

# Profilo de ZHOU ENLAI

verkita de

Percy Jucheng Fang


Lucy Guinong J. Fang

Esperantigita de **Wang Chongfang**

1989

**E-librigita de Elerno (2006)**

## **Memore al Zhou Enlai, la popola Ĉefministro**



Ĉefministro Zhou Enlai en la Popola Halo, la 9-an de januaro, 1973.

Foto de Giorgio Lotti (Italio)

### **RIMARKO DE LA TRADUKINTO**

Tiu ĉi libro estas tradukita laŭ la anglalingva originalo eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino. La notoj estas reguligitaj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

## ENHAVO

ĈAPITRO I La Morto de Ŝtatis

ĈAPITRO II La Junulo el Huai'an

ĈAPITRO III Karaktero de Heroo

ĈAPITRO IV Familia Rondo

ĈAPITRO V La Ĉefministro kaj la Popolo

ĈAPITRO VI *Maŭtaj*-o por Tablotenisa Ludantino

ĈAPITRO VII Perfekta Dipomato en Agado

ĈAPITRO VIII Ne Dioj, Sed Homoj

ĈAPITRO IX Sovaĝeco de la "Kultura Revolucio"

ĈAPITRO X Servoplumado en Hospitala Lito

# ĈAPITRO I

## La Morto de Ŝtatisto

Tiun junian tagon de 1975 Zhou Enlai kontraŭ ĉies atendo venis partopreni en la funebra soleno honore al He Long, marŝalo de Ĉina Popola Liberiga Armeo (PLA), vicĉefministro kaj membro de la Politika Buroo de la Komunista Partio de Ĉinio. Ekde la somero de 1974 Zhou estis homo serioze malsana sub intensa kuracado kontraŭ kancero de urina veziko. Sed malgraŭ la konsilo de siaj kuracistoj li eliris el la hospitalo por omaĝi al la mortinto, kiu suferis grandan mistraktadon en la “kultura revolucio”. La ĉefministro opiniis, ke li devas montri al la historio, kie devas stari homo kun honoro kaj honesteco, kaj esprimi siajn verajn sentojn tiam, kiam aferoj pri principo estas koncernataj.

He Long (1906-1969), unu el la plej fruaj viktimoj de la “kultura revolucio” de 1966-1976, estis persekutita ĝis morto de Lin Biao (Lin Bjaŭ), ankaŭ marŝalo de la Popola Liberiga Armeo, kiu leviĝis al la dua pozicio post Mao Zedong en tiu ĉi senprecedenca politika movado por la plej supera aŭtoritato. Tamen en 1974 laŭ la ordono de la Partia Centra Komitato He Long estis postmorte senkulpigita malgraŭ la furioza kontraŭstaro de la “kvarpersona bando”, gvidata de Jiang Qing (Ĝjang Ĉing), la edzino de Mao. La anoj de la bando estis la politikaj kaj ideologiaj aliancanoj de Lin Biao, kiu mortis en aviadila kraŝo en 1971. Rehonorigi He Long en la okuloj de la publiko estis anatemo al Jiang Qing kaj ŝia bando. Ili malhelpis la proponon komence kaj, kiam ĝi fariĝis nebarebla, ĉiel klopodis malgravigi kaj limigi la ceremonion.

Zhou Enlai alvenis kun sia edzino Deng Yingchao (Deng Jingĉaŭ) por aliĝi al limigita

nombro da funebrantoj. Perfekte eleganta kiel kutime, en vesto zorge gladita kaj sen eĉ unu haro hirta, li tamen aspektis konsiderinde maljuniĝinta; nur la vizaĝtraĵoj sugestis lian antaŭan fortikecon. Lia malgrasiĝinta korpo malrapide moviĝis al la registrolibro de ĉeestantoj kuŝanta sur tablo, kaj la mano tenanta la penikon forte tremis, dum ĝi skribis la gloran nomon. La ĉefministro intencis fari subskribon ankaŭ por vicĉefministro Deng Xiaoping (Deng Ŝjaŭping), kiu tiam estis kun iu vizitanta fremdlanda delegacio, sed la fortostreĉo ŝajnis tro granda por li. Li donis instrukcion, ke la registrolibro estu sendita al la hejmo de la vicĉefministro, por ke tiu aldonu sian subskribon.

Zhou sciis, ke lia plej kompetenta helpanto volus esti kun ili en tiu momento, ĉar ambaŭ ili havas longajn memorojn pri He Long. Heroo simila al Robin Hood<sup>1</sup> dum sia juneco, li kun sia brava pliaĝa fratino He Ying prirabis la riĉulojn por helpi la malriĉulojn en sia naskiĝloko Sangzhi-gubernio, Hunan-provinco en la unuaj 1920-aj jaroj<sup>2</sup>. Post sia soldatiĝo la junulo rapide promociiĝis kaj fariĝis oficiro diviziokomandanta jam en sia aĝo de apenaŭ tridek jaroj. En aŭgusto de 1927, kiam Zhou Enlai gvidis fortojn de la Komunista Partio en armita leviĝo en la sud-ĉina urbo Nanchang, Jiangxi-provinco, He Long ribelis kontraŭ Kuomintang<sup>3</sup> kaj transvenigis siajn trupojn al la flanko de la komunistoj; post tio li servis al la revolucia afero kun sindonemo kaj lerteco. En la 1930-aj jaroj Ĉjang Kajŝek<sup>4</sup> anoncis prezon de 100 000 arĝentaj dolaroj por kapti lin mortinta aŭ viva.

Tri jarojn post la fondiĝo de la Popola Respubliko, li estis nomumita ministro estranta la Ŝtatan Komisionon de Korpokulturo kaj Sportoj, krom donado de multa influo kiel membro de la Komisiono pri Militaj Aferoj de la Partia Centra Komitato. Pipfumanto, kiu

poste al kutimiĝis al cigaroj, la generalo brile laboris en la Sporta Komisiono, ĉar li mem estis sportisto kaj amanto de ĉevaloj. La iompostioma kreskado de Ĉinio kiel sporta nacio en la 1960-aj jaroj ŝuldis ne malmulte al lia energia gvidado.

Unu el la grandfamaj personoj de la ĉina revolucio, He Long ĉiam estis intima al Zhou Enlai kiel kamarado kaj amiko ekde la Nanchang-a Leviĝo<sup>5</sup>, kio faris lin malplaĉa al Lin Biao. Tiu manipulis grandegan povon en la unuaj jaroj de la “kultura revolucio”, kaj ekde la komenco tiu ĉi ruza “kronprinco” kunagadis en akordo kun la “gvida Grupo de la kultura Revolucio” tenata en la manoj de Jiang Qing kaj ŝia bando<sup>6</sup>. La du kruelaj klikoj decidis kapti potencon per forigo de la plej intimaj kolegoj de Zhou Enlai – la unua paŝo en ilia zorge teksita agadplano.

Tre baldaŭ He Long fariĝis objekto de ilia atako, etiketita kiel “granda bandito” kaj “granda militaristo” kaj estis akuzita pri aliaj fantaziaj krimoj. Zhou prenis He Long kaj lian edzinon Xue Ming (Ŝjue Ming) sub sian protekton en Zhongnanhai, la centra sidejo de la Partio kaj registaro en la Malpermesita Urbo<sup>7</sup>. En la unuaj tumultoplenaj tagoj de la “kultura revolucio” eĉ Hongnanhai ne estis loko la plej sekura. Tial alia kaŝejo konata nur al liaj konfidatoj estis trovita por la persekutata paro. Ili portempe evitis la persekutadon de Lin Biao. Fine li elflaris ilian kaŝejon kaj ordonis alkonduki He Long tien, kie liaj lakeoj povis turmenti la maljunan militiston, kiam ajn ili volis. Lia edzino estis forpelita al fora angulo de sudokcidenta Ĉinio. Jam en la aĝo de pli ol sepdek jaroj, suferanta je diabeto, He mortis en la manoj de siaj turmentantoj la 9-an de junio 1969.

Ĝuste por honori la memoron de tiu ĉi maljuna kunbatalanto, kies aliĝon al la Kominista Partio li mem siatempe prirespondis, Zhou Enlai pene levis sin el sia malsanula

lito. Post sia subskribado en la registrolibro, li tuj elserĉis la vidvinon de He. Per ĉiuj fortoj, kiujn li povis kolekti en si, li vokis ŝin. Ŝi kuris al la ĉefministro, kiu ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ ŝin. “Mi malsukcesis, Xue Ming, mi malsukcesis lin protekti.”. Larmoj fonte fluis, dum li parolis. La filino de He Long premis lian manon. “Onklo Zhou, vi devas bone zorgi pri vi mem.”

La ĉefministro rigardis ŝin por momento. Poste en trema voĉo, koncize kaj korŝire, aŭdiĝis la vortoj: “Nun jam ne longa estos mia tempo.”<sup>8</sup>

Sep monatojn poste, la 8-an de januaro 1976, Zhou Enlai, la ĉefministro de la Popola Respubliko dum pli ol kvarono da jarcento, forlasis por ĉiam tiun ĉi mondon.

La novaĵo pri la morto de la ĉefministro frapis la landon ĝis muteco. Oni ne sciis, kiel la vakanteco, kiun estigis lia perdo, povos iam esti plenigita. Dum la ĥaosaj jaroj de la “kultura revolucio” li pene streĉis ĉiujn siajn fortojn, portante la pezegan ŝarĝon de la registaro, kaj plenenergie laboregis por teni la administracion en unueco.

Malĝojo premis ĉies koron. Li ne estis ordinara ĉefministro, nek ordinara homo. Li estis homo el la popolo, por la popolo, kun la popolo. Lia forpaso en ordinaraj tempoj sendube kaŭzus grandegan malĝojon. Sed tiam ja ne estis ordinaraj tempoj. Vere, Lin Biao jam mortis, sed la “kvarpersona bando” – Jiang Qing, la malica karieristino dezireganta levi sin al la plej alta pozicio, Zhang Chunqiao (Ĝang Ĉunĉjaŭ), la artifikulo avida je uzurpo de la ĉefministreco, Yao Wenyuan (Jaŭ Ŭenjŭan), la malnobla verkistaĉo tenanta en siaj manoj la novaĵ-komunikilojn, kaj Wang Hongwen (Ŭang Hongŭen), la virinĉasemulo, kiu estis aventurema konspiranto de la bando – estis ankoraŭ en aktiveco, nun pli senpacienca ol iam ajn por kapti la regstangojn de la potenco.

Deng Xiaoping, preparita por transpreni la ĉefministrecon depost sia transposteniĝo de Sichuan-provinco al Pekino en la malfruaj 1950-aj jaroj kaj nomumita aganta ĉefministro dum la eksterlandaj vojaĝoj de Zhou Enlai, nun estis pli kaj pli senbride atakata en la gazetaro kiel “nerebonigebla iranto de la kapitalisma vojo”. La inundo da gazetaraj atakoj al la vicĉefministro estis malicega, kaj ofte estis traplektita per insultoj direktitaj kontraŭ la forpasinta ĉefministro.<sup>9</sup>

Jiang Qing kaj ŝia bando ĝojegis kredante, ke la potenco kiel de la Partio tiel ankaŭ de la ŝtato finfine venos en iliajn manojn. Tiuj, kiuj emis flati potenculojn, konkure kroĉis sin al Jiang Qing. Kaj ŝi mem estis sufiĉe senskrupula por fari varbadon. Ĉio ĉi tio faris la perdon de Zhou Enlai des pli neelteneble dolora. La nacio lasis sian emocion malkaŝiĝi en la 11-a de januaro, la tago difinita por lia kremacio.

Estis malhele kaj malvarme tiun tagon. Apenaŭ matenkrepuskiĝis, amasoj kaj amasoj da homoj, inkluzive de gepatroj portantaj infanetojn en siaj brakoj, jam komencis kolektiĝi sur la trotuaroj por atendi la ĉerkveturilon, kiu estis elveturonta el la Pekina Hospitalo por komenci sian solenan procesion al la Babaoshan-a Tombejo de Revoluciuloj. Estis pluraj milionoj. Ĉiu colo de la trotuaroj okcidenten al Babaoshan estis okupita, tie kaj ĉi tie triaŭ kvarvice, kun plej granda homamaso kolektiĝinta sur Tian'anmen-placo<sup>10</sup>. Ĉie vidiĝis nigraj brakrubandoj. Virinoj junaj kaj maljunaj portis en siaj haroj hejme-faritan blankan paperkrizantemon. La funebra procesio moviĝis malrapide, tre malrapide, en la muziko de funebra marŝo. Kiam ĝi alproksimiĝis, retenata plorsingulto turniĝis en neregeblan ploregon laŭlonge de tiu ĉi Pekina ĉefvojo, ordinare trafikbruanta kaj nun tamen dronanta en prema muto, escepte de la flustrado de la rampantaj veturiloj kaj la sonoj de homa



plorado.

Malgraŭ la akra malvarmo la loĝantoj de la ĉefurbo staris sinsekvajn horojn, atendente la preterpason de la ĉerkveturilo de la ĉefministro. Ilin firmigis io pli ol malĝojo. Tio estis la amo al la ĉefministro kaj la malamo kontraŭ la bando de Jiang Qing, kiu faris sian plejblon lin kalumnii.

Jam de longe oni indignis kontraŭ la eksterordinara konduto de Jiang Qing kaj ŝia bando kaj kontraŭ la maniero, kiel la aferoj estis irantaj en la lando, sed oni devis teni siajn opiniojn kaj sentojn kaŝitaj, ĉar la riskoj de senmaska oponado estis tro grandaj. En la tagoj post la morto de Zhou Enlai oni fariĝis pli kuraĝaj. Kvankam malkontenteco ankoraŭ ne publike montriĝis, tamen jam rondiris multaj famoj, kiuj disvastiĝis kaj fariĝis pli kaj pli spitemaj.

La naŭzaj agoj de Jiang Qing ĉe unu publika ceremonio servis kiel oleo verŝita sur fajron. Kiam ŝi, laŭ la postulo al ĉiuj membroj de la Politika Bruoo, faris omaĝon al la korpo de la ĉefministro antaŭ la kremacio, ŝi portis, kontraŭatende, ruĝan ĵerzon, kiu estis facile videbla ĉe la kolumo de ŝia tuniko. Ŝi portis ankaŭ ĉifitan ĉapon, kapveston nekutiman en tia solena okazo laŭ longe observata moro, nigro aŭ blanko estas deca koloro de funebro, dum ruĝo estas asociita kun feliĉo aŭ ĝojo. La novaĵo rapide disvastiĝis kaj ĉiu estis surprizita kaj indignigita. Des pli ŝoka estis tio, kion ŝi faris en la 15-a de januaro, la tago proklamita por nacia funebro, kun malpermeso al ĉiaj amuzoj. El ĉiuj tagoj Jiang Qing elektis tiun ĉi por spekti du filmojn en sia hejmo, unu antaŭtagmeze kaj la alian vespere!

Ŝiaj servantoj singarde atentigis ŝin, ke la 15-a de januaro estas tago de nacia funebro,

sed ili estis repuŝitaj. Lojalaj al la memoro de la ĉefministro, ili estis indignigitaj. Eble ili diris tion al aliaj. Kiel ajn estis, la novaĵo disvastiĝis. Tamen kritikoj restis kaŝitaj kaj esprimiĝis nur inter amikoj aŭ parencoj. Ja ŝi estis la edzino de Mao Zedong, kaj pro respekto al la prezidanto oni regis sian indignon. Tamen montriĝis signoj de kordoloro kaj maltrankvilo. Kia la lando jam fariĝis, se iu individuo, kiel ajn altranga, povis konduki senpune kiel ŝi, dum la popolamaso ricevis riproĉon nur pro peto de la permeso okazigi funebran ceremonion por la forpasinta ĉefministro?<sup>11</sup>

Post tri monatoj eventoj drame ŝanĝis la situacion. Estis aprilo, la tempo de *ĉingming*, la ĉina Festo de “Klaro kaj Brilo”. En tiu ĉi tempo ĉiujare oni en la malnova Ĉinio faris sian filan devon al siaj prapatroj per “balaado de la tomboj”, kaj en la nova ili honoras siajn karmemorajn mortintojn per floroj. Tial pekinanoj decidis memori Zhou Enlai per floroj – ne veraj floroj, ĉar la printempa vetero ankoraŭ estis tro kruda, sed paperaj. Ili ankaŭ kaptis tiun ĉi okazon por elverŝi sian obstrukcitan malkontentecon kaj sendis mesaĝon al Jiang Qing

Tian’anmen-placo estis atestanto de multaj granda politikaj eventoj. Nun, en 1976, alia grava politika movado estis en prepariĝo, kvankam nur malmultaj, eble neniu, antaŭvidis ĝian maksimuman signifon. Ĉar ĉi tie la pekinanoj per subita fortego malfermis la kluzpordon de la retenata kolero kaj disreviĝo. Tio estis la komenco de la falo de Jiang Qing kaj ŝia bando.

Estis menciinde, ke en la tuta historio de la Popola Respubliko oni neniam metis florkronojn por iu ajn individua revolucia gvidanto ĉe la Monumenton al la Popolaj Herooj en la festo *Ĉingming*. Tamen tiujare preterpasantoj kun intereso trovis kelkajn kuŝantajn ĉe

la piedo de la obelisko, kun aŭ sen la nomo de la sendinto sur ili. Ili estis oferitaj al la ĉefministro Zhou Enlai. La novaĵo elektris Pekinon. Pli multaj aperis, poste pli kaj pli multaj. Ili venis kvazaŭ lavango, ĉiu kun la nomo de la sendinto, plejofte tiu de institucio aŭ organizaĵo, okulfrape skribita. Oni ne plu timis publike deklari sian starpunkton. La florkronoj multiĝis, kreskis en grandeco kaj skalo kaj, kio estas signifoplena, alprenis politikan koloron per la surksriboj alkroĉitaj al ili. La tempoelekto, la kvanto, la identeco-montro, la maniero de la marŝantoj – ofte pluraj dekoj da homoj, kiuj portis la florkronojn sur siaj ŝultroj al la placo – kaj la ĵuroj, kiujn ili faris dum la metado de la forkronoj antraŭ la monumento, portis en si evidentan defion kaj malestimon al Jiang Qing kaj ŝiaj favoratoj.

En la unuaj kelkaj tagoj tiuj ĉi florkronoj, diversaj, delikate projektitaj kaj faritaj, jam kovris la tutan spaco ĉirkaŭ la monemento. Subite ili estis anstataŭitaj de miriadoj da poemoj algluitaj sur la balustradoj de la monemento, sur la lampostangoj kaj eĉ sur arboj sur kaj ĉirkaŭ la spaco. Ili estis himnoj kaj elegioj al Zhou Enlai, skribitaj en klasika stilo aŭ liberaj versoj. Sin trovis ankaŭ poemoj de tute alia karaktero, alegoriaj atakoj al Jiang Qing kaj ŝia bando. Pli ol la florkrono, tiuj ĉi forte atakantaj poemoj, saturitaj per kolero kaj malestimo, altiris centojn da miloj da homoj al la placo ĉiutage, iuj por sekvi la ekzemplon kun siaj propraj poemoj, kaj aliaj por kopii la plej akrajn por montri al amikoj.<sup>12</sup>

De frua mateno ĝis profunda nokto ne ĉesis la homfluoj konvergantaj al la placo. La poemoj de Tian'anmen fariĝis absorba temo de konversacio. Multaj iris tien ĉiutage por ne preterlasi la freŝe algluitajn. La plejparto el la alvenantoj estis junuloj el lernejoj, fabrikoj

kaj registaraj oficejoj, sed videbliĝis ankaŭ maljunaj homoj.

Maljuna kamparano kun vizaĝo veterskulptita, ŝajne el agrikulturejo en la ĉirkaŭurbo de Pekino, alvenis iun posttagmezon, vestita en vatita pantalono, kotmakulita pro kampa laboro, kaj vatita jako kun zono ĉiurkaŭ la talio. Li trovis al si kvietan lokon kaj tie, kun la kapo klinita, silente staris kelkajn minutojn. Li elprenis du oranĝojn el sia nebutonita jako kaj, tiel respektoplene kiel li povis, metis ilin apud balustradon. Riverencinte tri fojojn, li murmuris “Ĉefministro Zhou, Ĉefministro Zhou...” kaj foriris. Dezirante iel esprimi sin, li, probable analfabeta, kreis poezion en sia propra maniero:

La eksplodema situacio sur Tian’anmen-placo panikis la “kvarpersonan bandon”. La 5-an de aprilo ĝi ekagis. Tian’anmen-placo estis subite ĉirkaŭita de polickordono, kaj ĉiuj enfermitaj en la ringo estis forkondukitaj de la polico. Multaj estis arestitaj; la tiama pekina policestro estis lojalulo de la bando.

La 7-an de tiu monato vicĉefministro Deng Xiaoping, jam senigita je laborrajto de post sia oracio-dono ĉe la funebra soleno al Zhou Enlai en januaro, estis eksigita de ĉiuj siaj oficoj<sup>13</sup>. Li estis akuzita pri “instigado de kontraŭrevolucaj tumultoj sur Tian’anmen-placo” – fabrikita akuzo, kiu estis definitive nuligita nur unu jaron poste.

En la sekvantaj semajnoj ĉiu pekinano devis klarigi, kion li faris kaj kie li estis en la unua semajno de aprilo – ĉu li vizitis Tian’anmen-placon, skribis iajn ajn poemojn, kopiis poemojn aŭ montris ilin al amikoj, kaj tiel plu. Tra la tuta somero daŭris la subpremado. La persekutado ŝanĝiĝis en serĉadon de personoj suspektataj pri disvastigo de tio, kio estis nomata “onidiroj pri kamaradino Jiang Qing.”

Ŝi kaj ŝiaj subtenantoj estis timigitaj de la eventoj sur Tian’anmen-placo, sed nun ili

ree estis memfidaj. Ili faris miskalkulon. Fiaskis ilia komploto kapti la potencon post la morto de Mao Zedong en la 9-a de septembro. En la 6-a de oktobro tiuj ĉi potencomanipulantoj, kiuj rajdis sur la dorsoj de la popolo dek longajn jarojn, estis tuj kaj tute arestitaj. La novaĵo, kvankam ne raportita en la ĵurnaloj ĝis multajn tagojn poste, rapide disvastiĝis. Ĝi ŝajnis tro bona por esti vera. Amikoj kaj parencoj penis pli frue informi unu alian pri la sensacia evento. La ĝojego pro la subita fino de dek jaroj da tiranismo transformis Pekinon en drinkeman urbon en unu nokto. En nur kelkaj tagoj elĉerpiĝis la stokoj de ĉiuj alkoholaĵaj vendejoj en la ĉefurbo. Eĉ tiuj, kiuj neniam tuŝis guton, senescepte drinkis por celebri la falon de Jiang Qing.

Strange dirie, la pli bonaj hospitaloj en la ĉefurbo eĉ trovis kelkajn el siaj malsanulaj ĉambroj vakantaj de pacientoj post tiu nokto. Ĉar nombro da altrangaj kadroj restis en hospitaloj ja por meti kelkan distancon inter si kaj la malico de Jiang Qing. Sentante sin nun sekuraj, ili reiris tien, kie ili antaŭe laboris, por repreni siajn devojn kaj reordigi la aferojn.

La fakto, ke tiam estis oktobro, la komenco de la krabosezono, helpis fari la areston de la “kvarpersona bando” (tri viroj kaj unu virino), kio estis io vere gajiga. Ordinare kraboj estas vendataj en Ĉinio popare – po unu virseksa kaj unu unseksa, kaj oktobro estas la monato, kiam aĉetantoj preferas la insecsajn pro la sezona riĉa ovfaro. Laŭdire iu sprita aĉetanto faris jenan peton al fiŝvendisto: “Tri virseksajn kaj unu insecsan, mi petas.”

La fiŝvendisto surpriziĝis. “Sed mi povas havigi al vi du virseksajn kaj du insecsajn, kamarado.”

La aĉetanto ripetis la peton kun okulsigno: “Mi ne volas la alian insecsan. Lasu al mi

havi ĝuste mian tri-kaj-unu.”

La akcento en lia voĉo estis sur “unu”. La fiŝvendisto, fine ekkompreninte la signifon, kore ekridegis. Aliaj aĉetantoj ŝatis la ŝercon kaj ĉiuj komencis fari la saman aĉeton – de tri virseksaj kaj unu ineksa. Baldaŭ tio ĉi fariĝis la norma aĉeto ĉe ĉiuj markreskaĵaj vendejoj, kaj la ŝerco treege plaĉis al ĉiu. La tago de repago jam venis.

La jaro 1976 estis eventoplena por Ĉinio. Zhou Enlai forpasis la 8-an de januaro. Lia morto estis sekvita en la 6-a de julio de tiu de marŝalo Zhu De (Ĝu De) (1886-1976), la granda veterano de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiu estis prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, kaj poste en la 9-a de septembro de la morto de Mao Zedong (1983-1976). La perdo de la tri grandaj gvidantoj de la ĉina revolucio en rapida sinsekvo estis terura frapo al la lando, sed tio ne estis ankoraŭ ĉio. En la 28-a de julio al la malfeliĉoj aldoniĝis la katastrofo de Tangshan-tertreto, kiu en kelkaj sekundoj mortigis kvaronmilionon da homoj. En tiu ĉi senco, 1976 estis jaro de ruinigo. En alia – ke la lando estis senigita je la “kvarpersona bando” – ĝi estis jaro de saviĝo. La lastajn monatojn de 1976 oni estis en ekzaltiĝo, plena de esperoj je pli bona estonteco kaj preta rekonstrui la strukturon de la frakasta lando.

Dek jaroj de tumulto senfortigis Ĉinion en ĉiu sfero de la vivo. En politikaj rilatoj, la “Kultura revolucio” estis ekstreme doloriga por multaj kadroj, kiuj antaŭe estis energiaj kaj diligente laboris, plenumante oficojn ĉe diversaj niveloj de gvidado. Ili nun timis tro multe peni aŭ ree enfali en malagrablan situacion por sia troa diligenteco en sia laboro: Unu fojon mordita, duan fojon tŝimema. Ili falis en staton de inerteco, la plej granda malamiko de progreso. Ekonomie , la lando estis ĉe la rando de bankroto, parte pro la

malleviĝo aŭ stagno de produktado kaj grandnombra defcito de la fisko, parte pro rapida kaj senbrida plimultiĝo de beboj naskitaj dum la “kultrua revolucio”. Por Ĉinio nutri miliardon da buŝoj ja estas afero ne facile solvebla. En la sfero de edukado la niveloj malaltiĝis, tiel ke la ĝenerala nivelo ĉe superaj lernejoj estis sprite priskribita jene: la grado estas tiu de universitato, la lernoprogramo tiu de mezgrada lernejo, kaj la efektiva plenumado tiu de elementa lernejo. Tio ĉi kompreneble estis troigo. Sed la politiko de Jiang Qing kaj ŝia bando ataki ĉefe intelektulojn ja instigis al malklereco kaj multe malgravigis kaj demoralizis la homojn en akademiaj sferoj. Kiam ilia preferata esprimo estis: “ju pli multe oni scias, des pli reakcia oni estas”, scioj fariĝis ne io utila, sed malavantaĝo. Por ke klereco estu denove respektata, la grava afero post la falo de Jiang Qing estis krei kondiĉojn, kiu relevigos al la deprimitaj intelektuloj ilian kapon.

Oni devis doni antaŭecon al la revivigo de la ekonomio, ĉar antaŭ ĉio miliardo da homoj devas esti nutrataj kaj vestata. Samtempe tri demandoj postulis urĝan solvon: unue, fari personaran rearanĝon; due, klarigi la kriterion de la vero – ĉu Mao Zedong estis ĉiam prava, aŭ li povis fari erarojn (ĉi-okaze ili do bezonis esti ĝustigitaj); kaj trie, fari verdikton pri la “kultura revolucio”.

Rilate la unuan, unu prudenta politiko estis alprenita por konservi stabilecon kaj solidarecon en la Partia hierarkio per provizora retenado de la erarintaj membroj de la Politika Buroo kaj per enverŝo de sango nova, kaj ankaŭ “bona” malnova, en ĝin. Tre rimarkinde, la populara Deng Xiaoping estis reinstalita al ĉiuj siaj kvar antaŭaj postenoj la sekvantan jaron. Kvar obstinaj membroj de la Politika Bruoo, implikitaj iel aŭ aliel en la krimo de la bando de Jiang Qing, estis eksigitaj nur post la printempo de 1980. ili estis

Wang Dongxing (Ŭang Dongŝing), vicprezidanto de la Centra Komitato de la Partio, Ji Dengkui (Ĝi Dengkui), vicĉefministro, Chen Xilian (Cen Ŝjiljan), vicĉefministro kaj iama komandanto de la Pekinaj Militaj Trupoj de la Popola Liberiga Armeo, kaj la urbestro de Pekino, Wu De (U De).

La dua demando koncernis ĉefe la taksadon pri Mao Zedong kiel gvidanto, pensulo kaj teoriisto. Ĉu Mao estis ĉiam prava, kiel la kambicia kaj flatema Lin Biao lin deklaris, aŭ li povis fari erarojn kiel aliaj mortemuloj? Wang Dongxing, kiu komandis Trupunuon 8341 – la divizion de PIA destinitan por doni sekurecon al la prezidanto, la ĉefministro kaj aliaj gvidantoj en Pekino – havis la opinion, ke la vortoj de Mao Zedong, kion ajn li diris aŭ skribis, devas esti sekvataj, ĉar Mao, Wang asertis, estis ĉiam prava.<sup>14</sup> Tiun ĉi rigidan opinion oni mallongige nomis *kioajnismo*.

Multaj varme diskutadis pri la demando. En la printempo de 1978 ĝi estis solvita per longtempa kaj ĝisfunda debato pri la kriterio de la vero – kiel oni povas decidi, kio estas ĝusta kaj kio erara? Deng Xiaoping firme subtenis la vidpunkton, ke senkonsidere kiu diris kion, praktiko estas la kriterio de la vero, la sola kriterio. Tio ĉi estis prezentita en lia parolado al la militistoj en Pekino tiun someron, kio efektive subtenis la tezon elmetitan unuafoje de docento de la Nankina universitato en artikolo aperinta en Pekina *Guangming Ribao*, tagĵurnalo publikigita ĉefe por akademiaj sferoj.<sup>15</sup> La vidpunkto estis energie subtenata kaj la argumento de la “kioajnismo” estas energie subtenata kaj la argumento de la “kioajnismo” estis frakasita. La evidenta konkludo, kvankam ne eksplicite klarigita en tiu tempo, estis ke Mao Zedong, kiel ajn grandaj estis liaj kontribuoj al la ĉina revolucio, povis fari erarojn, kio estis pruvita iagrade de la eksceso kaj damaĝoj de la “kultura



revolucio”.

Rilate la trian demandon, se jam estis atingita samopinieco pri la kriterio de la vero, estis ne malfacile fari juĝon pri la “kultura revolucio”. Dum Jiang Qing kaj ŝia kliko estis en potenco, la temo kompreneble estis tabuo, ĉar estis ĝuste ili, kiuj ludis la grandan rolon en tiuj tumultaj jaroj kaj nature ne volis aŭdi siajn krimojn malkovritaj. La fakto, ke eĉ post ilia falo la partio devis dediĉi tri jarojn al la plenumado de la malagrabra tasko verdikti kontraŭ la “kultura revolucio”, montras, kiel malfacile solvebla estis la demando. En 1979 marŝalo Ye Jianying (Je Ĝjanjing), farante la nacifestan paroladon kiel prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso – en efektiveco, se ne en nomo, ankaŭ por la Centra Komitato de la Partio – traktis rekte tiun ĉi tiklan demandon. Ĉio do estis la verdikto, kiun li eldiris pri la dekjara “kultura revolucio”? Jardeko da katastrofo.

Du jarojn poste, en longa rezolucio aprobita de la Plena Sesio de la Partia Centra Komitato la 27-an de junio 1981, kiu pritraktas kelkajn gravajn eventojn depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la Partio faris plian paŝon por kondamni, en kategoriaj vortoj, la “kulturan revolucion” iniciatitan kaj direktatan de Mao Zedong.<sup>16</sup> La “kultura revolucio” estis erara en ĉiu aspekto, de la komenco ĝis la fino, ĝi diris: Erara en ideo, erara en plenumado, erara en politiko, erara en plenumado. Ĝi alvokis, ke la tuta popolo, homoj en kaj ekster la Partio, rekonu ĝin kiel tian kaj elradikigu ĝiajn malutilajn sekvojn. “Esktrem-maldekstraj” ideoj kaj praktikoj, kiuj superregadis dum tiu ĉi bedaŭrinda periodo, ne devas esti permesataj ekzisti plu, en ia ajn formo aŭ maskvesto, ĝi avertis, ĉar se Ĉinio ne estas liberigita de tiaj politikaj movadoj, la lando ne povas progresi kaj daŭrigi sian multebezonatan modernigon.

En la ekzamenado de la gravegaj demandoj, kiujn la lando alfrontis, la brilaj personecoj de du homoj nepre aperis en la pensoj de iliaj antaŭaj kamaradoj kaj kolegoj, kiam tiuj ĉi konsideris prenotan agadplanon. Unu estis, kompreneble, Prezidanto Mao Zedong, kaj la alia Ĉefministro Zhou Enlai. Estas domaĝe, ke la rekono de politikaj eraroj, kiuj makulis la bildon de la prezidanto en liaj lastaj jaroj, devis esti tiom longe prokrastita, ĉar li, malgraŭ la eraroj, pli ol iu ajn alia individuo – ne escepte eĉ de Zhou Enlai – estis la homo, kiu projektis kaj realigis la fondon de la Popola Respubliko. Lia loko en historio estas certigita. Timo pri sobra taksado pri li povas nur nebuligi liajn atingojn kaj tiel obskurigi lian grandecon.

La influo de Zhou Enlai sur la lando kaj interne de la Partio restis nemalgrandigita post lia morto. En efektiveco lia staturo kreskis. En parolado al kadroj de la Partio pri la taskoj, kiujn la lando alvizaĝis, en la 16-a de januaro 1980, Deng Xiaoping aparte citis la nomon de Zhou Enlai, ĉiama modelo de diligenta laboro kaj simpla vivo, kiel ekzemplon sekvidan, kiam li alvokis, ke ĉiuj estu fidelaj al la severmora spirito de la Yan'an-aj tagoj<sup>17</sup> kaj estu gvidataj de tiu ĉi tradicio por efektiviĝi la programon de la modernigo en Ĉinio post la morto de Mao.<sup>18</sup>

Ĉu kiel politika komisaro, ĉu kiel armea generalo, ĉu kiel partia gvidanto, ĉu kiel ĉefo de registaro, Zhou Enlai neniam ŝparis sian penon. Li laboris longajn horojn ĉiutage, kio karakterizis lian ĉefministrecon de 1949 ĝis la tago, kiam li mortis. Li kaj lia edzino vivis simplan, treege ŝpareman vivon, kaj nur tiam, kiam liaj subuloj publikigis siajn rememorojn, oni eksciis ion pli pri liaj modesteco kaj abnegacio

Tia li estis ne nur rilate sian personan vivon, sed ankaŭ rilate la ŝtatajn aferojn. Li

firme tenis la ŝtatan fiskon. Li admonis, ke ĉiuj registaraj departementoj singarde uzu ĉiun groŝon, ĉar Ĉinio, li neniam laciĝis atentigi ilin, estas malriĉa lando, kiu devas praktidi ŝparadon.

Zhou Enlai personigis malegoismon. Tiuj ĉi kvalitoj de la homo kaj la ŝtatisto faris lin folkloro heroo. En la historio de la moderna Ĉinio neniu homo post sia morto estis pli sopirata kaj funebrata, pli amata kaj respektata, ol Zhou enlai, post kiam lia koro ĉesis bati la 8-an de januaro 1976.

Ĉiu homo estas mortema. Iuj ne povas elteni la penson pri morto, dum aliaj rigardas ĝin kiel aferon naturan. Zhou Enlai kaj Deng Yingchao diskutis pri la afero kelkajn jarojn antaŭ la “kultura revolucio” kaj decidis ke, kiam la tempo venos al ili por foriri, ili disŝutigos sian cindron post kremacio. De enterigo al kremacio estas revolucia paŝo en Ĉinio, ili asertis, kaj de kremacio al nekonservo de cindro estas ankoraŭ alia. En siaj lastaj tagoj Zhou Enlai petis, ke lia cindro estu disŝutita sur la teron kaj riverojn de la lando, kiu lin naskis. Li petis ankaŭ, ke antaŭ la disŝuto oni ripozigu lian cindran urnon en Taiwan-ĉambro de la Popola Halo. Kiel dum sia vivo, Zhou Enlai ĉe la morto ankoraŭ nutris en sia koro la esperon pri la reunuiĝo de la insula provinco Taiwan kun la ĉeftero.

**Notoj:**

1. Robin Hood: Legenda angla heroo de la 12-a jarcento, kiu prirabis riĉulojn por doni al malriĉuloj. – Trad.

2. He Long komencis sian makisanan vivo en la Hunan-a kamparo, kie, laŭ revolucia folkloro, li kaj lia fratino svingis paronj da kuirejaj tranĉiloj kaj ĵetis teruron sur la lokajn firiĉulojn. Kion li prenis de la riĉa, li donis al la malriĉa, kaj tiu ĉi epizodo estis uzata de Lin Biao por kalumnii He Long kiel “grandan banditon” en la komenco de la “kultura revolucio”.

3. Kuomintang: Ĉina partio fonidita de d-ro Sun Yat-sen. Post lia morto Ĉjang Kajŝek prenis al si la gvidantecon de la partio. Antaŭ la fondiĝo da la Popola Respubliko ĝi estis la reganta partio. Ĝi praktikis la politikon subpremi la popolon kaj fine ĝia reĝimo estis renversita de la Popola Revolucio. – Trad.

4. Ĉjang Kajŝek: (1887-1975), estro de Kuomintango. Tenante la potencojn militan kaj politikan, li praktikis aŭtokratan regadon en Ĉinio. Post la venko de la Popola Revolucio en 1949 li kun siajn restantaj fortoj fuĝis al Q\aiwan-insulo kaj tie li mortis en 1975. – Trad.

5. Nanĉang-a Leviĝo: En la 1-2 de aŭgusto 1927, Zhou Enlai, Zhu De, He Long, Ye Ting, Liu Bocheng k.a. gvidis la trupojn el 30 000 personoj, sub la influo de la Komunista Partio, okazigi armitan leviĝon en la urbo Nanchang, Jiangŝi-provinco. Zhou Enlai estis la sekretario de la Frontlinia Komitato. Tio estis la komenco de la armita revolucio, kiun sendepende gvidis la Komunista Partio. Tiu tago poste estis difinita kiel la Fondiĝa Festo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. – Trad.

6. En la Dekunua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (KPCĈ), okazigita dum la 1-a de aŭgusto 1966, la membraro de la Kontanta Komitato de la Politika Buroo pliiĝis de sep al dek unu. La nova listo inkluzivis Mao Zedong, Lin Biao, Zhou Enlai, Tao Zhu, Chen Boda, Deng Xiaoping, Kang Sheng, Liu Shaoqi, Zhu De, Li Fuchun kaj Chen Yun. Lia Shaoqi, kiu rangis tuj sub la prezidanto de la Partio Mao Zedong antaŭ la sesio, estis malaltigita al la oka loko, dum Lin Biao estis altigita al la malnova loko de Liu Shaoqi. Post la sesio Lin Biao fariĝis, kaj estis regardata kiel, la unusola vicprezidanto, sed nur post la Naŭa Kongreso de la Partio en 1969 li estis oficiale deklarita postvenonto al prezidanto Mao Zedong en la Statuto de la Partio, kio estis senprecedenca en la historio de la internacia komunista movado.

7. Malpermesita Urbo: antaŭ la Revolucio de 1911, en la mezo de la malnova urbo de Pekino troviĝis Malpermesita Urbo, en kiu situis la Beihai (Norda Maro), Zhonghai (Meza Maro) kaj Nanhai (Suda Maro). Tie estis ĝardenoj de la imperiestro. Poste la ĝardeno Beihai estis malfermita al la Publika kiel parko kaj Zhongnanghai (la lagoj Zhonghai, Nanhai kaj la ĉirkaŭaĵo) fariĝis sidejo de la tiama registaro. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, Zhongnanghai estis la sidejo de la Centra Popola Registaro kaj la Centra Komitato de KPCĈ. – Trad.

8. “Onklo Zhou Ĉiam Vivas” skribita de He Xiaoming, la pliĝa filino de He Long, en *Laborista Tagĵurnalo*, Pekino, en la 7-a de januaro 1979.

9. En la 5-a de januaro 1975 la Centra Komitato de KPCĈ nomumis Deng Xiaoping vicprezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de KPCĈ kaj estro de la Ĉefstabo de la Popola Liberiga Armeo. La Dua Plena Sesio de la Deko Centra Komitato de KPCĈ (8-a – 10-a de la januaro 1975) elektis lin kiel unu el la vicprezidantoj de la Partio kaj membron de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo. La Unua Kunsido de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso (13-a – 18-a de januaro 1975) elektis lin kiel vicĉefministron. Kiel anstataŭanto de Zhou Enlai alforĝita al la malsanula lito, li fariĝis la ĉefa atakcelo de Jiang Qing kaj ŝia kliko de konspirantoj.

10. Tian’anmen-placo: Unu el la plej grandaj placoj en la mondo. La 40-hektara placo povas enteni duonmilionon da homoj. Ĝi situas centre de Pekino. Norde de la placo estas la pordego Tian’anmen, kie Mao Zedong dekaris la fondiĝon de la Ĉina Popola Respubliko en la 1-a de oktobro 1949. Oriente troviĝas la Muzeo de la Ĉina Historio kaj la Muzeo de la Ĉina Revolucio. Kocidente estas la Popola Halo, la parlamentejo de Ĉinio. Kaj sude vidiĝas la Memorhalo al Prezidanto Mao, en kiu nun kuŝas la restaĵoj de la forpasinta Mao Zedong. Meze de la placo staras la Monumento al la Popolaj herooj 38 metrojn alta. – Trad.

11. Jiang Qing kaj ŝia bando, kiuj ankoraŭ tenis konsiderindan potencon en la tempo de la morto de Zhou Enlai, dekretis, ke funebrado por la ĉefministro devas esti reduktita al minimumo. Registraraj oficejoj kaj aliaj establoj estis ordonitaj “ne lasi la mortinton preme pezi sur la vivantoj”.

12. Ne estis preciza kalkulo pri la nombro de la poemoj, kiuj aperis sur Tian’anmen-placo dum la festo Ĉingming. La unua kolekto, kunmetita de instruistoj kaj studentoj de la Pekina Dua Fremdlingva

Instituto sub la homonimo “Tong Huai Zhou” (Ĉiuj sopiras Zhou), entenis plurajn centojn. Tiuj ĉi fariĝis konataj kiel *Tian’anmen-poemoj*.

13. Laŭ la decido de la Centra Komitato de KPĈ datita la 7-an de aprilo 1976 Deng Xiaoping estis senigita je la jenaj oficoj: vicprezidanto de la Centra Komitato de KPĈ, vecĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, vicprezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de KPĈ kaj estro de la Ĉefstabo de la Popola Liberiga Armeo.

14. La 7-an de februaro 1977 *Popola Tagĵurnalo, Tagĵurnalo de Liberiga Armeo* kaj la gazeto *Ruĝa Flago* kune publikigis ĉefartikolon rekomendantan la du “kio-ajn”: “Kio ajn estas decidita de Prezidanto Mao, tion ni nepre devas firme plenumi, kaj kio ajn estas instruciita de Prezidanto Mao, tion ni devas ĉiam sekvi.”

15. La artikolo “Praktiko estas la Sola Kriterio de la Vero”, la 11-a de majo 1978.

16. “Rezolucio pri Kelkaj Demandoj en la Historio de Nia Partio depost la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko”, konata mallongige kiel *Rezolucio pri la Historio de KPĈ (1949-81)*, estis redaktita de grupo da verkantoj sub Hu Qiaomu, membro de la Politika Buroo, kun Deng Xiaoping kaj Hu Yaobang funkciantaj kiel direktantoj. La dokumento, konsistanta el 38 sekcioj, resumas la historion de la moderna Ĉinio post la naskiĝo de la Popola Respubliko en 1949, kun politika bilanco de atingoj kaj malsukcesoj.

17. Yan’an estas urbo en la nordo de Shaanxi-provinco. De 1937 ĝis 1947 tie estis la sidejo de la Centra Komitato de KPĈ. Spitante la blokadon de Kuomintangaj trupoj kaj kondukante la Kontraŭjapanan Rezistmiliton, la Komunista Partio kaj la popolo de norda Shaanxi eltenis la plej malfacilajn tagojn. – Trad.

18. “La Nuna Situacio kaj la Taskoj antaŭ Ni” en Elektitaj Verkoj de Deng Xiaoping, p. 224.

## ĈAPITRO II

### La Junulo el Huai'an

La estonta ĉefministro de Ĉinio naskiĝis en la 5-an de marto 1898, en malriĉiĝinta mandarena familio en Huai'an-gubernio, Jiangsu-provinco, ĉe la orienta marbordo. Li estis samaĝa kiel Liu Shaoqi, la ŝtatestro de Ĉinio ĝis tiam, kiam la “kultura revolucio” ĵetis lin en politikan Limbon kaj lin pereigis en 1969.

Ĝis la mezo de la 19-a jarcento la prapatra hejmo de Zhou-familio estis en Shaoxing, en la najbara provinco Zhejiang, gubernio fama pro du aferoj – rizvino kaj sekretarioj de mandarenaj oficejoj aŭ, kiel oni malŝate nomis, ĉikanistoj (la drinkaĵo estas ankoraŭ grandkvante produktata sed la ĉikanistoj jam antaŭ longe malaperis). Shaoxing meritas alian honoron kiel la naskiĝloko de la ĉina elstara verkisto Lusin<sup>1</sup>, la satiristo kaj novelisto, kies talento por sarkasmo povas esti komparata kun tiu de Jonathan Swift<sup>2</sup>. Zhou Panlong, la avo de Zhou Enlai, transloĝigis la familion de Shaoxing al Huai'an, post kiam li fariĝis tie ŝtatfunkciulo. Situantaj ĉe la 560 kilometrojn longa Granda Kanalo fosita en Sui-dinastio (581-618 p.K.) kaj interliganta Zhuoxian-gubernion en Hebei-provinco, en norda Ĉinio, kun la lago-urbo Hangzhou en la sudo – Huai'an, kun 1600-jara historio, estis la hejmloko de Zhou Enlai en lia infaneco.

Lia patro Zhou Shaogang estis malsupera ŝtatoficisto, kiu perlaboris modestajn vivrimedojn malproksime de sia hejmloko. Lia onklo Zhou Yigan, la plej juna el kvar fratoj, mortis seninfane en siaj dudekaj jaroj, kaj por havigi al la dudekjara vidvino kompanion kaj konsolon oni aranĝis, ke la nevo, tiam apenaŭ unujara, fariĝu ŝia adopta

filo. Tial laŭdire Zhou Enlai havis du patrinojn. Vaste-leginta kaj multescia kiel pri la klasikaĵoj kaj romanoj, tiel pri la poemoj de la fekunda Tang-epoko (618-907 p.K.), la adopta patrino arde deziris kleruligi la knabon. En sia kvara jaro li estis jam instruita legi kaj parkere reciti dekojn da poemoj. Antaŭ ol li atingis la aĝon de naŭ jaroj, li jam avide legis la plejparton de la popularaj antikvaj ĉinaj romanoj, el kiuj *Romano pri la Tri Regnoj*, *Pilgrimado al la Okcidento* kaj *Ĉe la Akvobordo* estis la de li plej ŝatataj. La solida bazo de instruiteco pri la klasikaĵoj, kiujn li ellernis parkere en siaj fruaj impresiĝemaj jaroj, ligita kun la severa memdisciplinado en la posta vivo, donis al li bonegan memoron, kiu mirigis ĉiujn, kiuj venis en kontakton kun li.

Lia knabaĝo estis relative malfacila. La patriarko de Zhou-familio falis en malbonstaton, tiel ke ĝi devis akiri monon el lombardejo kaj peti pruntojn de parencoj – plejofte donitajn kontraŭvole – por kovri la elspezojn. Maltrankvilo kaj la turmentado fare de ŝuldokolektantoj faris la vivon mizera por liaj patrino kaj adopta patrino, kiuj mortis unu post la alia en la daŭro de unu jaro. En sia deka jaro Zhou Enlai jam portis la pezajn devojn de familiestro truditajn al li. Li devis zorgi pri siaj du pli junaj fratoj kaj klopodis por eviti malsaton. En la tempo, kiam Zhou-familio havis rimedojn por subteni la ŝajnon de prospero, ne mankis vizitantoj en ilia domo en la strateto Fuma. Sed kiam la malboniĝantaj cirkonstancoj ne permesis eĉ ŝajnigon de bonstateco, nur ŝuldokolektantoj sin montris. Tio estis la unua elmetado de la juna Zhou Enlai al la malbonoj de socia hipokriteco.

En 1901, la dekdujara Enlai forlasis Huan'an, kien li poste meniam revenis, eĉ post kiam li fariĝis ĉefministro. Kaj tamen, Zhou Enlai konservis feliĉajn memorojn pri

Huai'an, la loko de lasta ripozo de ambaŭ liaj patrinoj, al kiuj li havis daŭran amon.

En la sekvantaj tri jaroj li lernis en elementa lernejo en Shenyang, nordorienta Ĉinio, kie lia onklo Zhou Yigeng prenis lin sub sian tegmenton. Li lernis bone kaj tie li finis la unuajn stadiojn de formala edukado.

La knabo ne vanigis la klopodojn, kiujn lia adopta patrino faris instruante lin skribi bele kaj studi la klasikaĵojn kaj romanojn. Kiam lia lernejo festis la dujaran datrevenon de sia fondiĝo, la esejo de Zhou Enlai "Pensoj pri Nia Datreveno" gajnis la aklamon kiel de instruistoj, tiel de kunlernatojn, ne nur per sia bela proza stilo, sed ankaŭ per sia altega patriotismo. La fakto, ke ĝi poste estis enmetita en du apartajn antologiojn de la plej bonaj esejoj de ĉinaj studentoj – unu estis eldonita de iu eldonejo en Shenyang en 1913 kaj la alia de iu Ŝanhaja eldonejo en 1915 – evidente atestas la literaturan talenton de la knabo.

Eĉ en tiu frua aĝo Zhou zorgis pri la estonteco de la patrujo. Iun tagon en la klasĉambro la instruisto demandis la lernantojn, "Kial vi vizitas la lernejon?" Kelkaj diris pli-malpli la samon: "por alporti honoron al la familio." Iu knabo respondis, ke li volas "lerni konduti bone en la socio". La filo de butikisto donis praktikan respondon: "Nur por plaĉi al mia patro." Ĝi elvokis viglan ridadon. Post kiam la ridoj malleviĝis, Zhou respondis: "Por vekigi Ĉinion el ĝia dormo kaj fari ĝin forta."<sup>3</sup>

Liaj jaroj en Shenyang koincidis kun la disvastiĝo de la demokratiaj ideoj al norda Ĉinio, pro kiuj batalis d-ro Sun Jat-sen<sup>4</sup> el Guangdong, suda Ĉinio, kontraŭ la Qing-imperiaj (manĉuraj) regantoj. Tiutempe legi, posedi aŭ dissemi revolucian literaturon ja signifis ribeli. La puno estis morto je senkapigo. Sed iu instruisto de historio kaj geografio, kiu estis nomata Gao, fortendis sian harplektaĵon kiel agon spiteman kaj ne



timis instrui radikalajn ideojn en sia klasĉambro. Li amikiĝis kun la junulo el Huai'an, pruntante al li politikajn broŝurojn kaj klarigante al li, kial la monarkio devas esti anstataŭigota per respublika formo de registaro<sup>5</sup>. Lia influo sur lian lernanton estis la ĉefa kaŭzo de la konvertiĝo de Zhou al la revolucia afero, kiu fine renversis la Qing-dinastiajn regantojn en 1911 por fondi respublikon, kian projektis d-ro Sun Jat-sen. Unu travivaĵo ekster la lernejo neatendite akcelis la politikan progreson de la junulo.

Dum someraj ferioj de iu jaro Zhou estis invitita gastu en la hejmo de samklasano, kiu loĝis en la orienta antaŭurbo de Shenyang. La avo de la samklasano estis patrioto, same revoluciema kiel la instruisto Gao, kaj al li tuj ekplaĉis lia juna gasto. Iun tagon la avo, la nepo kaj ilia amiko iris esplori la restaĵojn de malnova batakkampo proksime de Shenyang. Ĉi tie, la maljunulo diris al la junuloj, estis la loko, kie okazis la Milito inter Rusio kaj Japanio en 1904-1905 – milito kondukita por gajni regon super la nordorientaj provincoj de Ĉinio. Kaj la batalo okazis ĝuste ĉi tie sur la ĉina tero, diris la maljunulo, pugnobatante la aeron por emfazo. La popolanoj en tiuj ĉi partoj, li diris, suferis la sekvojn, kaj tamen la malkapabla registaro en Pekino faris nenion por haltigi la invadon al nia lando fare de fremdaj invadintoj. Des pli malbone, ĝi eĉ malprudente proklamis “neŭtralecon” kaj difinis limojn, kiujn la milito ne devis “transiri”. Ĉu tio ne estas ekstrema humiliĝo? li demandis la du junulojn.

La semoj de la deziro batali por potenca Ĉinio estis tiel semitaj en la koron de la Huaj'an-a junulo, kiu ekde tiu tempo multe interesiĝis pri ŝtataj aferoj. Li ĵuris savi Ĉinion el la grandega danĝero de malforteco kaj putreco.

En 1913 la dekkvinjara studento forveturis de Shenyang al Tianjin por eniri en

Nankai-mezlernejon. Tiam Ĉinio estis en politika tumulto. La Revolucio de 1911<sup>6</sup> spronis la nacion al nova vekigo, ekscitante la koron kaj animon de la junuloj, kaj heroldante eraon de nova kulturo, kiu vidis sian floradon en la Movado de la 4-a de Majo de 1919<sup>7</sup>. Same kiel aliaj junuloj de lia aĝo en tiaj urboj kiaj Tianjin kaj Pekino, kie novaj ideoj estis facile riceveblaj, Zhou baldaŭ trovis sin entirita en la vorticon de tiu ĉi burĝonanta naciismo. Kiel studento ĉe Nankai, li estis tiel diligenta kiel antaŭe, sed li ne lasis, ke liaj klasĉambraj studoj malhelpu al li akiri novajn sciojn kaj esplori novajn horizontojn, post kiam la taga lernotasko estis finita. Li estis inspirita de ideoj en la gazetoj eldonitaj sub la aŭspicioj de d-ro Sun Jat-sen<sup>8</sup>, kaj poste fariĝis avida leganto de la gazeto *Nova Junulo* redaktata de Chen Duxiu (1880-1942) kaj Li Dazhao (1889-1927) – kiuj poste fariĝis fondintoj de la Komunista Partio de Ĉinio. La legado de Zhou Enlai kovris vastan amplekson, de la progresema verkistoj de Qing-dinastio, kiaj Gu Yanwu (1613-1682) kaj Wang Fuzhi (1619-1692), al tradukitaj verkoj de alilanda origino, kiaj *Socia Kontrakto* de Jean Jacques Rousseau, *Spirito de Leĝo* de Montesquieu kaj *Evolucio* de H. Huxley.

En sia dua jaro ĉe Nankai Zhou jam fariĝis rimarkinda kiel gvidanto de studentoj. Kune kun du samlernejanoj li fondis asocion nomatan Fratularo de Respekto al Laboro kaj Ĝuado de Komunuma Vivo kaj eldonis bultenon *Respekto al Laboro*. Kvankam li estis la gvidanto de la grupo, li tamen cedis la prezidantecon al unu el siaj kamaradoj-kunfondintoj, kaj li mem ludis duan violon kiel vicprezidanto. Tiamaniere li montris en sia frua aĝo la bonajn trajtojn de modesteco kaj mankon de persona ambicio, kaj pro tiuj kvalitoj dum sia posta vivo li ofte lasis al aliaj honorojn, kiujn li mem meritis. La asocio fariĝis viveca centro, kien kunlernantoj venis por prunti progresemajn librojn, kolektitajn tie de Zhou

Enlai, por diskuti pri kurantaj aferoj, por kanti kantojn kaj fari aliajn aferojn, kiuj ilin interesis. Zhou redaktis kaj skribis por la bulteno, kaj ofte kontribuis per komentoj pri kurantaj aferoj kaj novaj okazintaĵoj al la lerneja gazeto *Moro de Nia Lernejo*. Liaj komentoj forte vipis la komplotojn de imperiismaj potencoj dismembrigi Ĉinion, kaj mokis kaj akuzis Yuan Shikai (1859-1916) pri lia provo aboli la respublikon kaj restarigi la monarkion kun li kiel imperiestro. Poste, en siaj jaroj kiel ĉefministro, Zhou Enlai ofte redaktis artikolojn por *Popola Tagĵurnalo*, la organo de la Partio, kaj estis ĝuste en Nankai, kie li komencis lerni ĵurnalistikon.

Nankai, unu el la plej bonaj mezlernejoj en Ĉinio antaŭ la Liberiĝo<sup>9</sup>, funkciigata de la fama edukisto Zhang Boling (1876-1951), estis administrata same kiel multaj edukaj establaĵoj en Ĉinio, financataj de usonaj misiistoj. Ĝi alprenis lernolibrojn en la angla lingvo por multaj kursoj, kiel ekzemple algebro, geometrio, trigonometrio, kemio, fiziko, historio de Okcidento kaj monda geografio, kaj donis emfazon al la lernado de la angla lingvo, postulante, ke la studentoj laboru super ĝi dek horojn ĉiusemajne.

Zhou Enlai brilis ĉe Nankai. Laŭ Zhang Honggao, amiko kaj samklasano, kiu kunloĝis kaj dividis pupitron kun li dum du jaroj,<sup>10</sup> Zhou fierigis sian klason per gajno de la unua premio en la interklasa eseokonkurso de la lernejo en 1916. La konkursantoj, po kvin el ĉiu klaso severe elektitaj, devis elekti al si unu el la du temoj: *Honesteco Venkos*, aŭ *Kio Estas la Plej Urga Problemo, kiun Ĉinio Alfrontas?* La premio estis aljuĝita al Zhou Enlai pro lia bonega eseo pri honesteco. Li akiris honoron ankaŭ kiel la ĉefa refutanto en la debat-teamo de la lernejo, kiu venkis ĉiujn aliajn en Tianjin dum sinsekvaj du jaroj.

Nankai sekvis striktan instruplanon, difinante du kaj duonan horojn por memlernando de la sepa ĝis la duono post la naŭa ĉiuvespere. Sed Zhou, Zhang Honggao rememoris, dediĉis maksimume duonon de la difinita tempo al la ripetado de la lecionoj de la tago; lia spirito sin okupis ĉefe pri postlecionaj aktivecoj: preparado de artikoloj por la gazeto de li redaktata kaj legado de libroj pri temoj lin interesantaj. Kaj tamen li sukcese akiris la unuan lokon en ekzamenoj en ĉiu semestro kaj diplomitiĝis kun plej brila lernorezuto en la klaso en la somero de 1917. Kiel li tion atingis? Zhang opiniis, ke li sciis kiel koncentri sian tutan atenton sur kion la instruisto diris en la klasĉambro. Cetere, li aldonis, li estis pli naturdotita ol la aliaj. Lia samklasano citis alian faceton de lia talento. Ĉiujare Nankai donis spektaklon por festi la datrevenon de sia fondiĝo en la 17-a de oktobro. Sed, ĉar tiam ne praktikiĝis geedukado, Zhou kun sia bela aspekto kaj aktora kapablo do estis taskita ludi virinajn rolojn. Lia ludado de la heroino en *Unudolara Monero* estis tiel sukcesa, ke la prezentado tuj faris sensacion en Tianjin.<sup>11</sup>

Du elektoj sin prezentis antaŭ Zhou Enlai ĉe lia diplomitiĝo el Nankai: serĉi okupon aŭ eniri en kolecion. Li decidis preni la lastan. Sed kien? En Ĉinio aŭ eksterlande? Li pensis, ke estos pli bone daŭrigi studadon en Japanio, kaj kun la helpo de kelkaj amikoj la deknaŭjara Nankai-diplomito kolektis al si sufiĉe da mono por fari vojaĝon orienten en septembro 1917. Li esperis, ke li trovos en Japanio respondojn al la demandoj superregantaj en lia koro, lernos kiel savi kaj rekonstrui Ĉinion, kaj akiros tiajn novajn sciojn, kiaj estos bezonataj post lia reveno en la patrujon. Krom Usono, Japanio tiam estis la plej alloga lando por la juna elito de Ĉinio. Sed li estis trompita en siaj esperoj. Tiam la Unua Mondmilito furiozis kaj, dum en Eŭropo la grandaj potencoj estis implikitaj en

miksatalo, la militarisma Japanio kun febra volo faris sian plejblon por intensigi sian agreson al la senforta Ĉinio.

Veninte en Japanion, Zhou tuj komencis lerni la japanan lingvon kaj baldaŭ jam sciis ĝian gramatikon kaj povis legi, pli-malpli glate, japanlingvajn ĵurnalojn. Samtempe li diligente studis por sin prepari al al kolegia enira ekzameno. Tamen post du monatoj lia atento estis altirita al unu entuziasmiga evento – la Oktobra Revoilucio en Rusio. Naskiĝis reĝimo de laboristoj. Li penis kompreni, kion signifas la diktaturo de la proletaro. Li esploris ĵurnalojn kaj gazetojn, legis ĉion, kion li povis trovi, pri la disvolviĝoj en la unua socialisma lando en la mondo, kaj komencis faris seriozan studon pri la doktrino implicita en tiu ĉi mondska evento. Tio estis lia unua edukiĝo en marksismo, kiu poste regis lian tutan vivon.<sup>12</sup>

En printempo de 1919 ĉinaj studentoj en Japanio estis indignigitaj de la novaĵo, ke la registaro de Duan Qirui (1865-1936) malhonore vendas la suverenajn rajtojn de Ĉinio al Japanio. Ili okazigis kunvenojn, faris manifestaciojn kaj lanĉis daŭran kontraŭjapanan movadon en Tokio. En ĉiuj ĉi tiuj patriotaj aktivecoj Zhou Enlai ludis sian kutiman viglan rolon. Lia atento do estis dividita, kaj li havis malmulte da tempo por sin prepari al la kolegia enira ekzameno kaj ne sukcesis enmatrikuliĝi. Dume la situacio en Pekino estis alarma, ĉar la registaro de militaristoj kun duan Qirui kiel sia ĉefo montris nenian signon doni atenton al la popola postulo, ke ĝi ĉesigu sian ŝtat-vendon al la imperiisma Japanio.<sup>13</sup> Zhou konsciis, ke en Ĉinio estas multe pli da aferoj por li farendaj. En aprilo 1919 li veturis al la patrujo post deknaŭmonata restado eksterlande.

Tuj post sia reveno la junulo trovis Ĉinion bolanta de malkontenteco kaj urĝe postulanta ŝanĝon. La eksplodpunkto venis post semajnoj. En la 4-a de majo la movado de patriotaj studentoj por renversi la militaristan reĝimon skuis Pekinon kun impeta fortego kaj baldaŭ disvolviĝis tra la tuta lando. Studentoj de superaj lernejoj en la ĉefurbo amase eliris por manifestacii antaŭ Tian'anmen-pordego kontraŭ la japana agreso kaj la perfiduloj ĉe altaj postenoj, kiuj ĝin permesis. Ĉe la fino la protestantaj manifestaciantoj forbruligis la hejmon de unu registara ministro<sup>14</sup>. Studentoj en la najbara Tianjin respondis per tuturba

protesta manifestacio, kiu kondukis al la formiĝo de studenta asocio por direkti ĉiujn patriotajn aktivecojn. Kiel la nervocentro por la movado, la studenta asocio decidis eldoni ĵurnalon por disvastigi novajn ideojn kaj tendencojn kaj muldi publikan opinion en la batalo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Vane la gvidantoj serĉis por ĝi kompetentan redaktoron.

La reveno de Zhou el Japanio estis neatendita gajno por la gvidantoj de la asocio, ĉar laŭ ilia opinio li estis persono perfekte taŭga por la redaktado. Ne necesis persvado por igi lin preni sur sin la taskon. Ĉar li nun revenis al la patrujo, li treege deziris ĵeti sin en la batalon. En la 21-a de julio en la gazetbudoj aperis la unua numero de la ĵurnalo titolita *La Tianjina Studento* kun “Demokratio: Registaro por la Popolo, per la Popolo, kaj de la Popolo – Nia Moto” en la angla lingvo kiel ornamo al sia kapo.

Publikigata du fojojn semajne, la ĵurnalo redaktata de Zhou Enlai tuj rikoltis sukceson kaj baldaŭ fariĝis ĉiutaga kun eldonkvanto de pli ol dudek mil – konsiderinda nombro por tiu tempo. Ĝi estis populara ankaŭ ĉe legantinoj, ĉar ĝi subtenis ilian postulon pri egalecon inter la seksoj kaj pri fino al la feŭdaj konvencioj, kiuj ilin katenis. Destinita ĉefe por studentoj, kiel ĝia nomo indikis, *La Tianjina Studento* altiris ankaŭ legantojn ekster edukaj rondoj kaj ricevis abonojn el la aliaj partoj de norda Ĉinio. Ĝi estis vaste legata, ĉar krom novaĵoj sur la enlanda kaj internacia scenejoj ĝi aperigis ankaŭ artikolojn klarigantajn en simplaj lingvaĵoj kial la tiamaj ĉinaj regantoj lakee humiliĝas al Japanio kaj aliaj agresemaj potencoj, kiuj estas pretaj ĵeti sin sur Ĉinion. Ĝi alvokis ĉiujn patriotojn, ke ili daŭrigu ĝis la fino la batalon likvidi la regadon de feŭda burokratismo. Kiel redaktoro, Zhou Enlai mem skribis la plejparton el la pikantaj ĉefartikoloj kaj kontribuaĵoj, uzante Fei

Fei kiel sian pseŭdonimon.

Sed la studenta movado en Tianjin ne havis centran direktadon kaj unuecan agadon. Tio estis kompensita de la kuniĝo de la studenta asocio kaj la Virina Patriota Asocio, sendependa organizaĵo de studentinoj. La kuniĝo de fortoj okazis en septembro de tiu jaro, ĉiu flanko elektis dek membrojn por formi la gvidantaron, kiu fariĝis konata kiel Vekiĝa Societo. Zhou Enlai kaj Ma Jun, gvidanto de islamaj studentoj, estis la elstaraj membroj el la flanko de la studenta asocio, dum el la virina organizaĵo la plej konataj homoj estis Guo Longzhen<sup>15</sup>, islamano, kaj Deng Yingchao, kiu, en la aĝo de dek kvin jaroj, estis la plej juna el ili kaj poste fariĝis la edzino de Zhou Enlai.

La societo publikigis gazeton titolitan *La Vekiĝo*, postulante ĉiujn membrojn skribi artikolojn por ĝi sub pseŭdonimoj. Kvindek ciferoj anstataŭ nomoj, kaj ne dudek, estis lotumitaj – kun espero pri pliampleksiĝo en la estonteco. Zhou Enlai tiris numeron kvin, kaj Deng Yingchao numeron unu. Por fari ilin pli similaj al ĉinaj nomoj, la membroj de la societo aliformigis ilin en ĉinajn ideografiaĵojn, kiuj estis samsonaj kiel la numeroj. Sekve Zhou Enlai fariĝis Wu Hao kaj Deng Yingchao Yi Hao. Tiujn ĉi pseŭdonimojn ili uzis dum multaj jaroj. La Vekiĝa Societo volus vidi sian gazeton prosperi, sed okazis eventoj, kiuj limigis ĝian publikiĝon al nur unu numero, kaj la organizaĵo mem ĉesis funkcii en la aŭtuno de la sekvanta jaro. Sed antaŭ sia fermo ĝi ludis ankoraŭ lastan viglan rolon en la batalo kontraŭ la aŭtoritatoj.

La situacio kriziĝis en januaro 1920, kiam Tianjina polico komencis subpremi la studentan movadon kaj arestis dudek kvar personojn – interalie Zhou Enlai, Ma Jun kaj Guo Longzhen – kiuj estis ĵetitaj en malliberejon por ses monatoj. Ekzekutiĝo estus ilia

sorto, se tutlanda movado por justeco ne postulus ilian tujan liberigon kaj se Zhou Enlai kaj liaj kamaradoj ne farus fortan batalon kaj daŭran fastadon en la malliberejo.

Dum tiu ĉi tempo Deng Yingchao kaj la aliaj bombardadis la policestron per postuloj. Iun tagon ili kolektis dudek kvar membrojn kaj subtenantojn de la societo kaj postulis, ke ili estu permesitaj anstataŭi la dudek kvar fastantojn en la malliberejo. Kiel ajn estas, ili diris, la enkarcerigoj estas iliaj reprezentantoj, kaj estas juste nur ke ili enkarceriĝos laŭvice. Pikita, la polico haste faris juĝan esploron al la dudek kvar “malliberuloj” por montri, ke la leĝoproceso ne estis forgesita. Sed, kontraŭ ilia atendo, Zhou Enlai en la akuzitejo akuzadis la purtran registaron kaj inverse faris sian akuzanton.<sup>16</sup>

La 17-an de julio ĉiuj dudek kvar akuzitoj estis liberigitaj. Ĝojegis iliaj kamaradoj kaj subtenantoj, kiuj alpinglis sur ilin insignojn kun la surskribo “Sinofero por la Nacio”. El siaj karceraj travivaĵoj Zhou Enlai skribis *En Arestejo de Polico* kaj *Karcera Taglibro*, kiuj estis liaj unuaj libroj, ambaŭ nun jam ne haveblaj.

La 16-an de aŭgusto en Taoranting, parko en suda Pekino, kun aliaj progressemaj junulaj organizaĵoj partoprenantaj, la Vekiĝa Societo okzigis sian adiaŭan kunvenon post sia meteoreca ekzistado. Prof. Li Dazhao (Li Daĝzuŭ)<sup>17</sup> de Pekina Universitato, kiu la unua enkondukis marksisman teorion kaj bolŝevisman en Ĉinion kaj skribis artikolojn, kiaj *La Venko de la Ordinara Popolo* kaj *La Venko de Bolŝevismo*, estis la gvidanta spirito. Zhou Enlai servis kiel la ĉefparolanto, resumante la atingojn kaj lecionojn de Tianjina patriota movado. Tio estis lia lasta publika apero antaŭ ol li marveturis Eŭropon laŭ la ĉina-franca labor-studa programo.

Zhou Enlai, politike matura dudekdu-jarulo, kiu estis travivinta la revolucionan bapton



de la Movado de la 4-a de Majo, atingis Francion en decembro 1920. lia alveno en Parizo vekis vivan intereson inter tiuj, kiuj venis el Ĉinio antaŭ li laŭ la sama programo, ĉar li jam gajnis renomon pro sia studado pri marksismo kaj la nova soveta ŝtato en Japanio kaj ankaŭ distingiĝis kiel elprovita kaj hardita gvidanto de junuloj en sia hejmlando.

Zhou bone sciis, kion li devas fari dum sia restado en Eŭropo, kaj ne permesis al io ajn deturni lin de la celo, kiun li mem fiksas. Li venis al Francio kun du celajoj en la menso: pliintensigi la studadon de marksismo komencitan en Japanio kaj daŭrigitan dum lia restado en Tianjina malliberejo, kaj due, trovi kuracilon kontraŭ la malsanoj de Ĉinio. Li estis altirata de la unua kaj puŝata al la dua. La du estis nekontraŭdiraj unu al la alia, sed komplementaj, kiel ŝlosilo al seruro; li pli kaj pli venis al la kompreno, ke marksismo estas la ŝlosilo por solvi la problemojn de Ĉinio. Li fariĝis persista kaj sindona komunisto. Li avide legadis kaj substrekis paragrafojn, kiujn li opiniis gravaj. Iu libro, kiun li legis kaj uzis dum tiu ĉi periodo, ekzakte dirite, en 1921, estis grandvaloraĵo en la ekspozicio en Pekino por memorigi Zhou Enlai. Sur unu el ĝiaj paĝoj oni povas legi faman paragrafon de Marks substrekitan per krajono:

Kaj rilate al mi mem, nenian honoron mi meritas por la malkovro de la ekzisto de klasoj en moderna socio aŭ la batalo inter ili. Longe antaŭ mi burĝaj historiistoj jam priskribis la historian disvolviĝon de tiu ĉi klasbatalo kaj burĝaj ekonomikistoj la ekonomian anatomion de la klasoj. Tio, kion mi faris – kaj tio estis nova – estis pruvi: 1) ke la ekzisto de klasoj estas nedisigeble ligita nur kun apartaj historiaj fazoj en la disvolviĝado de produkto, 2) ke la klasbatalo nepre kondukas al la diktaturo de la proletaro, 3) ke tiu ĉi diktaturo mem konsistigas nur la transiron al la abolo de ĉiuj klasoj kaj al senklasa socio.<sup>18</sup>

Zhou, diligenta leganto de marksisma literaturo, neniel estis de la eburtura tipo. Li ne enfermis sin en la klasĉambro, studante por studo, en izoliteco for de la realo. Li pasigis sian tempon pririgardante la vivon ĉirkaŭ si por vidi, kiel la francoj laboras kaj kiajn problemojn ili alfrontas. Li laboris sporade en francaj fabrikoj, kie li povis pli bone kompreni ilin kaj fari inter laboristoj de ĉina deveno kaj laboristoj-studentoj similaj al li mem propagandon, kiu instigis ilin al patriota, se ne samtempe socialisma, vojo.

En la unuaj tagoj post sia alveno li loĝis en la antaŭurbo de Parizo, kie li vivis el la malgranda monsumo ricevita el la labor-studa programo. Pli ol du jarojn li restis en Hotelo Godefroy, proksime de la Placo de Italio en la suda parto de la urbo kaj de tempo al tempo laboris en la aŭtomobila fabriko Renault. Li mem kuiris siajn manĝaĵojn kaj, kvankam bonorda laŭ la ekstero, li havis aspekton de ŝima eleganteco, portante pantalonon, kiu eble

pro troa uzado ŝajnis ŝrumpinta kaj fariĝanta pli kaj pli mallonga je la refalditaj randoj. Liaj amikoj rimarkis ankaŭ, ke li kunportis el Ĉinio ian umon, specon de ŝustreĉilo, per kiu li riparas siajn ŝtrumpetojn. Malluksema, ŝparema, kalkulema pri ĉiu groŝo, tiuj ĉi virtoj frue kulturitaj fariĝis liaj vivkutimoj, kiuj ne estis forlasitaj eĉ tiam,. Kiam dudek ok jarojn poste, kiel ĉefministro de Ĉinio, li havis la rimedojn por havigi al si komfortaĵojn, sed ilin malŝatis.

Unu signifoplena evento okazis en Ĉinio en la sekvanta somero – la naskiĝo de la Komunista Partio en Ŝanhajo la 1-an de julio 1921. Mao Zedong estis unu el la Partio-fondantaj delegitoj. Ĉar la tiama komunikado inter Ĉinio kaj Francio ne estis tia, kia ĝi estas hodiaŭ, la novaĵo atingis Parizon nur post paso de longa tempo. Tamen estas interese konstati, ke homoj samopiniaj, kvankam disigitaj geografie de miloj da mejloj, konsideris pli-malpli la saman faron en la sama tempo. Iom pli frue en tiu jaro Zhou Enlai kaj aliaj ĉinaj marksistoj en Eŭropo jam kunvenis por formi sian propran organizaĵon nomatan la Komunista Grupo, kiu inkluzivis Zhang Shenfu, Liu Qingyang<sup>19</sup>, Zhao Shiyan kaj Chen Gongpei krom Zhou Enlai mem.

Antaŭ tiu eventoplena julio 1921 ekzistis ok tiaj grupoj funkciantaj en kaj ekster Ĉinio, ĉiu dediĉita al la afero fondi por Ĉinio Komunistan Partion. Post ĝia fondiĝo tiuj, kiuj antaŭe apartenis al la Komunistaj Grupoj estis rekonitaj kiel regulaj membroj de KPĈ. La dato de la aniĝo de ĉiuj ĉi tiuj “antaŭ-Partiaj” membroj, laŭ la decido de la Departemento pri Organizo de la Centra Komitato de la Partio en la 23-a de majo 1985, estis fiksita kiel 1921. Sekve la aliĝo de Zhou Enlai al KPĈ, antaŭe rekonita kiel datiĝinta de 1922, nun staras korektita.

La parto de KPĈ en Parizo estis nomita ĝia Eŭropa Ĝenerala Branĉo, kun Zhou Enlai elektita kiel sekretario – plentempa okupo, kiu postulis lian tutan atenton, ĉar ĝia funkciotereno kovris ne nur francion, sed ankaŭ Germanion kaj Belgion. Zhou Enlai, kiu havis ĵurnalistikan kapablon, konis la plenan agitantan valoron de publikigaĵo. Do estis tute nature, ke li tuj komencis iniciati gazeton.

*La Jeunesse (La Junulo)*, alinomita *Red Ray (Ruĝa Radio)* en 1923, aperis kiel proparolanto de la Partio en Eŭropo. Ne presita, sed mimeografita, la gazeto havis vastan influon inter junaj ĉinaj elmigrintoj en Eŭropo kaj altiris ankaŭ legantojn en Ĉinio. Kiel kutime, Zhou Enlai skribis por la publikigaĵo, kaj en ĝia dua numero aperis unu artikolo “Komunismo kaj Ĉinio” subskribita per Wu Hao, lia malnova pseŭdonimo. Li kaj Deng Xiaoping, la plej juna el la laboristoj-studentoj, estis tre intimaj dum siaj Parizaj tagoj; Zhou traktis la pli junan kamaradon ameme kaj kiel frateton. Ili donis multon el sia tempo al preparado de stenciloj. Tiam Deng, kiu estas la ĉefa gvidanto de Ĉinio post la morto de Mao, estis tiel lerta en sia laboro, ke li akiris la ŝercnomon “Doktoro pri Mimeografado”.

Kiel gvidanto de la Eŭropa branĉo Zhou devis de tempo al tempo naveti inter Parizo kaj Berlino kaj ofte restis longe en Germanio. Foje dum daŭra vizito al Berlino li konatiĝis kun Zhu De<sup>20</sup>, homo dek du jarojn pli aĝa ol li. Antaŭ ol veni en Germanion, Zhu klopodis, sed ne sukcesis, aliĝi al la Komunista Partio en Ĉinio, kaj nun li estis certa, ĉu li estas kvalifikita por tio. Zhou opiniis, ke li estas, kaj proponis sin kiel rekomendanton por lia aliĝo al la Partio. Zhu De poste famiĝis kiel ĉefkomandanto de la komunistaj armitaj fortoj, kiuj unue estis konataj iel la Ĉina Laborist-kampana Ruĝa Armeo, poste kiel la Oka-voja Armeo kaj la Nova Kvara Armeo dum la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj de la malfruaj 1940-aj jaroj ĝis nun kiel la Popola Liberiga Armeo.

En 1924, responde al la alvoko de d-ro Sun Jat-sen entrepreni tion, kio fariĝis konata kiel Norden-ekspedicio el Guangzhou, por liberigi Ĉinion el la militarisma reĝimo en la

nordo, Kuomintango kaj la Komunista Partio unuafoje kunigis siajn fortojn. Kune ili faris militon kaj kondukis ĝin norden al la regiono de Yangzi-rivero. Tio estis la periodo de la Unua Enlanda Revolucia Milito. La Komunista Partio, kiu estis en sia infaneco, bezonis kadrojn por plenigis sian vicaron. Ĝi revokis multajn membrojn el Eŭropo por servi la aferon hejmlande. Ankaŭ la sekretario de la Eŭropa branĉo estis ordonita reveni, kaj li veturis al Guangzhou en aŭgusto. Post kvar jaroj da laboro kaj studado en Eŭropo, Zhou Enlai, nun dudeksesjara, jam maturiĝis politike kaj intelekte, kaj estis preta preni sur sin la taskojn, kiuj kuŝis antaŭ li.

Tuj post sia reveno en la urbon, kiun d-ro Sun Jat-sen faris la ĉefstabejo por direkti la nacian revolucion, Zhou Enlai estis nomumita al la ofico de politika direktoro de Huangpu-militakademio, West point<sup>21</sup> de Ĉinio antaŭ la Liberiĝo. Estis taskita al li ankaŭ la gvidado de la laboro de la Komunista Partio en Guangdong-provinco kaj la najbara Guangxi. En sia ofico de politika direktoro de la Militakademio kaj kiel la reprezentanto de la Komunista Partio por suda Ĉinio, Zhou Enlai multfoje konfliktis, kiel en postaj jaroj, kun Ĉjang Kajŝek. D-ro Sun Jatsen mortis frue en 1926, kaj Ĉjang Kajŝek baldaŭ akiris la superregon de Kuomintango. En 1927 li iniciatis partio-purigadon kaj poste dekjaran enlandan militon kontraŭ la komunistoj. En 1937 Japanio faris plenskalan invadon al Ĉinio, kaj tio estigis inter la du politikaj partioj periodon de nestabila paco, kiu estis refoje rompita tiam, kiam la Kuomintanga diktatoro faris lastan provon, komencitan en 1946, por detru la komunistojn kaj akiri absolutan regadon de la lando. La rezulto estis historio. Tiel Zhou Enlai jen kaj jen trovis sin en rekta alfrontado al Ĉjang Kajŝek dum pli ol dudek jaroj, kaj en la procezo li fariĝis legendeca heroo de la Ĉina Revolucio.

### **Notoj:**

1. Lusin (1811-1936), kvankam ne membro de la Komunista Partio, estis akklamita de Mao Zedong kiel “ne nur granda literaturisto, sed ankaŭ granda pensulo kaj granda revoluciulo”. *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, esp. eld. Vol. II, p. 360, Fremdlingva Eldonejo, Pekino.

2. Honathan Swift (1667-1745), fama angla satiristo. – Trad.

3. “La Lernejoj de Kamarado Zhou Enlai en Shenyang” skribita de Lu Zhong en *La Amata Ĉefministro de la Popolo*, p. 58, Popola Eldonejo, Shanhajo.

4. Sun Jat-sen (1866-1925), alinome sun Zhongshan, granda revolucilulo de Ĉinio, gvidanto de la Revolucio de 1911. – Trad.

5. *La Amata ĉefministro de la Popolo*, p. 57

6. Revolucio de 1911: Demokratia revolucio por renversi la aŭtokratan reĝimon de Qing-dinastio. Ekde 1894 d-ro Sun Jat-sen organizis revoluciajn societojn en- kaj eksterlande, ili plurfoje organizis ribelojn, kio preparis kondiĉojn por la Revolucio de 1911. En la 10-a de oktobro 1911 eksplodis insurekcio en Wuchang, Hubei-provinco. Baldaŭ leviĝis dek kelkaj provincoj kaj disfalis la reĝimo de Qing-dinastio. En la 1-a de januaro 1912, en Nankino stariĝis Provizora Registaro de la Respubliko de Ĉinio kaj Sun Jat-sen estis elektita kiel la provizora prezidento. Sed fine la ŝtatpotenco falis en la manojn de norda militaristo Yuan shikai kaj la revolucio malsukcesis pro tio, ke la gvidantaro de la revolucio estis kompromisema, ne donis verajn bonojn al la popolamasoj, kaj cedis al la premo de imperiismaj kaj feŭdaj fortoj. – Trad.

7. Movado de la 4-a de Majo: Post la Unua mondmilito, en januaro 1919 okazis “Paca konferenco” en Parizo. Al la konferenco Ĉinio postulis, ke la potencaj landoj rezignu siajn privilegiojn en Ĉinio. La postulo estis rifuzita, tamen la ĉina militarista registaro ankoraŭ estis preta subskribi en la paca traktato. Tio indignigis la ĉinan popolon. En la 4-a de majo 1919, miloj da pekinaj studentoj kunvenis antaŭ Tian’anmen por protesti, kio poste formis landskalan patriotisman movadon de laboristoj, studentoj kaj komercistoj. La movado estas ankaŭ por nova kulturo kaj kontraŭ la feŭda. Tiu ĉi kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma revolucia movado de la ĉina popolo markis la komencon de la novdemokratia revolucio de Ĉinio. – Trad.

8. *Minquan Bao* (*Jŭrnalo de Popolaj Rajtoj*) kaj *Minli Bao* (*Jŭrnalo de Nacia Sendependeco*), publikigataj en Ŝanhajo, ankaŭ *Da Gong Bao* (*La Senpartieco*), publikigata en Tianjin, estis parto de la ĉiutagaj legaĵoj de Zhou Enlai.

9. Liberiĝo: En 1949 la ĉina popolo liberiĝis el sub la reakcia regado de Kuomintang-a registaro kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon. Tion la ĉinoj kutimas nomi Liberiĝo. – Trad.

10. “La Nankai-lernejoj kun Zhou Enlai” skribita de Zhang Honggao en *Bona Ĉefministro de la Popolo*, p. 66.

11. Samlibre, p. 67

12. Zhou Enlai ekkonis marksismon en serioza maniero per legado de *Studoj pri Sociaj Problemoj*, revuo redaktata kaj publikigata en Tokio de profesoro Kawakami Hajime de la Imperia Universitato, kiu la unua enkondukis la doktrinojn de marksismo en Japanion.

13. La militaristoj, kiuj tiutempe superregis en la registaro en Pekino, pli konataj kiel la Beiyang-aj (Nordau) militaristoj, estis dividitaj en tri grupojn – el Hebei, Anhui kaj Liaoning – ĉiuj pretendis esti lojalaj al Yuan Shikai (1859-1916), la ĉefo de tiu ĉi loze ligita militaristaro. Duan Qirui apartenis al la grupo el Anhui.

14. La Pekinaj protestantaj manifestaciantoj, detenate for de manifestaciado antaŭ la diplomaciaj misioj en la loko tiam konata kiel la “legacia kvartalo”, sin direktis al la hejmo de Cao Rulin, ministro de komunikado, en Zhaojialou. Cao kaj liaj du kolegoj, Zhang Zongxiang kaj Lu Zongyu, estis denuncataj en la gazetaro kiel “perfiduloj” pro sia kaŝa enmiksiĝo en la vendadon de la nacia suvereneco al Japanio ekde la tempo de Yuan Shikai. Cao ne estis hejme, sed la studentoj batis Zhang, kiu okaze estis tie, kaj poste forbruligis la domon. Vidu *De la Opia Milito ĝis la Movado de la 4-a de Majo* verkita de Hu Sheng, Vol. II, p. 960, Popola Eldonejo, Pekino.

15. Guo Longzhen (1893-1930), ankaŭ konata kiel Guo Linyi, aliĝis al KPĈ en 1922. en 1930 ŝi estis arestita de Kuomintang en Qingdao, Shandong-provinco, kaj ekzekutita en Jinan.

16. Je la tria de la 8-a de julio 1920, t.e. lasta tago de la juĝproceso, Zhou leviĝis de la sidloko de akuzito por pledi por enkarcerigitaj studentoj. En sia zorge preparita pledo li turnis ilian akuzitecon en akuzantecon konatrŭ la persekutanto kaj tiuj sidantaj sur la juĝistaj sidlokoj. Unu semajnon poste li kaj liaj kamaradoj estis liberigitaj. Vidu *Kamarado Zhou Enlai – Liaj infaneco kaj Juneco* skribita de Hu Hua, p. 70, Ĉina Junulara Eldonejo, Pekino.

17. Li Dazhao (1889-1927) el Hebei-provinco, post trijara postdiplomitiĝa studado en Japanio, revenis en Ĉinion en 1916 kiel sindediĉa marksisto. Krom instruado en la Pekina Universitato, li verkis abunde por popularigi socialismajn kaj marksismajn ideojn. Li estis ĉefa gvidanto de la Movado de la 4-a de Majo de 1919 kaj du jarojn poste fariĝis, kune kun Mao Zedong, fondinto de la Komunista Partio de Ĉinio.

18. “Marks al J. Weydemeyer, la 5-an de Marto 1852” en *Elektitaj Korespondaĵoj de Marks kaj Engels*, p. 86, Fremdlingva Eldonejo, Moskvo. Vidu ankaŭ *Kamarado Zhou Enlai – Liaj Infaneco kaj Infaneco*, p. 95.

19. Liu Qingyang (1894-1977) kaj Zhang Shenfu (1893-), ambaŭ laboristoj-studentoj, estis respondeculoj por la aliĝo de Zhou Enlai al KPĈ. *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, Vol. II, p. 357, Popola Eldonejo, Pekino.

20. Zhu De, brigadestro de la malnova armeo en Yunnan, rifuzis inviton de sia samprovincano el Sichuan generalo Yang Sen por komandi divizion. Anstataŭe, li forveturis al Ŝanhajo por serĉi la Komunistan Partion, kun la decido aliĝi al ĝiaj vicoj. Chen Duxiu, la ĝenerala sekretario de la Partio, donis al li rifuzon. Ofendite Zhu ŝipveturis al Eŭropo. La celo de oia vojaĝo estis Germanio, kiun li nomis “la hejmlando de marksismo”. Tie li unuafoje renkontis Zhou Enlai. Li aliĝis al la Komunista Partio sub la rekomendado de Zhou Enlai. Vidu *Kamarado Zhou Enlai – Liaj infaneco kaj Juneco*, p. 100, kaj *Zhou Enlai – la Tempo de Lia Juneco* skribita de Wang Jingru, p. 339, Popola Eldonejo, Henan.

21. West Point: Fama usona militlernejo en West Point, sudoriente de Nov-Jorko. – Trad.

## ĈAPITRO III

### Karaktero de Heroo

En Novjara Tago de 1980 Pekina Popola Tagĵurnalo faris surprizon al siaj legantoj, publikigante popece en ĉiu numero rakonton pri epizodo en la ĉina revolucio, felietonaĵon senparalelan en la historio de la ordinare serioza Partia organo. La fakta-kaj-fikcia rakonto, efektive pli fakta ol fikcia, estis daŭrigata en dek kvin numeroj (la 1-a – 21-a de januaro) kun frapanta titolo – “Ponardo de Wu Hao”. Wu Hao estis neniu alia ol Zhou Enlai mem.

La cirkonstancoj de la enlanda milito, kiu eksplodis en 1927, faris necesa por revoluciuloj alprenon de pseŭdonimoj. Tio ofte estis afero de vivo aŭ morto. Zhou Enlai uzis diversajn plumnomojn en sia longa kariero kiel revoluciulo, interalie Wu Hao, Fei Fei kaj Xiang Yu en siaj studentaj jaroj, kaj Guan Sheng kaj Zhou Shaosan dum la periodo de 1927-31, kiam li direktis subterajn agadojn kontraŭ Kuomintango en Ŝanhajo. Dum la Tria Enlanda Revolucia Milito, t.e. la Liberiga Milito de 1946-49, superaj gvidantoj de la Komunista Partio uzis falsajn nomojn en depeŝoj por la celo trompi la deĉifristojn aŭ kriptajistojn de Ĉjang Kajŝek. Mao Zedong estis Li Desheng (Li la Venka) dum Zhou Enlai fariĝis Hu Bicheng (Hu la Sukcesa). Sed el ĉiuj pseŭdonimoj de Zhou Enlai Wu Hao estis la plej konata, kaj ĉar la nomo ricevis aŭreolon de triumfo, liaj malamikoj, unue Kuomintango en la fruaj 1930-aj jaroj, kaj kvardek jarojn poste la “Kvarpersona bando”, utiligis ĝin por siaj celoj.

La 16-an kaj 17-an de februaro 1932 *Shi Bao (La Tempoj)* de Ŝanhajo publikigis anoncon, kiu diris, ke Wu Hao kaj 242 aliaj deklaris forlasi la Komunistan Partion? Kiu?

Wu Hao – Zhou Enlai? La akreviduloj tuj ekvidis en la “anonco” trompaĵon fabrikitan de Kuomintangaj propagandaj organoj por kalumnii Zhou kaj vojerarigi aliajn membrojn de la Partio. Se vere ekzistus pli ol ducent homoj “forlasintaj” sian paritianecon kune kun Wu Hao, Kuomintango certe maksimumigus propagandon pri la neatendita gajno kaj plene listigus ĉiun nomon de la 242 personoj. La fakto, ke ĝi tion ne faris kaj efektive ne povis fari, igis la artifikon aspekti des pli falsa kaj mallerta.

La 22-an de februaro *Shen Bao*<sup>1</sup>, tiama Ŝanhaja ĉinlingva ĵurnalokun plej granda eldonkvanto, aperigis la jenon en sia reklama kolumno:

*Kara s-ro Wu Hao:*

*Dankon pro via sendo de anonco en la 18-a por enpresigo en la ĵurnalon. Tamen, ĉar la mebla kompanio Fuchang rifuzas esti garantianto, la formalaĵoj ne estas kompletaj. Tial ni bedaŭras, ke ni ne povas presi ĝin laŭ via peto.*

*Reklama Sekcio*

*Shen Bao*

Se al la anoncosendinto mankis garantianto, la ĵurnalo bezonis nur postuli, ke li liveru tian. Kial okulfrape presi ion tian en la ĵurnalo? Tio estis pensiga kaj evidente la intenco estis atentigi la legantojn kaj sugestii, ke la “anonco de Wu Hao” en *Shi Bao* estis falsaĵo. Ĉar la neordinara anonco de *Shen Bao* indikis ion gravan – Wu Hao tuj respondis en la 18-a, la tago post la publikigo de la nekredbla “anonco de Wu Hao” en *Shi Bao*. Tio, kion la intencita anonco volis diri, ne estis malkaŝita, ĉar Shen Bao rifuzis ĝin presi – evidente ĝi estis respondo al *Shi Bao* – sed la fakto estis ja sufiĉa al la legantoj por tiri ĝustan konkludon.<sup>2</sup>



Fakte Zhou Enlai jam monatojn antaŭe forlasis Ŝanhajon kaj ĉe la fino de novembro 1931 estis en Ruijin, Jianĝi-provinco. Kiam Kuomintango disvastigis tiun ĉi sensencaĵon, li ja ne estis en la urbo. Estis liaj subteraj helpantoj, kiuj rebatis la dungitojn de Kuomintango per la taktiko pri “garantianto” en *Shen Bao*. Tiu ĉi akcesora okazintaĵo restus amuza detalo en la historio de la Komunista Partio de Ĉinio, se en siaj maĥinacioj la klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing ne uzis ĝin kiel rompitan kanon por bati Zhou Enlai.

Dum la “kultura revolucio” ili denove elfosis tiun ĉi “aferon” por fari groteskajn akuzojn kontraŭ Zhou pri publika perfido al la Partio – kaj instigis Ruĝajn Gvardianojn embarasi la ĉefministron. Sed ilia penado estis vana. La kolerigita Zhou Enlai skribis pri la fakto al la Centra Komitato de la Partio por klarigi la aferon. La situacio vekis atenton de Mao Zedong kaj li donis sian opinion. Estas klare, li diris, ke la tuta afero estis fabrikaĵo de Kuomintango. Eĉ tiel la malamikoj de Zhou ne forlasis sian intencon, dezirante trovi ian “damaĝan materialon” por vundi la ĉefministron. Zhou Enlai, por enterigi la fantomon unu fojon por ĉiam, faris en junio 1972 specialan raporton kontraŭ tiu ĉi malvera famo pri “forlaso de la Partio fare de Wu Hao”, kaj postulis, ke la raporto estu registrita en la dosiero. Li faris tiun ĉi neordinaran paŝon tial, ĉar fari la raporton registrita bonorde, nigre sur blanke, povos vanigi ĉiujn klopodojn de eventualaj kalumniuloj en la estonteco.

En septembro 1975, en la tago kiam li devis submeti sin al grava operacio, li petis transskribaĵon de sia registrita raporto. Li refoje atente tralegis ĝin, donis sian subskribon kaj datis ĝin la 20-an de septembro 1975. post tio li estis preta enruliĝi en la operaciejon. Ne certa, ĉu li povos supervivi la operacion, li lasis al kalumniuloj nenian kapteblan okazon.

Kaj tamen, post lia morto en la 8-a de januaro 1976, la kalumniuloj, Jiang Qing kaj ŝiaj konspirantoj, ree uzis sian kanajlan artifikon. Dum semajnoj la vaste cirkulanta *Cankao Ziliao (Referenca Mterialo)*, interna publikigaĵo de novaĵoj el eksterlandaj fontoj, eldonita ĉiutage de Xinhua-a Novaĵagentejo, portadis tributojn al la memoro pri la mortinta ĉefministro. Tamen iun tagon ĝi aperigis iom neordinaran artikolon pro Wu Hao, reproduktitan el iu Hongkonga ĵurnalo. Ĝi estis intence enmetita de la sekvantoj de la “kvarpersona bando” en Xinhua por kalumnii Zhou Enlai, evidente kun la aprobo de Yao Wenyuan, membro de la “kvarpersona bando”, kiu regis la novaĵkomunikilojn. Xinhua do estis bombardata per furiozaj leteroj kaj telefonadoj. Oni postulis klarigon pri tiu ĉi malnobla sugesto. La postulado estis tiel forta, ke fine Xinhua estis devigita presi pardonpeton, pretekstante malzorgemon, en la sekvanta numero. Poste en la jaro, la “kvarpersona bando” estis forbalaita por ĉiam, kaj kun ĝi ankaŭ la abortigita miskulpigo kontraŭ Wu Hao.

“Ponardo de Wu Hao” en *Popola Tagĵurnalo* en januaro 1980 estis ĝustatempa artikolo por memori la datrevenon de la morto de Zhou Enlai. Ĝi kondukis la legantojn returne al la tempo, kiam la Komunista Partio devis kaŝiĝi kaj Zhou servis kiel subtera revolucia gvidanto sub la terora regado de Kuomintango. En aprilo 1927 Ĉjang Kajŝek, sin apogante sur militaj sukcesoj en la Norden-ekspedicio<sup>3</sup>, kaptis la regadon super la provincoj de orienta Ĉinio, Jiangsu kaj Zhejiang. Tiam li subite interrompis la kunlaboron kun la komunistaj kaj komencis masakron, unue en Ŝanhajo kaj poste en aliaj partoj de la lando. Tio metis finon al la Kuomintang-Komunista Kunlaborado de 1924-27 kaj signis la komencon de dekjara sangoverŝa malpaco (1927-36), kiu estas rigardata kiel la Dua

Enlanda Revolucia Milito.

Tiu ĉi estis sanga periodo en la ĉina historio. Multaj estis mortigitaj sur la stratoj. La instrukcio donita al la Kuomintangaj ĉashundoj estis mortigi ĉiun komuniston, kiun ili kaptis, “prefere erare mortigi mil, ol lasi unu forgliti”. Kvankam en kaŝiteco, membroj de la komunista Partio konstante falis en la manojn de Kuomintangaj sekretaj policagentoj, ĉar iuj kun malfortaj genuoj fariĝis perfiduloj aŭ denuncantoj. En Shandong, provinco de orienta Ĉinio, en 1929 la loka Kuomintanga reĝimo faris plurajn atakojn al filioj de la Komunista Partio kun la helpo de perfiduloj, kaj multaj kamaradoj estis kaptitaj. Tio ĉi postulis tujan kontraŭagon.

La artikolo de *Popola Tagĵurnalo* rakontas, kiel Zhou Enlai, sekretario pri militaj aferoj estranta la stabon de la Partio en Ŝanhajo, decidis fari tujan rebaton. Okazas kunveno por diskuti pri tio kaj agadplano ellaboriĝas. Lia korpogardanto, bonega pafisto kaj spertulo pri tradicia ĉina luktarto, kaj alia helpanto estas komisiitaj elimini tiujn ĉi regenatojn. Iom poste, Zhou Enlai okulvitroj-portanta kaj vestita en longa ĉina robo, aperas en iu kuriozaĵbutiko, kiu estis uzata kiel kamuflaĵo en la urbo. Li atendas, ĝis la lastaj aĉetantoj foriras, kaj fermas la pordon post si, por ricevi de sia helpanto novaĵon, ke la misio jam estas plenumita. Li atentigas ĉiujn apudestantojn, ke uzi teroran rimdeon estas kontraŭ la principoj de la Partio, sed la cirkonstancoj en Shandong faras perforton nepre necesa por protekti la Partion kaj revolucionan aferon.

Jen estas la mallongigita ĉefa enhavo de “Ponardo de Wu Hao”. Ĝi verŝis lumon sur Zhou Enlai kiel ĉefon kaj organizanton de la Partio, laborantan en subteraj, ekstreme malfacilaj cirkonstancoj – kuraĝan, aplomban, sagacan kaj, se necese, senindulgan. Ĝi

montris ankaŭ lian spiton al la korpa danĝero, kiu sin esprimis iel kaj tiel en liaj Guangzhou-aj kaj Ŝanhajaj tagoj kaj poste dum la jaroj, kiam li reprezentis la Komunistan Partion en Chongqing, kie li denove fariĝis celon por Kuomintangaj murdistoj. Tio manifestiĝis ankaŭ en la danĝeroplana Longa Marŝado<sup>4</sup>. Trapasante la akre malvarmajn marĉozajn stepojn dum la marŝado, Zhou donis sian lastan porcion da hordeo al sia korpogardisto Wu Kajsheng, kiu enfalis en gravan malsanon. Insistante, ke la juna soldato prenu la nutraĵon, Zhou Enlai riskis sian vivon, ĉar en la sekvaj tagoj li devos manĝi sovaĝajn herbojn, kiuj, la soldatoj sciis el siaj malfacilaj travivaĵoj, povos kaŭzi veneniĝon kaj morton. En efektiveco homoj ja mortis ĉirkaŭ ili. Sed Wu Kaisheng, la korpogardisto, estis en terura bezono de eĉ porcieto da nutraĵo. Kontraŭvole li akceptis la donacon de sia politika komisaro.

Iafoje la neglektemo de Zhou Enlai al sia persona sekureco signifis inviti morton eĉ pli rekte, ekzemple kiam li cedis sian propran paraŝuton al kunvojaĝanto en plonĝanta aeroplano en 1946. dum la traktado kun la reĝimo de Ĉjang Kajŝek post la fino de la Dua Mondmilito Zhou ofte devis naveti inter Chongqing kaj Yan'an. Foje en flugado al Chongqing la aeroplano trafis en krudan veteron super Qinling-montaro kaj komencis kolekti sur siaj helicoj kaj flugiloj glacieron, kiu konsiderinde aldoniĝis al la ŝarĝo. Ĉar la aeroplano rapide perdis altecon, la piloto ordonis forĵeti la pakaĵojn kaj diris al la dek-kelkaj pasaĝroj en la aeroplano, ke ili pretigu ĉiu sian paraŝuton kaj atendu lian signalon de eksalto. Zhou Enlai leviĝis de sia sidloko kaj metis sur sin la sian kaj helpis al aliaj ĉe ilia surmetado. Subite plorkrio de iu knabino aŭdiĝis en la bruo kaj konfuzo. Ŝi estis la dekunuajara Ye Yangmei, filino de generalo Ye Ting (1896-1946), unu el la plej

fame konataj militaj figuroj de la moderna Ĉinio. Ŝi ploris pro tio, ke estis neniu paraŝuto sub ŝia sidloko. La penso, ke ŝi estos postlasita sen paraŝuto post elsalto de ĉiuj aliaj pasaĝeroj el la aeroplano, ŝin teruris.

Zhou Enlai rapide iris al ŝi kaj ŝin konsolis; li mallgis sian paraŝuton kaj alligis ĝin al la infano. Lu Dingyi – delegito de la Komunista Partio al la Chongqing-a intertraktado kaj poste unu el la vicĉefministroj de Zhou – kaj la aliaj pasaĝeroj multe ekscitiĝis. Iu proponis, ke Zhou Enlai uzu sian propran paraŝuton, dum Yangmei, malgranda kaj malpeza, povas esti ligita al unu el ili por fari la salton. Zhou ne konsentis pri tio, kaj pasis la danĝero kaj la piloto donis la signalon de sendanĝereco. Tiu ĉi incidento poste fariĝis ofte-rakontata legendo pri la amata ĉefministro de Ĉinio.<sup>5</sup>

Post sia reveno al Eŭropo en 1924 Zhou Enlai penis plenumi taskojn al li difinitajn kaj luktis kun situacioj variaj kaj kompleksaj, sekvante karieron plenan kiel de provokoj, danĝeroj kaj heroaĵoj, tiel ankaŭ de laŭroj, kiujn li ne serĉsis.

En la printempo de 1927, la demokratiaj kaj revoluciaj armitaj fortoj lanĉis en Guangzhou la militan kampanjon kontraŭ la nordaj militaristoj, kiu estas konata historie kiel la Norden-ekspedicio. Ili marŝis antaŭen nerezisteble kaj konkeris la tutan Yangzi-baxenon. Urbo post urbo estis akirita de la revoluciaj fortoj, dum ili antaŭeniris norden. Zhou Enlai estis sekrete sendita de la Komunista Partio al Ŝanhajo, kiu tiam estis ankoraŭ posedata de Sun Chuanfang, norda militaristo. La komisiono de Zhou estis organizi armitan leviĝon de 800 000 laboristoj tie por helpi preni la urbon de interne. Ĝi estis la tria leviĝo depost oktobro de la antaŭa jaro. La unuaj du malsukcesis pro manko de forta kaj bone organizita gvidantaro.

Ĵus atinginta la aĝon de dudek naŭ jaroj, Zhou okupis la postenojn de sekretario de la Partio por militaj aferoj de Jiangsu- kaj Zhejiang-provincoj kaj sekretario de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Partio. Li tuj komencis plenumi sian novan taskon. Zhao Shiyan el Sichuan-provinco, kiu, kiel laboristo-studento, antaŭe estis kun li en Francio, kaj Luo Yinong el Hunan, kiu studis marksismon en Sovetunio antaŭ kelkaj jaroj, estis liaj helpantoj. Estis la tria semajno de marto. Kiam la ekspediciaj trupoj pli kaj pli proksimiĝis al la antaŭurbo de Ŝanhajo, la timoplena reganta militaristo koncentris sian atenton sur la alirejojn al Ŝanhajo kaj tute ne sciis, ke io okazas interne de la urbo. Zhou Enlai alvestita vizitadis la pli aktivajn gvidantojn de la laboristaj sindikatoj, ofte konsiliĝis kun ili ĝis profunda nokto. Estis decidite fari ĝeneralan strikon ĉe la tagmezo de la 21-a de marto kaj poste provi kapti per armita leviĝo la regpotencon de la registaro.

Ŝanhajo estis dividita en sep distriktojn, por esti samtempe atakota laŭ la strategio planita de Zhou kaj liaj kamaradoj. Li persone gvidis la atakon, kiun faris la avangardo el kvin mil harditaj industriaj laboristoj, el kiuj la plej multaj partoprenis en la antaŭaj du leviĝoj. Tre rapide ilia vicaro pligrandiĝis je multaj dekoj da miloj da personoj, kvnkam en cirkonstancoj treege malfavoraj kaj kun nur malpli ol ducent fusiloj en la komenco, ili faris al la malamikoj grandan surprizon. La nesufiĉeco je pafiloj kaj municio de la ribelantoj estis kompensita, laŭ la propono de Zhou, per tiaj lertaj ruzaĵoj, kia eksplodigo de petardoj en malplenaj benzinujoj por imiti la sonon de mitrala pafado. Dum tridek horoj la ribelantoj persiste batalis, sieĝante policejojn kaj aliajn fortikaĵojn de la urbo, kaj superfortis la malamikojn. Je la sesa posttagmeze en la sekvanta tago la aŭtoritatoj estis devigitaj kapitulaci, kaj Zhou kaj liaj batalantoj okupis Ŝanhajon.

La triumfo de la tria armita leviĝo en la plej granda urbo de Ĉinio, kiu prezentas gravan mejloŝtonon en la histori de la Ĉina Revolucio, stampis Zhou Enlai kiel brillan strategiiston. Li montris tiujn ĉi bonajn kvalitojn kelkajn monatojn poste en alia leviĝo, la fama Nanchang-a Leviĝo kiu, en malsama situacio kaj en pli granda skalo, estigis la naskiĝon de la Ĉina Laborist-Kampana Ruĝa Armeo, la antaŭa formo de la Ĉina popola Liberiga Armeo.

Intertempe la Ŝanhajaj laboristoj estis perfiditaj de siaj propraj aliancanoj. Ili transprenis de la militaristoj la administradon nur por esti atakataj siavice de la armeoj de Ĉjang Kajŝek, post kiam ili enmarŝis en la urbon. En nur kelkaj semajnoj, tute senskrupule Ĉjang Kajŝek rompis la jam de longe starigitan interkonsenton inter Kuomintango kaj la komunistoj kaj sin turnis kontraŭ la revolucio.

Zhou Enlai kaj liaj kamaradoj sin turnis al subteraj agadoj kaj de la 12-a de aprilo Ŝanhajo fariĝis buĉejo. Komunistoj kaj progresemoj estis masakritaj sur la stratoj aŭ amase arestitaj kaj tuj ekzekutitaj. Luo Yinong estis murdita la 21-an de aprilo 1928 kaj Zhao Shiyang, la alia fidinda helpanto de Zhou, estis arestita kaj ekzekutita de Kuomintango la 19-an de julio. Zhou Enlai mem evitis la persekutadon kaj bonŝance eskapis kun la helpo de subteraj laborantoj de la Partio.

Fuĝinte for de la Kuomintanga persekutado, Zhou Enlai alvenis per ŝipo al Wuhan, kie li restis kelkan tempon, antaŭ ol komenci sian sekvantan pli gravan agon en Nanchang, la ĉefurbo de Jianĝi-provinco en suda Ĉinio, proksime de Ruijin, kie poste Mao Zedong, Zhou Enlai mem kaj iliaj kamaradoj starigis la unuan “Sovetan Respublikon” sur la tero de Ĉinio. Zhou atingis Nanchang ĉe la fino de julio, post kiam li estis elektita de la

Komunista Partio por gvidi plenskalan leviĝon kontraŭ Kuomintango. La celo en ia grado estis liberigi la ordinarajn partianojn de la influo de la “dekstra oportunismo” de la tiama Partia ĝenerala sekretario Chen Duxiu<sup>6</sup> – nome, liaj iluzioj pri daŭra kunlaborado kun Kuomintango malgraŭ la aprila masakrado al komunistoj en Ŝanhajo kaj aliaj lokoj. Tamen la leviĝo signis ĉefe la unuan sendependan armitan batalon fare de la komunistoj por savi la revolucion, kiun jam perfidis Ĉjang Kajŝek kaj lia kliko.

Post sia rolado en la Ŝanhaja leviĝo, kiu famigis lin kiel enlande tiel ankaŭ internacie, Zhou Enlai trovis sian nomon sinonima kun revolucia ribelo. Depost aprilo Kuomintango senĉese serĉis lin. Zhou malaperis el Wuhan kaj alivestita vojaĝis per ŝipo laŭflue de la rivero al Jiujiang, de kie li pluveturis al Nanchang, kun fidinda eskortanto, kiu estis nomata Chen Geng (kadeto de Huangpu-militakademio, kiu en 1955 fariĝis unu el la dek superaj generaloj de la Popola Liberiga Armeo). Ili sekure atingis la celon de sia vojaĝo en la lasta semajno de julio. Zhu De, intima amiko kaj kamarado en Berlino kvin jarojn antaŭe, estis, sufiĉe oportune, ĉefo de la Buroo de Publika Sekureco de Nanchang. Li loĝigis la neanoncitajn gastojn ĉe la numero 4 de Huayuanjiao, sia privata loĝejo, kiu estis libera de malbonvenaj spionaj okuloj.

Kiel gvidanto de la leviĝo, portanta la nerimarkindan titolon sekretario de la Frontlinia Komitato, Zhou Enlai tuj komencis sian laboron. En al 27-a de julio li kunvokis en Jianĝi-a Granda Hotelo – kiu poste fariĝis la ĉefkomandejo de la leviĝo – kunvenon de Liu Bocheng, Yun Daiying, Ye Ting kaj alia sindonaj partianoj, kiuj kolektiĝis en Nanchang por lin helpi. Ili diskutis pri la situacio, kiun ili opiniis favora, decidis pri agadplano, kaj elektis la noktomezon de la 30-a de julio kiel la horon por lanĉi la leviĝon.



Generalo He Long, kiu komendis la dudekan Armeon, garnizonantan najbare de Nanchang, malkaŝe montris abomenon kontraŭ Ĉjang Kajŝek kaj simpatio por la revolucio; li tiam estis preta sin dediĉi al la revolucia afero. Estante ankoraŭ ne membro de la Komunista Partio (post la leviĝo li aliĝis al la Partio, kun Zhou mem kondukanta la ceremonion), He Long ne estis vokita al la sekreta kunveno en la hotelo, sed Zhou Enlai opiniis nepre necesa viziti lin en la sekvanta tago kaj konfidis al li la sekreton. He Long volonte konsentis partopreni en la leviĝo, kaj metis siajn trupojn sub la disponon de Zhou. “Mi obeos la Komunistan Partion kaj faros, kion ĝi volas, ke mi faru,” li diris al Zhou Enlai.

La Dudeka Armeo sub He Long, la elitaj regimentoj de la dudekkvara Divizio, kies komandanto estis generalo Ye Ting (profesia militisto, kiu aniĝis al la Komunista Partio tuj post sia reveno el Sovetunio en 1924), plus la regimento el kadetoj trejnitaj de Zhu De kaj liaj publiksekurecaj trupoj, kune konsistigis potencon armeon de pli ol tridek mil spersonoj. Poer nombro, per spirito, per batalpreteco, ili superis la de ili alfrontotajn Kuomintangajn trupojn, kiuj nombriĝis nur je iom pli ol dek mil.

Ĉio ŝajnis perfekte kunordigita. Tamen en la 29-a de julio Zhang Guotao<sup>7</sup>, kiu staris dekstre de la politika spektro kaj havis skrupulojn pri la leviĝo, dufoje telegrafis al Zhou Enlai el Jiujiang en la nomo de la Centra Komitato de la Partio, ke “la leviĝo devas esti efektivigita kun aparta singardemo”, kaj ke “la leviĝo devas esti prokrastita” ĝis lia alveno al Nanchang. Zhou Enlai konsiliĝis kun siaj kamaradoj en la ĉefkomandejo. Ili decidis ignori tiun ĉi entrudiĝon kaj plu agadi laŭplane, kaj nur ŝanĝi la tempon de la leviĝo al la unuaj horoj matene de la 1-a de aŭgusto. En la lasta momento antaŭ la agado Zhang

Guotao<sup>7</sup> postulis revizion en la deklario redaktita por la leviĝo, kio evidente estis ruzajo por prokrasti la agon, sed Zhou Enlai firme opinis. “Se estas farenda ia revizio, mi estos tiu, kiu ĝin faros, jen ĉio.”

He Long fariĝis ĉefkomandanto de la leviĝo, kun Liu Bocheng, sperta armea komandanto el Sichuan-provinco, kiel sia stabestro. La revoluciaj fortoj komencis batalon en la difinita tempo. Zhu De, la ĉefo de la Buroo de Publika Sekureco, faris neordinaran kontribuon, invitante superajn Kuomintangajn oficirojn al luksa bankedo kaj regalante ilin per abundo da drinkaĵo je kelkaj horoj antaŭ la planita leviĝo. Tre baldaŭ ili senmovebliĝis. Batalo ĉesis post kvinhora interŝanĝo de pafoj, kaj la malamikoj demetis siajn armilojn. La Nanchang-a Leviĝo estis unu el la plej brilaj horoj de Zhou Enlai.

Je la naŭa horo en la mateno de la 1-a de aŭgusto 1927, la leviĝo estis celebrata per la starigo de revolucia komitato por Nanchang el dudek kvin membroj, inkluzive de Zhou Enlai, He Long, Soong Ching Ling (la vidvino de d-ro Sun Jat-sen) kaj Guo Moruo, la fame konata poeto kaj historiisto. La koleriĝinta Ĉjang Kajŝek regroupigis siajn militajn fortojn kaj urĝe sendis helpajn trupojn al la Nanchang-a regiono, kie li esperis ekstermi la ribelantojn. La revoluciaj trupoj ekmarŝis suden en la 5-a de aŭgusto, dezirante kapti Guangzhou kaj aliajn ŝlosilajn partojn de Guangdong-provinco. En tio ĉi ili ne sukcesis, sed la Nanchang-a Leviĝo estigis la naskiĝon de la komunistaj revoluciaj armitaj fortoj, la fama Laborist-Kamparana Ruĝa Armeo. Baldaŭ poste la unua kampara bazloko estis starigita. La revolucia armeo kreskis rapide, tiel ke ĝi poste povis defendi la bazlokon kontraŭ la potencaj malamikaj fortoj, entrepreni la malfacilegan Longan Marŝadon, sukcese alveni al nordokcidenta Ĉinio kaj starigi novan ĉefstabejon en Yan'an kaj

komencis ludi ŝlosilan rolon en la rezistado kontraŭ la japana agreso.

Dum parto de la Longa marŝado de 1934-35 ekde la interna parto de Jianĝi-provinco en la sudo al la leŭsa altebenaĵo en la nordokcidento, Zhou Enlai, malsana je tifoida febro, kuŝis sur brankardo. La marŝado estis peniga por ĉiu, de plejsuperaj gvidantoj ĝis ordinaraĵaj piedsoldatoj, kaj ofte ŝajnis super homa eltenpovo. Zhou Enlai ne povis toleri la ekpenson, ke oni portas lin per brankardo, kvankam lia rango kiel politika komisaro kaj vicprezidanto de la Partia Milita Komisiono plene rajtigis lin ricevi tian prizorgon. Lia malsano ne permesis al li piediri, por ne paroli pri marŝado, kaj li estis gravega por la revolucio. Lin malgrankviligis ĉefe tio, kiom multe da korpaj fortoj estas bezonataj al liaj kamaradoj kun la kliniĝintaj kaj lacigitaj ŝultroj por porti lin sur brankardo. De tempo al tempo li insistis pri piedirado, sed liaj kamaradoj insistis same obstine, ke li estu portata. En postaj jaroj, kiel ĉefo de la delegacio de la Komunista Partio en Chongqing, li ĉiam rifuzis veturi en portoseĝo portata sur la ŝultroj de homoj, tiama ordinara transportilo en la dumilita montoza urbo.

Dum tiu ĉi parto de la Longa Marŝado, unu el la brankard-partantoj estis Yang Lisan (1900-54), generalo okupiĝinta pri armea provizado. Kiam Yang mortis malonge post la Liberiĝo, Zhou Enlai ĉeestis lian funebran solenon kaj servis iel ĉerkoportanto, kio estis manifestiĝo de persona amikeco kaj eble ankaŭ esprimo de komplezo reciprokata. Sed estis ankoraŭ io pli ol tio. Kiam Zhou Enlai faris la specialan peton esti unu el la ĉerkoportantoj, li estis instigita de motivo pli alta ol simpla amikdeo kaj dankemo. Tio estis lia maniero saluti kamaradon, kiu en malfacilegaj tempoj faris pli ol kio estis al li taskita, ne zorgante pri si mem.

La sekvanta okazo, kiu ebligis al Zhou Enlai akiri mondan atenton, estis en la tempo de Xi'an-evento de 1936, kiam Ĉjang Kajŝek estis forkaptita de du el siaj propraj generaloj. Generaloj Zhang Xueliang kaj Yang Hucheng komandis Kuomintangajn trupojn en la nordoriento kaj en la nordokcidento respektive. En la nordoriento la japanaj agresantoj jam okupis vastajn areojn de la ĉina teritorio, kaj arde deziris plifirmigi sian akiraĵon. Sed la ordonoj de Ĉjang Kajŝek estis daŭrigi la batalon kontraŭ la komunistoj anstataŭ kontraŭ la japanoj, kaj tio ĉi forte indignigis la patriotajn generalojn. Post vana foj-refoja petegado pri ŝanĝo en politiko, Zhang kaj Yang kaptis la "generalisimon", intencante devigi lin batali kontraŭ la japanaj invadantoj.

Ili invitis la Yan'an-ajn gvidantojn sendi reprezentanton al Xi'an, la ĉefurbo de Shaanxi, por traktado inter la tri interesataj partioj – Ĉjang Kajŝek, la du generaloj kaj lia morta malamiko, la koministoj. Zhou Enlai estis elektita kaj tuj flugis per la privata aeroplano de Zhang Xueliang al Xi'an. La historia intertraktado, kiu sekvis, rezultigis la duan periodon de Komunist-Kuomintanga Kunlaborado, unuigitan rezistadon kontraŭ la japanaj agresantoj. La komunistoj metis la intereson de la nacio super ĉian konsideron pri venĝo kontraŭ sia malnova malamiko Ĉjang. La granda takto kaj diplomateco de Zhou helpis konduki tiujn ĉi delikatajn traktadojn al sukcesoplena fino, kaj tial li poste fariĝis la ĉefa reprezentanto de la Komunista Partio en la ofte streĉa kaj komplika laboro de interligo kun la Kuomintanga registaro.

Malsame ol en pli fruaj tagoj, Zhou Enlai nun ne plu bezonis sekrete fari subterajn agadojn. De la tempo de Xi'an-evento en 1936 ĝis la eksplodo de la Tria Enlanda Revolucia Milito (1946-49), kiu igis la Kuomintangajn gvidantojn fuĝi de la ĉeftero al

Taiwan, la batalo de Zhou Enlai kontraŭ lia ĉefa antagonisto estis en malkaŝeco, kiel diplomato kaj traktanto, sincera kaj tamen malcedema kontraŭ nehonestaj taktikoj. La multflankeco de la talento de Zhou Enlai – ĉu kiel revoluciulo, sindona sen doktrinismo; kiel traktanto, persistema sen rigideco; kiel diplomato, firma en sia starpunkto sen malkonstanteco; aŭ kiel administranto, kiu traktis sin tiel severe kiel siajn subulojn – faris lin la natura kaj evidenta elektito kiel ĉefministro de la nova Ĉinio en oktobro 1949. tiam li estis en la matura aĝo de kvindek unu jaroj, kvin jarojn pli juna ol Mao Zedong, kaj ses jarojn pli aĝa ol Deng Xiaoping.

Por administri la plej multehoman landon de la mondo, Zhou Enlai havis mil kaj unu devojn, precipe en la unuaj jaroj de la Popola respubliko. Li devis provizi kaj subteni la Ĉinajn Popolajn Volontulojn batalantajn ŝultro ĉe ŝultro kun la armeoj de Kim Il Sung kontraŭ la usonaj agresantoj en Koreio, kaj samtempe preni rimedojn por resanigi la ekonomion frakasitan de longaj jaroj da milito kontraŭ la reĝimo de Ĉjang Kajŝek. Tamen, malgraŭ tio, nenio ŝajne povis eviti lian atenton.

Baldaŭ post la Liberiĝo du raraj kaligrafiaj rulaĵoj uzataj kiel garantiaĵo por banka prunto en Hongkong staris en danĝero fali pro neplenumita repago en manojn de ruzaj internaciaj artaĵkolektantoj, kiuj volis pagi tre altajn sumojn por ili. La limdato por la elaĉeto estis antaŭ la fino de 1951. Zhou Enlai instrukiis al la plej koncerna registara departemento reakis tiujn ĉi naciajn trezorojn je ia ajn kosto. La paro, kune kun alia peco konservata en Pekino, prezentas la tri plej rarajn trezorojn de la ĉina kaligrafio, kies historio datiĝas jam de pli ol 1 500 jaroj. La trio, specimenoj de la senprecedence grandaj kaligrafoj de Ĉinio, ĉiuj nomataj Wang, nun estas ekspoziciata en Pekina Palaca Muzeo.

Kvankam neveste konata en tiu tempo, la rapida reakiro de la kaligrafoj estigis konsiderindan influon sur la intelektulan eliton de la lando, ĉar, kiam la komunistoj ĵus enpotenciĝis, kompreneble neniu estis certa, kia estos ilia inteno al la kultura heredaĵo de Ĉinio. Nun oni trankviliĝis.

Fakte, en la antaŭvespero de tutlanda venko kaj eĉ antaŭ la preno de la registara potenco, Zhou Enlai jam turnis siajn pensojn al la demando konservi de kanonado gravajn historiajn lokojn, kiam la Popola Liberiga Armeo persekutis la armeojn de Ĉjang Kajŝek trans Yangzi-riveron. En kunveno ĉeestata de altrangaj oficiroj, kiel estro de la Ĉefstabo, li speciale ordonis al la armeo zorgi, ke Tianyige-biblioteko en Ningbo (Zhejiang-provinco) kaj Jiayetang-biblioteko en Wuxing (Jaingsu-provinco), en kiuj konserviĝas multaj el la plej fruaj kaj raraj eldonaĵoj, estu protektataj kaj sendifekte konservataj. Laŭ lia propono Katalogo de la Naciaj Historiaj Lokoj kaj Antikvaj Restaĵoj kun nomoj kaj situoj estis pretigita, presita kaj distribuita al ĉiuj trupunuoj kie eldona memorigilo por oficiroj kaj soldatoj.

Tamen tio ne estis konservo por konservo. Kiam pli grandaj interesoj postulis, ke iuj lokoj estu malkonstruita, li agis kun sama decidemo. En 1954, kiam la pajloŭ-oj, aŭ arkaĵoj en Pekinaj mallarĝaj stratoj fariĝis trafik-obstrukcantaj kaj kaŭzadis akcidentojn, la problemo estis metita antaŭ iu plivastigita kunveno de la Ŝtata Konsilantaro (kabineto). Iuj estis por tuja malkonstruo. Aliaj faris fortan peton pri kompato. Profesoro Liang Sicheng<sup>8</sup> (1901-1972) el Guangdong-provinco, fama arkitekto, kun larmoj en siaj okuloj petegis pri konservo. Nun estis la vico por la prezidanta ĉefministro diri la lastan vorton. Kiel poeto, kia li estis en siaj pli junaj jaroj, li citis versduon el poemo de Tang-dinastio: “Senfine bela

estas la krepousko, sed ĝi nur tro proksimas al noktiĝo.” La konservo-skolo, li daŭrigis, estas kaptita de “krepusko”-manio, ĉar ĝia argumento estas prezentata sen deca konsidero pri la bezonoj de urba disvolviĝo. Venkis la malkonstruo-skolo. Tamen kelkaj el la arkaĵoj, konsiderataj kiel indaj je konservado pro sia arta valoro, estis translokitaj kaj restarigitaj en la parko Taoranting. La afero do estis solvita je ĉies kontento.

Mallonge post la fondiĝo de la Popola Respubliko, Zhang Honggao<sup>9</sup>, menciita en la antaŭaj paĝoj, venis al Pekino por vidi sian malnovan samklasanon, kiu jam fariĝis la ŝtata ĉefministro. Pasis jam dudek jaroj de post ilia lasta renkontiĝo en 1930, kiam sur sia revenvojo de Sovetunio al Ŝanhajo Zhou Enlai mallonge haltis en Harbino, urbo en nordorienta Ĉinio.

En la oficejo de la ĉefministro en Zhongnanhai ili parolis pri la malnovaj tempoj, pri tio, kion Zhou Enlai kun ĝuo faris kun siaj Nankai-aj samlernejanoj, ĉar li havis amon al sia vizitita lernejo. Nature la nomo de Zhang Boling, ilia malnova lernejdirektoro, estis menciita. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, la studento kaj la direktoro ambaŭ estis en Chongqing, la dummilita ĉefurbo, sed iliaj vojoj ne kruciĝis. Tiam Zhou Enlai jam fariĝis tutlande konata eminentulo kiel la ĉefo de la delegacio de la Komunista Partio, dum Zhang Boling, famulo en sia profesia sfero, estis nenio pli ol funkciulo en la registaro de Ĉjang Kajŝek. Pere de triulo Zhou petis sian antaŭan direktoron pri kopio de listo de la Nankai-aj samlernejanoj. La peto perpleksigis la maljunulon, ĉar pro momenta kontraŭ-komunisma fervoro, eble puŝate de la deziro plaĉi al Ĉjang Kajŝek, li forstrekis la nomon de la estonta ĉefministro de Ĉinio el la listo de la diplomitoj de la jaro 1917. Tamen li ekpentis kaj haste enmetis la nomon de Zhou manskribe ĉe la fino de la nomlisto de 1917.

Post la Liberiĝo, la ĉefministro konfideme diris al sia samklasano, ke Zhang Boling iam skribis al li leteron. Interalie estis tiuj ĉi pentemaj vortoj: “Mi nun enfermas min en la hejmo por fari introspekton.” Tio ĉi estis tipa ĉina esprimo, kiu implicis, ke iu persono faris ion eraran kaj provas peti pardonon. Sciante, ke la malnova direktoro estas en senileco en Chongqing, Zhou Enlai sendis aeroplanon por revenigi lin al Tianjin, por ke li povu pasigi siajn lastajn tagojn en la komforto de hejmo, al kiu li kutimis. Tio estis aparta favoro, ĉar en tiuj fruaj tagoj post la Liberiĝo ne estis komercaj aviadiloj flugantaj inter la du urboj. Kiam Zhang Boling mortis en 1951, la ĉefministro veturis al Tianjin por esprimi la lastajn respektojn de studento. Plie, Zhou faris tion ja en la ofico de registara kaj partia gvidanto.

Estis karaktera trajto de Zhou Enlai, ke li ne havis malpardonemon kontraŭ iu ajn, eĉ ne kontraŭ iu, kiu iam faris al li malbonon. Estis egale karaktera trajto de li, ke li ne forgesis iun ajn, kiu iam faris bonon por la revolucio kaj la patrujo, en publika aŭ privata maniero.

La 2-an de majo 1971, Zhou Enlai veturis al Babaoshan-tombejo de revoluciuloj por ĉeesti tion, kio laŭ li devos esti funebra soleno por la ministro de la Geologia Ministrejo, Li Siguang (d-ro Joseph S.K. Lee), la internacie konata ĉina geologo. Li venis por fari omagon al sia kolego kaj persona amiko, kiu pli ol iu ajn ebligis al Ĉinio malkovri kaj disvolvi la faman Daqing-petrolkampon. Sed subite Lin Biao kaj Jiang Qing, tiam okupantaj altajn postenojn, malice asertis ĉiujn “funebrajn solenojn” feŭda praktikado kaj dekretis, ke ili devas esti anstataŭigitaj per tiel nomataj “adiaŭaj ritoj”.

Se ne estos funebra soleno, tiam necesos nenia funebra parolado. Kial? Zhou Enlai



volis scii. Kial Li Siguang devis fariĝi escepto? Kaj kial oni ne konsiliĝis kun la ĉefministro kaj lin ne informis? Videble li koleriĝis. Li enŝovis la manon en sian poŝon kaj elprenis la leteron, senditan al li de Li-familio. Sen peti opiniojn de la vidvino, filino kaj aliaj membroj de la familio, li demandis Guo Moruo, prezidanton de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu kondukis la ceremonion, kaj aliajn respondeculojn, ĉu ili konsentos pri lia lego de la letero anstataŭ funebra parolado. Ĉiuj kapjesis. La funebrantoj staris en silento, kaj kiam la funebra muziko venis al sia fino, Zhou iris al la mikrofono. Li parolis kviete kaj solene, pardonpetante en la nomo de la Ŝtata Konsilantaro pro tio, ke li ne preparis funebran paroladon konvenan por homo, kiu faris tiom multe por la patrujo. Li volis scii, ĉu la letero de k-dino Li Lin, la filino de la geologo, taŭgos esti legata anstataŭe. Li lin, naskiĝinta en 1923, la sola infano de la geedzoj Li, posedas doktorecon de filozofio el Kembriĝa Universitato kaj mem estas sciencistino.<sup>10</sup>

Li Siguang (1889-1997), kiu mortis en sia okdek-unua jaro, dezirus vivi nur kelkajn monatojn pli longe por fini iun esploron pri sisma prognozo, taskon metitan al li de la ĉefministro mem. La letero rakontis, kiel feliĉa li estis pro tio, ke li povis dediĉi la lastajn dudek jarojn de sia vivo al plenumo de io valora al patrujo. Ĝi esprimis lian dankemon al la Partio kaj registaro pro la tuta helpo kaj afableco, kiujn li ricevis. Li volus paroli, longe paroli, kun la ĉefministro pri la disvolviĝo de scienco en Ĉinio, sed li ŝanĝis la ideon. Paĉjo, lia filino skribis, trovis ne konvena fari la peton, sciante, ke la ĉefministro estas tro okupita dum tiuj tagoj de la “kultura revolucio”. Sekve li skribis siajn pensojn sur paperon. Inter liaj postlasaĵoj ŝi trovis iun skribaĵon. Legante ĝin la ĉefministro levis sian voĉon:

En tia granda socialisma lando, kia la nia, ni havas en ni la kuraĝon kaj forton venki ĉion, kio baras al ni la vojon, por grimpi al la pinto de scienco kaj teknologio kaj malfermi grandegan rezervujon de energio en la interno de la tero por

la bono de nia popolo. Se anstataŭ penadi en tiu ĉi direkto ni sekvos la iritan vojon de kapitalismo kaj malŝparoos la mineralan riĉaĵon, ekzemple karbon, heredigitan al ni de la naturo, kaj forbruligos ĝin en senzorgema maniero, tiam post kelkaj jardekoj la infanoj de niaj infanoj ne pardonos nin pri nia stultaĵo kaj malprudentaĵo.

Li plu legis kaj poste venis al abrupta halto. Estis vortoj pri la ĉefministro mem, vortoj komplimentaj de dankemo al li mem kaj Deng Yingchao, lia edzino. Li Lin diris en la letero, ke ŝia patro iam diris al la familio, ke la ĉefministro traktas sin tro severe, laborante pli ol dudek horojn ĉiutage, sep tagojn ĉiusemajne, kaj ŝi petegis lin gardi sian sanon pro la patrujo. Zhou Enlai transsaltis la tutan paragrafon.

Zhou Enlai kaj Li Siguang konatiĝis unu kun la alia en la 1940-aj jaroj, kiam ili ambaŭ estis en Chongqing. Ili renkontiĝis nur du fojojn dum tiu periodo, ĉar viziti tro ofte la ĉefon de la delegacio de la Komunista Partio el Yan'an povus kaŭzi al li malfeliĉon. Kvankam iliaj kontaktoj estis mallongaj kaj tre maloftaj, ili tamen komprenis unu la alian sufiĉe bone, ke ili povus malkaŝeme interŝanĝi politikajn opiniojn, kaj Zhou trovis, ke Li ne ŝatas Ĉjang Kajŝek. Tiutempe Ĉjang uzis devigon kaj kajolon por igi fame konatajn instruistulojn ornami lian reĝimon kaj sekvi Kuomintangon. Li invitis la profesoron servi en lia registaro, sed la invito estis rifuzita. Ĉar minacoj jam estis disemitaj kaj persekutoj povis sekvi, Zhou proponis, ke Li serĉu provizoran rifuĝon eksterlande.

Profesoro Li kaj lia edzino finfine forlasis Ĉinion ĉe la fino de 1947 por resti en Britujo, kie li iam estis studento. Oportune, por lia vojaĝo al Eŭropo unu preteksto sin prezentis, ĉar li ĵus ricevis de la Internacia Geologia societo inviton por ĉeesti ĝian Dekokan Kongreson en la brita ĉefurbo en la venonta semero.

En aŭgusto la Internacia Geologia Societo okazigis en Albert-halo en Londono sian Dekokan Kongreson, la unuan tian kunvenon en dek unu jaroj depost la Deksepa Kongreso, kiu okazis en Moskvo antaŭ la milito. Profesoro Li Siguang, en la nomo de

Ĉinio, liveris traktaton pro geomekaniko, kaj baldaŭ poste retiriĝis al Bournemouth, apudmara turisma loko en suda Anglujo, kie li pensis, ke la saniga maraero eble estos bona por li kaj lia ezino. Li suferis koronarian perturbon kaj lia edzino kronikan altan sangpremon. Dum ilia restado en Bournemouth, la disvolviĝado de la situacio en Ĉinio atingis sian kulmion, kaj la novaĵoj estis kuraĝigaj. Ili komencis paroli pri reveno al sia patrujo. En la plej fruaj horoj de la 2-a de oktobro 1949 ili aŭdis pere de BBC la novaĵon pri la naskiĝo de la Popola Respubliko. Ĝi estis la plej grava novaĵo de la radio-disaŭdigo, kun citado de depeŝo sendita el Pekino de Reuters-korespondanto. Li estis ankoraŭ en matena robo, kiam la telefono ektintis. Tio estis virina voĉo, en kiu li rekonis tiun de Ling Shuhua, malnova amikino, kies edzo Chen Yuan<sup>11</sup> havis rilatojn kun la Kuomintanga ambasadorejo en Londono.

“Via nomo estas en la listo de membroj konsistigantaj la Popolan Politikan Interkonsiliĝan Konferencon. Taiwan jam instrukciis al sia ĉi-tiea ambasadorejo, ke ĝi ekagu. Se vi ne faros deklaron pri rifuzo, ĝi provas reteni vin ĉi tie eksterlande.” Ŝi sciigis ankaŭ, ke la ambasadoro mem eble jam estas sur la vojo al Bournemouth por fari al li personan premon.

Estis neniom da tempo por perdi. Li pakis kelkajn objektojn, eniris en trajnon al Southampton kaj tie per kargoŝipo veturis al Cherbourg sur la alia flanko de la angla Markolo. Antaŭ la foriro li diskutis kun sia edzino pri plano erarigi Kuomintangon en la priflarado. Ili elektis Basel kiel sian rendevuejon en Svislando.

En la sekvinta tago de lia hasta foriro, unu sekretario, ne la ambasadoro, aperis en lia hotelo en Bournemouth. Kiam oni diris al la sekretario, ke la profesoro jam forveturis al

Turkio por fari surkampan esploradon, li grimacis kaj skribis ĉekon por 5 000 usonaj dolaroj. “Por kio tio estas?” S-ino Li reĵetis ĝin en lian vizaĝon. Li toleris la ofendon, sed li insistis, ke ŝi legu kopion de la telegramo el Taiwan, sen diri, kompreneble, iun ajn vorton pri reteno. “Vi povos doni ĝin persone al la profesoro, kiam li revenos el Turkio,” ŝi diris kaj montris al li la pordon.

La sesan de majo 1950 Li Siguang kaj lia edzino revenis en Ĉinion. La sekvantan posttagmezon ĉefministro Zhou vizitis ilin en ilia hotelo kaj restis kun ili tri horojn malgraŭ la streĉiteco de sia horaro. Post kiam la profesoro malaperis el Bournemouth, Zhou malsukcesis teni sin informita pri li kaj nur lastatempe ricevis informon, ke la paro baldaŭ venos al Hongkong. Unu helpanto estis sendita tien por fari aranĝon por ilia vojaĝo al la ĉefurbo. Estis iam onidiroj, ke Li Siguang fine ne venos al la patrujo. Iuj klaĉoj eĉ malice aludis, ke li eble jam iris al Taiwan. Sed la fido de Zhou Enlai al la profesoro ne estis skuita. Li insistis, ke la unua geologia konferenco de Ĉinio post la Liberiĝo estu prokrastita ĝis la reveno de Li Siguang.

En sia konversacio kun la paro en Pekino, la ĉefministro proponis, ke ili ambaŭ ricevu plenan medicinonan ekzamenon. “Vi suferas je brustangino, ĉu ne? kaj kiel estas la tuberkulozo?” li demandis la profesoron. “Ne necesas plu maltrankviliĝu, ĉar la plej bonaj medicinaj rimedoj nun estas je nia dispono.” Zhou Enlai tion diris, ĉar li rememoris, ke dum la jaroj en Chongqing la profesoro, ne havante sufiĉe da mono por pagi medicinajn kostojn, devis malpliigi vizitojn al la hospitalo, por uzi sian malgrandan enspezon por pli urgaj elspezoj. La unua afero por la geologo antaŭ ol li sin ŝarĝos per novaj respondecoj, Zhou insistis, estas ricevi ekzamenon de kuracistoj kaj havi longan ripozon. “Ankaŭ

Shuping,” diris la ĉefministro, “devas ekzameniĝi kaj ricevi kuracadon kontraŭ sia alta sangpremo.” Meti sin sur alies lokon, doni helpon al kamaradoj en malfeliĉo, estis frapanta karakterizaĵo de Zhou Enlai, la homo kaj ŝtatisto. Sed dum sia vivdaŭro li neniam permesis, ke io eĉ iomete sugesta pri laŭdo estu skribita pri li mem, pri lia rolo en la revolucio aŭ liaj personaj kvalitoj. Nur post lia morto oni povis pli bone koni la ĉefministron kaj ekscii liajn multajn bonajn farojn, kiuj antaŭe ne estis notitaj.

Dum la “kultura revolucio” li ofte estis okupita je serĉado de rimedoj protekti kaj konservi la veteranojn de la Ĉina Revolucio de la Guangzhou-aj tagoj tra la Longa Marŝado ĝis la Yan’an-a tempo. En tiuj jaroj, krom Mao Zedong, li estis unu el tiuj plej bone lokitaj, kiuj povis malpezigi, se ne haltigi, la frapojn venantajn de la bandoj de Lin Biao kaj Jiang Qing.

Yang Yong (1921-1983), la lasta ĉefkomandanto de la Ĉinaj Volontuloj en la korea milito, estis trafa ekzemplo. Nomunita ĉefkomandanto de trupunuoj de PLA en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono en la malproksima okcidento de Ĉinio post sia reveno el Koreio en 1958, Yang Yong estis enskribita en la nigran liston de Lin Biao kaj liaj bandanoj en la komenco de la “kultura revolucio”. Unu el la plej altrangaj veteranoj treege kalumniataj, li estis transdonita al la “Ruĝaj Gvardianoj” por “batal-kunvenoj”. Kiam ĉefministro Zhou informiĝis pri tio, kio okazis, li ordonis veturigi la generalon al Pekino per speciala aeroplano pretekste, ke tiu ricevu kuracadon. Terura taŭzado jam rompita al la generalo unu kruron. Poste Yang Yong fariĝis unu el la vicestroj de la Ĉefstabo de PLA, kaj estis ankaŭ membro de la Sekretariato de la Partia Centra Komitato en la tempo de sia morto en 1983.

Ne nur veteranoj ĝuis lian protektadon. Kie ajn evidenta maljustaĵo kaptis lian okulon aŭ orelon, li senescepte faris reĝustigon. Ekzemple, en 1973 li reĝustigis maljustaĵon faritan al Pekina feko-kolektanto, Shi Chuanxiang. Shi praktikis tiun ĉi profesion de sia knabeco ĝis la tago, kiam la bando de Jiang Qing asertis, nekredeble, ke li estas netaŭga por la laboro. La fakto estis, ke li bonege faris sian laboron kaj pro tio estis elektita al la Tutlanda Popola Kongreso. Estis unu fotografaĵo, prezentanta lin manpremantan kun Liu Shaoqi, la ŝtatestro. Nu, laŭ la logiko de la bando, se iu povis manpremi kun Liu Shaoqi, kiun ili nomis la “iranto de la kapitalisma vojo”, do li devis esti aĉulo. Tial la feko-kolektanto estis kondamnita kiel “laborist-perfidulo” kaj forpelita el la ĉefurbo.

La akuzo estis tiel absurda, ke la maljuna modela laboristo freneziĝis pro ĝi kaj perdis la parolkapablon. La 20-an de aŭgusto 1973, prezidante super kunveno por kontroli la laboron de la Buroo de Publikaj Servoj de Pekino. Zhou Enlai okaze menciis Shi Chuanxiang kaj oni rakontis al li la sorton de la kompatinda homo. “Kio! Ĉu do renversi feko-kolektanton estas la celo de la ‘kultura revolucio’?” Li furioze kriegis. Tio estis, kiel oni scias, unu el la tre malmultaj okazoj, ĉe kiuj la ĉefministro perdis la sinregadon. Li tuj instrukiis al la urba registaro sendi iun en la nomo de la Partia organizaĵo al la hejmloko de Shi en Shandong por peti lian pardonon, inviti lin reveni al Pekino kaj doni al li ĉiajn medicinajn prizorgojn, kiujn li bezonis. Tiel finiĝis unu malnobla okazaĵo de la “kultura revolucio”.<sup>12</sup>

La “kultura revolucio” estis la plej malfacila periodo de lia longa, eventoplana kariero. Li devis teni la landon en unueco. Samtempe li penis ŝirmi kolegojn kaj subulojn de maljustaj atakoj kaj eviti pli aŭ malpli kaŝitajn pikilojn, kiuj estis celita al li mem. Li

neniam faris ion duone. Li kutime konsideris ĉiujn flankojn de problemo kaj ĉiun eventualecon, eĉ la eblecon, ĉu iu kamarado alpremita al muro povus fari sinmortigon. Zorgemeco ja estis patrico de Zhou Enlai – laborstilo, kiun li sekvis longe antaŭ la “kultura revolucio”.

De 1952 ĝis 1962 Xi Zhongxun servis kiel ĝenerala sekretario de la Ŝtata Konsilantaro. Antaŭ ol li estis transpostenigita al Pekino por labori sub Zhou Enlai, li estis unua sekretario de la Nordoocidenta Buroo de la Partia Centra Komitato, la homo numero unua en nordokcidenta Ĉinio. En la Dekaj Plena Sesio de la Oka Partia Centra Komitato, okazigita en somero de 1962, Xi subite trovis sin sieĝata de ĥaoso da atakoj. Li estis etiketita kiel “granda kontraŭ-Partia komplotanto kaj intriganto” pro tio, ke li estis la iniciatino de unu “kontraŭ-Partia” romano Liu Zhidan.<sup>13</sup> Poste en sia artikolo skribita por honori la memoron de Zhou Enlai en *Popola Tagĵurnalo*, Xi Zhongxun identigis sian akuzanton kaj atakanton al “tiu memnomita teoria aŭtoritatulo”.

Kiu estis tiu ĉi enigma “teoria aŭtoriatulo”? Ĝis la somero de 1980 kiam lia identeco estis fine malkaŝita, la ĉinaj novaĵkomunikiloj ofte aludis tiun ĉi misteran personon per alia esprimo, “tiu konsilanto de la Gvida Grupo de la Kultura Revolucio”, iafoje kun la epiteto “ĉefa” antaŭ la vorto “konsilanto”. Kiam la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio” fonidĝis en 1966 kun Chen Boda kaj Jiang Qing ĉe la kapo. Ĝi havis du konsilantojn: Tao Zhu (1908-1969) el Hunan-provinco kaj Kang Sheng (1898-1975) el Shandong. Tiam Tao Zhu estis la homo numero kvara, post Mao Zedong, Lin Biao kaj Zhou Enlai, en la hierarkio de la Partio. Antaŭ tio li estis la unua sekretario de la Centra Suda Buroo de la Partia Centra Komitato. Interna batalo en la gvidanta grupo elpelis lin

frue en 1967. Tao estis ĵetita de Lin Biao kaj liaj kunuloj en malliberejon kaj tenata en izolita enfermo. En 1969 li mortis pro persekutiĝo. Kune kun aliaj maljuste kondamnitaj veteranoj, Tao Zhu nun jam estas postmorte rehonorigita.

Kang Sheng, kiun timis la subtenantoj de Jiang Qing, profitis de la tumultoj de la “kultura revolucio” kaj prosperis. De alterna membro de la Politika Buroo en la komenco de la “kultura revolucio”, li sin puŝis al la plej alta ŝtupo kaj fariĝis membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo. De post la falo de Jiang Qing li neniam estas menciita krom kun malestimo, ĉar multaj fiagoj dum tiu ĉi traŭmatizita periodo povas esti atribuitaj al li.

Estis Kang Sheng, kiu ĵetis koton sur Xi Zhongxun ĉe la kunveno de la Centra Komitato. Tio estis ektondro el blua ĉielo. La intima kamarado de Zhou Enlai estis tro konsternita por defendi sin, alvizaĝante miksamason da akuzoj ĵetitaj al li de kunvenantoj, kiuj sciis nenion pri la romano, sed estis instigitaj de la “teoria aŭtoritatulo”. Ankoraŭ pli malbone, Mao Zedong, prezidante, legis al la kunveno letereton skribitan kaj transdonitan al li de Kang Sheng: “Uzi romanon por ataki la Partion estas rimarkinda invento.” Ĉu la prezidanto konsentis pri tio, kio estis skribita tie, aŭ nur transdiris la opinion de unu membro ĉeestanta al la kunveno, oni ne sciis. Ĉiuokaze tiuj vortoj, vaste diskonigitaj de Kang Sheng, fariĝis “citaĵo el Prezidanto Mao” kaj estis uzataj de la senskrupululoj kiel armilo. Xi Zhongxun falis en malfacilan situacion, preskaŭ elpelita el la Centra Komitato.

Antaŭ la “kultura revolucio”, dum dek jaroj Xi, kiu estas el Shaanxi-provinco en nordokcidenta Ĉinio, estis la dekstra mano de Zhou Enlai en direktado de ĉiutaga laboro de la Ŝtata Konsilantaro. Por plenumi siajn taskojn ili laboregis eĉ en dimanĉoj. Ili ofte



kunmanĝis en la manĝejo de la Ŝtata Konsilantaro, dum kio ili daŭrigis nefinitajn oficajn aferojn. En 1959 Ĉinio dronis en ekonomiaj malfacilegoj, kaj greno kaj viando estis porciumitaj. Ĉiu plenkreskulo estis permesita ricevi dudek kvin ĝis tridek ĝinojn<sup>14</sup> da greno ĉiumonate, kaj manlaborantoj ricevis kelkajn pliajn ĝinojn. Zhou Enlai difinis al si malaltan ciferon. Tial, kiam li kaj lia edzino invitis amikojn al manĝo en sia hejmo, ili ĉiam atentigis ilin – bonvolu veni, sed portu viajn proprajn nutraĵo-kuponojn. Eĉ la ĉefministro de Ĉinio ne povis ne zorgi pri sia malabunda porcio.<sup>15</sup>

Iun tagon li kaj Xi Zhongxun ree kune manĝis en la publika manĝejo. Kiel kutime, la ĉefministro staris en vico, kaj kiam li atendis, li rimarkis la malbonan kvaliton de la servita manĝaĵo kaj la palan vizaĝkoloron de la kadroj. Reveninte en sian oficejon, ili parolis pri la afero, pri registaraj laborantoj ne ricevantaj sufiĉajn kaloriojn, pri io farebla por altigi la nivelon de la ĉefmanĝaĵo kaj la ĉefaj pladoj. Zhou Enlai proponis starigi produkt-bazlokojn de “memhelpo”, por kreskigi grenon kaj legomojn, bredi porkojn kaj kortobirdojn, ktp.

Laŭ la ordono de la ĉefministro, la ĝenerala sekretario instrukciis unue al la diversaj fakoj de la Ŝtata Konsilantaro kaj poste al aliaj registaraj departementoj kaj Partiaj establoj sendi laŭvice ĉiujn kadrojn labori sur siaj propraj kultivejoj kelkan tempon ĉiujare por produkti kion ili povis, por aldoni al sia nutraĵo. Tio ĉi, Xi Zhongxun rememoris, tre multe helpis al la pliboniĝo de la vivo en tiuj malfacilaj jaroj 1959-1961.

Estis plezuro kaj privilegio labori sub gvidanto, kiu vere zorgis pri siaj subuloj. Por Xi la longaj laborhoroj ne estis ĝeno, ĉar li kun ĝuo dividis kun la ĉefministro la dolĉamaran politikan vivon de la ĉefurbo. Nun ke li estis kulpigita antaŭ la Centra

Komitato, ĉio ĉi ja devus finiĝi.

Li bezonis tempon por mediti pri la akuzoj ĵetitaj al li en la vizaĝon, kaj li iris al la ĉefministro por peti formermeson por prepari sian defendon, aŭ la tiel nomatan “ekzamenon pri eraroj”. Poste li iris hejmen, tre malespera. Li dronis en pli profunda deprimiĝo, kiam la ĉefministro telefone vokis lin al si por interparolo. Chen Yi, vicĉefministro kaj ministro de eksteraj aferoj, estis kun la ĉefministro, kaj ili diris, ke ili parolas en la nomo ne nur de si mem, sed ankaŭ de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Mao.

La entuziasma marŝalo Chen penis lin trankviligi. “Mi faris pli grandajn erarojn ol vi. Nenio ĉagrena. Necesas al vi nur ilin ĝustigi. Nu, gajiĝu!” La ĉefministro montris grandan zorgemon. “La Partio kaj Prezidanto Mao havas fidon al vi. Eĉ se sin trovas tiu ĉi afero pri Liu Zhidan, vi povas fari riparon, se vi eraras.” Premante al Xi la manon, Zhou aldonis: “Ni restas bonaj amikoj. Kio ajn okazos, vi devas fari nenion stultan.” Xi sufokiĝis de larmoj kaj ne povis diris eĉ unu vorton, sed li kaptis la plenan sencon de la lastaj vortoj de la ĉefministro.

Tamen Zhou Enlai ankoruax ne trankviliĝis. Li telefonis al la edzino de Xi kaj diris al ŝi, ke ŝi prenu kelktagan forpermeson por resti hejme kun sia edzo kaj atente zorgi pri li. Certigu vin, ke li faros nenion stultan, la ĉefministro avertis ŝin.

Xi havis malfacilan tempon post sia ekziĝo. En 1965 li recevis laboron kiel vicdirektoro de fabriko en Luoyang, Henan-provinco. Li finfine pruviĝis senkulpa, kaj la afero pri Liu Zhidan montriĝis nenio alia ol kalumnia kulpigo fare de Kang Sheng. Li do estis kvalifikita por nova posteno pli konvena al lia kapablo kaj sperto, kaj la falo de la bando de Jiang Qing akcelis lian promociiĝon. Li estis nomumita Unua Partia Sekretario de Guangdong-provinco en suda Ĉinio, kaj brile laboris sur sia posteno. Hodiaŭ Xi Zhongxun estas membro de la Politika Buroo, okupanta altan lokon en la potencostrukturo.

De la tago, kiam Zhou Enlai venis en sian oficejon en Zhongnanhai en 1949 ĝis li

forlasis ĝin en 1974 por ricevi kancerkuracadon en la hospitalo, li pasigis la plejparton de nedormaj horoj en simple meblita oficejo kun preskaŭ nenia ornamaĵo escepte de busto de Mao Zedong. Laŭlonge de la muroj viciĝis libroŝrankoj, kaj lia skribotablo, kvankam granda, aspektis jam sufiĉe eluzita. Tri kvadrataj tabloj, kunmetitaj por formi rektangulan konferencan tablon, plus kelkaj seĝoj, kompletigis la inventaron. La ununura aldona meblo akirita dum lia longa oficitenado estis litseĝo, kiun Mao Zedong sendis al li kiel donacon en 1972. ĉar lia jam malsaniĝinta kolego rifuzis enhospitaliĝi, Mao pensis, ke tia seĝo povas helpi mildigi la laciĝon de longaj laborhoroj. En aliaj rilatoj, la oficejo de la ĉefministro restis same tia, kia ĝi estis tiam, kiam la okupanto venis en ĝin. Eĉ la telefonnumero en la ekstera ĉambro de lia oficefjo, uzata por ricevi telefonvokojn de ordinaraj popolanoj, restis la sama, kvankam oni iam provis ĝin ŝanĝi. Iu sagaca burokrato en la Telefona Administracio, opiniante la alvenantajn telefonvokojn tro multaj, proponis, ke la numero estu ŝanĝita aŭ ne enlistigita. Li tuj ricevis riproĉon de la ĉefministro, kiu diris, ke la kamarado ja elpensis bonegan rimedon por disigi la ĉefministron for de la amasoj!

La malnova oficefjo de Zhou Enlai, en Xihuating de Zhongnanhai, estis iam parto de la oficiala loĝejo de princo Zaifeng, la lasta regento de Qing-dinastio. Ĝi estis uzata ankaŭ de Yuan Shikai kaj Duan Qirui de la militarismaj reĝimoj, post kiam Ĉinio fariĝis respubliko en 1911. kiam la revolucio fine triumfis en 1949, ĝi estis kvazaŭ ĥaoso de ruinoj, sed la ĉefministro decidis, ke kun iom da riparo li povos facile uzi ĝin kiel oficejon. Li volis nenion luksan kaj imponon ĉirkaŭ si kaj malpermesis ĉian nenecesan elspezon de la ŝtata mono. Tial, kiam oni elmietis por lia aprobo la planojn konstrui dek “grandajn

konstruaĵojn”<sup>16</sup> por signi la dekan datrevenon de la fondiĝo de la Popola Respubliko, li firme kontraŭstaris al unu projekto – konstruo de nova oficejo por la Ŝtat Konsilantaro. Li diris al Xi Zhongxun kaj aliaj vicĉefministroj, ke tiel longe kiel li restos ĉefministro, li ne permesos konstrui tian konstruaĵon. Li tiel severe regis la elspezadon de la ŝtata mono, ke li riproĉis eĉ subulon, kiu, profitante la okazon de lia vizitado eksterlande, rekonstruigis en la loĝejo de Zhou la necesejon, kiu efektive bezonis riparon.

En Xihuating la lampoj lumis de sunsubiro ĝis sunleviĝo. La ĉefministro komencis la tagon post la tagmanĝo, laboris dum la tuta posttagmezo, haltis por vespermanĝo kaj poste, je la oka vespere, daŭrigis la laboron seninterrompe, ĝis la tuta plenumenda laboro estis finita. Li havis ĉiam skatoleton da ĉingljangjoŭ (refreŝiga oleo) ĉemane kaj, se li sentis laca, li ŝmiris al si la tempiojn per iom el tiu ĉi stimulilo por sin sproni. Iafoje la ĉingljangjovu ne efikis, kaj li ekbruligis cigaredon, kvankam kutime li estis nefumanto, por ke li povu plu sin teni. En ĉiu laborperiodo li konsumis multajn pintigitajn kraĵojn, sed li estis pli lerta en manipulado de ĉina peniko por skribi instrukciajn notojn sur la stakon da ŝtataj dokumentoj sur sia skribotablo. Por ekstrema dormemo li foje-foje lasis inkmakulojn tie kaj tie. Kiam li devis labori super dokumento longajn horojn post la noktomezo, sciante, ke la korpo ne ĉiam obeas la spiriton, li de tempo al tempo uzis varman mantukon por teni sin maldorma.

Dum la “kultura revolucio”, Zhou Enlai malofte ĝuis eĉ kvar horojn da dormo, ĉar multaj neantaŭviditaj novaj aferoj bezonis lian prizorgon. Li kutime dormetis en sia aŭtomobilo survoje al kaj de kunvenoj, kaj la horoj de liaj manĝoj estis tre neregulaj. Li fariĝis pli kaj pli malgrasa kaj pala. Maltrankviliĝinte, sekretarioj servantoj ŝoforoj, ankaŭ

kuracistoj kaj flegistinoj de la Ŝtata Konsilantaro decidis “ribeli” post vanaj provoj persvadi lin malpliigi la laborstreĉon. La 3-an de februaro 1967 ili subskribis kaj gluis sur la pordo de lia oficejo la jenan grandideografiaĵan afiŝon:

*Kamarado Zhou Enlai:*

*Nun ni estas en stato de ribelo kontraŭ vi. Ni volas, ke vi ŝanĝu vian laborritmon kaj ĉiutagan rutinon, ĉar nur se vi tiel agos, vi povos adaptiĝi al la ŝangiĝoj en viaj korpaj kondiĉoj kaj servi la Partion pli longe kaj pli bone. Ni estas motivitaj de kio laŭ ni estas la plej altaj interesoj de la Partio kaj la revolucio. Do nepre obeu nian postulon.*

La ĉefministro respondis la sekvantan tagon per ok vortoj: “Mi akceptas kun sincereco. Bonvolu observi mian plenumadon.” Du tagojn poste, kvin proponoj venintaj de lia edzino Deng Yingchao kaj subskribita per ŝia nomo estis aldonitaj al la afiŝo. Kolegoj, kiuj lin vizitis, interalie vicĉefministroj Li Xiannian, Chen Yi kaj Nie Rongzhen, ĝin vidis kaj aprobis per siaj subskriboj. Ĝi fariĝis unu el la plej vaste konataj afiŝoj de tiu periodo, manifestanta vivecan opinio-interŝanĝon inter la kritikato kaj kritikantoj. Kvankam la premo sur la ĉefministro ne malpliigis, tamen ŝajnis, ke li iel elturniĝis el la antagonismo. Aĝo, ofte uzata kiel preteksto por fari malpli multe da laboro, ĉe Zhou Enlai fariĝis preteksto por fari pli multe. Ju pli oni maljuniĝas, des pli malmultiĝas la tagoj restantaj por fari la laboron – jen lia ĉiama preteksto.

Destinita por skribotabla laboro dum la plejparto de siaj nedormaj horoj, la ĉefministro de tempo al tempo persone faris ian inspektadon en vespero. Iafoje liaj helpantoj sendis antaŭsciigon al la loko inspektota, ke la ĉefministro iros tien, kaj iafoje ili tion ne faris, ĉar ili mem eksciis nur en la lasta minuto. Iuvespere li vizitis Pekinan ĉefan

magazenon sur la strato Wangfujin ĉirkaŭ la fermohoro en la minuto, kiam la direktoro ricevis sciigon pri lia alveno, li anoncis pere de laŭtparolila sistemo: Kamaradoj klientoj, ni havas alian aferon por prizorgi ĉi-vespere. Bonvolu foriri pli frue ol en la kutima fermohoro. Dankon.” La voĉo estis apenaŭ forsoninta, kiam Zhou Enlai enpaŝis tra la flanko enirejo. “Ho ne, vi ne devas fari tion. Vi devas esti pli prudenta,” li riproĉis la direktoron. Li kun rideto rifuzis la proponon de taso da teo en la ripozejo antaŭ ol komenci sian inspektadon.

La ĉefministro miksis isn en la amason da aĉetantoj kaj paŝis rekte al la vendotablo de fontoplumoj. Li petis por si unu, kaj ankaŭ la permeson trempi la plumon en la inko por provi la bekon. La komizo post la vindotablo havis nenian ideon pri la homo, kiu stairs antaŭ li. Li estis tro absorbita per sia abako, adiciante la vendokvantojn de la tago, aŭ eble jam pensante pri sia reveno hejmen. Li nur kapjesis, faris nenian konversacion, kaj eĉ ne levis sian rigardon. Zhou provis la bekon sur papero kaj skribis tri legeblajn ideografiaĵojn – ZHOU ENLAI. Oni ne scias, ĉu la konsternita vendisto fuŝis siajn kontojn en tiu vespero.

Poste la ĉefministro aliris al la razila vendotablo, komencis paroli kun la vendistoj, sed ne faris aĉeton. Li tamen petis ilin transdoni vorton al la fabrikantoj. “Diru al ili, ke ili faru ion por plibonigi la kvaliton de siaj malakraj raziloj,” li diris kun rideto, “ĉar ili estas netaŭgaj por mi kaj por aliaj.” Zhou Enlai iam havis vangoplenan barbon, restaĵon el siaj tagoj de la Longa Marŝado, dum Xi’an-evento en 1936, kiam li estris la delegacion de la Komunista Partio en la triflanka intertraktado kun Ĉjang Kajŝek kaj ties forkaptintoj Zhang Xueliang kaj Yang Hucheng. En tiuj tagoj la estonta ĉefministro estis konata inter

siaj amikoj kiel “Zhou la Barbulo”.

Li povis tre rapide kreskigi abundan barbon. Foje, kiam li estis devigita ferii ĉe la marbordo de Dalian laŭ ordono de Mao Zedong, unu el liaj skurigaj helpantoj proponis, ke li kresigu barbon por eviti rekoniĝon sur la marbordo. Zhou pensis, ke la ideo estas absurda, kaj prelegis al la akompanantoj pri “barboj kaj korpogardistoj”. Havi tro da sekurecgardistoj ĉirkaŭe, li diris al ili, izolus lin for de popolanoj kaj malebligis al li havi kontakton kun ili. La sekureco, por esti vere efika, devas apogiĝi sur la fido kaj subteno de la amasoj, li diris emfaze. Por kio do taŭgas nur manpleno da homoj, kiaj vi? Kaj kreskigi barbon? Li ekridis kaj diris, “Al mi? al la ĉefministro, la popola servanto? Kiel vi povas proponi tion, kio apartigus min de la popolo!”

Tial li neniam prenis kun si pli ol du korpogardistojn. Dum siaj noktaj ekskursoj for de sia Zhongnanhai-a oficejo li ofte estis akompanata nur de unu sekvanto.

Estis iom post la deka ptm. en la 26-a de septembro 1958. Ĝuste tiam, kiam la lasta aŭtobuso de la 5-a linio de la stacio de Xijing-strato estis alproksimiĝanta al la haltejo ĉe Tianqiao, en suda Pekino, la Tianqiao-a Teatro malfermis siajn pordojn por la teatrovizitintoj hejmenirantaj. Du homoj enaŭtobusiĝis. Unu pagis por du naŭ-cendaj biletoj. Deŝirinte kaj doninte la biletojn al la pasaĝero, la nova kondukto tuj rekonis, kiu tiu estas. “Ĉefministro Zhou!” li ekkriis.

“Nu, junulo, kiel statas via laboro?” la ĉefministro demandis lin. “Ĉu vi jam alkitimiĝis al tio?” Antaŭ ol li povus respondi, pasaĝeroj konkure penadis premi al Zhou Enlai la manon. La kondukto boris sian vojon tra la tumulta homamaso antaŭen al la ŝoforo kaj diris al li, ke la ĉefministro estas en ilia aŭtobuso. Kiam ĝi atingis

Beihai-parkon, la haltejon por Zhongnanhai, la konduktoro malfermis la pordon kaj saltis sur la troturaron, preta por helpi al Zhou Enlai elaŭtobusiĝi. Preskaŭ same facilmove, la ĉefministro elaŭtobusiĝis tuj post li, etendis sian manon kaj dankis lin. La juna konduktoro premis ĝin per ambaŭ manoj. Kun granda bedaŭro li tro malfrue ekpensis, ke li eĉ ne diris ion konvenan responde.

Tio ĉi ne estis la ununura fojo, ke la ĉefministro veturis en aŭtobuso por vidi propraokule la kreskantajn problemojn de la publika vetursistemo de la ĉefurbo. Li provis veturi antaŭ en troleaj aŭtobusoj, starante kun regulaj pasaĝeroj kaj malakceptante sidlokon ceditan al li. Li volis trovi, kia hompleneco regas en aŭtobusoj en la plej gremaj horoj. En 1972 oni proponis ŝanĝis la kurson de la aŭtobuso de la 14-a linio, kiu preterkuris la okcidentan pordon de Zhongnanhai. Pli da oportuneco kaj sekureco por tiuj, kiuj laboris kaj loĝis en Zhongnanhai, estis la motivo por la ŝanĝo elmetita de departemento pri transportado. “Ne,” Zhou diris, “oportuneco por kelkaj signifus maloportunecon por multaj.” La propono estis flanken metita kaj ĝis nun la kurson de la aŭtobuso de la 14-a linio restas neŝanĝita.

Inter ĉefministroj Zhou Enlai eble estis la unika, kiu prenis sur sin la devojn de trafika policano. Oni plurfoje vidis lin direkti la intensan trafikfluron alvenantan por publikaj ceremonioj en la Popola Halo aŭ la Pekina Hotelo. Okaze de iu ŝtata bankedo estis serioza trafika obstrukco antaŭ la granda kunveno de la ĉefurbo. Zhou Enlai aperis. Mansvinge direktante la aŭtomobilojn preterveturantajn, li demandis, kial “Hei Da Ge” ne deĵoras?

Hei Da Ge (Bruna altkreskulo) estis la ŝercnomo de Yu Youfu (nun kapitano de la trafika polico ĉe la Pekina Publiksekureca Buroo), policano, kiu estis lerta en direktado kaj



kontrolado de trafiko kun aplombo. Iu flustris al la ĉefministro en la orelon, ke Hei Da Ge jam transposteniĝis. “Do revenigu lin,” ordonis la ĉefministro, “tuj revenigu lin.” Estis mirindaĵo, ke la nomo kaj vizaĝo de ordinara policano povis tiel firme gravuriĝi en la menso de la ĉefministro.

La fakto estas, ke Zhou Enlai malofte forgesis nomon aŭ vizaĝon, eĉ jarojn post unua renkontiĝos. Dum sia intervidiĝo en 1957 kun veteranaj laboristoj de la Ŝanhaja armita leviĝo antaŭ tridek jaroj, li povis voki ĉiun el ili per ties nomo.

Tra la tuta longa kariero de Zhou Enlai liaj agoj kaj decidoj estis gvidataj de unu centra principo – ĉu ili utilas al la popolo. Gravaj demandoj pri politiko estis kompreneble deciditaj de la Partio aŭ registaro, sed, ĉar ĉiuj efektivaj paŝoj, kiujn li prenis kiel administra estro de la lando, estis influantaj la vivon de pluraj centoj da milionoj da homoj, li ne povis ne antaŭe konsiliĝi kun siaj kolegoj. Li donis gravecon kiel al petitaj tiel al nepetitaj opinioj de kadroj malalt-nivelaj. Laŭ li bona gvidanto ne devas esti memizolanto, orakolo, ĉar orakoloj estas danĝeraj estaĵoj. Dum bona gvidanto devas persisti ĉe ĝusta juĝo, li devas samtempe esti preta forlasi eraran decidon kun plena volonteco. Bona gvidanto devas scii kiel konvinki kaj persvadi skeptikulojn al decido, kiun li opnias ĝusta, sed li devas samtempe esti sufiĉe grandanima kaj sufiĉe kuraĝa, por submeti sin al la ĝustaj opinioj de aliaj. Tio, li klarigis, estas parto de demokratio.

Ĉar li praktikis kion li predikis, homoj laborantaj rekte sub li sentis sin liberaj diri kion ili pensis, tute ne timante lin ofendi. Zhou ne volis jeshomojn ĉirkaŭ sia oficejo, kaj li abomenis flatojn kaj komplimentojn. Tiaj naŭzaj vortoj, kiaj “La opinio de la ĉefministro estas absolute ĝusta kaj mi subtenas ĝin plene kaj senkondiĉe”, kaŭzis al li antipation. Foje

li donis al tia flatulo sinceran kritikon: “Kiam ni parolas aŭ okazigas kunvenon, tio estas por diskuti pri problemoj, por pesi ĉiun por kaj kontraŭ, por ekzameni malsamajn opiniojn kaj poste veni al ĝusta konkludo. Mi volus aŭskulti opiniojn malsamajn ol la miaj. Ne ĉiam diri ‘Mi konsentas’ aŭ ‘Mi subtenas tion.’”

Tute vere, lia kontribuo al la lando estis netaksebla. Sed li ĉiam insistis, ke la merito apartenas al la Centra Komitato de la Partio kaj Mao Zedong, ke la publika atento devas turniĝi al aliaj. Krom se la etiketo postulis, ekzemple kiam oni faris grupajn fotografadojn, li ĉiam provis eviti fariĝi la centro de publika atento kaj libere miksis sin en homamasojn. Por diri per la preferata esprimo, li ŝatis esti “nur unu el la amaso”. Sed kiam io fuŝiĝis, li la unua elpaŝis por preni sur sin la kulpon. Li neniam forpuŝis la respondecon. Antaŭ homoj en kaj ekster la Partio, li neniam hontis paroli pri siaj propraj mankoj kaj eraroj en la pasinteco, ĉe kunvenoj kaj en konversacioj. Se tio povis servi al la utila celo. Ies eraro, li opiniis, devas esti alies averto. Li faris memkritikon tiel serioze, ke Mao Zedong iam rimarkis: “Kamarado Enlai jam faris tro da memkritiko.”

En 1959, por celebri la dekan datrevenon de la naskiĝo de la Popola Respubliko, la registaro deklaris specialan amnestion al militkrimuloj, plejparte de la periodo de la enlanda milito. En tiu okazo Zhou Enlai lasis sin regi de profunda emocio. En la antaŭtago de la Nacio Festo (la 1-a de oktobro), kun la ĝenerala sekretario de la Ŝtata Konsilantaro Xi Zhongxun en ĉeesto, li akceptis en sia Xihuating-a oficejo iujn el la iamaj generaloj favorataj de Ĉjang Kajŝek, ĝuste antaŭ ol ili estis liberigitaj por ĝui sian unuan enspiron de libereco.

Du Yuming (1905-1981), bopatro de la ĉin-devena usonano Yang Chen Ning,

Nobel-premiito pri fiziko, estis en plena ekscitiĝo. Pli frue, li ne atendis, ke tiel baldaŭ li povos esti liberigita, por ne paroli pri ĝuo de tia honoro. Li siatempe estis la komandanto de la Kuomintangaj armeoj en centra Ĉinio batalantaj kontraŭ la Popola Liberiga Armeo, kies estro de Ĉefstabo estis neniu alia ol la homo, kiu nun lin gastigis.

En la lastaj tagoj de 1948 Du fariĝis kaptito en Huaihai-kampanjo en Jiangsu-provinco, unu el la lastaj bataloj, kiuj definitive decidis la sorton de la reĝimo de Ĉjang Kajŝek. Du videble estis en ĝeneco, ne sciante kiel sin teni, nek kion diri, ĉe tiu ĉi renkontiĝo en tute neatenditaj cirkonstancoj. La ĉefministro provis lin malembarasi. Fingromontrante la ĝeneralan sekretarion Xi Zhongxun, li diris al Du, ke li kaj Xi estas el la sama provinco Shaanxi. Poste li demandis lin, kian aĝon li havas kaj ĉu li fartas bone.

La pardonita generalo rektigis sin. “Mi estas kvindekkvinjara,” li respondis, kaj per duoncerta tono li aldonis, “en la plej bona sano.” Tiuokaze la ĉefministro aldonis, “vi estas ankoraŭ sufiĉe juna por fari ian utilan laboron por la lando.” Du reakiris iom da trankvileco, senŝarĝiginte sin de tio, kion li nomis la krimoj kontraŭ la popolo. “Kompreneble vi estas kulpa,” la ĉefministro edife daŭrigis, “sed ĉar vi nun jam rekonas tion kaj volas turni novan paĝon, do estas bone. Fakte,” li diris, “eble ankaŭ mi devas preni parton de la kulpo, ĉar vi estis unu el la kadetoj en la Huangpu-militakademio. Eble mi ne bone faris mian laboron kiel politika instruitoro, ne edukis vin kaj la aliajn en la ĝusta direkto, tiel ke vi iris la eraran vojon.”<sup>17</sup>

**Notoj:**

1. *Shen Bao* estis elektita de Ŝanhajaj subteraj gvidantoj de KPC kiel la perilo por refuti la fabrikitan mensogon, ke “Wu Hao forlasis la Partion”, ne nur pro tio, ke ĝi estis la plej vaste legata ĵurnalo, sed ankaŭ ke progresema verkisto kiel ekzemple Lusin, Bakin kaj Mao Dun, regulaj kontribuantoj al ĝiaj rubrikoj, povis igi maldekstremajn legantojn primediti la strangan leteron al “s-ro Wu Hao” enmetitan en la reklaman sekcion de la ĵurnalo.

2. Dum sia vizito al Ĉinio en 1922 Viscount Northcliffe, eldonisto de *The Times* de Londono, estis tiel impresita de *Shen Bao*, ke li nomis ĝin “The times de Ŝanhajo”. Poste la posedanto de la plej prestiĝa ĵurnalo de Ĉinio, Shi Liangcai (1878-1934) estis favore komparata kun sia brita similulo. Krom publikigado de *Shen Bao*, li riĉiĝis per aliaj entreprenoj. Li subtenis Ĉjang Kajŝek en la malfruaj 1920-aj jaroj, sed li seniluziiĝis, kiam la Kuomintanga ĉefo komencis fari dubindajn traktadojn kun Japanio, kiu tiam pli kaj pli malkaŝe invadis la ĉinan teritorion. Sekve Shi Liangcai rifuzis doni sian subtenon kaj anstataŭe kontribuis al la kontraŭjapanaj aferoj. Li estis murdita de la sekreta polico de Ĉjang Kajŝek la 13-an de novembro 1934 sur Ŝanhaj-Ĥangzhou-a ŝoseo. Zhou Enlai, en sia raporto al la Kongreso de KPCĈ en la 3-a de marto 1944, retrorigardante la enlandan situacion de la pasintaj jaroj, priskribis Shi Liangcai kiel reprezentan figuron de “Kontraŭstara forto interne de la tendaro de la reganta klaso”. *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, Vol. I, p. 185. Ankaŭ Rakontoj de Patriotoj de la Moderna Ĉinio, p. 180, Popola Eldonejo, Ŝanhajo.

3. Norden-ekspedicio (1926-1927): Milito kondukita sub la kunlaborado de la Komunista Partio kaj Kuomintango, kontraŭ la nordaj militaristoj, agentoj de imperiismaj kaj feŭdaj fortoj. – Trad.

4. Longa Marŝado (1934-1936): Strategia transmoviĝo fare de la ĉefaj fortoj de la Ĉina Laborista-Kampana Ruĝa Armeo, el la centra revulicia bazloko kaj aliaj bazlokoj al la bazloko en norda Shaaxi-provinco. Dum la marŝado la trupoj de la Ruĝa Armeo senĉese renkontis la sieĝadon, persekutadon, blokadon kaj atakadon de Kuomintangaj trupoj, trapasis multajn grandegajn malfacilojn kaj danĝerojn kaj kreis miraklon en la historio de la homaro. – Trad.

5. La aeroplano portanta Zhou Enlai kaj aliajn membrojn de la delegacio de KPCĈ al la politika interkonsiliĝa konferenco kun la Kuomintangaj intertraktantoj ekflugis de Yan’an en perfekta vetero en la mateno de la 30-a de januaro 1946, sed ĝi renkontis hajloŝtormon super Qinling-montaro. Ye Yangmei, la plej juna el la dekkelkaj pasaĝeroj, estis ekscitita, ĉar ŝi estis rekuniĝonta kun siaj gepatroj – ĵus liberigitaj el Kuomintanga malliberejo post kvin jaroj – kaj vidonta unufoje sian pli junan fraton, naskitan en la malliberejo. Du monatojn poste, generalo Ye Ting kaj lia tuta familio, inkluzive de Yangmei, mortis en aeroplana kraŝo dum sia reveno al Yan’an. Vidu *Memore al Zhou Enlai*, Vol. II, p. 116, Popola Eldonejo, Pekino, kaj Eventoplenaj Jaroj skribitan de Liu Jiuzhou, Peng Haigui kaj He Qian, p. 99, Popola Eldonejo, Tianjin.

6. Unu el la dek du fondintoj de la Komunista Partio de Ĉinio, Chen Duxiu (1880-1942) el Huaining-gubernio, Anhui-provinco, estis profesoro ĉe la Pekina Universitato kaj famiĝis kiel la redaktoro de *Nova Junulo*. Li poste kuniĝis kun Li Dazhao, sia kolego ĉe la Pekina Universitato, por fondi *Semajna Revuo* por disvastigi la tiam nomatan “novan kulturon” kaj dissemi marksismajn ideojn. Li estis unu el la ĉefaj aktivuloj de la Movado de la 4-a de Majo de 1919 kaj post la naskiĝo de KPCĈ estis unu el la ĝiaj superaj gvidantoj dum ses jaroj. Sed en la fino de la Unua Enlanda Revolucia Milito (1925-27) Chen seniluziiĝis kaj kapitulacis sub la Kuomintanga premo. Li funkciis kiel trockiisto interne de la Partio kaj estis eksigita el la Partio en novembro 1929.

7. Zhang Guotao (1897-1979) el Pingxiang-gubernio, Jiangxi-provinco, kvankam unu el la fondinto de KPCĈ. Fifiĝis pro sia malhonesteco kaj maldekstrema oportunismo. En 1935 li endanĝerigis la Longan Marŝadon al Shaanxi-provinco, retirante de la antaŭdifinita vojlinio la Kvara-frontan Armeon sub sia komando kaj starigante nelegan Partian Centron en opozicio al la gvidado de Mao Zedong, starigita ĉe Zunyi-konferenco. Dum Xi’an-evento de 1936 li proponis, ke Ĉjang Kajŝek estu mortigita, dum Mao Zedong, Zhou Enlai, Zhu De kaj aliaj superaj gvidantoj, sub la cirkonstancoj de la japana agresado kaj la neceseco unuigi la landon, opiniis, ke naciaj interesoj postulas intertraktadon kun la kaptita Kuomintanga ĉefo. En 1938 Zhang sekrete forlasis Yan’an, ligis sin kun Kuomintango, kaj dungiĝis en ĝian sekretan

policon. Li estis forpelita el KPĈ. En 1979 li mortis en Kanado.

8. Liang Sicheng (1901-1972), filo de fama jarcent-turniĝa politika reformisto kaj fekunda verkisto Liang Qichao, studis arkitekturon en Qinghua-universitato en Pekino kaj poste faris postdiplomitiĝan studadon en Usono, subtenate per stipendio. Dum kelka tempo li instruis arkitekturon kaj estis kritikita pro prefero al “grandaj vizierteĝmentoj” por la domoj konstruitaj en la ĉefurbo en la malfruaj 1950-aj jaroj.

9. Zhang Honggao estis kolegia studento en Japanio en la sama tempo kiel Zhou Enlai. Post la morto de Zhou, Zhang publikigis artikolon memore al sia amiko el Huai’an, rememorante iliajn tagojn en Tokio. Li siatempe petis konsilon de Zhou Enlai, ĉu li devus provi eniri en alian kolezion je risko de perdo de sia stipendio. Vidu “Nankai-lernejaj Tagoj kun Zhou Enlai” en *La amata Ĉefministro de la Popolo*, Vol. II, p. 67.

10. Ne estis glata por Li Lin la sinregistriĝo por postdiplomitiĝa studado en Granda Britio. En aŭgusto 1946, post kiam ŝi alvenis en Birminghama Universitato, la registristo sendis ŝin al la fakultato pri fiziko por fari esploradojn pri “plasteco” anstataŭ “elasteco” pro eraro farita en unu litero dum plenumo de formularo ĉe la oficejo de la Brita Konsulejo en Chongqing. Ŝi eltenis la malfeliĉan okazaĵon kaj transiris de Birminghamo al Kembriĝo, kie ŝi finis sian edukiĝon kaj ankaŭ renkontis sian estontan edzon, biokemiiston Zou Chenglu. Nun ŝi estas unu el la ĉiaj dek kvin akademianoj de la Ĉina Akademio de Naturaj Sciencoj.

11. Chen Yuan, ankaŭ konata kiel Chen Xiyang, kiu aliĝis al instruistaro de la Pekina Universitato post studado en Britio, fariĝis vaste konata en la Ĉinaj literaturaj rondoj en la malfruaj 1920-aj kaj fruaj 1930-aj jaroj pro siaj polemikaj artikoloj direktitaj al Lusin, la progresema verkisto. En la tempo de la naskiĝo de la Popola respubliko Chen Yuan, postenigita en Londono, estis la Kuomintang-representanto al Unesko.

12. Vidu *Popola Tagĵurnalo*, la 9-a de januaro 1977.

13. KPĈ okazigis kunvenon en Pekino en la komenco de 1962 por resumi la laboron kaj spertojn de la jaroj post la fondiĝo de la Popola Respubliko, precipe la kvar jaroj de post la Granda antaŭensalto de 1958. Ĝi estis plivastigita kunveno de KPĈ kaj tial estis konata populare ankaŭ kiel la “Kunveno de Sep Mil Homoj”. Mao Zedong kritikis sin antaŭ la centraj kaj lokaj Partiaj kadroj pro sia nesufiĉa modesteco kaj la de li faritaj decidoj, kiuj estise kontraŭ la tradicioj de la Partio – esti realisma kaj sekvi la amaslinion. Ok monatojn poste, ĉe la Dekaj Plena Sesio okazigita en Pekino de la 24-a ĝis la 27-a de septembro, KPĈ, sekvante proponon de Mao, troe akcentis klasbatalon. Unu el la aferoj, kiuj fariĝis atakitaj, estis la romano *Liu Zhidan*. Liu Zhidan (1903-1936) el Shaanxi-provinco estis brava kaj kapabla Partia gvidanto, kiu kun la helpo de siaj kamaradoj kreis bazregionon en norda Shaanxi. Liaj moderaj opinioj pri la kiel batali kontraŭ la Kuomintangaj militfortoj malplaĉis al la ekstrem-maldekstruloj. Liu Zhidan falis en batalo en 1936. la romano, verkita de Li Jiantong, lia bofratino, penis montri la heroon laŭ lia vera aspekto.

14. Unu ĝin-o egalas duonkilogramon. – Trad.

15. Ĉe la fino de la Dudek-sesa Tablotenisa Turniro pri Mondĉampioneco, okazigita en Pekino en 1961, ĉefministro Zhou Enlai invitis la ludantojn al simpla moanĝo. Li persone aranĝis la menuon – kvar ĉefajn pladojn kaj unu supon, sen deserto kaj fruktoj. Li opiniis nepre necesa antaŭatentigi la gastojn – portu kun vi viajn proprajn nutraĵ-kuponojn.

16. El la dek “grandaj konstruaĵoj” konstruitaj en la urbo de Pekino por memorigi la dekan datrevenon de la liberiĝo de Ĉinio, la plej bone konataj inkluzivas la Popolan Halon, Ĉinan Artan Galerion kaj la Fervojan Stacidomon kaj ĝiaj ĝemelajn horloĝturojn.

17. Du Yuming, liberigita el Gongdelin-malliberejo ekster la ĉefurbo en 1959, ne kuniĝis kun sia edzino Cao Xiuqing ĝis 1963, kiam ŝi revenis el Usono (kie ŝi loĝis kun siaj filino kaj bofilo Yang Chen Ning, la Nobel-premiito pri fiziko). En 1958 la Taiwanaj aŭtoritatoj donis al Cao specialan permeson viziti Usonon, kondiĉe ke ŝi venigu la Nobel-premiiton returne al Taiwan en periodo de dek du monatoj, sed ŝi elektis resti kun la familio de sia filino en Princeton. Kiam ŝi aŭdis pri la liberigo de Du Yuming, novaĵo kontraŭa al la Kuomintanga aserto, ke li jam estis ekzekutita de la komunistoj, ŝi sin direktis al la hejmlandon kaj estis akceptita de Zhou Enlai baldaŭ post sia alveno. La ĉefministro konsilis al la geedzoj rekonstrui feliĉan hejmvivon. Turnante sin al Cao Xiuqing, kiu havis malfacilan tempon dum sia devigita restado en Taiwan, perlaborante vivrimedojn por sepmembra familio, li diris, “S-ino Du, vi ne bezonas esti maltrankvila pri familiaj elspezoj. La registaro tion prizorgos.” Kiam komenciĝis la “Kultura revolucio”, Zhou Enlai ekpensis pri la geedzoj Du, ĉar tia elstara eksgeneralo de Kuomintango povis inviti al si malbonvenan atenton. Li do sendis glui anoncon sur la pordo de ilia domo: “Interne de tiu ĉi konstruaĵo sin trovas grava registara posedaĵo. Ĉiu nepermesita ne eniru.” Du Yuming mortis en majo 1981, sed liaj infanoj en Taiwan ne estis permesitaj de tieaj aŭtoritatoj veni al Pekino por ĉeesti lian funebran solenon.

## ĈAPITRO IV

### Familia Rondo

Estas ironie, ke ekzistas nenia registro pri la edziĝo de Zhou Enlai al Deng Yingchao el Guangshan-gubernio, Henan-provinco,<sup>1</sup> kvankam ili estis laŭdataj de ĉiuj, kiuj ilin konis, kiel modela paro. Ne okazis formala ceremonio, ĉar edziĝsoleno ne eblis en la cirkonstancoj tiamaj, sed la 8-a de aŭgusto 1925 estis ĉiam rigardata de ili kaj iliaj amikoj kiel la dato de ilia geedziĝo. El ĉiuj superaj gvidantoj de la Partio, ilia ligo estis la plej longa, daŭranta pli ol duonan jarcenton.

Ili unuafoje renkontiĝis en la entuziasmiga Movado de la 4-1 de Majo de 1911 en Tianjin. Tiam Deng estis aktiva studentino en la aĝo de ĉirkaŭ dek kvin jaroj – viveca, aparte fervora en politiko, timinda oratorino malgraŭ sia juneco. Zhou, ses jarojn pli aĝo ol ŝi, fekunda verkanto kaj ĵurnalisto funkciiganta la influan *Tintsin Student (Tianjina Studento)* post sia reveno el Japanio, estis same elokventa kaj same vigla kiel Deng en la

batalo heroldita de la Movado de la 4-a de Majo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Kvankam ili apartenis al la sama Vekiĝa Societo, organizaĵo el patriotaj studentoj kaj aliaj junuloj, kaj ofte vidis unu la alian en siaj politikaj aktivecoj, tamen la severmoraj konvencioj tiamaj trudis limigojn kaj ili strikte kaŝis sian koraferon.

En la vintro de 1920, kune kun proksimume ducent aliaj studentoj el Ĉinio, Zhou marveturis al Francio, kiel parto de labor-studa programo partronata de la franca registaro el la Ĉina-Franca Kompensfonduso de 1900.<sup>2</sup> Tie li restis la sekvantajn kvar jarojn. Dume Deng fariĝis instruistino de elementa lernejo, unue en Pekino kaj poste denove en Tianjin. La du restis en kontakto pere de korespondado, limigante sin komence ĉefe al diskutado pri la situacio en la lando kaj en Eŭropo, kiel ili siatempe kutimis en Tianjin. Iom post iom kaj neeviteble, ili permesis al si tuŝi personajn temojn. La korespondado fariĝis pli ofta kaj pli intima.

Kompreneble, Zhou skribis ankaŭ al aliaj membroj de la Vekiĝa Societo, sed sendube “Xiao Chao” (karesnomo, kiun Zhou uzis por ŝi, “Xiao” estas diminutiva prefikso kun karesa senco, signifanta “eta”) ricevis la plimulton el liaj leteroj kaj poŝtkartoj. En 1983, vizitante ekspozicion en Pekino pri la fruaj politikaj aktivecoj de Zhou Enlai en Tianjin, iu maljuna amikino faris rimarkojn pri unu el la ekspoziciaĵoj, poŝtkarto ekspedita el Parizo, kaj Deng Yingchao, kun brilo en la okulo, diris al ŝi, ke ŝi ankoraŭ havas en sia posedo ĉirkaŭ cent tiajn poŝtkartojn senditajn al ŝi de Zhou Enlai antaŭ pli ol duona jarcento.<sup>3</sup>

Responde al la alvoko de la Komunista Partio, Zhou Enlai revenis al Ĉinio en 1924, atingante Guangzhou en septembro. Amaso da laboroj atendis lin, en kaj ekster la Partio, kaj la plej vaste konata estis la posteno de politika direktoro de la nova

Huangpu-militakademio. Li ĵetis sin en siajn multnombrajn taskojn, flankenmetante ĉiujn perosnajn aferojn, kaj tial li ne vidis Deng ĝis preskaŭ unu jaron poste. Ĝis tiam, krom sia okupo de lerneja instruisto, ŝi laboris kiel ĉefo de la departemento pri virinaj aferoj de la Tianjina organizaĵo de la Partio, al kiu ŝi jam aliĝis. Hazarde aŭ intence, en julio 1925 Deng transposteniĝis al Guangzhou, kaj la nova ofico perfekte konvenis al ŝi. Ŝi atendis sian revidon de Zhou Enlai. Ŝi vojaĝis suden per la vojo de Ŝanhajo, kie ŝi haltis kelkajn tagojn, kaj fine atingis la urbon de suda Ĉinio en la 7-a de aŭgusto.

Se ŝi kalkulus je Zhou por renkonti ŝian ŝipon, ŝia espero estus ege trompita. Tiam Guangzhou estis plena de bolantaj politikaj aktivecoj de tia aŭ alia speco, kaj Zhou Enlai ne povis foriri el la ĉefkomandejo, kie lia ĉeesto estis bezonata de horo al horo por direkti la daŭrantan Grandan Strikon fare de Guangzhou-aj kaj Hongkongaj laboristoj kontraŭ la aŭtoritatoj de la brita kolonio.<sup>4</sup> Tamen li sendis sian helpanton Che Geng (1903-1961) al la kajo, kun unu fotografiaĵo de Deng, por ke li povu akcepti la ĝustan personon, kaj kun instrukcio transdoni al ŝi lian pardonpeton ke li ne iris tien persone. Sed malgraŭ sia sagaco la atentema Chen Geng malsukcesis renkonti la junulinon sur la kajo, ĉar la pasaĝeroj elŝipiĝis en bruado kaj konfuzo. Deng estis devigita mem trovi al si la vojon al la sola adreso, kiun ŝi havis, la loĝejo de Zhou Enlai. Malfrue en la nokto li venis hejmen kaj estis feliĉa finfine trovi sian estontan novedzinon.

La tuta revolucia kariero de Zhou Enlai kaj Deng Yingchao en la Kuomintaga Ĉinio estis karakterizita pli per disiĝo ol per kuneco kaj ofte miksitaj kun danĝeroj, kaj al tio ili iom post iom alkitimiĝis. Ĉiufoje, kiam ili disiĝis, ĉiu sciis, ke la adiaŭo eble estus porĉiama. Subita aresto, ekzekuto aŭ murdo estis la sorto de multegaj progresemoj, por



ne paroli pri komunistoj, sub la Kuomintanga regado. Unu aparta okazaĵo eble estas ĉi tie menciinda pro la akra malĝojo, kiu ombris unu tian disiĝon.

Estis 1927, turnopunkta jaro en la historio de la Kominista Partio. La dekstra alo de Kuomintango, la frakcio estrata de Ĉjang Kajŝek, subite rompis kun sia kunlaboranto kaj komencis ataki kaj masakri komunistojn, unue en Ŝanhajo kaj poste en la tuta lando. Tiam Zhou Enlai estis en Ŝanhajo, dum Deng Yingchao restis en Guangzhou, graveda je sia unua infano. Estis tro danĝere por ambaŭ resti kie ili estis. Laŭ ordono de la Partio Deng devis tuj foriri el Guangzhou. Du kamaradoj, Chen Tiejun<sup>5</sup> kaj Shen Guoqing, estis senditaj al la hospitalo. Deng estis devigita preni ian tradician ĉinan medikamenton, kiu kaŭzis aborton. Kun la helpo de la ŝin prizorgantoj kuracisto kaj flegistino Deng kaj ŝia patrino ŝtelveturis sekure el Guangzhou en Hongkongon. Sed la eskapo kostis al ŝi la infanon, kiu povus naskiĝi. Kaj al ŝi neniam naskiĝis alia.

Amemeaj al infanoj, Zhou Enlai kaj Deng Yingchao ĉiam havis emocian sentemon por tiuj naskitaj en la sama jaro kiel ilia perdita infano. En iu okazo Zhou Enlai diris al sia edzino, “Se mi nur ne forlasus Gangzhou, nia sola infano eble vivus.”

Plena de amara pento, Deng riproĉis sin. “Mi devus anticipi paroli al vi pri la abortigo. Sed tiam mi estis tro juna, nur dudekunu-jara...”

Foje, kiam ili parolis en tia humoro, Gong Zhiru, kuzino de Zhou Enlai, intermetis, “Jes, estas vere domaĝe, ke vi ne havas infanon.”

Kaj la ĉefministro kontraŭdiris: “Kiu diras, ke ni ne havas infanon? Ni havas dek.” Li aludis la multajn orfojn de revoluciaj martiroj, por kiuj li kaj Deng prenis respondecon kaj kiujn ili rigardis kiel parton de sia familio.

Al tiuj ĉi povas esti kalkulata Li Mei, sola filino de Li Shaoshi kaj Liao Menging, kies angla antaŭnomo estis Cynthia. Li Shaoshi, sekretario de Zhou Enlai, estis mortigita en Chongqing de Kuomintangaj kugloj en oktobro 1945<sup>6</sup>, unu monaton post kiam Japanio kapitulacis al Ĉinio kaj la aliancanoj.

*Zhandi (Bataalkampo)*, gazeto, kiu estis neregule publikigata de *Popola Tagĵurnalo* sed poste aliformiĝis kiel aldona rubriko sub malsama nomo, portis okulfrape sur la interna kovrilo de sia unua numero en 1980 faksimilon de letero skribita de Zhou Enlai al Li Mei en 1949:

*Li Mei:*

*Mi ricevis vian leteron datitan hodiaŭ. Ĉu vi devas komenci labori aŭ daŭrigi viajn studojn, tio estas afero, kiu devas esti decidota de la universitataj aŭtoritatoj kaj via Junulara Ligo. Ne decas por ni interveni deflanke. Se tamen vi volas mian personan opinion, mi ne estas kontraŭ via preno de ia okupo, sed la loko ne devas esti tro malproksima de via patrino. Koncerne laboron inter la amasoj, vi povas trovi tian ankaŭ ĉi tie en la nordo.*

*Ĉion bonan.*

*ZHOU ENLAI*

*La 23-an de julio*

Kvankam mallonga estas la letero, tamen pluraj punktoj de intereso estas rimarkindaj.

Ĝi estas datita la 23-an de julio 1949, nur du monatojn antaŭ la tutlanda triumfo de la revolucio. Zhou Enlai senigis sin je la kutima saluto kaj la adresato fariĝis simple Li Mei, kio montris familiarecon. Li respondis la saman tagon, kvankam li estis okupita je siaj multaj devoj kiel gvidanto de la Partio kaj estro de la Ĉefstabo en la lastaj monatoj de la Liberiga Milito. Li strekis klaran limlinion inter la publika kaj privata flankoj de problemoj kaj evitis preni ian sintenon, kiu povus influi la universitatajn aŭtoritatojn. Konsilante al Li Mei havigi al si laboron ne malproksime de sia patrino, li montris konsideron al ŝia propra deziro kaj ankaŭ atentigis ŝin pri ŝiaj respondecoj.

Kiam Mei estis dektrijara, ŝia patro mortis, kaj post nelonge ŝi kaj ŝia patrino Cynthia Liao forveturis de Chongqing al Ŝanhajo. En 1946 plenskala enlanda milito estis eksplodonta kaj la komunista delegacio retiriĝis al Yan'an. Cynthia estis taskita por daŭrigi subteran laboron de la Partio, kiu povis endanĝerigi la junan knabinon. Tial Mei estis sendita al Hongkongo por resti tie dum tiu tempo kun sia patrinflanka avino He Xiangning, fame konata tradicia ĉinstila pentristino kaj probatalantino de progresema aferoj interne de Kuomintango.

Post la Liberiĝo la familio reunuiĝis en Pekino. Mei enskribis sin en politikan trejnan kurson ĉe la tiama Nord-Ĉinia Kolegio kaj estis diplomitiĝonta en aŭgusto, nur kelkajn semajnojn poste. Sed liam estis ekscitaj tempoj, tiuj ardigis la junulojn per nesubpremebla deziro aliĝi al la armeo, kiu tiam varbis en sin studentojn de kolegioj kaj mezlernejoj por servi kiel politikaj laborantoj dum la suden-marŝado. Mei, tiam deksepjara, ne estis escepto. Ŝi timis nur, ke ŝia patrino ne aprobos tion, ĉar ŝi estis sola filino kaj la familio nur ĵus reunuiĝis. Ŝi havis ĉian artificecon de knabinoj de sia aĝo, kiam ŝi skribis

al Zhou Enlai, la persono, kiun ŝi opiniis povanta doni plej grandan influon al la familio. Ŝi ne ricevis la subtenon de Zhou Enlai, kaj en la fino ŝi restis en la kolegio por fini sian kurson.

La intima rilato inter la du familioj komenciĝis de la fruaj 1920-aj jaroj. En 1924, kiam Zhou Enlai revenis el Parizo, preparoj estis en irado en Guangzhou por starigi Huangpu-militakademion sub la kuna patronado de Kuomintango kaj la Komunista Partio.<sup>7</sup> Oni difinis ses eminentulojn por fondi tiun ĉi oficir-trejnaran institucion. Unu estis Zhou Enlai, kaj alia estis Liao Zhongkai, la patrinflanka avo de Li Mei, reprezentanta Kuomintangon. Kompetenta helpanto de d-ro Sun Jat-sen kaj lerta monkollektanto por la Kuomintanga milita kazo, Liao Zhongkai pasigis kelkajn jarojn en Honolulu, Usono. Li staris ĉe la maldekstro de la politika spektro. Liao kaj lia edzino He Xiangning ambaŭ ludis aktivan rolon en la Unua Kuomintang-Komunista Kunlaborado kaj estis intimaj al Zhou Enlai, kiu estis kelkajn jarojn pli juna ol ili, sed jam fariĝis brila, vigla politikisto.

Cynthia aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en 1931, sed laŭ la propono de Zhou Enlai ŝia partianeco estis tenata en sekreto dum ĉirkaŭ dudek jaroj kaj ne malkaŝiĝis ĝis 1953. Naskita en 1904, dividanta la saman naskiĝtagon kun Deng Yingchao, ŝi ĉiam nomis Zhou Enlai per “A Ge” – la Kantona dialektaĵo por “Pliiĝa frato” – kun la aprobo de Zhou kaj sia patro, kio montris la intimecon de la du familioj. Opiniante, ke sekreteco estas la plej bona maniero laboris por la Partio en kondiĉoj tiam regantaj, Zhou Enlai diris al Cynthia en 1937: “Tro multe da Kuomintanganoj konas vin. En nenia cirkonstanco malkaŝu vian partianecon. Kontaktiĝu rekte kun mi, se vi havos ion ajn por diskuti.” Cynthia alprenis sian anglan antaŭnomon dum la jaroj, kiam ŝi laboris en Hongkongo kaj

en la regionoj regataj de Kuomintango. En la rondoj, kie ŝi agadis, nomo kun ekzotika sono estis ia avantaĝo.

Dum multaj jaroj Cynthia estis sekretario kaj kasisto de la Defenda Ligo de Ĉinio, estrata de la eminenta Soong Ching Ling, la vidvino de d-ro Sun Jat-sen. La pozicio provizis ŝin per oportuna ŝirmo por fari konfidencan laboron de la Partio. En Chongqing ŝi kaj ŝia edzo tenis sian geedzecon kaŝita kaj vivis aparte. Cynthia luprenis malgrandan domon en angulo de la dummilita urbo kun sia filino, dum ŝia edzo laboris kaj loĝis ĉe la rezidejo de Zhou Enlai. En tiuj tagoj la Defenda Ligo de Ĉinio servis kiel kanalo por sendi monon kaj medicinajn provizojn donacitajn de eksterlandaj fontoj al Yan'an, la nervocentro de la liberigita regiono, kiu, blokata de armeoj de Ĉjang Kajŝek, bezonis ĉiaspecajn medicinaĵojn.

Unu granda X-radia maŝino alvenis en la flughaveno de Chongqing el eksterlande kaj atendis ekspediĝon al Yan'an. Kvankam usonaj aviadiloj flugadis inter la du urboj dum tiu timpo, tamen neniu el ili havis sufiĉe grandan pordon por enlasi la maŝinon en sin. S-ino Soong Ching Ling, konsiliĝinte kun Zhou Enlai, sendis Cynthia vidi la personan adjutanton de generalo Joseph Stilwell, kapitanon richard M. T. Young, kiu, ĉino naskita en Havajo, ĝuis absolutan konfidon de la generalo. Cynthia, kiu povis flue paroli la anglan kaj la japanan, parolis anglalingve kun la kapitano, kiu tiam malmulte sciis la ĉinan lingvon. Aŭdinte raporton de sia adjutanto, la simpatia generalo ordonis malmunti kaj plilarĝigi la pordon de unu aeroplano kaj diris al kapitano Young, ke li transportigu ĝin al Yan'an tuj post kiam tio pretiĝos, ĉar Stilwell tre bone sciis, kiel entrudiĝemaj povas esti la homoj de Ĉjang Kajŝek, kaj li ne volis prokraston. Cynthia vidis Zhou Enlai la sekvantan

tagon kaj informiĝis, ke la X-radia maŝino jam sekure elaeroplaniĝis en Yan'an, Stilwell tenis sian vorotn.

La edzo de Cynthia renkontis sian tragikan morton en la 8-a de oktobro 1945. Kiam li, akompaninte vizitanton hejmen en la nomo de Zhou Enlai, estis sur sia revenvojo al la sidejo de la komunista delegacio, li estis trafita de kugloj. Morte pafvundita, li estis rapide portita al la hospitalo. Zhou Enlai, ĉeestanta bankedon donitan honore al Mao Zedong de la Kuomintanga generalo Zhang Zhizhong (1890-1969) dum la Kuomintang-Komunista Traktado, tuj informiĝis pri la okazaĵo. Li rapidis en la hospitalon, kie lia sekretario, kvankam ankoraŭ konscia, jam ne povis eligi eĉ unu vorton. Post kelkaj minutoj oni deklaris, ke Li Shaoshi jam mortis.

Estis Kuomintangaj kugloj, kiuj kaŭzis la morton de Li Shaoshi, sed Zhou Enlai post esplorado pri la okazaĵo venis al la konstato, ke la ŝoforo de la aŭtomobilo veturiganta lian sekretarion estis parte kulpa. Ne bone konanta la aŭtovojon en la antaŭurbo, la ŝoforo, nove dungita de lia oficejo, tre rapide veturigis la aŭtomobilon kaj faligis unu Kuomintangan soldaton sen scio pri tio. Alia soldato ekpafis por haltigi la aŭtomobilon, sed la ŝoforo plu kondukis la aŭtomobilon rapide. La koleriĝinta subplotona estro ŝprucigis hajlon da kugloj kaj Li Shaoshi estis mortigita. Zhou Enlai, informiĝinte pri ĉiuj tiuj faktoj, instrukiis halpanton, ke li vizitu la vunditan soldaton por vidi, ĉu li bezonas ian ajn helpon. li ankaŭ ordonis al *Xinhua Ribao* (*Nov-Ĉinia Tagĵurnalo*), la ĵurnalo de la Partio en Chongqing, fari anoncon, ke lia oficejo pagos por ĉiuj medicinaj elspezoj. La traktado de la okazintaĵo fare de Zhou, karakterizita per gsŭteco kaj justeco al ĉiuj flankoj, akiris la admiron de multaj, inkluzive de la fremdlandanoj en la monturbo, kiuj en la komenco

pensis, ke la tuta afero probable estis politika murdo.

Memore al sia edzo, Cynthia eldonis en 1979 kolekton de liaj poemoj, bele presitan en volumeto, titolitan *Por la Memoro: Poemoj de Shaoshi*. La pli juna frato de Cynthia, Liao Chengzhi specialisto pri Japanio. Gravulo en la sferoj de ĉinaj ŝtatoficistoj, li estis membro de la Politika Buroo de la Komunista Partio, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la tutlanda Popola Kongreso kaj la oficisto ŝarĝita per aferoj de elmigrantaj ĉinoj. En la tempo de sia morto, la lastajn tagojn de la Tutlanda Popola Kongreso okazigita en junio 1983, li estis informita pri tio, ke li fariĝis elektito de la Partio por la alta ofico de la vicprezidanto de la Popola Respubliko.

Kiam Liao Chngzhi unuafoje renkontis Zhou Enlai en 1924, li estis deksesjara flavbekulo, studanta en la Usono-financata Kristana Kolegio en Guangzhou. Iuvespere li demandis sian patron pri la viro, kiu ĵus vizitis ilian hejmon, vestita en okcidenta kostumo el maldelikata ŝtofo. La brilantaj okuloj kaj vepraj brovoj kaj la konversacio tenata per mallaŭta voĉo kun lia patro tiklis la scivolon de la knabo. “Kiu tio estis?” demandis la eta Liao.

“Ĉu vi ne konas, filo? Zhou Enlai, gravulo de la Komunista Partio!” Dek jarojn poste, ĝuste la “gravulo” savis la vivon de Liao Chengzhi dum la Longa Marŝado.

Intertempe la batalo por la potenco interne de Kuomintang alprenis malbelan formon en Guangzhou. La 20-an de aŭgusto 1925, la patro de Chengzhi, Liao Zhongkai, estis pafmorigita la pagita murdisto de la dekstra alo de Kuomintang. Unu enketa komisiono estis starigita, kun membroj de Kuomintang kaj de la Komunista Partio, por esplori tiun ĉi politikan murdon.

Zhou Enlai ludis eminentan rolon kaj skribis ĵurnalan artikolon titolitan “Ne Forgesu la Malamikon de la Partio”, en kiu li atentigis pri la “profunda komploto” malantaŭ la murdo. Pro sortokapricoj li ĉeestis la vivofinon de du homoj al li intimaj, Liao Zhongkai en 1925 kaj lia bofilo Li Shaoshi dudek jarojn poste. La morto de Liao estis gajno por Ĉjang Kajŝek. La homoj de la dekstra alo, rigardataj kiel respondecaj pri la abomena ago, estis elpurigitaj kaj sekve la vojo estis pavimita por Ĉjang Kajŝek por kapti la politikan levilon, per kiu li baldaŭ akiris aŭtoritatecon.

Dek jaroj intervenis antaŭ ol la juna Liao Chengzhi kaj Zhou Enlai ree renkontiĝis,

ĉi-foje dum la Longa Marŝado. Dum tiuj jaroj Zhou Enlai organizis kaj gvidis la Ŝanhajan Armitan Leviĝon kaj la Nanchang-an Leviĝon en Jiangxi-provinco. Poste li ankoraŭfoje reiris al Ŝanhajo por direkti la subteran batalon de la Partio, antaŭ ol li foriris ĉe la fino de 1931 por sin turni al Ruijin, la Centra Soveta Bazregiono en Jiangxi-provinco, kaj kuniĝi kun Mao Zedong, Zhu De kaj aliaj gvidantoj de la Komunista Partio. En tiu ĉi sama periodo Liao Chengzhi kreskis el la mezlerneja knabo, kiun Zhou Enlai renkontis en siaj tagoj en Guangzhou, al kvalifikita membro de la Komunista Partio.

La renkontiĝo okazis iom post la gravega Zunyi-konferenco en januaro 1935 en Guizhou, provinco de sudokcidenta Ĉinio. Ĉe la konferenco je la unua fojo Mao Zedong, kun la subteno de Zhou Enlai, estis starigita kiel la nekontestebla gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio. Tio ĉi estis dum la Longa Marŝado. Kiam la dua-fronta kaj Kvara-fronta Armeoj de la Ruĝa Armeo alproksimiĝis al la Flava Rivero post eniro en Gansu-provincon kaj Ningxia, Zhou Enlai, politika komisaro kaj vicprezidanto de la Partia Milita Komisiono, serĉis Liao Chengzhi kaj kelkajn aliajn kamaradojn, pri kiuj li sciis, ke ili marŝas kun la Kvara-fronta Armeo. Li tute ne sciis, ke Liao “marŝas eskortite” kiel politika arestito de Zhang Guotao, la ĉefa gvidanta oficiro de la Kvara-fronta Armeo, kiu jam publike eksigis la junulon el la Partio.

Zhang Guotao, unu el la fondintoj de la Komunista Partio de Ĉinio, kiu ludis malgloran rolon dum la Nanchang-a Leviĝo de 1927, ne estis el la marterialo, el kiu komunistoj estis faritaj. Ruza kaj malhonesta, kaj tiel kruela kiel ambicia, li kontraŭstaris al la decido de la Centra Komitato movi la soldatojn de la Ruĝa Armeo norden al Yan'an. Li estis manovranta por retiri la trupojn sub sia regado al Sichuan kaj Xikang (nun parto de



Sichuan-provinco). Ne malmultaj kadroj, kiuj malkonsentis kun li, estis ekzekutitaj, kaj la sorto de Liao Changzhi kaj pluraj aliaj arestitaj en la sama tempo. Inkluzive de Zhu Guang (urbestro de Guangzhou en la fruaj jaroj post la Liberiĝo), pendis en necerteco. Ĝuste en tiu ĉi kriza momento Zhou Enlai hazarde renkontiĝis kun Liao kaj aliaj, kiam ili direktiĝis al urbeto nomata Yuwangbao.

Kiam la juna Liao ekvidis Zhou Enlai, li estis turmentata de konfliktantaj inklinoj – ĉu saluti la politikan komisararon kiel li devis, ĉu deturni sian vizaĝon en siaj nunaj embarasaj cirkonstancoj. Li ne volis fari malagrablajn al la malnova amiko de sia patro per monstro de konateco. Dum li primeditis, kion li devas fari, Zhou Enlai paŝis al li. Sur lia vizaĝo estis neniun tiko, kaj li diris neniun vorton, sed en la ĉeesto de la eskorto li nur prenis la manon de Liao, donis al ĝi fortan premon kaj iris for.

Tiuvespere Zhou sendis servosoldaton por voki Liao al la stabejo. La ĉambro estis plena de homoj, kaj ankaŭ Zhang Guotao estis tie. Zhang, kiu komencis sian karieron en Guangzhou, kompreneble sciis pri la amikeco de Zhou Enlai kun Liao-familio. Sed li ankoraŭ demandis, “Ĉu vi jam antaŭ longe interkonatiĝis?” Zhou ignoris la demandon. Li sin turnis al Liao. En ŝajnigita severa tono li bombardis lin per demando post demando: “Ĉu nun vi scias, ke vi eraras? Ĉu vi komprenas, kiel kulpa vi estas? ĉu vi estas preta korekti viajn erarojn?” kaj tiel plu kaj tiel plu. Fininte la pridemandadon al Liao, li restigis tiun por vespermanĝo, dum kiu li ignoris lin, parolante nur al Zhang Guotao. Tuj kiam la vespermanĝo estis finita, li senprokraste forsendis la junulon. Liao jam antaŭe estis kondamnita ekzekutiĝi ĝuste tiun vesperon, kaj nur la sagaca ŝajnigo de kolero kaj senindulga pridemandado farita de la amiko de lia patro savis lian vivon en la kriza

momento.

Sperta en la arto de enpartia batalo, Zhou Enlai donis abundan pruvon de tiu ĉi kapablo en la “kultura revolucio”, kiam la sorto, fakte la vivo, de multaj veteranoj dependis de lia sagaco kaj lerteco en forturno de la atakoj direktitaj al ili de Lin Biao, Jiang Qing kaj iliaj bandanoj. Sed iafoje eĉ la majstro-taktikisto de kaŝbatalo malsukcesis. Li ne povis savi iun el sia propra familia rondo – Sun Wishi, adopta filino de li kaj Deng Yingchao.

Sun Wishi devenis el familio de revoluciuloj. Ŝia patro Sun Bingwen kaj ŝia patrino Ren rui, alnomata “Kamaradino Panjo” en Yan’anaj rondo, estis longtempaj membroj de la Komunista Partio. Zhou bone konis sun kiel unu el la intimaj amikoj de marŝalo Zhu De, kiam ili triope estis studentoj en Berlino en la fruaj 1920-aj jaroj. Fakte, estis Zhou, kiu respondecis por ilia aliĝo al la Partio.

Antaŭ ol veturi al Eŭropo, sun estis studento en la Pekina Universitato kaj ĵurnalisto dum kelkaj jaroj. Homo klera kaj revoluciulo sindona, Sun Bingwen post reveno el Germanio aliĝis al Zhou Enlai ĉe Huangpu-militakademio kaj sekvis lin kiel direktoro de la Politika Departemento kaj ĉefinstruktoro, kiam tiu forlasis Guangzhou en 1925 por Norden-ekspedicio.

En aprilo 1927 Sun estis sendita de la Partio al Ŝanhajo por alia tasko, sed antaŭ lia alveno Ĉjang Kajŝek jam faris sian kontraŭrevolucion puĉon de la 12-a de aprilo, por likvidi la komunistojn. Pro denunco de perfidulo, Sun estis arestita de la sekreta polico kaj post unu semajno la Kuomintanga diktatoro ordonis ekzekuti tiun ĉi fame konatan komuniston ĉe Longhua, loko de Ŝanhajo, kiu en la sekvantaj jaroj akiris al si fifamon kiel

la preferata loko por ekzekutistoj de Ĉjang.

Antaŭe, en la mezaj 1920-aj jaroj en Guangzhou, la geedzoj Zhou kaj la geedzoj Sun ofte kunvenis en sekreto por diskuti pri Partiaj kaj aliaj politikaj aferoj, kaj Weishi, tiam apenaŭ kvinjara, ĉiam okupis observan postenon ĉe fenestro gvatante la movojn ekster la domo, por averti sian patron kaj onklon Zhou, se fremduloj alproksimiĝis. Irante eksteren pro ia afero, la patro ĉiam prenis kun si la filinon kaj lasis ŝin rajdi sur liaj ŝultroj por vidi, ĉu ili estas gvatsekvataj. Ŝi estis inteligenta knabino kaj ŝajne jam havis ioman komprenon pri ĉio, kio okazis ĉirkaŭ ŝi. Sed ŝia efektiva edukiĝo pri la krudaj realaĵoj de tiu tempo venis nur tiam, kiam ŝi estis kelkajn jarojn pli aĝa.

Post la morto de ŝia patro, ŝia patrino Ren Rui daŭrigis labori en malfacilaj cirkonstancoj kiel subtera laboranto de la Partio en Ŝanhajo. La patrino kaj filino devis ofte fari transloĝiĝon antaŭ ol venis la ĉeestantaj Kuomintangaj spionoj, kaj ĉiufoje, kiam ili estis transloĝiĝontaj al nova adreso, ŝia patrino forbruligis ĉemanajn dokumentojn de la Partio. Kaŭrante antaŭ la fajro, ŝi rakontis al Weishi, kial la Komunista Partio estas bona, kaj kial Kuomintango estas malbona. De sia naŭa jaro ĝis la dekseka, Weishi vivis nestabilan vivon, transiĝante de unu loĝejo al alia kun sia patrino, kaj iafoje sen ŝi.

Ĉar la Kuomintanga regado de teroro plifurioziĝis, Ren Rui aranĝis en 1935, ke ŝia filino, nun dekkvarjara, loĝu kaj laboru sub falsa nomo ĉe du teatraj trupoj, kiuj konservis sekretajn rilatojn kun la Partio. Jiang Qing, tiam aktorino ambicia kun unu piedo ĉe la komunista tendaro kaj la alia ĉe la Kuomintanga, faris sin disponebla al tiuj ĉi trupoj, kaj iafoje oni donis al ŝi neĉefajn rolojn por ludi. Tamen ŝi reputacio kiel virino de dubinda virto faris Ren Rui antaŭgardema. Ŝi avertis sian filinon teni sin je distanco disde Jiang

Qing, kiu poste neniam forgesis tiun ĉi ofendon.

En 1937 Ĉinio jam estis en milito kontraŭ Japanio. Weishi vojaĝis al Wuhan, la triobla urbo en centra Ĉinio ĉe Yangzi-rivero, por peti permeson de la oficejo de la delegacio de la Komunista Partio por iri al Yan'an. Tie neniu konis ŝin kaj, cetere, ŝi ja estis tro juna. La dekseŝjarulino rifuzis foriri, kaj plorsingultante restis ĉe la enirejo. Zhou Enlai, revenante al sia oficejo ĉe la tagmezo, estis surprizita, kiam li trovis junan knabinon ploranta ĉe la pordo. Pasis jam multaj jaroj de tiam, kiam li lastafoje vidis Weishi, kaj li ne renkonis ŝin en la komenco. Poste en palpebruma daŭro la konataj vizaĝtrajtoj rememorigis ion al li. Li ĉirkaŭprenis ŝin, ekkriante: "Ho, mia infano..." Zhou kaj lia edzino sendis Weishi al Yan'an, kaj ofte skribis al la knabino kaj donis en abundo tiajn amon kaj prizorgon, kiaj povis veni nur de karaj patro kaj patrino. Ili kontaktiĝis kun "Kamaradino Panjo" kaj esprimis la deziron adopti Weishi kiel sian filinon. Ren Rui ĝoje konsentis.

Weishi alvenis en Yan'an en la plimalpli sama tempo kiel Jiang Qing, kiu, tediĝinta de Ŝanhajo, estis en serĉado de nova aventuro. La sorto venigis ilin kune. Ili estis samlernejaninoj de la kadrotrejna *Kangda* (Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato) kaj iam dividis la planklumojn en teatraĵo nomata Sangoverŝado en Ŝanhajo.

La teatraĵo estis pri riĉa Ŝanhaja kapitalisto kaj lia amantino, kiu, pro ilia malakordo, ekhavis amrilaton kun la ŝoforo. La elnodiĝo venis, kiam la ŝoforo, patrioto, veturigis aŭton da municio destinita por transportiĝi al Japanio en Huangpu-riveron kaj sin mortigis. Jen la sangoverŝado. Jiang Qing ludis la rolon de la konkubino, dum Weishi tiun de la filino de la kapitalisto.

Tri dek jarojn poste, en la "kultura revolucio", Ren Baige, la dramisto, pagis por tio, kion Jiang Qing nomis ŝia vizaĝperdo en la ludo de la konkubino de la kapitalisto. La fakto estis, ke ŝi elpetis al si la rolon, ĉar ŝi volis paradi per sia aktora "talento" en siaj

unuaj tagoj en Yan'an kaj altiri la atenton de la tieaj eminentuloj. Post nelonge Jiang Qing edziniĝis al Mao Zedong.

Kiel la edzino de la prezidanto, ŝi prenis la avantaĝon de sia pozicio kaj penis akiri kaj ĝui ion, pri kio kiel ordinara membro de la Partio ŝi ne estis rajtigita. Ĉar en la socialisma socio la rajtoj kaj privilegioj de altranga kadro, se tiaj ekzistas, ne etendiĝas al iu ajn membro de la familio. Sed ŝi havis preskaŭ nenan skrupulon kaj agis, kiel al ŝi placcis. Ĉevalrajdo estis unu el ŝiaj ŝatokupoj, kiun ŝi faris en iu ajn tempo de la tago, kiam ŝi ekhavis la emon. Unu ŝia petolaĵo estis la rekta kaŭzo de la elartikiĝo de la dekstra kubuto de Zhou Enlai kaj ĝia krupliĝo por lia vivoresto.

Iun someran vesperon en 1939 Mao Zedong devis fari prelegon en la Partia Lernejo, kaj ĉar li estis tre okupita per aliaj aferoj kaj okaze Zhou estis tie en lia kaverna loĝejo, li do petis, ke lia intima kamarado anstataŭu lin. Zhou surĉevaliĝis. Kiam li direktiĝis al la Partia Lernejo, li trovis Jiang Qing rajdanta kaj spronanta sian ĉevalon trans la malprofundan Yanhe-riveron. Jiang Qing subite ektiris la bridon kaj la ĉevalo ekbaŭmis. Zhou abrupte haltigis sian ĉevalon. Li elseliĝis kaj por mildigi la falegon elpuŝis sian kubuton, kiu rompiĝis sub li. Se la prezidanto aŭdus pri tiu ĉi okazaĵo, Jiang Qing estus riproĉita. Zhou zorgis pri tio, ke nenio atingu la orelojn de la prezidanto, kaj instrukciis siajn helpantojn klarigi, se iu demandos, ke li estis simple ĵetita teren de sur sia ĉevalo.<sup>8</sup> Sed la rompita kubuto bezonis bonan kirurgian kuracadon, kian la Yan'anaj medicinaj rimedoj ne povis doni. Fine Zhou estis sendita al Sovetunio, kun sia edzino lin akompananta.

Weishi, kiu jam estis aprobata daŭrigi sian studadon en Moskvo, akompanis siajn

adoptajn gepatrojn. Ili vojaĝis per la vojo de Xinjiang en malproksim-okcidenta Ĉinio, la dummilita interliga punkto kun Sovetunio. Zhou kaj lia edzino restis en Moskvo ĝis la sekvanta printempo, sed la kuracado ne estis efektive sukcesa. Weishi sin enskribis unue en la Orientan Universitaton de Moskvo kaj poste en la Draman Lernejon, kie ŝi diplomitiĝis. Kun la plej bona rezultato en sia klaso. Ŝi bone pasigis pli ol ses jarojn en tiu lando, ellernis la rusan lingvon kaj estis preta sin dediĉi al la teatro.

En 1946 Weishi revenis al Ĉinio kaj trovis furiozanta la Trian Enlandan Revolucian Militon. Ŝi finiĝis en venko por la komunistoj post tri kaj duona jaroj. En decembro 1949 Mao Zedong vizitis Moskvon por traktado kun la Sovetuniaj Partio kaj registaro. Weishi servis en la tradukgrupo de la delegacio. Krom la laboro sur sia propra kampo, verkado kaj reĝisorado de nombro da teatraĵoj, inkluzive de Kiam la Suno Leviĝas, ŝia lasta teatraĵo, pri la vivo de la laboristoj de Daqing-petrolkampo, ŝi faris ankaŭ konfidencan laboron de post la 1950-aj jaroj kiel por la prezidanto, tiel por la ĉefministro.

Estas menciinde, ke dank' al la iniciato, kiun Weishi faris el la amo al siaj adoptaj gepatroj, en la 8-a de aŭgusto 1950 la celebrado de la arĝenta geedziĝa datreveno de Zhou Enlai kaj Deng Yingchao estis organizita. En ilia Zhongnanhai-a hejmo ŝi alpinglis al ĉiu grandan ruĝan paperfloron por signi la okazon, kaj la ridetanta ĉefministro klarigis al la junaj sekurecgardistoj ĉirkaŭe kolektiĝintaj la Okcidentan moro de "arĝenta" kaj "ora" datrevenoj.<sup>9</sup> Tio estis la sola fojo, ke la "modela paro" iam festis sian geedziĝan datrevenon.

Jiang Qing neniam kaŝis sian envion kontraŭ la intimaj rilatoj de Weishi al la ĉefministro. Supozante, ke Weishi partoprenas en la sciado pri ŝtataj sekretoj kaj gravaj

aferoj en la oficejoj kiel de la prezidanto tiel ankaŭ de la ĉefministro, ŝi penis flatakiri favoron de Weishi. Ŝi sugestis ĉirkaŭfrazo: “Weishi, mi estas la edzino de la prezidanto kaj vi filino de la ĉefministro. Ni devas akordiĝi, vi sciu.” Sed Weishi evitis rekte respondi tiujn ĉi sugestojn kaj tiel malplaĉis al tiu ĉi potenco-ĉasanta virino. Ili ne akordiĝis, kaj neniam estis en akordo.

Kiam la “kultura revolucio” estis en bolado, Jiang Qing, kiu okupis regantan pozicion en la gvida grupo de la revolucio, brulis de senpacienco venĝi sin kontraŭ Weishi. Ŝi faris interkonsenton kun Ye Qun, la edzino de Lin Biao, virino same avida je potenco kaj manipulantino de la palaca politiko. Sun Weishi, Jiang Qing diris al al la edzino de Ministro de Nacia Defendo, estis ŝia morta malamiko. Ĉu ŝi volus sendi siajn homojn aresti ŝin? Servo meritas rezervon, ŝi diris, promesante reciproki la favoron, se Ye Qun havis malamikojn, kiujn ŝi volis elimini.

Sekve la du virinoj, unu la edzino de la prezidanto de la Partio, kaj la alia la edzino de la vicprezidanto kaj Ministro de Nacia Defendo, elkovis siajn planojn. Pluraj misaŭguraĵoj okazis dum 1967-68, antaŭ ol Weishi falis en la manojn de la perfortuloj, kiujn la du virinoj havis en sia servo.

Unue marŝalo Chen Yi, vicĉefministro kaj Ministro de eksteraj aferoj, estis publike atakata per grandideografiaj afiŝoj kaj murskribaĵoj aperantaj ĉie en Pekino. Membroj de la tiel nomata “enket-grupo” starigita de la bando de Jiang Qing subite venis al la hejmo de Sun Weishi por postuli, ke ŝi skribu “ateston”, ke Chen Yi iam kontraŭstaris Prezidanton Mao, kio estis la plej grava krimo imagebla. “Mi neniam aŭdis pri tia afero,” Weishi diris, reĵetante la absurdan akuzon al ili en la vizaĝon.

La pridemandantoj persistis. “Chen Yi devas esti eksigita. Vi nepre diru al ni, kiaspeca homo tiu ĉi Chen Yi.” Anstataŭ cedi al la pridemandantoj, Weishi venis al la defendo de la maljuna marŝalo. “Viĉefministro Chen Yi havas grandan respekton al la prezidanto. Li estas brava soldato kaj hardita generalo kaj liaj eminentaj servoj havigis al li la honorojn donitajn de la Partio kaj la lando.”

La dua celo estis Zhu De, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, kiu estis simile insultita kaj kalumniita per afiŝoj kaj murskribaĵoj. Lakeoj de Jiang Qing penis elpremi el Weishi “ateston” por kaluminii la marŝalon de PLA, farante minacojn, se ŝi ne obeis. Sed ŝi ne kontentigis ilin. “Kamarado Zhu De estas malnova kunbatalanto de prezidanto Mao,” ŝi deklaris per tono de justa indigno. “Mi treege respektas lin. Ŝparu viajn vortojn! Vi akiros nenion el mi.” kiam tiaspecaj uloj ree venis, ŝi forte frapis la tablon kaj ilin forpelis.

Post Zhu De ili turnis sian atenton al pli malgranda celo – la pli aĝa frato de Weishi, Sun Yang, konfidenca sekretario de Zhu De dum multaj jaroj kaj tiutempe Partia vicrektoro de la Popola Universitato. Li estis akuzita kiel “spiono”. Kolerigita de la absurda akuzo, Weishi postulis precizajn detalojn. Ili parolis elturniĝeme, simple dirante, ke almenaŭ Jiang Qing jam faris la deklaron pri tio ĉe kunveno de “Ruĝaj Gvardianoj”. Ŝi sendis al Jiang Qing leteron, denuncante la tutan aferon kiel kaluminion kaj postulante, ke la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio” faru konvenan enketon pri la afero de ŝia frato. La letero estis neniam respondita. Sun Yang mortis mistere dum li estis retenata en la Popola Universitato.

Dum tiu ĉi periodo de perforto ligita kun senleĝeco, la atakoj ne estis limigitaj al



kelkaj homoj proksimaj al la ĉefministro. Preskaŭ ĉiuj vicĉefministroj estis same kalumniitaj. Tiuj ĉi eventoj samspecaj estis antaŭsignoj pri pli gravaj okazontaĵoj. Lin Biao kaj Jiang Qing ŝajne ne povis plu kaŝi sian lastan celon. Ili komencis ataki la ĉefministron. Ĉe la mateniĝo iutage Pekino konsterniĝis, trovinte afiŝojn ŝprucintajn sur la muroj de Tian'anmen-placo, atakantajn Zhou Enlai kun mencio de lia nomo. Lakeoj de Jiang Qing aperis en la hejmo de Weishi, superŝutante ŝin per minacoj kaj kriegante al ŝi, ke ŝi konfesu ĉion, kion ŝi scias pri la ĉefministro. Ili kriis ĝis raukiĝo, sed vane.

Poste, en decembro 1967, policanoj invadis ŝian hejmon kaj arestis ŝian edzon Jin Shan, fame konatan aktoron-reĝisoron, je suspekto pri spioneco. Valizoj kaj kofroj estis priserĉitaj kaj ĉiuj valoraĵoj, precipe fotografaĵoj kun la prezidanto kaj la ĉefministro kaj leteroj skribitaj al ŝi de Zhou Enlai kaj Deng Yingchao, estis konfiskitaj kaj senditaj al Jiang Qing, kiu disŝiris ilin en pecetojn.<sup>10</sup> Sekvis la aresto kaj persekutado al Weishi. Ekde la 1-a de marto 1968 eĉ en karcero ŝi estis mankatenita kaj krude traktata en tia maniero, kian la provosoj opiniis plaĉa al ilia novaj mastroj, kiuj nun ŝajne manipulis superegan potencon. La katenoj ne estis forprenitaj ĝis la 14-a de oktobro, kiam la vundita karno povis elporti neniun plian punon. Kaj Sun Weishi elspiris sian lastan spiron.

Oni eble demandas, kial Zhou, la ĉefministro de la lando, ne povis eĉ savi sian propran tute senkulpan adoptan filinon. Por tion respondi, oni bezonas kompreni la situacion en Ĉinio en la unuaj jaroj de la “kultura revolucio”. Al ribelo, senkonsidere kontraŭ kiu aŭ kio, la verda lumo estis donita de neniuj malpli altranga ol Mao Zedong, la prezidanto de la Partio. Kvankam iaj limigoj estis postulataj, kaj ja foj-refoje ordonataj de la prezidanto mem, tamen la damaĝo estis tro ruiniganta kaj tro disvastiĝinta por esti

retenita.

Fakte, perforto estis aprobita de Lin Biao, la Ministro de Nacia Defendo, Jiang Qing kaj iliaj sekvantoj, kiuj tiranis la tutan landon. “Ruĝaj Gvardianoj” estis instigataj ataki ĉiujn aŭtoritatojn kaj ankaŭ frakasi la policajn departementojn, la juĝejojn kaj la prokurorojn. Jen la speco de gvidado donita al politike naivaj junuloj. Rezulte de tio, la ĉiutaga laboro de ĉiuj registaraj oficejoj estis en malordo, kaj precipe la leĝplenumaj instancoj, kiuj estis anstataŭigitaj per neregulaj, neleĝaj tribunaloj kaj similaj. Multaj malliberejoj estis transprenitaj kaj funkciigitaj kiel iliaj feŭdaj bienoj.

Imagu la malfacilojn de la spirite turmentata Zhou Enlai, penanta teni la landon en unueco vizaĝe al tia tumulto, laboranta kiel eble plej energie por sukcese konkuri kun senfina tabelo da konferencoj kaj kunvenoj, ofte kun la Ruĝaj Gvardianoj mem, por decidi pri ŝtataj aferoj kiel registara ĉefo, kaj por elpremi el la taga pezega laborŝarĝo almenaŭ unu horon por eksterlandaj vizitantoj.

Plie, ke li neniam permesis aferojn de privata naturo deturni lian atenton de ŝtataj aferoj, tio ĉi estis la plej grava el la trajtoj de lia karaktero. Kaj, cetere, eĉ se li penus, li sendube ne povus eltrovi, kie Sun Weishi estas tenata. Tia estis la stato, en kiu la aferoj staris en 1968.

Informite pri la morto de Weishi, la ĉefministro, suspektante mistraktadon, ordonis enketi por konstati la kaŭzon. Sed la lakeoj de Jiang Qing jam senprokraste kremaciis la kadavron. Kiam la pli juna fratino Xinshi iris postuli la cindron, ŝi ricevis krudan kaj mallongan respondon: “Jam traktita kiel kontraŭrevoluciulo. Neniom da cindro konservata.”

Weishi havis ian antaŭsenton en siaj lastaj tagoj de libereco, ke oni insidas kaj eble arestos ŝin en iu ajn tago. Ŝi kaj Xinshi renkontiĝis plurajn fojojn sur Tian'anmen-placo, anstataŭ en ŝia hejmo, ĉar ŝi estis gvatata. Ĉe unu rendezuo apud la Monumento al la Popolaj Herooj, ŝi diris al Xinshi: “Mi estas de nenia graveco, homo nekonsiderinda, kaj estas apenaŭ diference, ĉu mi vivas aŭ mortas. Sed la ĉefministro, ... tio estas malsama. Tio tuŝas la sorton de la Partio kaj la lando. La ĉefministro devas esti protektata je ĉia kosto.”

Poste ili parolis pri sia frato, kiu estis submetita al senfina turmenta pridemandado fare de torturistoj. Ambaŭ sciis, ke ilia frato estas senkulpa, sed ili estis senhelpaj. “Sed, se iu mortas, estas malfacile purigi lian aŭ ŝian nomon,” Weishi diris. “Oni devas sin alkroĉi al la vivo. Se iam oni diros, ke mi mortis, kaj ke mi mem finis mian vivon, tion vi ne kredu. Tio estos murdo.” Jen kelkaj bravaj lastaj vortoj de Sun Weishi, adopta filino de Zhou Enlai, kiu, en la aĝo de kvardek sep jaroj, estis mortigita de ekzekutistoj de Jiang Qing.

Pli fortuna estis Li Peng, ankaŭ “ano” de Zhou-familio. En multaj flankoj lia frua kariero ne estis malsama de tiu de Sun Weishi. Ambaŭ estis infanoj de revoluciaj martiroj. Ambaŭ elkreskis en Yan'an sub la kuratoreco de Zhou Enlai kaj lia edzino Deng Yingchao. Ambaŭ estis senditaj al Sovetunio, kvankam en malsamaj tempoj, por fari pluajn studojn, Sun pri la homaj sciencoj kaj Li pri naturaj sciencoj, ĉefe elektra kaj hidraŭlika inĝeniertekniko. Dum Sun mortis en la manoj de bando da mortigistoj de Jiang Qing, Li Peng transvivis la “kulturan revolucion”.

Kvindek-sep-jara, Li Peng hodiaŭ estas unu el la kvar vicĉefministroj de Ĉinio,<sup>11</sup> relative nova vizaĝo en la politika scenejo, kiu estis enoficigita de la Sesa Tutlanda Popola

Kongreso en junio 1983. la aliaj vicĉefministroj inkluzivas Wan Li, Yao Yilin kaj Tian Jiyun, alia freŝa vizaĝo el Sichuan, riĉa kaj plej multthoma provinco de Ĉinio. La eduka fono de Li Peng kiel teknokrato perfekte adaptis lin al la modernigo de la lando efektivigota antaŭ la fino de la jarcento. Kun la plejparto de la superaj gvidantoj de la Partio kaj registaro jam en la aĝo de pli ol sesdek jaroj, lia relativa juneco, por ne paroli pri lia faka scio, staras favore al li. Li estis lastatempe elektita al la Politika Buroo kaj al la grava ĉiutaga labororgano – la Sekretariato. Tio ĉi estis anoncita post kiam la Centra Komitato kunvenis en septembro 1985.<sup>12</sup>

La patro de Li Peng estis Li Shuoxun el Sichuan, unu el la plej fruaj anoj de la Komunista Partio, kiu partoprenis en la Nanchang-a Leviĝo de 1927 kiel Partia reprezentanto de la Dudek- kvina Divizio de la Nacia Revolucia Armeokorpuso. Li estis unu el la intimaj kunbatalantoj de Zhou Enlai, kaj edziĝis al la pli juna fratino de Zhao Shiyan, kiu estis ekzekutita de Kuomintang baldaŭ post la Ŝanhaja Armita Leviĝo. En 1931 Li Shuoxun estis nomumita Partia Sekretario de Militaj Aferoj por Guangdong-provinco, kie li direktis gerilan militon kontraŭ la malamata reĝimo de la malamiko post la rompo de la Kuomintang-komunista kunlaborado. Kiam li pretigis sin por okazigi kunsidon pri milito kun siaj kamaradoj sur Hainan-insulo la 9-an de julio, iu perfidulo denunciis lin al la malamiko. Li estis arestita, kaj du monatojn poste, la 16-an de septembro, pafmortigita de ekzekutistoj.

En la Arkiva Oficejo de la Partio estas konservata la jena letero skribita de Li Shuoxun antaŭ lia morto:

*Tao:*

*Mi ne malkonfesis mian identecon ĉi tie sur Hainan-insulo, kaj tial ŝajnas, ke verdikto estos eldirita en la proksimaj kelkaj tagoj. Tio ĉi signifas porĉiaman adiaŭon al vi ĉiuj. Homoj estas mortigitaj ĉiutage, iuj sur la fronto, iuj en la postfrontaj regionoj, kaj mi estos inter ili. Ne tro multe ploru pri mia morto. Bone vartu nian filon kaj sendu lin al mia familio. Ankaŭ penu mem perlabori vivrimedojn. Sendube oni iel enterigos min. Do nepre*

*ne venu. Tio ĉi estas imperativa, absolute imperativa.*

*Via,*

*Xun*

*La 14-an de septembro*

“Tao” estas Zhao Juntao, lia vidvino, kaj “nia filo” estas kompreneble Li Peng. Multajn jarojn Zhou Enlai ne informiĝis pri ili ĝis 1939, kiam li eksciis, ke Li Peng, jam dek-unu-jara, vivas ĉe parenco en Chengdu, Sichuan-provinco. Deng Yingchao venigis lin al Chongqing kaj poste sendis lin al Yan’an, kie la knabo ricevis bonan edukon. Ili traktis lin kiel sian propran filon. Por Li Peng, Zhou Enlai ĉiam estis “Oĉjo Zhou” kaj Deng Yingchao “Panjo Deng”.

Li Peng mem iam rakontis, kiel li en novembro 1945, tiam apenaŭ dek-sep-jara sed jam membro de la Komunista Partio, iris adiaŭi “Oĉjon” kaj “Panjon” en ilia Yan’ana kaverna loĝejo. Li jam ricevis ordonon servi en iu trupunuoj alfrontanta la Kuomintangajn armeojn. Zhou ĝojis, ke la junulo jam aliĝis al la Partio, sed li diris eksplicite al li, ke fariĝi partiano organize estas unu afero kaj estis partiano ideologie – kio estas pli grava – estas alia. Alivorte, li devas heredi la noblanimecon de sia patro kaj aliaj revoluciaj martiroj. Zhou kaj lia edzino donis al Li Peng tute novan silkkotonan litkovrilon kiel adiaŭdonacon. Ĝi estis sendita al ili iam antaŭe de iu amiko en Chongqing, sed ili ĝin neniam uzis. Zhou kaj lia edzino pensis, ke iliaj kotonaj, ne silkaj, kvankam jam eluzitaj, estas sufiĉe taŭgaj por ili mem. Unu ekrigardo al la trolavitaj litkovriloj sur la lito decidigis Li peng rifuzi la donacon kun kiel ebla plej granda firmeco. Sed “Panjo” kaj “Oĉjo” persiste devigis lin

akcepti ĝin opiniante, ke la malpezeco de silkkotona litkovrilo, streĉe faldita kaj premita en tornistran, estos oportuna dum lia marŝado.

Li Peng, kiu poste sin enskribis en la unuan politeknikon starigitan en Yan'an kaj ekde 1948 faris postdiplomiĝan studadon en Sovetunio, brile laboris kiel elektra inĝeniero kaj fabrikodirektoro post sia reveno el eksterlande en 1955. Plenuminte multajn oficojn, plejparte en nordorienta Ĉinio, li estis promociita al vicministro, kaj poste Ministro de Energia Povo en 1981. Povante flue paroli en la rusa lingvo, lia unua fremda lingvo, Li Peng komencis lerni aŭtodidakte la anglan lingvon en 1973 malgraŭ sia peza laborŝarĝo. Sed en la okuloj de Panjo Deng li ankoraŭ estas la infano, kiu de tempo al tempo bezonas iom da instigo kaj puŝo de siaj pliaĝuloj. Iun varmegan someran tagon en 1983 la sepdek-naŭ-jara Deng Yingchao faris personan viziton al la nova oficejo de Li Peng en Zhongnanhai por gratuli lin pro lia sukceso en vicĉefministriĝo. Sed samtempe ŝi avertis lin ke li “ne estu aroganta” kaj “ne apartigu sin de la amasoj”.<sup>14</sup>

Unu el la plej proksimaj parencoj de Zhou Enlai estis lia nevino Zhou Bingjian, kiu fariĝis ŝafistino en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.<sup>15</sup> En la somero de 1968, en la aĝo de dek ses jaroj, ŝi forlasis Pekinon por komenci novan vivon sur la herbejoj kun la benoj de siaj onklo Zhou kaj onklino Deng. Kiel multaj tiamaj gejunuloj de ŝia aĝo, ŝi respondis la alvokon iri al la kamparo, por labori kelkatempe for de urba vivo. Se oni devas iri, multaj pensis, kial ne al loko tute malsama de la aliaj kamparaj regionoj de Ĉinio? Bingjian venis diri adiaŭ, kaj ŝiaj onklo kaj onklino donis al ŝi simplan adiaŭan vespermanĝon. La knabino neniam tuŝis bovaĵon kaj ŝafaĵon, kaj Zhou konsilis ŝin al kutimiĝi al tiuj ĉi viandoj. Laŭ li tio estos ŝia unua obstaklo en nacimalplimulta regiono

kiel Interna Mongolio. Ŝi devos observi kaj respekti gentajn kutimojn kaj vivmanierojn, kaj psikologie devos esti preparita venki pli multajn malfacilaĵojn ol ŝi atendis. Alie, Zhou avertis sian nevinon, ŝi ŝanceliĝos kaj probable ne persistos ĝis la fino.

En la vintro de 1970 Bingjian vestiĝis en armea uniformo. Ŝi petis aliĝi al la Popola Liberiga Armeo kaj estis akceptita, kaj tiel plenumiĝis ŝia longe dorlotita revo. Povi surmeti militan uniformon en tiuj tagoj estis io inda je skribo al la hejmo. Ŝi rapide skribis leteron por informi siajn onklon kaj onklinon pri la bona novaĵo.

En la Novjara Tago Bingjian, tre kontenta pri si mem en nova oliv-verda tuniko, venis al Pekino por ilin vidi. Transpaŝinte la sojlon, ŝi estis tuj salutata de sia onklo, sed en maniero tute malsama de tia, kian ŝi atendis. “Nun demetu de vi vian uniformon. Kaj iru returne al la herbejoj. Ĉu vi ne diris, ke en Interna Monglio estas multaj fareblaĵoj? Kompreneble, vi trapasis la ordinaran proceduron por aliĝi al la armeo kaj ĉio ŝajnas esti en ordo. Sed ĉu ne estas fakto, ke ĝuste pro ni la armeo ingnoris ĉiujn aliajn petantojn en Interna Mongolio kaj elektis vin? Ni devas esti antaŭgardemaj kaj ne lasi nin infekti de apartaj privilegioj. Lasu al la gefiloj de tieaj paŝtistoj kaj laboristoj havi la unuan ŝancon. Ĉu ne estos same, se vi restos sur la herbejoj?” Nepotismo neniam tuŝis Zhou Enlai. Eĉ liaj mortaj malamikoj ne povis akuzi lin pri tio.

Kvankam ĉagrenita kaj malkontentigita, kaj ne malmulte embarasita, tamen Bingjian konvinkiĝis, ke ŝia onklo estas prava. Ŝi devis reiri al la herbejoj. Ŝi ne sciis pri tio, ke ŝia onklo jam antaŭe faris enketon pri la aprobo de la armeo pri ŝia rekrutiĝo baldaŭ post ricevo de ŝia letero. La ĉefa zorgo de Zhou estis, ĉu ŝia rekrutiĝo sekvis la normalan proceduron kaj ĉu lia nomo estis menciita por turni la aferon favore al ŝi.

Reveninte en la armeon, Bingjian raportis al la stabo sian intencon ekŝi kaj reiri al la herbejoj. La armeo faris prokraston, ĉar ĝi volis ŝin restigi, pensante, ke post kelkaj monatoj la multeokupita ĉefministro forgesos la tutan aferon. Ĝi ne kalkulis kun lia ĝisfundemo. Li koleris pro la prokrasto kaj faris riproĉon. “Nun aŭ vi resendos ŝin aŭ mi sendos al vi la ordonon, ke vi tion faru.” Bingjian baldaŭ revenis al sia okupo kiel ŝafistino, je la ĝojo de la paŝtistoj, kiuj aplaudis la decidon de la ĉefministro restigi sian nevinon inter ili.

La sekvantan fojon, kiam ŝi iris al Pekino, ŝi ne estis permesita vidi la kancerfrapitan Zhou Enlai, nun tre malsanan en la hospitalo. Tamen li telefonis al ŝi kaj en mallonga telefona konversacio kuraĝigis ŝin studi la mongolan lingvon. Apenaŭ povante teni la ricevilon, li fakte esprimis sian lastan deziron al ŝi.

La 8-an de januaro 1976 Bingjian ricevis telegramon el Pekino kun la jena enigma mesaĝo: “Ne venu kiam vi legas la ĵurnalon.” Ŝi konfuziĝis. Frue en la sekvanta mateno pere de radiodisaŭdigo ŝi kun konsterno aŭdis kontraŭ la sono de funebra muziko la anoncon pri la morto de sia onklo. Ŝi telefonis je longa distanco al Pekino, sed ŝia onklino persvadis ŝin resti ĉe sia posteno. Tio, la mesaĝo de Deng Yingchao klarigis, estas kion ŝia onklo volis, ke ŝi faru. Kvankam en similaj cirkonstancoj Zhou Enlai ĉiam kaj ĉiel donis konsolon al la afliktitaj familioj de siaj kamaradoj, tamen kiam tio venis al li mem, li rifuzis, kion li propre meritis kiel ĉefministro de Ĉinio. Li postlasis vortojn en siaj lastaj tagoj, ke li deziras, ke liaj parencoj, se ili vere volas fari omaĝon al lia memoro, restu kie ili estas prefere ol veni al Pekino. Sed se ili nepre volas veni, ili devas pagi siajn proprajn elspezojn. Eĉ unu groŝo ne venu de la registaro. Li ĉiam pensis pri la ŝtata fisko kaj restis



rigora insistanto pri bona konduto ĝis la lasta tago.

Kiel homo identigita kun la Ĉina Revolucio kiel gvidanto, organizanto kaj administranto dum pli ol duona jarcento, Zhou Enlai havis grandan “ofican” familion, kiu inkluzivis sekretariojn, helpantojn kaj sekurecgardistojn. Tiuj ĉi multiĝis kun la forpaso de la jaroj, ĉar li faris aranĝojn tiel, ke tiuj, kiuj restis ĉe li kelkan tempon kaj jam montris sian indon, estis transoficigitaj kaj promociitaj al aliaj postenoj de respondeco. Multaj, kiuj komencis labori sub li en sia dekelk-jara aĝo, post jardekoj jam starigis sian familion. Ili vizitis la geedzojn Zhou kiam ajn ili povis, prenante kun si siajn edzinon kaj infanojn. Tiuj ĉi feliĉaj okazoj rememorigis al ili pri la malnovaj tempoj kune pasigitaj en Chongqing kaj Nankino, dum la Longa Marŝado, kaj eĉ pri la fruaj 1930-aj jaroj kiam ili batalis kontraŭ Kuomintango por gardi la sendependan reĝimon starigitan en la interno de Jiangxi-provinco en suda Ĉinio. Ĉe tiaj okazoj Zhou ĉiam demandis, precipe siajn iam analfabetajn korpogardistojn, kiel ili daŭrigis sian edukiĝon post la Liberiĝo. Li surloke ekzamenis ilin per demandoj por vidi, kiel bone ili povas legi kaj skribi. Ne plu krudaj junuloj, sed oficiroj komandantaj provincajn trupunuojn de la Popola Liberiga Armeo en sia aĝo de kvindek aŭ sesdek jaroj, ili tamen en la okuloj de Zhou Enlai estis ankoraŭ la knaboj, kiuj venis labori sub li post aliĝo al la revolucio. Zhou kaj lia edzino zorgis pri ilia bonfarto kaj progreso. Ili sciis, kiam ili devas atendi iliajn vizitojn, kaj ĉiam havis ion rezervitan por ilin regali – nenion specialan, nur kukojn, arakidojn aŭ spicitajn melonsemojn aŭ iajn dolĉaĵojn por la infanoj.<sup>16</sup>

Zhou Enlai estis vokto, kiu volis, ke ĉiu ano el tiu ĉi “ofica” familio faru sian plej grandan eblon kaj laboru pli diligente ol aliaj. Anstataŭ plendi kontraŭ tio, kadroj trovis

honora esti asignitaj labori en lia oficejo aŭ en la departementoj sub lia rekta direktado. Tio ĉi estis ilia fierindaĵo kaj metis ilin en pozicion profiti de lia saĝo kaj sperto. Ili pensis, ke nenio povas esti pli rekompensa, ol ke la granda homo mem trovas personan intereson en iliaj ĝojoj kaj ĉagrenoj.

Unu el liaj antaŭaj helpantoj ricevis post la Liberiĝo leteron de siaj gepatroj, kiu diris, ke la mono, kiun li regule sendis hejmen, estis akurate ricevita. La embarasita homo antaŭe fairis nenion tiaspecan, nek li povus tion fari. Sed poste li rememoris, ke Zhou iam demandis lin antaŭ longa tempo pri lia familio en la Kuomintanga regiono. Li rakontis al sia superulo pri ĝia mizero. Donante al li nenian subsugeston, Zhou instrukiis sian oficejon preni sumon da mono, kvankam malgrandan, por sendi al la maljunaj gepatroj por helpi ilin en vivtenado.<sup>17</sup>

Zhou Enlai ankaŭ volis dividi la ĝojon de siaj subuloj. Harvard-edukita Pu Shouchang, lia sekretario-interpretisto dum multaj jaroj, estis informita per telegramo, ke li estas patro duafoje, ĉar lia edzino naskis al li alian filinon, kaj ke la patrino kaj infano estas en sano. Pu, poste Vicministro de eksteraj aferoj, tiam estis for de Pekino kun la ĉefministro en la sudo. Laŭkutime, membroj de la akompanantaro devis laŭvice deĵori por enŝlosi klasitajn materialojn fine de la taga laboro, kiu povis daŭri ĝis ia ajn tempo post la noktomezo. Tiutage estis la vico de Pu. Kiam li envenis por bonordigi la skribotablon, la ĉefministro menciis la telegramon ricevitan pli frue en la tago. Li prenis unu botelon el la ŝranko, elverŝis du glasojn da *Maŭtaj-o*<sup>18</sup> kaj poste kun rideto faris toston: “Jen pro la sano de la patrino kaj infano!”

### **Notoj:**

1. Deng Yingchao, kies prapatra hejmo estis en Henan-provinco, estis naskita en Guangxi-provinco (hodiaŭ la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono) en suda Ĉinio la 4-an de februaro 1904. Ŝia patro mortis dum ŝia infaneco kaj ŝia patrino transloĝigis la familion al Tianjin, kie ŝi perlaboris siajn vivrimedojn kiel praktikistino de tradicia ĉina medicino. Popola Tagĵurnalo, la 22-a de julio 1981, p. 8, pri la edziniĝo de Deng Yingchao al Zhou Enlai.

2. La Kompensfonduso de 1900 estis eltrudita el la ĉina registaro post la ekspedicio fare de la “aliancaj armeoj” (Britio, Usono, Rusio, Germanio, Japanio, Francio, Aŭstrio kaj Italio), kiuj invadis Pekinon kaj en la sekvanta jaro devigis la manĉurajn regantojn pagi kompenso de 450 milionoj da taeloj da arĝento. La Franca Labor-Studa Programo estis financita el partoj de la kompenso.

3. Vidu la semajnan gazeton *Liaowang (Foren-rigardo)*, la 4-a de marto 1985, p. 20.

4. La Granda Striko de laboristoj en Guangzhou kaj Hongkongo, kiu komenciĝis la 19-an de junio 1925, daŭris multe pli ol unu jaron. Ĝi estis manifestiĝo de la solidareco kun iliaj Ŝanhajaj fratoj, kiuj strikis kontraŭ la posedantoj de japana kotonŝpina fabriko pro ilia pafado al protestantaj manifestanciintoj, fortigante unu kaj vundis multajn aliajn. La britaj aŭtoritatoj en Hongkong deklaris militlegon kaj blokis la kolonion per kordono, sed en la fino cedis al la strikantoj. Ĝi estis la plej longa striko en la historio de la monda laborista movado.

5. Chen Tiejun, studentino de Universitato Sun Jat-sen, aktiva en la revolucia movado en Guangzhou, estis en la nigra nomlisto, kiam Ĉjang Kajŝek sin turnis kontraŭ la koministoj kaj komencis aresti kaj mortigi membrojn de KPĈ en la 12-a de aprilo 1927. Ŝi estis avertita per la Partia subtera organizaĵo, por ke ŝi povu fuĝi, sed, sciante, ke Deng Yingchao estas enhospitaliĝinta, Chen alivestis sin kiel mondumulinon kaj iris al la hospitalo por helpi la edzinon de Zhou Enlai eskapi. Ŝi mem postrestis por helpi Partian gvidanton Zhou Wenyong per interliga laboro, kaj luis ĉambrojn por hejmo, kvazaŭ ili estus geedzoj. Arestite de Kuomintanga polico, kiam ili estis ekskortitaj al la ekzekutejo, ili anoncix sian intencon geedziĝi. Tiu ĉi epizodo estas konata en la ĉina revolucia literaturo kiel “Nupto antaŭ la Pafekzekutistoj”.

6. La morto de Li Shaoshi konsternis Chongqing, kiu tiam estis en febra nestabileco, ĉar multaj el ĝiaj dumilitaj loĝantoj estis sin preparantaj forveturi al Ŝanhajo, Nankino kaj aliaj partoj de la orienta marborda regiono. Multaj supozis, ke la pafmortigo estis politika murdo.

7. D-ro Sun Jat-sen fondis Huangpu-militakademion kun la helpo de KPĈ kaj Sovetunio. KPĈ sendis iujn el siaj superaj kadroj, inkluzive de Zhou Enlai kaj Nie Rongzhen, hodiaŭ unu el la kvar ankoraŭ vivantaj marŝaloj de PLA) por helpi funkciigi la akademion. Ĝis Ĉjang Kajŝek sin turnis kontraŭ la revolucio en 1927, Huangpu-militakademio restis elstara ekzemplo de Kuomintang-komunista Kunlaborado.

8. La dekstra kubuto de Zhou Enlai, laŭ lia korpogardisto Liu Jiuzhou, estis tiel serioze elartikigita, ke li devis esti helpata ĉe sia vestiĝo kaj matena tualetoj kaj uzis sian maldekstran manon por teni la dokumentojn, kiuj postulis lian atenton. *Eventoplenaj Jaroj*, p. 31.

9. “Modela Paro – Zhou Enlai kaj Deng Yingchao” en la semajna Gazeto *Liaowang (Foren-rigardo)*, p. 25-a de marto 1985.

10. Elkarceriĝinte post la falo de la “kvarpersona bando”, la edzo de Weishi skribis longan artikolon memore al ŝi, rakontante la historion de unu el la plej malbonaj periodoj de la “kultura revolucio”. Ĝi estis titolita “Ne Permesu al la Aŭtunaj Ventoj Forporti la Malamon en Nia Koro”, verso el poemo verkita de la patrino de Weishi, kaj jam estis kolektita en *Neforgeseblaj Memoraĵoj* eldonita de la Eldonejo de Popola Tagĵurnalo, p. 221.

11. Ekde novembro, Li Peng fariĝis aganta ĉefministro kaj en agrilo 1988 la Tutlanda Popola Kongreso elektis lin kiel la ĉefministron. – Trad.

12. Krom Li Peng, kelkaj relative pli junaj homoj estis enoficigitaj en la dudekdu-membran Politikan Buroon kaj la dekunu-membran Sekretariaton de la Centra Komitato de KPĈ.

13. “Pri Li Peng” en la semajna gazeto *Liaowang (Foren-regardo)*, p. 6, la 20-a de novembro 1983.

14. Samloke, p. 8.

15. Vidu Ĉina Junulara Ĵurnalo, p. 1, la 6-a de marto 1979.

16. Tiu ĉi de longe starigita kutimo daŭris eĉ post la morto de Zhou Enlai. La 11-an de aprilo 1983 ĉiuj, kiuj laboris kelkan tempon en Xihuating, oficejo de Zhou en Zhongnanhai – inkluzive de sekretarioj, sekurecgardistoj, kuracistoj, flegistinoj kaj kuiristoj – ricevis inviton al Xihuating en la 17-a de aprilo, ekde la sepa matene, por trinki teon kun “granda fratino” Deng Yingchao kaj ĝue rigardi la spektaklojn florantajn en la ĝardeno. La spektaklo estis ŝatata de Zhou Enlai. Salutinte la ĉirkaŭ naŭdek invititojn, Deng Yingchao diris, ke la plejparto el ili, kiuj estis transigitaj al aliaj postenoj ekde la dua duono de 1957, malofte vidas unu alian de tiam. Dum la “kultura revolucio”, krom por oficialaj aferoj, ŝi kaj la ĉefministro restis fidelaj al “tri-Ne”-gvidprincipo por eviti malagrablojn – “Ne” akcepti vizitantojn; “Ne” respondi leterojn; kaj “Ne” fari vizitojn. Nun, ŝi diris, estas tempo rekuniĝi. La ĵurnalo *Wen Hiu Bao*, Ŝanhajo, la 12-a de majo 1983.

17. *Eventoplenaj Jaroj*, p. 80.

18. Maŭtaj-o: Fama, tre forta, senkolora alkoholaĵo de Ĉinio, distilita el sorgo. – Trad.

# ĈAPITRO V

## La Ĉefministro kaj la Popolo

Kvardek tri jarojn antaŭe, estante la estro de la delegacio de la Komunista Partio en Chongqing, la dummilita ĉefurbo de Ĉinio, Zhou Enlai, tiam kvardekkvin-jara, faris sep-punktan decidon koncerne sian propran konduton.<sup>1</sup> En sia posta politika kariero de pli ol tri jardekoj li ĉiam sin tenis al la altaj normoj, kiujn li starigis por si mem – krom tiu de la lasta punkto: gardi fizikan sanon kaj sekvi racian dieton. Tion ĉi li malzorgis precipe en la lastaj dek jaroj de sia vivo, kiuj koincidis kun la “kultura revolucio”. Kiel vaste konate, Zhou Enlai laboris longajn horojn en ĉiu semajnotago, farante malmulte da korpa ekzercado. Li iafoje ludis tablotenison aŭ promenis ĉirkaŭ Zhongnanhai. Li neniam lasis la hodiaŭan laboron al la morgaŭo kaj laboregis eĉ dimanĉe (tiam en Ĉinio oni laboris ses tagojn semajne) la tutan jaron. Li ne ĝuis feriojn, krom se oni trudis tiajn al li, kaj eĉ tiam li prenis kun si stakojn da paperoj kaj dokumentoj.

La aliajn punktojn de la decido li tamen observis tre bone, precipe la sesan, kiu akcentis, ke li tenu intiman kontakton kun la amasoj, lernante de ili kaj farante sin utila al ili.

Teni intiman kontakton kun la amasoj estas unu el la tri plej gravaj principoj de la Komunista Partio de Ĉinio (la aliaj du estas kritikado kaj memkritikado kaj kunligo de teorio kun praktiko). Ĝi estis postulata egale al gvidantoj kaj ordinaraj partianoj. Ĉar nur tiamaniere, la Partio asertas la politika partio en potenco povas senti la pulson de la nacio kaj sciiĝi, pri kio la popolo zorgas, kaj ĉu ili havas plendojn, kiuj necesigas ian tujan agadon. Oni ne povas sidi en oficejo, manipulante plumon tuttage; oni devas iri inter la

popolanojn por enspiri iom da freŝa aero, por rigardi, aŭskulti, kaj ankoraŭ pli grave, por lerni. Teni kontakton kun la popolo estas, laŭ la Partio, la ŝlosilo.

Ĉi-rilate estas inde mencii viziton de Zhou Enlai al iu artekspozicio. Sur la muro pendis unu pentraĵo supozata por montri la simplan vivmanieron de prezidanto Mao Zedong kaj marŝalo Zhu De, bildigante ilian promenadon en parko malfermita al la publiko. Tamen neniu homo vidiĝas proksime de ili aŭ en la fono de tiu ĉi tiel monata artaĵo. Zhou Enlai rigardis ĝin kaj demandis, “Kie estas la popolo? Kie estas la aliaj plezurerĉantoj? Ĉu ili ĉiuj estas forbaritaj per kordono?” La ekspozicio-organizanto, kun vizaĝo ruĝiĝinta, ricevis surloke lecionon pri politiko kaj arto.

Zhou Enlai ĉiamaniere kontaktigis sin kun la popolamaso kaj miksiĝis kun homoj el diversaj rondoj kaj okupoj, rigardante sin ne kiel nealireblan ĉefministron, sed nur kiel unu el la popolanoj, afablan, agrablan, facile alparaleblan kaj liberan de ŝtatoficista sinteno. Oni volonte elverŝis siajn pensojn antaŭ li kaj li povis eltiri la problemojn, kiuj ilin ĉagrenis. Ofte li sin okupis pri aferoj, kiuj, ĝustadire, devus esti la zorgo kaj respondeco de subuloj aŭ la departementoj de la Ŝtata Konsilantaro, kies estro li estis. Ili efektive estis en la sfero de lia devo. Sed la sola fakto, ke la ĉefministro mem faris esplorojn, kiuj ne estus eblaj se li ne parolus kun iuj, ofte alportis dezirindajn rezultojn – ekzemple, la korektado de eraroj aŭ reĝustigo de maljustaĵoj. Trafa ekzemplo estas Zhang Quan, unu el la ĉinaj plej konataj koloraturaj sopranuloj.

Talenta, Usone-edukita, kaj je la kulmino de sia kariero, Zhang Quan estis etiketita kiel “dekstrulino” en la politika movado de 1957,<sup>2</sup> kun ĉiuj teruraj sekvoj de politika malhonoro. Degradita, kun salajro malaltigita, ŝi estis forsendita el la Centra Eksperimenta

Operteatro en Pekino al Harbin, fora nordorienta urbo proksima al la Sovetunia landlimo. Malfeliĉo ofte ne venas sola, kiel diras la ĉina proverbo. Ŝia edzo Mo Guixin, orkestra direktisto, estis same malhonorita kaj devigita suferi pli malbonajn sekvojn. Pro siaj “kulpoj” kiel “dekstrulo” Mo estis forpelita al punlaborejo, Xingkai-laga Agrokulturejo, en nordorienta Ĉinio, kie li estis ordonita “remuldi sin per laboro” – fakte, esti turmentata en mallibero. Li mortis baldaŭ poste.

Kian politikan krimon faris tiu ĉi juna virino, muzikistino kun konsiderindaj atingoj, ke ŝi devis esti tiel punita? En 1957, la jaro, en kiu la supre-menciita politika movado komenciĝis, Literatura Gazeto publikigis artikolon skribitan de la gazeta redakcio sed portantan nomon de Zhang Quan. La artikolo riproĉis iujn ŝtatoficistojn, ke ili funkciigas la Operteatron ne laŭ la postuloj de arto, kaj krome ankaŭ esprimis kelkajn trafajn opiniojn tiurilate. Tio estis farita kun la plej bona volo en la mondo, ne el iu ajn persona motivo, sed por la celo aperigi pli bonajn operojn. La kritikoj ne estis akceptitaj en la spirito proponita, sed torditaj en “senbridajn atakojn” al la politikoj kaj principoj de la Partio. Ankoraŭ pli ridinda estis la akuzo, ke Zhang Quan kalumnias operteatron gvidatan de la Partio, kiam tio, kion ŝi faris, celis nur montri ĝiajn mankojn. Tiamaniere la talenta artistino, kiu ĉarmis Pekinajn muzikamantojn, estis forpelita de sur la scenejo ĝis jarojn poste, kiam ŝia afero kaptis la atenton de Zhou Enlai.

Zhang Quan atingis sian eminentecon dank’ al sia diligenta laboro. En la somero de 1947, ŝi, patrino de du filinoj, marveturis al San-Francisko, por studi muzikon ĉe Nazareth-kolegio en Rochester, Nov-Jorko. Ŝi restis tie unu jaron kaj poste ricevis subvencion por fari postdiplomiĝan studadon ĉe la fama Eastman-muziklernejo en la

sama ŝtato, kie ŝi studis klasikan kaj modernan muzikon sub plej bonaj instruistoj de Eastman kaj akiris sian magistrecon. Kvankam ankoraŭ studentino, Zhang Quan jam estis ofte invitata kanti en koncertoj.

La Eastman-a stipendio kovris ŝian lernopagon kaj aliajn lerneajn elspezojn, sed ĝi ne sufiĉis por ŝia modesta vivteno. Ŝi faris diversajn laborojn en sia libera tempo – librotenado, infanvartado, donado de privataj lecionoj kaj pladolavado en restoracioj. Ŝi laboris ankaŭ kiel bibliotekistino. Ĉiufoje, kiam someraj ferioj venis, la juna virino iris al la Eastman-a Kodakkompanio por penlabori en ĝia filmo-sekcio. Krom pagi sian vivtenon ŝi klopodis ŝpari monon ĉiusemajne ankaŭ por sia vojaĝo al la patrujo. Post kiam ŝi akiris sian magistrecon kaj sian solistan diplomon, instruistoj kaj amikoj insiste petis ŝin resti plu en Usono. Tamen la koro de Zhang estis en la nove naskita Popola Respubliko, kaj en oktobro 1951 ekvuturis hejmen ŝi, nun matura tridekdu-jara koloratura sopranulino plena de espero kaj preta oferi, kion ŝi ellernis en Usono.

La unua koncerto de Zhang Quan post ŝia reveno al Pekino altiris senprecedence multegajn homojn. Inter la aŭdantoj estis Zhou Enlai, kies neatendita ĉeesto kvazaŭ montris, ke la registaro alte taksas ŝian revenon al la patrujo. La apero de la ĉefministro estis gesto al ĉiuj patriotoj, precipe al la intelektuloj, ke ili estos bonvenaj reveni por helpi konstrui la novan Ĉinion. Kiam la kurteno lastfoje malleviĝis kun ankoraŭfoje tondro da aplaŭdoj, li iris gratuli la kantistinon, laŭdante ŝian patriotismon kaj dezirante al ŝi pli grandan sukceson. En la unuaj jaroj post ŝia reveno en Ĉinion la Eastman-a diplomitino instruis voĉan muzikon kaj estis multe ŝatata kiel solistino. En la florado de sia kantistina kariero ŝi laboris kiel neniam antaŭe kaj persistis en prezentado eĉ tiam, kiam ŝi estis



graveda de sep monatoj je sia tria infanon. En 1956 ŝi ĉefrolis en *La Traviata* en ĝia unua ludado en Ĉinio, kaj ŝi sentis sin kiel ĉe la supro de la mondo. Unu jaron poste tiu mondo frakasiĝis ĉirkaŭ ŝi. eĉ ŝiaj du lernoĝaj filinoj suferis diskriminacion pro tio, ke ilia patrino partii la etiketon de “dekstrulino”.

Zhang Quan estis turmentata de sinkulpigo miksitita kun dubo, kaj de sento de serioza miskulpigiteco. Sed eĉ en sia plej malluma horo Zhang Quan ne forlasis esperon, havante fidon al si kaj fidon al pli altaj gvidantoj de la Partio. Malĝojo ne malhelpis la ĉiutagan ekzercadon de ŝiaj voĉkordoj. Ŝi persistis en tio dum la jaroj.

Zhou Enlai fine sciigis, kio okazis al la kantistino. Li esploris la aferon kaj senigis ŝin je la etiketo de “dekstrulino”. Li faris eĉ pli. En 1962, Zhang Quan, tiam aliĝinta al la Harbina Operteatro, ricevis specialan inviton veni al Pekino por ĉeesti kunsidion de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (ĈPPIK), la unuecfronto de la Partio por teni kontakton kaj unuiĝon kun la ne-partiaj popolanoj. Tiam Zhou Enlai estis ĝia ĉefo.

En tiu tempo oni aranĝadis semajnofinajn balojn, kaj superaj registaraj oficistoj de tempo al tempo alvenis post longaj labortagoj por danci kiel aliaj kadroj. Dum la sesio de ĈPPIK okazis balo en la Pekina Hotelo, kaj malnovaj amikoj de Zhang Quan, ĝojante vidi ŝin ree inter si, insiste petis ŝin kanti kelkajn ariojn. Pro malnova amikeco ŝi paŝis sur la malgrandan scenejon de la hotelo kaj kantis popolkantojn, kiujn ŝi antaŭe famigis. Tio estis ŝia unua prezentado post kvar-jara dolorplena foresto el la ĉefurbo. Kiel iam ajn antaŭe, ŝia riĉa voĉo plenigis la ĉambron. Kiam ŝi atingis sian lastan kanton, Zhou Enlai senbrue envenis. Laŭta aplaŭdo eksplodis ĉe ŝia lasta noto, kaj la ĉefministro leviĝis de sia seĝo kaj iris kun manklakoj al la scenejo. Li varme salutis ŝin.

“Mi ne aŭdis vin kanti jam de longe.” La vortoj elvokis ŝiajn larmojn, kiuj ruliĝis malsupren sur la vangoj. Neniam antaŭe Zhang Quan estis tiel malĝoje feliĉa.

Poste la ĉefministro petis ŝin al danco: “Ĉu mi povus havi la plezuron?” kiam ili valsas, li daŭrigis la interparolon, demandante, kiel ŝi statas kaj kiel ŝi trapasis la lastajn jarojn.

“Mi ne sciis, ke vi estis transpostenigita. Ĉu vi kutimas al la vivo en la nordoriento? Vi estas sudulo, kaj ne estas korpe fortika. Bone prizorgu vin mem. Se estas al vi nekonvene en la nordoriento, vi povas reveni ĉi tien.” La ĉefministro poste demandis pri la stato de ŝia edzo. Li subite haltis meze de la danco, kiam ŝi diris al li, ke Mo jam mortis en la tria monato post kiam li estis sendita al Xingkai-laga Agrokulturejo. Por deturni ŝin de tiu ĉi doloriga temo, li donis al la konversacio novan direkton kaj demandis pri ŝiaj infanoj. Lia amika sinteno donis al ŝi la kuraĝon elmeti demandon, kiu estis por ŝi grava.

“Ĉefministro,” ŝia voĉo kvazaŭ aliiĝis. “Ĉu iu, kiu faris dekstrulan eraron kaj ĝin jam korektis, povas iam fariĝi maldekstrulo?”

“Jes, kompreneble. Kial ne?”

Tiuj ĉi vortoj diritaj de la ĉefministro mem estis tiel kuraĝigaj, ke post la sesio de ĈPPIK ŝi tuj skribe faris rekomendon por kunigi la fortojn de la tri nordorientaj provincoj por starigi novan operteatron kun Harbin kiel ĝia sidejo – kaj la propono estis adoptita.

Reveninte en la sociajn aktivecojn, la koloratura sopranulino estis refoje invitita al Pekino en novembro por koncert-prezentoj. En unu el ili, kiam ŝi riverencis al la aŭdantaro, Zhou Enlai leviĝis de sia sidloko kaj, kiam ĉies okuloj turniĝis al li, portis tason da teo al la scenejo por proponi al la kantistino. Tio estis mirinda kaj eksterordinara sinteno de tiu,

kiu reprezentis la Partion kaj registaron, por mildigi la vundon de maljuste traktita artistino.

Poste okazis la “kultura revolucio”, kaj kiel multaj aliaj Zhang Quan ree spertis malfeliĉajn tempojn. Dum dek jaroj, precipe en la lastaj 1960-aj, la kremo de la instruita popolo de Ĉinio, tiuj, kiuj ricevis kolegian aŭ pli altan edukon, ĝenerale estis metitaj sub suspekton. Tiuj, kiuj antaŭe studis eksterlande aŭ havis transmarajn rilatojn, estis pleje suspektataj. Ĉiuj intelektuloj estis nomataj la “malbonodora naŭa kategorio”, lokita post alia tia socioskoro kiel bienuloj, riĉkampanoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj, dekstruloj, renegatoj, malamikaj spionoj kaj irantoj de la kapitalisma vojo.

En tiaj cirkonstancoj Zhang Quan fariĝis senŝirma celo, tiom pli ke ŝi estis rigardata de Lin Biao, Jiang Qing kaj iliaj sekvantoj kiel protektato de Zhou Enlai. Ŝia artista vivo estis ree interrompita; ŝi estis malpermesita aperi sur la scenejo aŭ kanti en koncertoj. La fakto, ke ŝi siatempe studis en Usono, estis sufiĉa, por ke ŝi povu esti kondamnita kiel “spiono” kaj “reakcia aŭtoritatulino” (pri muziko). Ŝi estis enfermita en izoliteco kaj insultata. Ŝi estis tiel krude taŭzata de lakeoj de Jiang Qing, kiuj provis devigi ŝin konfesi sian spionecon, ke ŝi eksuferis diskon mislokiĝon.

Dum tiu ĉi tuta tempo Zhang neniam dubis pri tio, ke estas Zhou Enlai, ne Lin Biao kaj Jiang Qing kaj iliaj similaj, kiu vere reprezentas la Partion kaj registaron. Ŝi ĉerpis kuraĝon el tiu ĉi kredo, kaj en la lastaj monatoj de 1976 ŝi ree leviĝis el la profundo de malespero por sin varmigi en la sunlumo de la nova erao heroldita de la falo de la plej abomeninda virino de Ĉinio. Zhang estis komplete rehonorigita, kun la verdikto pri “dekstrulino” de 1957 renversita kaj siaj salajroj kaj rango realigitaj. Kaj ankaŭ ŝia edzo

estis postmorte senkulpigita.

La nombro de la homoj, superaj kaj malsuperaj, mallaŭditaj kaj akuzitaj pri senbazaj krimoj dum la “kultura revolucio”, same kiel Zhang Quan, estis terure granda. Preskaŭ ĉiuj nun estas pravigitaj kaj la plejparto el ili jam revenis al sia antaŭa posteno, tamen, multaj sendube sentis sin kiel Rip van Winkle,<sup>3</sup> kun iom pli da sensobtuzeco kaj konfuziteco.

Zhang Quan, reveninte en la Pekinan muzikmondon, aldonis al sia reperturaro peanon laŭdi la forpasintan ĉefministron, kanton, kiun ŝi kantis kun profunda sento. Ŝia voĉo tiel tuŝis la koron de la aŭdantoj, ke inter ili kaj la kantisino kvazaŭ ekzistis perfekta kunsento.

Zhou Enlai persone faris aranĝon por Pu Yi, la lasta imperiestro de Qing-dinatio, ke li havu okazon rigardi unu el la paradoj de la nacia Festo de la nova Ĉinio en la unua de oktobro, 1961. La decido estis prenita kiel monro de pardono por signi la ĝojan okazon.

Pu Yi estis detronigita post la Revolucio de 1911, kiam li estis ankoraŭ infano, kaj jarojn poste lasis sin uzadi de la japanaj armeoj okupantaj la Nordorienton de Ĉinio kiel pupa reganto. Post la milito li estis metita en malliberejon, kie dank’ al pacienca edukado li venis al nova opinio pri sia absurda pasinteco kaj ekhavis esperon je pli signifoplena estonteco. Libereco al la eksmonarko, kune kun aliaj militkrimuloj, el kiuj la plejparto estis Kuomintangaj eksgeneraloj, estis anoncita en speciala amnestio kvardek ok horojn antaŭ la Nacia Festo de 1959.<sup>4</sup> Per speciala aranĝo li estis lokita ĉe fenestro en la dua estaĝo de konstruaĵo de la Buroo de Publika Sekureco ĉe la rando de Tian’anmen-placo, loko libera de scivolaj okuloj, sed sufiĉe proksima, por ke li bone vidu la defiladon kaj la buntajn ĉarojn preterruliĝantajn, kio, laŭ la ĉefministro, devis esti eduko por la eksimperiestro pri la ŝanĝoj, kiuj okazis en la tuta lando de tiam, kiam la komunistoj transprenis la ŝtatpotencon.

Post la liberigo de Pu Yi la ĉefministro donis al li aŭdiencon. Malgrasa,

okulvitroj-portanta kaj vestita en iom ne bone sidanta Mao-tuniko, la eksimperiestro estis treege ĝentila kaj humila, kiam li estis kondukita en la akceptejon, kun ĝenateco pro si mem kaj la ĉirkaŭaĵo. Eble li pensis, ke en la alesto de la ĉefministro li devas antaŭ ĉio konfesi sian malgloran pasintecon. Li komencis torente rakonti pri siaj krimoj kaj misagoj, kiel ekzemple esti la ĉefo de la tutlanda bienula klaso, perfidi sian patrujon, estante pupo de la japanaj okupantoj, kaj tiel pu kaj tiel plu. La litanio estis haltigita de la ĉefministro, kiu diris, ke li jam faris memekzamenon pri ĉio ĉi kaj ne plu bezonas tion fari. “Se vi havas tempon,” li diris al la eksimperiestro, “vi povas skribi viajn memoraĵojn, kaj tio estus servo al la patrujo.” La vortoj senŝarĝigis la koron de Pu Yi. Li senĝene rakontis al la ĉefministro, kiel antaŭaj membroj de la kortego, ĉe lia reveno hejmen, falis sur la genuojn laŭ la tradicia salutmaniero al imperiestro. Li faris al ili riproĉon, li diris, montrante al ili, kiel postresteca estas ilia ago. Li mem, li diris al ili, estas iom pli progresema en siaj pensoj.

Laŭ informoj el diversaj fontoj, la lasta imperiestro de Ĉinio serioze faris sian “ideologian remuldon” dum kaj post sia mallibereja tempo, kio surprizis japanajn vizitantojn, kiuj intervidiĝis kun li. “Estas mirindaĵo, ke la ĉinaj komunistoj sukcesis tion fari,” iu rimarkis. “Ili transformis eĉ imperiestron!” Pu Yi ricevis okupon kun modesta salajro kiel speciala esploranto de la Historia Esplora Komitato de ĈPPIK kaj kondukis bone. Antaŭ sia morto en 1967 li finis, laŭ la propono de Zhou Enlai, sian aŭtobiografion *De Imperiestro al Civitano*, kiu rakontis pri tio, kiel li, trijara knabo, estis portata plorante sur la tronon, pri la mallaboremo kaj diboĉo en lia mezaĝo, pri liaj amaraj rememoroj pri la situacio esti arbitre ludata marioneto kaj pri la finfina ŝanĝiĝo de lia pensmaniero.

La ĉefministro ne trovis malinda je sia digno la kontakton kun Pu Yi, kiu antaŭe estis rigardata kiel “malamiko de la popolo”. Li pensis tamen, ke tio valoras lian penadon, ĉar la politiko de la Partio estas helpi al militkrimuloj transformi sin kaj transturni novan paĝon kaj ĉar Pu Yi estas ano de manĉura gento, unu el pli ol kvindek naciminoritatoj. La politiko de la Partio estas unuigi ĉiujn naciminoritatojn ĝis la plej alta grado kaj grupigi ilin ĉirkaŭ la registaro. En tiu ĉi sfero de penado la ĉefministro estis kaj lerta kaj nelacigebla. Nelonge post kiam la antaŭa imperiestro estis liberigita, Zhou Enlai invitis lin kaj lian familion kunmanĝi kune kun Lao She, la dramisto kaj romanisto, kaj lia edzino, ambaŭ de manĉura deveno.

Tio estis tempo por politikadi kaj la ĉefministro la unua ekparolis. “Ĉi tie ni kune manĝas, vi, Pu Yi, manĉuro, kaj vi Lao She, alia manĉuro<sup>5</sup>,” Zhou diris, “en la pasinteco unu estis imperiestro kaj la alia, malnobelo. Nun ni tri sidias ĉe la sama tablo. En la malnovaj tagoj, ĉe la alesto de la suvereno ni devus fali sur niajn genuojn, sed nun ni kunmanĝas kiel egaluloj. Ĉu tio ne estas rimarkinda ŝanĝiĝo? Kaj ŝanĝiĝo devigas nin denove lerni. Vivi kaj lerni, kaj lerni por progresigi nin dum ni vivas” – jen la temo, kiun la ĉefministro akcentis. Kaj liaj vortoj pravis kaj trafis.<sup>6</sup>

Unu el la plej famaj literaturistoj en Ĉinio, Lao she – kies vera nomo estis Shu Sheyu – fariĝis konata al Zhou Enlai en la fruaj 1940-aj jaroj. Poste li fariĝis ĉinlingva instruisto en la Lernejo de Orienta kaj Afrika Studoj en Londono, kaj estis en Usono en 1949, kiam Zhou Enlai kiel ĉefministro invitis lin reveni al la liberigita Ĉinio. La aŭtoro de Kamelo Ŝjangzi, romano priskribanta per riĉa loka idiomato la mizeran vivon de Pekina rikiŝisto, revenis al la patrujo, ĉe la jarfino de 1949. La sekvantan jaron li estis elektita kiel

prezidanto de la Pekina Literatura kaj Kultura Asocio. Konante kiel sian mandorson ĉiujn facetojn de Pekino, ĝiajn vidaĵojn, sonojn kaj odorojn, precipe la aĉan flankon de la vivo en la malnova urbo, Lao She tuj komencis verkadon, apenaŭ li revenis post sia longa restado eksterlande. Lia dramo *Drakbarba Kanalo*, pri la ŝanĝiĝo de malriĉula kvartalo en suda Pekino, estas akuzo kontraŭ la malnovo kaj glorado al la novo. Ĝi sukcesis kaj populariĝis, kaj la ĉefministro instigis la reĝisoron enscenigi ĝin en Huarentang-aŭditorio en Zhongnanhai por Mao Zedong kaj aliaj gvidantoj de la Partio.

En dekelkaj jaroj Lao She verkis pli ol dek dramojn kaj krome ankaŭ aliajn literaturaĵojn.<sup>7</sup> De tempo al tempo li profitis de la persona direktado de la ĉefministro, precipe rilate politikajn temojn, pri kiuj li trovis sin tute necerta. Lao She sentis sin bone en sia elemento rilate la temojn kiel tiu de *Drakbarba Knalo*, sed li devis navigi inter sablorifoj, kiam li entreprenis, ekzemple, verkadon de unu dramo kun la tiam okazanta kvin-kontraŭa movado<sup>8</sup> kiel ĝia fono. La verkado de tiu ĉi nova dramo, kiu estis titolita *Printempa Semado kaj Aŭtuna Rikolto*, lin ĉagrenis, unue ĉar li malmulte konis industriajn laboristojn kaj kapitalistojn kaj la ruzaĵojn de riĉulaĉoj, due ĉar la movado tiam estis en sia komenca stadio, kaj trie ĉar verkado de dramo kun politika enhavo estis, li trovis, riskoplena. La dramisto povis aŭ akcenti politikon de la Partio je la kosto de intrigo, la rezulto de kio povis esti nur revuo anstataŭ vera teatraĵo, aŭ li povis doni troan atenton al la intrigo kaj distordi la politikon kiel tuton. Zhou Enlai estis invitita ĉeesti al la kostuma provludo kaj li ne estis, almenaŭ por tiel diri, impresita. Sed laŭpete li donis al la dramisto, reĝisoro kaj aktoroj siajn kritikojn.

*Printempa Semado kaj Aŭtuna Rikolto* traktas pri grava demando – la duobla naturo

de la kapitalistoj de Ĉinio, la nacia burĝaro, sub socialismo. La Partio opiniis, ke la batalo kontraŭ kaj la limigo al la kapitalistoj ne devas esti emfazitaj ĝis la grado, ke ignorata estus la grava fakto – ke sub socialismo kapitalistoj povas esti submetitaj al transformo. Zhou klarigis al Lao She kaj la reĝisoro la subtilajn nuancojn de la Partia politiko al la nacia burĝaro. Li ankaŭ insiste atentigis Lao She, ke li ne turnu la dramon simple en politikan predikon. Li konsilis sian amikon doni plenan liberecon al sia stilo de verkado, por ne bridi sian apartan humuron, la elstaran fortaĵon de Lao She. Tio, kion la publiko volas, estas riĉenhava dramo, vera artverko, li diris.

Kio interesis Zhou Enlai estis ne nur la substanco de la dramo. Li ekzamenis la kostumojn, la lumefektojn, rekvizitojn kaj la fonokurtenon per sperta okulo, ĉar dum siaj studentaj tagoj en Tianjin li estis aktoro, reĝisoro kaj ĉiuflanka fakulo pri la teatro. Dum unu el la provludoj, kiun li ĉeestis, li parolis al la knabino, kiu estis kudanta la rolon de la kapitalista filino. Li petis ŝian opinion pri unu difinita sceno – ĉu ŝi sentas sin agrable en ĝi. “Ne, ĝi min pli-malpli agacas,” ŝi senkaŝe diris al li. Li meditis pri la problemo kelkan tempon kaj kelkajn tagojn poste telefonis al Lao She, taktoplene sugestante, ke eble troviĝas io neperfekta en la sceno. Ĉe Zhou Enlai ĉiam estis sugesto, ĉar li abomenis trudi al aliaj tion, kio prezentis nur la opinion de unuopa individuo.

El la lastaj verkoj de Lao She Zhou Enlai plej alte taksis *Tetrinkejon*, laŭdante precipe la unuan akton – li trovis ĝin animskuanta kaj artisme kaj bele prezentita. *Tetrinkejo*, li diris, devas esti spektata de la pli juna generacio, por ke ili komprenu, kiel terure la aferoj staris en la pasinteco. Li opiniis grava igi ĉiujn junulojn havi vidan bildon pri la malnova Ĉinio, ĉar sole predikado kaj persvado, kiel ajn efike farataj, ne estas sufiĉaj.



Jarojn poste, Zhou duafoje spektis *Tetrikejon*, kaj post la lasta kurtenfalo li kolektis Lao She kaj la geaktorojn, kaj ili revenis al la temo pri la pli juna generacio. La teatraĵo, li diris, devas doni al la junuloj ideon – doni al ili ion por primediti rilate la demandojn, kio konsistigas la movforton de la historio kaj kiaspecaj homoj ludas gvidadn rolon en la marŝo de la tempo. Kvankam la aŭtoro jam faris plibonigon al la unua enscenigo de la dramo, plifortigante ĝin per scenoj pri studenta movado, tamen li opiniis necesa pluan plibonigon. Li diris, ke li estas ankoraŭ ne certa, kia epizodo en la moderna Ĉinio devus esti elektita kaj tipigita sur la scenejo, kaj tial li bezonis tempon por tion pripensi kaj volis precipe, ke Lao She tion remaĉu, sed poste neniu el ili ree sin okupis pri tio.

Lao She kaj lia edzino Hu Jieqing loĝis en iu mallarĝa strateto en orienta Pekino, okupante unu modestan malgrandan domon, kiun Zhou Enlai vizitis de tempo al tempo. Iun posttagmezon en 1959 li venis en ilian korton por demandi pri la farto de Lao She, ĉar la verkisto lastatempe sentis sin ne bone. Lia edzino malfermis la pordon, kaj Zhou riproĉetis ŝin, ke ŝi ne lasis lin scii pri la malsano de ŝia edzo.

Zhou Enlai kaj Lao She ambaŭ estis grandaj konversaciemuloj – Lao She estis ankaŭ sprita rakontanto – kaj tiuvespere la konversacio ŝajne daŭris senfine. Estis la tempo por vespermanĝo, kaj tamen ili ankoraŭ parolis. La gastigantino demandis, ĉu la ĉefministro bonvolus resti por manĝo, kvankam ŝi sciis embarasite, ke estas malmulto en la kuirejo. Zhou Enlai perceptis ŝian embarason. “Mi ĝojos preni manĝon ne speciale preparitan,” li diris, kaj lia rideto ŝin trankviligis. La manĝo estis malabunda eĉ mezurite laŭ nespeciale-prepariteco, nur iom da ovkirlaĵo plus plado da peklita fiŝo. La gasto ĝuis la manĝon, sed li taŭzetis sian gastigantinon: “Aha! Kia intelektulino, ne sperta en la

kuirejo!” – aludante ŝian karieron de tradicia ĉinstila pentristino.

En sia juneco Lao She, kvankam li jam publikigis ne malgrandan nombron da romanoj kaj noveloj antaŭ ol provi verki dramojn, tamen finance li ne sukcesis kaj, por kovri la malsufiĉojn, fariĝis instruisto. Li neniam revis, ke en la aŭtuno de sia vivo li povos ĝui tiel altan estimon en la nova Ĉinio. Nek oni povis imagi, ke tia eminenta verkisto mortos perfotan morton en la politika paranojo de la “kultura revolucio”.

En ĝiaj unuaj monatoj la maljuna kaj maljuna kaj malforta verkisto estis trenata al unu “batala” kunveno post alia de “Ruĝaj Gvardianoj” de Jiang Qing, sub la absurda akuzo, ke li estas “reakciulo”, pledanta por la restarigo de kapitalismo. Drakbarba Kanalo, ili asertis, estas “fero-tegita atesto” pri la krimoj de tiu homo.

Iuvespere oni trovis la kadavron de Lao She kuŝanta apud Taiping-lago, kovrita per pajla matraco. Kiam kaj kiel li mortis – la precizaj cirkonstancoj estas malklaraj eĉ ĝis tiu ĉi tago, preskaŭ dudek jarojn post lia tragedia morto. “Ruĝaj Gvardianoj” diris, ke Lao She faris memmortigon, ĉar li timis alvizaĝi siajn krimojn. Sed kelkaj faktoj nun estas certaj. Iun tagon Lao She estis trenita al kunveno. Li malaperis la sekvantan tagon. Poste en la tria tago oni trovis lin mortinta. Oni vokis lian edzinon en la profunda nokto por identigi la kadavron. Ŝi genuiĝis apud sia edzo por forviŝi la sangajn makulojn sur liaj kapo kaj korpo. Tian teruran travivaĵon ŝi ĉiam memoras dum sia vivresto.

Surprizita kaj indignigita de la subita morto de Lao She, la ĉefministro ordonis fari enketon pri la cirkonstancoj. Sed, kvankam li multe funebriis pri la perdo de sia amiko, tamen li povis fari malmulton, ĉar Lin Biao kaj Jiang Qing tenis grandan potencon en tiu tempo.

Nur en la 3-a de julio 1978 okazis funebra soleno en Pekino por fari malfruan omaĝon al tiu ĉi talenta dramisto, kiun Bakin, la okdekjara romanisto, laŭdis kiel modelon de ĉinaj intelektuloj. Bakin, la aŭtoro de *La Familio* kaj amaso da aliaj romanoj, unu el la longtempaj amikoj de la dramisto, diris, “Estas honto por la viantoj, honto por ĉiuj, kiuj lin supervivis, lasi laŭ She morti tian morton.”<sup>9</sup>

Inter la tiamaj plejsuperaj gvidantoj de Ĉinio, Zhou Enlai sendube estis la plej bone informita pri la ekstera mondo. Lia kompreno pri la internaĉaj aferoj kaj pri la problemoj de aliaj landoj surprizis registarajn ĉefojn, kiuj kontaktiĝis kun li. Kiel ĉefministro li devis intervidiĝi kun vizitantoj el diversaj partoj de la mondo, homoj kun tre diferencaj fonoj kaj ĉiaj nuancoj de politika opinio. Ĝenerale, li havis interpretistojn kun si, sed li ofte interrompis ilin, se la signifo ne estis sufiĉe ĝuste tradukita aŭ la ideo ne estis adekvate komunikita. Li sciis la anglan lingvon sufiĉe bone kaj iom la francan, germanan kaj japanan, sed li ne estis sufiĉe kapabla por fari longajn koversaciojn. Postutante altajn nivelojn de siaj interpretistoj, la ĉefministro estis zorgema pri ili. En bankedoj li ofte amasigis porciojn sur la teleron de la interpretisto apud si – ĉar interpretado ĉe manĝotablo tute ne estas tasko facila.

Ĉar Ĉinio komencis ludi pli kaj pli gravan rolon en mondaj aferoj, estis akre sentata la bezono je pli alte kvalifikitaj interpretistoj kaj tradukistoj, por ne mencii instruitulojn, kiuj devis povosci unu aŭ du fremdajn lingvojn. Zhou Enlai prenis sur sin la aferon en 1970. Inter julio kaj novembro li kvinfoje kunsidis je neregulaj intertempoj kun la reprezentantoj de la instruistoj kaj studentoj de la Pekina Fremdlingva Instituto kaj la fremdlingva fakultato de la Pekina Universitato, kaj ĉiu kunsido daŭris pli ol kvin horojn.<sup>10</sup>

La kunsidoj komenciĝis ĉe la noktomezo kaj daŭris ĝis ĉirkaŭ la kvina en la mateno, ĉar la streĉa tagordo de la ĉefministro permesis nur tiujn ĉi horojn kontraŭkutimajn. Kvinkam jam sepdekdu-jara kaj kun malsana koro (li havis koratakon en 1966), li kondukis la kunsidon, kvazaŭ ĝi estus la unua afero de la tago. La unuaj du kunsidoj estis dediĉitaj al tio, ke la ĉefministro metis demandojn kaj la instruistoj kaj studentoj donis respondojn. Kun plumo en la mano, li rapide enskribis la esencon de respondoj donitaj al liaj esploraj demandoj kaj en la procezo penis paroligi ĉiun ĉeestanton. La tria kunsido iris kvazaŭ kolegia leciondonado, kun Zhou Enlai sidanta tie kiel aŭskultanto, sed juĝanta ambaŭ la instruistojn kaj studentojn.

La lasta kunsido estis brila resumo pri la antaŭaj kunsidoj, farita de la ĉefministro, kiu metis specialan emfazon sur la firman tenon de “tri ĉefaj punktoj”: politika orientiĝo, posedo de lingvo kaj amplekso de scioj. La kombino de la tri, li diris, estas postulata al tiuj, kiuj deziras servi la patrujon en la sfero, kie posedo de fremda lingvo estas nepre necesa,

ĉu kiel tradukisto, interpretisto aŭ diplomato.

Li ekzamenis per demandoj la universitatajn instruistojn kaj studentojn. Sed por ilin trankviligi, antaŭ ol meti demandojn li faris kuraĝigon per “nenio alia ol komunaj scioj”. Ĉe iu kunsido li demandis, “nun vi ĉiuj jam legis la hodiaŭan ĵurnalon, ĉu ne? dek kvar Latin-Amerikaj landoj publike postulis uzi siajn rajtojn pri teritoriaj akvoj. Tiuj, kiuj scias la nomojn de tiuj ĉi landoj, bonvolu levi sian manon.”

Ili ekrigardis unu alian, sed neniu sentis sin sufiĉe memfida. Tion vidante, Zhou Enlai diris, ke ĉar neniu volontas sin proponi, li devas elekti iun laŭ sia bontrovo. La elekto falis sur tiun sidantan plej proksime al li, kiu donis respondon vere ne kontentigan. Zhou do elnomis la nomojn de la Latin-Amerikaj landoj laŭvice de la okcidenta marbordo al la orienta. Li forte emfazis, ke la uzo de fremda lingvo estas nur rimedo, kaj ke ne sufiĉa estas sole ĝusta politika sinteno. Li klarigis, ke oni devas havi riĉan provizon da scioj facile disponeblan. Li elnomis kvin specifajn ŝlosilojn al la sukceso: legi, paroli, aŭskulti, skribi kaj traduki. Sen forta trejnado en ĉiuj ĉi kvin aspektoj, oni ne povas atingi kompetentecon, li diris. Li opiniis grava por studentoj paroli la lingvon en kaj ekster la klasĉambro, kaj instigis instruistojn sendi studentojn al tiuj lokoj, kiel ekzemple flughavenoj kaj doko, por fari tie praktikadon kiel interpretistojn.

La kunsidoj estis ofte interrompataj de enveno de la kuracisto por memorigi al la ĉefministro pri preno de medikamento, de sekretarioj por atentigi lin pri gravaj telefonvokoj aŭ peti lin subskribi dokumentojn, kaj simile. Tamen de la komenco ĝis la fino li povis teni sian atenton sur la ĉeestantojn. Se li ekvidis novan vizaĝon en la kunsido, li do demandis pri ties nomo, aĝo, familia fono kaj tiel plu, por enkapigi ilin al si, kaj naŭ

fojojn el dek li povis alparoli la personon per ties nomo, kiam tiu ĉi aperis en la sekvanta kunsido. Li petis unu el la novaj alvenintoj prononci “Zhou Enlai”, kaj tiu trovis sin en senprepareco. Kutime sudlandanoj havas malfacilon en distingo de “l” disde “n”, kaj la nova alveninto tuj perfidis sian devenon. “Ne tre lerta en distingo de ‘l’ disde ‘n’, ĉu?” Zhou Enlai, mem sudlandano, rimarkis lian eraron.

Okazigitaj en Zhongnanhai sub lia rekta gvido, tiuj ĉi kunsidoj havis grandan influon sur la Pekina Universitato kaj la Pekina Fremdlingva Instituto kaj eĉ ekster iliaj terenoj. La kunsidoj emfazis la gravecon, kiun la registaro metis sur studadon de fremdaj lingvoj, kio antaŭ ĉio devus esti la zorgo de la fremdlingva fakultato aŭ la Ministrejo de Edukado. Treege domaĝe, el tiuj ĉi kunsidoj efektive rezultis nenio, ĉar kiel la instruistoj tiel ankaŭ la studentoj, kvankam entuziasme konsentantaj pri la ideoj de la ĉefministro, ne kuraĝis deturni sin de tiuj kelkaj sengustaj anglalingvaj lernolibroj kompilitaj dum la “kultura revolucio”, kiuj estis ŝtopitaj per politika ĵargono en la tiel nomata angla lingvo. La unua postulo de la ĉefministro propre celis vastan legadon de libroj en la originalaj lingvoj, tamen ĝi estis komprenata celi foj-refojan tralegadon de tiuj lernolibroj, ĉar la granda nombro da direktivoj donitaj de la bando de Jiang Qing al ĝiaj lakeoj en la Pekina Universitato kaj aliaj superaj lernejoj en tiuj jaro fariĝis kateno por edukado. Profesoroj, kiuj estis sufiĉe kuraĝaj por rekomendi beletran verkon de fama Okcidenta aŭtoro, eĉ se ne malutilan laŭ ia ajn normo, povis esti akuzitaj pri “korupto” al la animo de la junaj studentoj. Dum la tempo, kiam la verkoj de Beethoven kaj Ŝekspiro estis disŝiritaj en pecetojn kaj kondamnitaj kiel “burĝaj”, universitataj instruistoj kaj studentoj ne volis riski esti atakataj.

Oni ekkomprenis plene la signifon de la instrukcio de la ĉefministro pri la studado de fremdaj lingvoj nur post la senpotenciĝo de Jiang Qing. Studentoj, ne malpli ol instruistoj, konkure penis trovi librojn en originalaj lingvoj, kaj la lerno de fremdaj lingvoj, precipe de la angla, jam fariĝis manio en la terenoj de kolegioj kaj universitatoj. *English 900*, lernolibro eldonita de Usono pri konversacia angla lingvo, estis multe dezirata de studentoj, kiuj ĝin ŝatis multe pli alte, ol kiom ĝi efektive meritis, kvazaŭ posedi unu ĝian ekzempleron signifus jam teni ĉiujn ŝlosilojn al la lingvo.

Dum sia vivo Mao Zedong mem estis diligenta studanto de la angla lingvo. Parolante al grupo da aerarmeaj oficiroj de PLA en 1972, Zhou Enlai diris, ke ili skvu la ekzemplon de la prezidanto: “la prezidanto estas preskaŭ okdekjara. Ĉiutage li foliumas du dikajn volumojn de *Referenca Materialo*<sup>11</sup> (la matena kaj posttagmeza kajeroj de tiu ĉi interna eldonaĵo egalas libron el tricent paĝoj) kaj uzas refreŝigan kurson por daŭrigi sian anglalingvan studadon. La plej juna el vi estas ĉirkaŭ tridekjara kaj la plej maljuna iomete pli ol kvindekjara. Ĉiaokaze vi estas junaj kompare kun la prezidanto. Ĉu vi ne pensas, ke vi devas fari la samon kaj pliintensigi vian studadon?”

#### **Notoj:**

1. “Gvidlinio por Mi Mem” en *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, Vol. I, p. 144.
2. La politikaj movadoj de 1957 kaj 1959 ambaŭ estis direktitaj al “dekstruloj”. Dum la unua homoj estis akuzitaj pri atakado al la Partio kaj la socialisma sistemo, kaj dum la lasta pri atakado al Prezidanto Mao Zedong. La unua kampanjo estigis la rezulton silentigi homojn ekster la Partio, kaj precipe la intelektulojn, kaj la dua ĝismute timigis homojn interne de la Partio. En la menso de multaj la politika movado de 1957 estis terura makulo sur la historio de la Popola Respubliko. “Pri kio do eraris la kontraŭ-dekstrula btalo?” demandis Deng Xiaoping. Li respondis: “La problemo estis ke, dum ĝi disvolviĝis, la amplekso kaj celoj de la atako estis troe pligrandigitaj, kaj la frapoj estis multe tro pezaj. Grandaj nombroj da homoj estis punitaj nekonvene aŭ tro severe.” “La Nuna Situacio kaj la Taskoj antaŭ Ni.” en *Elektitaj Verkoj de Deng Xiaoping*, p. 228.
3. Rip van Winkle: Fikcia persono en rakonto de la usona verkisto Washington Irving. Li dormis 20

jarojn kaj sekve sciis nenion pri la aktualaĵoj. – Trad.

4. Post sia agreso en 1931 Japanio elhakis parton de nordorienta Ĉinio por starigi tiel nomatan “Manĉuran Regnon” kun Pu Yi instlita kiel “imperiestro” en 1934. Post la malvenko en 1945, la marioneta imperiestro kaj liaj proksimaj familianoj forkuris, inkluzive de lia frato Pu Jie, lia adjutanto. Ili estis kaptitaj de la antaŭenmarŝanta Ruĝa Armeo de Sovetunio. En 1950 Pu Yi kaj Pu Jie estis transdonitaj al la ĉina registaro. Ili estis ententataj en militkrimulejo en Fushun, Liaoning-provovincio, ĝis sia liberiĝo en decembro 1959.

6. En la 10-a de junio 1961, la antaŭvespero de la forveturo de la patrino de Hiroko Saga el Ĉinio, ĉefministro Zhou donis al la bopatrino de Pu Jie, japana nobelino, aŭdiencon, al kiu ĉeestis Pu Yi, verkisto Lao She kaj lia edzino Hu Jieqing, kaj la vidvino de Cheng Yanqiu, la fama pekinopera aktoro virin-rolanta – ĉiuj de manĉura deveno. Ĝi estis granda renkontiĝo de manĉuroj, kiuj inkluzivis membrojn de la antaŭa monarĥa familio. Estante en sia plej bona spiritostato en tiaj okazoj – libera de oficista sinteno, varma kaj amikema, sen montri ian moŝtecan dignon – la ĉefministro kondukis vastan diskutadon kun siaj gastoj pri tiaj temoj, kiel ekemple egaleco inter ĉinoj (inter la hanoj kaj anoj de la aliaj naciecoj) kaj inter azianoj, temo, kiu havis la efikon trankviligi la edzinon kaj bopatrinon de Pu Jie kaj kredigi al ambaŭ, precipe al s-ino Naoko, ke ŝi ne bezonas estis maltrankvila pro eventuala diskriminacio kontraŭ sia filino en Ĉinio. Zhou diris al la japana nobelino, ke monsubtenoj estos donataj al Hiroko Saga, por ke ŝi ne trovu la vivkondiĉojn severaj en Pekino kompare kun tiuj, al kiuj ŝi kutimis en Japanio, kaj ke la edzino de Pu Jie estas libera loĝi en Ĉinio aŭ en Japanio kaj vojaĝi inter la du landoj tiel ofte kiel plaĉas. Pu Jie kaj lia edzino havis du filinojn, Huisheng kaj Husheng, kiuj vivis kun sia patrinflanka avino en Japanio, antaŭ ol Pu Jie reakiris sian liberecon. Sen sciigo al iu ajn en sia familio Huisheng, la pliaĝa filinoj, faris neordinaran paŝon, skribante leteron en la ĉina lingvo al ĉefministro Zhou Enlai por demandi, ĉu ŝi povus korespondi kun sia patro en militkrimulejo. Permeso estis donita. En la malliberejo Pu Jie estis de tempo al tempo informata de Huisheng pri sia familio en Japanio. Poste la leteroj ĉesis komplete. Huisheng, kolegia knabino, ne ricevis aprobon de sia patrino pri edziniĝo al la viro, kiun ŝi amis. Kiel ago de protesto ŝi kaj la junulo kune sin pafmortigis proksime de Tokio en 1957. Tio fariĝis sensacia novaĵo en la japana gazetaro en tiu tempo. Tuŝante la malfeliĉan okazintaĵon en sia konversacio, la ĉefministro demandis, ĉu li povus esti favorata per fotografiaĵo de Huisheng, ĉar li opiniis ŝin tre kuraĝa knabino. “Konversacio kun Hiroko Saga, Pu Jie, Pu Yi kaj aliaj” en *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, vol. II, p. 316.

7. Post *Tetrikejo*, unu TV-Serio de 1985 bazita sur Kvar Generacioj sub Sama Tegmento de Lao She furoriĝis en Pekino kaj ricevis specialan premion.

8. La amasmovado de 1952 kontraŭ la kapitalista subaĉeto de registaraj oficistoj, impostevito, trompado en kontraktoj kun la registaro, ŝtelado de ŝtataj proprajoj kaj ŝtelado de ekonomiaj informoj en la registaraj fontoj.

9. “Kamarado Lao She: Pro Memoro” en *Memoraĵoj* skribita de Bakin, p. 184, Popola Eldonejo, Ningxia.

10. “Kvin Noforgeseblaj Vesperoj” skribita de Pekina Fremdlingva Instituto en *La Amata Ĉefministro de la Popolo*, p. 370. “Granda Kuraĝigo kaj Neforgesebla Instruĉio” skribita de la Okcidentlingva Fakultato de la Pekina Universitato, kolektita en *Amata Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. III, p. 367.

11. Referenca Materialo kaj Novaĵoj por Referenco estas la du ĉefaj ĉiutagaj internaj eldonaĵoj de eksterlandaj novaĵraportoj kaj gazetartikoloj preparitaj, tradukitaj en la ĉinan lingvon, kiujn presas kaj distribuas Xinhua-novaĵagentejo. Dum la kvarpaĝa *Novaĵoj por Referenco* havas grandegan eldonkvanton kaj akceptas abonojn de individuoj, *Referenca Materialo* estas limigita per distribuo nur inter officejoj de

la Partio kaj registaro.



## ĈAPITRO VI

### ***Maŭtaj-o* por Tablotenisa Ludantino**

Kiel Deng Xiaoping, Chen Yi, He Long – liaj viĉefministroj – kaj multaj aliaj intimaj kamaradoj, Zhou Enlai estis fervorulo pri sportoj, fervora kiel pri rigardo de tablotenisa ludo, tiel pri ĉeesto al futbala matĉo. Unika inter mondaj registaraj gvidantoj, li sekvis tiun ĉi intereson pli malproksimen. Eble neniu alia ĉefministro de iu ajn lando havis en sia oficejo trejnan manlibron por konsultado. Zhou havis tian. Li iam havis sur sia skribotablo flugpilkan trejnan manlibron, *Sekvu Min*, verkitan de Hirobumi Daimatsu,<sup>1</sup> la fama japana flugpilka trejnisto, kiu gvidis la virinan teamon de sia lando atingi la mondan ĉampionecon. La ĉefministro de tempo al tempo foliumis ĝin, post kiam li finis traktadon de dokumentoj al li prezentitaj. La historio de la japana sukceso kaj la reputacio de Daimatsu kiel severa vokto tra interesis lin. Li meditis pri la demando, kiajn lecionojn la ĉinaj gesportistoj povas tiri el la sperto de Japanio.

Kiam la teamo de Daimatsu vizitis Ĉinion por ludi kontraŭ la flugpilkistinoj de la gastiganta lando, Zhou Enlai elprenis tempon por iri rigardi la japanajn knabinojn kaj ilian trejniston, ne en metĉo, sed dum ilia ekzercado, por vidi, kiel ili estas trejnataj, kaj por eltrovi, kio ilin sukcesigis. Li observis unu tutan ekzercadon kaj, kiam Daimatsu kaj liaj flugpilkistinoj finis la lacigan ekzercadon, li ekparolis al la trejnisto kaj diris nenion krom laŭdo pri lia maniero meti la teamon sub severan provon. Zhou Enlai ekŝatis Daimatsu kaj lian trejnan metodon – trejni en la plej malfacila, strikta maniero kaj kun la venonta matĉo en la koro – kaj konsilis al la Sporta Komisiono, ke ĉinaj flugpilkistoj sekvu la ekzemplon de la japanaj. Li tuj faris inviton al Daimatsu, ke li venu al Ĉinio la venontan jaron por

trejni la ĉinan virinan flugpilkan teamon.<sup>2</sup> Daimatsu, iama simpla soldato en la japana armeo, kiu invadis nordan Ĉinion dum la Dua Mondmilito, estis supersūtita per la honoro donita al li de la grandanima ĉefministro kaj dankeme akceptis la inviton.

Zhou Enlai donis gravecon al sportista moralo, kio estis tipigita de lia fama slogano en la 1970-aj jaroj – Amikeco la Unua, Konkurso la Dua. Se okazis ia incidento aŭ neamika konduto, kiam la hejmlanda teamo ludis kontraŭ tiu de fremdlando, li tanis la haŭton al superaj oficistoj de la Sporta Komisiono. Okazis unu aŭ du malgrandaj incidentoj en iu futbala matĉo inter Ĉinio kaj vizitanta teamo sudorient-azia. La spektantoj en la stadiono prifajfis kaj malaklamis la vizitantojn pro ties iom kruda ludo. La novaĵo alvenis al la oficejo de la ĉefministro.

Estis la tria en la mateno. Zhou Enlai, ankoraŭ laboranta en sia oficejo, telefone vekis el la lito la vicministron respondecan pri la Sporta Komisiono kaj vokis lin al Zhongnanhai. La dormema vicministro estis severe riproĉita. “Tiu ĉi teamo,” la ĉefministro diris, “estis invitita al nia lando. Ili estas niaj gastoj kaj ni devas respekti ilin. Eĉ se ilia sportista moralo lasas ion nedezirata, ni povas paroli kun ili pri tio kaj fari intersanĝon de opinioj post la matĉo. Kiel vi povas toleri tiajn bruskaĵojn de la spektantoj?” li opiniis, ke li kaj liaj kolegoj, ne la spektantoj, estas respondecaj pri la okazaĵo, ĉar tio montras, ke la Sporta Komisiono ne bone faris sian laboron. Necesus antaŭe uzi rimedojn por atentigi spektantojn kiel kondukti ĉe internacia matĉo. “Ĉu vi ne povas presigi sur la dorso de la biletoj tiajn sloganojn, kiaj Estu Ĉentila al Vizitantoj, Estu Justa al Ĉiu Partio kaj Respektu la Decidojn de la Juĝanto?” demandis Zhou Enlai.

Kelkan tempon post tiu ĉi riproĉo, la erarinta oficisto denove vidis la ĉefministron,

kiu demandis, ĉu li jam legis artikolon en la gazeto *Novaj Sportoj* pri iu instruisto de elementa lernejo, kiu prenis sur sin la respondecon por fuŝado de sia laboro kiel juĝanto de la lerneja futbala matĉo. La instruisto-juĝanto estis pugnita de ludanto, sed pensis, ke li mem estas riproĉenda, unue ĉar kiel instruisto li ne instruis siajn lernantojn ĉiam resti bonkonduktaj kaj due ĉar efektive troviĝis kelkaj misjuĝoj.

“Vere rimarkinda instruisto. Tre noblanima. Laŭdata li devas esti,” diris la ĉefministro, plene komprenigante la lecionon. “Vi estas gvidanta kadro, kaj vi povas lerni ion de tiu ĉi instruisto. Fakte, ĉiuj kadroj de via Sporta Komisiono devas sekvi lian ekzemplon.”

Rilate la demandon de sportista moralo, Kimiyo Mtsuzaki, japana unuaranga tablotenisa ludantino kaj la virina unuopa mondĉampiono en 1959, faris grandan impreson sur Zhou Enlai. Ŝi partoprenis en la Dudeksesa Tablotenisa Mondĉampioneeca Turniro okazinta en Pekino en 1961, kaj tuj gajnis la koron de tablotenisaj amantoj, ĉar ŝi estis brile lerta kaj gracia ludantino, kiu bone regis sian temperamenton kaj neniam aspektis agitita. En la aĝo de dudek tri jaroj kaj en la plej bona fizika kondiĉo, Kimiyo Matszaki estis atendita konservi sian kronon, sed ŝi estis eliminata de hungara ludantino en la kvaron-finalo. Ŝi malsupreniris kun rideto, perdinta la ludon ĉe la fino.

La ĉefministro, rimarkinte kiel Matsuzaki aperigas preterkuran rideton ĉiufoje kiam ŝi perdis poonton, estis impresita de tiu ĉi monstro de sportista moralo. Ĉe la adiaŭa vespermanĝo donita por la japana teamo li venis por pasigi unu vesperon kun la gastoj. Li gratulis speciale Kimiyo Matsuzaki, laŭdante ŝin, ke ŝi estas bona sportistino, kaj postulis la ĉinajn atletojn ĉe la vespermanĝo sekvi ŝian ekzemplon. Tio estis la unua renkontiĝo de la japana ĉampiona tablotenisistino kun la ĉina ĉefministro, kaj ekde 1961 ŝi fariĝis unu el

la geamikoj de Zhou Enlai kaj lia edzino. Dum la postaj vizitoj al Ĉinio ŝi estis ree invitita manĝi en la hejmo de Zhou Enlai en Zhongnanhai. Matsuzaki regajnis al si la mondĉampionecon en unuopa ludado en 1963, kaj en sia gratula telegramo al la japana teamo, la ĉefministro aparte menciis ŝian triumfon. Kimiyo Matsuzaki ĝuis raran honoron en Ĉinio kaj estis rigardata kiel “gastino de ĉefministro Zhou” ĉie, kien ŝi iris eĉ post lia morto.

Gajninte je la dua fojo la virinan unuopan mondĉampionecon, Kimiyo Matsuzaki retiriĝi el konkursa ludado kaj en oktobro 1964 ree vizitis Ĉinion kiel trejnisto de la japana virina teamo. Invitite al manĝo en la hejmo de la geedzoj Zhou, kun aliaj fame konataj tablotenisaj geludantoj, ĉinaj kaj japanaj, ŝi konfidis la sekreton, ke ŝi baldaŭ edziniĝos, kaj ŝiaj gegastigantoj tuj donacis al ŝi belan pecon da ĉina brokaĵo – blankaj floroj kontraŭ rozkolora fono – kiel geedziĝan donacon.<sup>3</sup> La donaco faris novaĵon en Japanio kaj enviigis ĉiujn en la familio de Matsuzaki. Post kiam ŝiaj gepatroj kaj fratinoj kaj parencoj pririgardis ĝin, la juna virino metis la brokaĵon en sian dotaĵ-tirkeston. Ĝis hodiaŭ ĝi restis sendifekta kaj netranĉita – tro valora kiel simbolo por esti metita al praktika uzo.

Tio ĉi ne estis la unua donaco, kiun Kimiyo Matsuzaki ricevis de la geedzoj Zhou. Dum ŝia unua vizito en 1961 la ĉefministro donis al ŝi botelon da *maŭtaj*-o por ŝiaj gepatroj, kiuj tenis malgrandan vinbutikon en urbeto en Kagawa-prefektujo ĉirkaŭ kvardek jarojn.

La novaĵo rapide disvastiĝis. La najbaroj kaj geamikoj de Kimiyo Matsuzaki de malproksime vizitis ŝian familion por vidi tiun ĉi botelon da *maŭtaj*-o el Ĉinio. La maljuna paro, ordinaraj homoj, estis plenplena de dankemo, ricevinte donacon de la ĉina

ĉefministro.

Unu jaron poste, Kimiyo Matsuzaki denove vizitis Ĉinion. Kiam ŝi staris en vico kun aliaj japanaj tablotenisaj geludantoj, atendante akcepton de Zhou Enlai, la penso, ke la multeokupita ĉefministro memoras ankoraŭ tiun botelon da *maŭtaj-o*, ne venis al ŝi en la kapon. Ŝi ne antaŭvidis lian fenomenan memoron.

“Nu, kiel plaĉas al viaj gepatroj tiu *maŭtaj-o*?” la unuaj vortoj de la ĉefministro surprizis Matsuzaki.

“Bongusta, vere bongusta.” La japana knabino estis tro konfuzita por pli longa respondo.

“Bone, tiaokaze mi donos al vi ankoraŭ unu botelon.”

Kiel sakeo por la japanoj, ĉampano por la francoj, aŭ skota viskio por la britoj, tiel *Maŭtaj-o* estas por la ĉinoj, preskaŭ la nacia drinkaĵo, servata en specialaj okazoj. Forta alkoholaĵo distilita el sorgo, *maŭtaj-o* produktiĝas en for a vilaĝo en Guizhou-provinco, sudokcidenta Ĉinio, sed ĝia merkato antaŭe limiĝis nur al kelkaj urboj en Guizhou kaj Yunnan pro manko de transportiloj.

Zhou Enlai kaj aliaj kamaradoj hazarde trovis ĝin kun la plej granda plezuro en 1939 dum la Longa Marŝado. Sed, persekutataj de la trupoj de Ĉjang Kajŝek, ili povis fari nur mallongan konatecon kun tiu ĉi mirinda drinkaĵo. *Maŭtaj-o* leviĝis el sia relativa senfameco post la Liberiĝo en 1949. Rekono fare de la Okcidenta Mondo venis en 1972, kiam dekoj da usonaj raportistoj sin turnis al Pekino por raportoj pri la historia vizito de Riĉard Nixon al Ĉinio, kaj la sceno de tostado de ĉefministro Zhou Enlai al la Usona prezidento per tiu ĉi fajra drinkaĵo estis televidita ĉie en la mondo, kio atentigis

vin-amantojn pri tiu ĉi sukcesa likvaĵo ĝis tiam malmulte reklamata.

Post kiam la dua botelo da *maŭtaj*-o transiris la oceanon al Japanio, la gepatroj de Matsuzaki rigardis ĝin kiel simbolon de honoro kaj granda vitra kovrilo. Nur en tre specialaj okazoj, kaj nur por proksimaj amikoj kaj parencoj la maljuna paro formovis la kovrilon kaj malkorkis la botelon por gastigo, limigante la regalon nur al malgranda vinglaso por ĉiu.

La dua botelo daŭris dek kvar jarojn kaj en la tempo de la morto de Zhou Enlai duono de ĝi ankoraŭ restis. La familio de Matsuzaki decidis konservi ĝin en precize tia stato, kiel porĉiaman ateston de respekto.

Ne povante plu rezisti al la petegoj pri enhospitala kuracado, Zhou Enlai cedis en 1974, sed tiam lia malsano ne estis malkaŝita. Kimiyo Matsuzaki skribis al la ĉefministro kaj deziris al li rapidan resaniĝon, ne sciante, ke li estas kancer-trafito. Kiam ŝi kaj ŝia edzo vizitis Ĉinion baldaŭ poste, ili petis permeson por viziti la pacienton. La peto estis rifuzita de la kuracistoj en la hospitalo, sed la ĉefministro informiĝis pri ilia alveno. Li instrukiis al unu el siaj vicĉefministroj buŝe transdoni lian mallongan respondon: “Mesaĝo ricevita. Koran dankon!” Tiuj ĉi estis la lastaj vortoj de Zhou Enlai al Kimiyo Matsuzaki, la japana tablotenisa ĉampionino, kiu havis la privilegion esti kalkulata al la geamikoj de la ĉefministro.

Post la morto de Zhou Enlai granda nombro da raportistoj svarmis en ŝian hejmon en Tokio, sed ŝi dronis en tro da malĝojo, ke ŝi ne povu bone kolekti siajn pensojn por diri al ili, kiel ŝi sin sentas.

Dum la sekvanta vizito al Ĉinio en 1978 Matsuzaki skribis epigrafon al la mortinta

ĉefministro: “Ĉefministro Zhou Enlai: Vi vivas en mia koro. Kimiyo Matsuzaki. La 50an de oktobro, 1978.” Ĝi estis okulfrape presita en *Popola Tagĵurnalo* en Pekino.

“Vi vivas en mia koro.” Zhou Enlai vivas ne nur en la koro de mondfama tablotenisa sportistino, ne nur en liaj sampatrujanoj, sed ankaŭ en la koro de ĉiuj, kiuj havis la plezuron lin persone koni.

Kiel homo kun ĉarmo kaj spirita ekvilibro, kun granda varmece kaj afableco, pensema, societema, sed abnegacia, Zhou Enlai ne permesis al la aliaj devoj de sia ĉefministreco limigi lin nur al ŝtataj aferoj. Li ofte klopodis amikiĝi kun tiuj ekster ŝtatoficistaj rondoj – ekzemple, homoj en la rondoj artaj kaj sportaj – kaj ne nur ĉinoj, sed ankaŭ homoj el aliaj landoj. Liaj zorgemo kaj konsidero pri amikoj estis legendecaj.

Lia amikeco al Anna Louise Strong (1885-1970) estas trafa ekzemplo. Tiu ĉi usonanino estis la aŭtoro de *Milionoj de Ĉinio*, *La Ĉinoj konkeras Ĉinion*, kaj granda nombro da aliaj libroj, inkluzive de kelkaj pri Sovetunio. Ŝi estis konsiderata kiel danĝera revoluciulino en iuj okcidentaj landoj pro sia senfina intereso pri la du landoj. Kiam ŝi vizitis Ĉinion je la sesa fojo en 1958, en la aĝo de sepdek du jaroj, ŝi decidis fiksloĝiĝi en ĝi.<sup>4</sup> Zhou Enlai, kiu konis ŝin de antaŭ la milito kaj aparte bone en la tagoj de Yan’an, metis sub ŝian disponon komfortan apartamenton proksime de la vivoplena Wangfujing-strato, en centra Pekino. Ŝi estis provizita ankaŭ per sekretariino, Zhao Fengfeng, kiu kombinis la devojn de interpretistino kaj kunulino, kaj per komfortaĵoj, kiujn, Zhou Enlai pensis, ŝi devis havi en la aŭtuno de ŝia vivo. Sed fakte ŝi ankoraŭ laboris tiel energie, kvazaŭ ŝi estus en sia plej floranta aĝo, skribante dusemajnajn flugfoliojn, Leteronj el Ĉinio, kiuj poste aperis en formo de tri-voluma libro. Ĉiufoje, kiam

ŝia naskiĝtago revenis, Zhou kaj lia edzino Deng Yingchao vizitis ŝin por esprimi al ŝi siajn bondezirojn.

La okdeka datreveno de la naskiĝtago de Anna Louise en novembro 1965 estis tre aparta, celebrata kun la benoj de Partiaj gvidantoj de Ĉinio. Ŝi estis invitita al Ŝanhajo de Mao Zedong, tiam vintranta en la pli varma urbo ĉe la orienta marbordo, kiu donis tagmanĝon je ŝia honoro. Post tio ĉi sekvis granda vesperkunveno en hotelo, organizita de ĉefministro Zhou por soleni la okazon. Ĉar la plejparto de la geamikoj de Anna Louise estis en Pekino, kaj ŝi ne volis celebri la feston sen ili (ili antaŭe ĉeestis ĉiun el ŝiaj naskiĝtagaj festoj en Pekino), la ĉina registaro faris specialan klopodon rapide veturigi ilin per aeroplano al la urbego de orienta Ĉinio por helpi al tiu ĉi grandaĝulino celebri sian ĝojigan tagon. Ili inkluzivis, inter aliaj, d-ron Ma Haide (George Hatem) kaj lian edzinon Su Fei, aktorino-reĝisorinon, la geedzojn Epstein (Israel kaj Elsie), la geedzojn Coe (Frank kaj Ruth), la geedzojn Adler (Sol kaj Pat), la geedzojn Schuman (Julian kaj Donna), la geedzojn Milton (David kaj Nancy). Ankaŭ Sidney Rittenberg, intima kaj malnova kolego de Anna Louise, estis tie. Kaj same estis Rewi Alley, poeto el Nov-Zelando.

La malferma parolo de Zhou Enlai faris agrablan surprizon al ĉiuj ĉeestantoj, kaj precipe al la honorita gastino. “Ni kunvenas ĉi tie hodiaŭ,” diris la ĝentila kaj elokventa ĉefministro, “por esprimi al nia kara amikino, Anna Louise Strong, verkistino el Usono, bondezirojn okaze de ŝia kvardek-kilojariĝo.” Antaŭvidante konfuzon inter la gastoj pri la uzo de stranga esprimo, la ĉefministro rapidis fari klarigon. “En Ĉinio,” li diris, “‘kilo-’ duobligas la unuon, kiu ĝin sekvas. Do kvardek kilogramoj signifas, en la ĉina lingvo, okdek ĝin-ojn<sup>5</sup>, kaj same kvardek kilojaroj, kvankam fremda la esprimo ŝajnas, signifas



okdek jarojn.<sup>6</sup>” La pluraj centoj da ĉeestantaj bondezirantoj – ĉinaj, usonaj kaj alilandaj – eksplodis per rido ĉi tiu ĉi nekutima, lerta esprimo. Kvardek-kilojariĝo anstataŭ ŝia okdek-jariĝo! Tio ja igis Anna Louise denove senti sin tre juna.

Zhou Enlai faris pli detalan klarigon. “Kvardek kilojaroj,” li komencis filozofii, “estas meza, ne maljuna aĝo.” “Anna Louise Strong,” li aldonis, “jam faris multon por la ĉina popolo kaj la popoloj de la tuta mondo. Ŝi meritas esti gratulata pro siaj multaj atingoj en la kampo de politika literaturo. Ni deziras al ŝi pli multajn kaj pli grandajn sukcesojn! Ni deziras al ŝi verdan maljunecon!”

Anna Luoise dankis la gastiganton pro la grandioza naskiĝtaga festeno. Ŝi diris, ke ŝi estas aparte ĝoja pri tio, ke la ĉefministro malpliiĝis ŝian aĝon je duono.

Israel Epstein, korespondanto de la novaĵagentejo *United Press* por Ĉinio dum la 1930-aj jaroj kaj 1940-aj jaroj, estis ankaŭ tie kune kun sia edzino, la nun jam mortinta Elsie Fairfax-Cholmeley, kiu siatempe helpis Anna Louise Strong en la preparado de ŝia kopio de *Leteroj el Ĉinio*. Laŭ Epstein, aŭtoro de *La Nefinita Revolucio* en Ĉinio kaj lastatempe Tibeto Transformita, en 1965 ĉefministro Zhou kantis kun vervo ĉe la festeno por Anna Louise kaj, por pliigi la festan gajecon, instigadis aliajn zumi konatajn melodiojn, kaj precipe la kantojn de la Longa Marŝado. En la aĝo de sesdek sep jaroj, Zhou Enlai aspektis ankoraŭ kiel energioplena studento en Nankai, direktanta la lernejan ĥoron kun vervo kaj viveco. La festado treege plaĉis al Anna Louise.

*Leteroj el Ĉinio*, kiu provizis legantojn en ĉiu dua semajno per regula ekvido super disvolviĝoj de Ĉinio en la jaroj antaŭ la “kultura revolucio”, estis la lasta ĉefa ĵurnalisma atingo de Anna Louise, sed certe ne ŝia malplej grava. Estis Strong, kiu la unua malkaŝis la

novaĵon pri la perfida atako fare de Ĉjang Kajŝek kontraŭ la aliancaj komunistaj armeoj dum la milito kontraŭ la japana agreso en januaro 1941.<sup>7</sup> Nelonge antaŭ la atako ŝi estis en Chongqing, kaj Zhou Enlai jam iom detale parolis al ŝi pri la ĝenerala situacio dum pluraj vesperoj. Zhou faris penetran analizon pri la milito kaj ĝia influo sur la malfortika Kuomintan-komunista interrilato. Li antaŭdiris la probablecon, ke Kuomintango refoje subite turnos sin kontraŭ la komunistaj armeoj anstataŭ batali kontraŭ la komuna malamiko, la japanaj invadantoj. “La signoj montras,” Zhou aldonis, “ke la subita atako baldaŭ okazos. Sed tenu tiun ĉi informon konfidenca portempe. Mi vin sciigos, kiam estos plej favora tempo por ĝia publikigo.”

Unu monaton poste, Strong revenis en Nov-Jorkon. Post nelonge la armeo de Ĉjang Kajŝek faris surprizan atakon kontraŭ la komunistajn trupojn en suda Anhui-provinco. Granda parto de la komunisto-gvidata Nova Kvara Armeo estis detruita. Tio rememorigis la pli fruan perfidon de Ĉjang Kajŝek en la subita masakro al komunistoj en Ŝanhajo en 1927. Li faris, kion la japana armeo provis sed malsukcesis efektiviĝi – detruiri tiom multe da trupunuoj per unu fojo. La Kuomintangaj propagandaj organoj, kiuj havis striktan regon super la gazetaro, faris unu organoj, kiuj havis striktan regon super la gazetaro, faris unu nekredeblan famon. La evento okazis, ili diris, ĉar la Nova Kvara Armeo malobeis ordonojn kaj ribelis. Strong ricevis telegramon de Zhou Enlai, kiu petis ŝin “diri al la mondo”, kion ŝi scias. Ŝi do publikigis sian raportaĵon, je la konsterno de la aliancaj landoj.<sup>8</sup>

Post la fino de la Dua Mondmilito Anna Louise Strong denove venis en Ĉinion, kie ŝi pasigis multon el sia tempo en Yan’an. Tie ŝi ofte diskutis kun Zhou kaj lia edzino pri

Ĉinio kaj la internacia situacio. Estis dum iu interparolo kun Strong en tiu tempo, ke Mao Zedong nomis la atombombon “papera tigo” kaj detale klarigis la teorion, ke la bone armitaj imperiistaj fortoj ne estas tiel nevenkeblaj kiel ili povas ŝajni. Sekve la esprimo “papera tigo” eniris en la anglan lingvon.

Tiam Ĉjang Kajŝek jam estis preparita uzi plurajn milionojn el siaj trupoj por fari lastan atakon al la komunistaj fortoj. Li kredis, ke por ilin tute ekstermi necesos ne pli ol ses monatoj, kun grandega kvanto da materialoj prenitaj el la manoj de la japanoj post ties kapitulaco kaj la mono kaj municioj donitaj al li de Vaŝintono, li avide deziris atingi rapidan venkon.<sup>9</sup> Zhou Enlai konsilis Strong forlasi Ĉinion, sed reveni post la liberiĝo de la tuta Ĉinio. Kaj li ne lasis ŝin longe atendi.

Ankoraŭ unu anekdoto montras la zorgemon kaj sentemon de Zhou Enlai. Choi Yong Kun, supera gvidanto de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, vojaĝis kun la ĉina ĉefministro al Shenyang en nordorienta Ĉinio en junio 1963. Choi estis tre malnova amiko, kiu pasigis multajn jarojn kiel kadeto en Ĉinio kaj batalis ŝultro ĉe ŝultro kun ĉinaj kamaradoj kontraŭ la japanaj invadantoj en la montoj de nordorienta Ĉinio en la 1930-aj jaroj. La 21-a de junio estis lia naskiĝtago, kaj la ĉefministro decidis surprizi lin per naskiĝtaga festeno en tradicia korea maniero. Zhou ordonis prepari longvivecajn kukojn, longvivecajn nudelojn kaj similajn, kun aldono de io speciala – sorgorizo ĝismole kuirita. La kuiristoj de la gastejo ne komprenis. Ili neniam songus regaladon al eminenta gasto per tiel kruda plado. “Choi antaŭe trairis la fajron kaj akvon kun ni,” la ĉefministro klarigis, “tio rememorigos al ni ĉion, kion ni kune spertis en tiuj malfacilaj tagoj.” Sed la sorgorizo devis esti ĝismole kuirita, ĉar ambaŭ ili estis ne plu junaj kaj povis manĝi nur ion, kio ne

trostreĉos ilian digestan sistemon. Choi estis profunde tuŝita de la festeno kaj la simpla plado, kiu elvokis tre multajn rememorojn.<sup>10</sup>

Tamen Zhou Enlai neniam permesis naskiĝtagan celebradon por si mem. Lia propra naskiĝtago, la 5-a de marto, estis preskaŭ ŝtata sekreto – ne malkaŝita ĝis lia morto kaj solene celebrata nur en 1978. Se tiam li vivus ankoraŭ, okdek jarojn li jam havus. En morto 1943 Zhou Enlai estis en Chongqing. Iu tre malnova kamarado malkaŝis la sekreton, ke li baldaŭ atingos la aĝon de kvardek kvin jaroj. Kamaradoj kaj subuloj en la sidejo de la komunista delegacio interkonsentis soleni la okazon. Kiam la tago alproksimiĝis, Zhou eksciis pri tio kaj decidis ilin haltigi. Ili petegis lin, dirante ke ĝi efektive ne estos naskiĝtaga festeno. Ili volis nur igi la kuiristojn prepari iom da nedeloj por variigi la manĝon. Nudeloj, per kiujn la ĉinoj celebras naskiĝtagojn, estis fakte preferata manĝaĵo de Zhou. Bone, li diris, vi certe povas manĝi nudelojn – en iu ajn tago escepte de la 5-a de marto. Kaj tio estis ĉio.

Zhou Enlai kaj liaj kolegoj, kiuj estis sportamantoj, rigardis sportojn kiel ion pli ol amuzadon. Ĉeesto al sportludoj kontaktigis ilin kun fremdlandaj altranguloj kaj mondklasaj sportistoj kaj donis al ili okazojn gajni amikojn por Ĉinio kaj plivastigi kontaktojn kun la ekstera mondo.

La Olimpikoj de 1952 en Helsinki, Finnlando, okazis malpli ol tri jarojn post la naskiĝo de la Popola Respubliko. La Internacia Olimpika Komitato, post komplika batalo interne de la organizaĵo, invitis Ĉinion partopreni en la sportludoj. La invito alvenis tre malfrue, kun la grandioza malfermo kaj kelkaj konkursoj jam finitaj, kaj ĉinaj sportaj rondoj estis pli aŭ malpli unuanimaj pri nepartopreno. Ili ne havis tempon por organizi teamon, kaj la ŝanco atingi laŭdindan rezultaton estis malgranda, kaj eĉ se ili povis starigi teamon, estis probable tro malfrue por ili por partopreni en multaj el la konkursoj. Ilia konsiderita opinio estis submetita al la Ŝtata Konsilantaro. Sed sub la instigo de la ĉefministro la decido pri partopreno estis fine farita. “Nur hisi la novan ruĝan kvinstelanan nacian flagon ĉe tiu ĉi internacia kunveno estos triumfo en si mem,” li diris al la atletaj oficistoj. “Kaj plie, vi iros tien ankaŭ por lasi al alilandanoj scii, kia estas la nova Ĉinio, kaj amikiĝi kun ili. Tio estas okazo nepreterlasebla.”

Kiel diplomato, Zhou Enlai ankaŭ instigis kapton de la okazo, kiu sin prezentis ĉe la Tablotenisa Mondĉampioneca Turniro okazinta en Nagojo, Japanio, en la printempo de 1971. Tio estigis tablotenisan diplomation kaj suririgis sur la vojon de repaciĝo Ĉinion kaj Usonon, kiuj sin tenis malamike unu kontraŭ la alia dum pli ol dudek jaroj. Malstreĉiĝo de la streĉitaj interrilatoj postulus reciprokajn agojn. La Usona prezidento Richard Nixon de tempo al tempo sendis vualitajn, nerektajn signalojn el Vaŝingtono, ke Usono estas preta rekomenci iajn kontaktojn kun la lando, kiun li nun nomis la Ĉina Popola Respubliko anstataŭ la kutima “Komunisma” aŭ “Ruĝa” Ĉinio. Sed nun dependis de la sagaca Zhou Enlai la decido pri la tempo por la sinsekvo de paŝoj, kiujn li jam havis en la koro.

Glenn Cowan, membro de la Usona teamo, estis atendanta veturilon al la stadiono. La ĉina trejnisto preterpasis kaj haltis por veturigi lin per sia aŭtomobilo. Cowan komencis interparoli kun unu el la ĉinaj tablotenisaj ludantoj. Ili interŝanĝis donacojn, kio maltrankviligis la ĉefon de la ĉina teamo. Li ja havis sufiĉan kaŭzon por tio, ĉar Ĉinio kaj Usono estis longtempe malamikaj unu al la alia, kaj se li permesus la kontakton disvolviĝi, li povus krei malfeliĉan politikan eventon. Li opiniis prudenta telegrafi hejmen por peti instrukciojn. La ĉefministro ne sole aprobis la amikan agon, sed eĉ diris al la ĉefo de la ĉina teamo, ke li invitu la usonan tablotenisan teamon viziti Ĉinion.

La dektri-membra usona teamo estrata de Graham Steenhoven ŝajnis eksciita kaj samtempe perpleksa. Ili akceptis la inviton por ioma hezito. Kvar aliaj landoj konkursantaj en Nagojo – Kanado, Komolbio, Britujo kaj Neĝerio – estis kune invititaj, por ke la ago havu la econ senpartian. Sed, nature, estis la usonanoj, kiuj ricevis la plej grandan atenton en Pekino kaj de la monda gazetaro. Naskiĝis la tablotenisa diplomatio.

La vizitado atingis sian kulminon tiam, kiam ĉefministro Zhou Enlai intervidiĝis kun ĉiuj vizitantoj. Li rondiris en la ĉambro por manpremi kaj babili kun la ĉefo de ĉiu teamo. Poste, sidiĝinte antaŭ mikrofono, li alparolis ĉiujn ĉeestantojn, improvize respondante demandojn kaj eldirante kelkajn spritaĵojn. Li faris la okazon historia per sia parolo direktita precipe al la usonanoj. “Ni jam malfermis,” li diris, “unu novan paĝon en la interrilatoj de la ĉina kaj usona popoloj.” Li aldonis, ke li estas certa, ke tiu ĉi restarigo de amikeco trovos aprobon kaj subtenon ĉe la granda plimulto de la ĉina kaj usona popoloj.

La usonanoj reciprokis tion, invitante unu ĉinan tablotenisan teamon viziti Usonon poste en la jaro. Du jardekoj da frostiĝinta antagonismo inter la du landoj komencis degeli pro tiuj ĉi kontaktoj inter la du popoloj, movitaj de malgranda pilko, kiu ekrulis pli grandan globon. D-ro Henry Kissinger, la nacisekureca konsilanto de prezidento Nixon, estis invitita de ĉefministro Zhou Enlai por fari diskretan vojaĝon al Pekino en julio.<sup>11</sup> Li kaŝe eniris tra Pakistano kaj faris aranĝojn por la vizito de la unua usona prezidento al Ĉinio. Zhou Enlai kaptis tiun ĉi okazon per ambaŭ manoj kaj transturnis novan paĝon en la historio de la interrilatoj inter Ĉinio kaj Usono.

#### **Notoj:**

1. Hirobumi Daimatsu venis en Ĉinion laŭ invito de Zhou Enlai en 1965 por helpi trejni la virinan flugpilkan teamon de la lando. Tre kompetenta pri sia okupo, li elmetis la ĉinan teamon al la elprovado en la mallonga tempo, kiun li havis je sia dispono. Li estis kontenta pri la severa plenumado de tio, kion li ordonis al la ĉinaj knabinoj, kaj asertis, ke iun tagon ili fariĝos mondĉampionoj. Ili montris sin indaj je liaj esperoj, sed Daimatsu mortis de atako de kormalsano en 1978 kaj tiel ne ĝisvivis la vidon de tio. Kiam ili gajnis sian unuan trofeon en 1981, ili karmemoris la homon, kiu siatempe instruis ilin tiom multe sur la flugpilkejo, kaj iris fari respektajn salutojn ĉe lia tombo.

2. Post sia unua sukceso en 1981 la ĉina virina flugpilka teamo gajnis kvar pliajn mondĉampionecojn en sinsekvo.

3. “Tagmanĝo en la Hejmo de Ĉefministro Zhou” skribita de Zhou Bin, *Popola Tagjurnalo*, la 3-a de novembro 1985.

4. La kvina vizito de Anna Louise Strong al Ĉinio en 1946 kaj ŝia restado en Yan'an estis dramigita kaj prezentita de la Ĉina Centra Televizistacio por festi la centan datrevenon de ŝia naskiĝo en la 24-a de novembro 1985. Ankaŭ la Pekina Studio produktis filmon, *La Nekronita Reĝino*, memorigantan la eventon, kun ŝia malnova amiko d-ro Ma Haide (George Hatem) kiel konsilanto kaj Su Fei (lia edzino de Mahaide) kiel reĝisoro.

5. Vedu noton 14 de ĉapitro III.

6. "Memore al Ĉefministro Zhou" skribita de Liu Liangmo, la ĵurnalo Wen Hui Bao, la 7-a de marto 1979, Ŝanhajo.

7. La 4-an de januaro 1941 ses regimentoj, sume, ĉirkaŭ dek mil homoj, de la Nova Kvara Armeo estis ordonitaj de la ĉefstabejo de Ĉjang Kajŝek moviĝi morden al Suda Anhui. La 7-an de januaro ili estis ĉirkaŭitaj kaj atakitaj de sep divizioj de la Kuomintangaj militfortoj. Kvankam ĉirkaŭ mil personoj sukcesis trarompi la sieĝon, la plejparto de la trupoj falis en la batalo aŭ estis kaptitaj, inkluzive de la altrangaj oficiroj de la armeo. En la 17-a de januaro Ĉjang Kajŝek jam estis preta kiom eble puŝi sian kontraŭ-komunistan kampanjo, deklarante la Novan Kvaran Armeon kulpa pri ribelo, abolante ĝian titolnumeron kaj ordonnante transdoni Ye Ting, la kaptitan komandanton de la armeo, al milita tribunalo. Samtempe li ĵetis 200 000 personojn el siaj trupoj kontraŭ la kontraŭjapanajn bazregionojn sude de la Flava Rivero. Tio ĉi estis la kulmino de la dua kontraŭ-komunista kampanjo de Ĉjang Kajŝek. Historio de la Komunista Partio de Ĉinio, p. 248. eldonejo de Ĉina Junularo, Pekino. Vidu ankaŭ "Ordono kaj Deklaro pri la Sud-Anhui-a Evento" en *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, Esp. eld., Vol. II, p. 439.

8. "Rememoroj pri la Diplomatiaj Bataloj de Zhou Enlai antaŭ la Liberiĝo de Ĉinio" en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. II, kp. 99.

9. "Interparolo kun la Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong", en *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, Esp. el. Vol. IV, p. 148.

10. "La Vizito de Ĉefministro Zhou Enlai al Liaoning" en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. II, p. 148.

11. Henry Kissinger donis priskribon pri sia "Vojaĝo al Pekino" en *Jaroj en la Blanka Domo*, p. 733, Little, Brown and Company, Boston.

## ĈAPITRO VII

# Perfekta Dipomato en Agado

La kariero de Zhou Enlai kiel diplomato estas ofte katita de la komenco de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la 7-a de julio 1937, kiam li publike ŝargis sin per eksteraj aferoj por la Komunista Partio de Ĉinio. Efektive lia laboro en tiu ĉi sfero povas esti retrospurata ĝis Xi'an-evento de 1936, kiu estis jam rakontita. La bezono je liverado de informoj pri tiu ĉi grava evento igis Zhou Enlai sin turni al la servoj de du simpatiaj fremdlandaj ĵurnalistoj, kiuj tiam hazaerde estis en Xi'an.<sup>1</sup> Unu estis Agnes Smedley (1892-1950) el Usono, filino de Koloradia ministro, kiu sin ligis kun la afero de la Ĉina Revolucio kaj verkis *La Granda Vojo*, biografion de Zhu De. La alia estis James Bertram, aŭtoro de *Fronto en Norda Ĉinio*, nov-zelandano.<sup>2</sup> Ili preparis manuskriptojn por Radio Xi'an kaj Zhou Enlai redaktis kaj akceptis la pli gravan materialon, kiel anglalingvan tiel ankaŭ ĉinlingvan, kiun oni radiodissendis.

La unua regula oficejo de la Partio, traktanta pri eksteraj aferoj, estis starigita en la unua jaro de la milito en Wuhan (centra Ĉinio) kiel parto de la Wuhan-a Oficejo de la Komunisto-gvidata Oka-voja Armeo. Ĝi estis nomata la Sekcio de Internacia Informo. Lupreninte en neklasifikebla hotelo ĉambron, kiu estis uzata kiel kaj oficejo kaj dormoĉambro, S.I.I., en sia embria stadio, havis personaron nur el tri aŭ kvar homoj kaj du kadukajn skribmaŝinojn. Ĉi tie Zhou Enlai akceptis vizitantojn kaj ĵurnalistojn el la eksterlando kaj direktis S.I.I. en ĝia ĉiutaga laboro de tradukado de verkoj de Mao Zedong. Inter tiuj, kiuj venis viziti Zhou por novaĵoj kaj opinioj – iuj ofte kaj iuj okaze – estis trio da usonaj geverkistoj: Agnes Smedley, Anna Louise Strong kaj Edgar Snow. Tiuj ĉi



usonanoj hodiaŭ estas konservataj en la ama memoro de la ĉina popolo kiel la “tri S-oj”.<sup>3</sup> Ankaŭ Rewi Alley, la poeto, alia nov-zelandano, estis ofta vizitanto al la oficejo de Zhou, iafoje por diskuti pri aferoj koncerne sian industriian kooperativan projekton. La gastiganto kaj gastoj parolis plejofte pri la milito kaj la estonteco de Ĉinio.

Ĉi tie en Wuhan oni faris ankaŭ aranĝojn por la alilandaj vizitantoj, kiuj deziris ricevi paspermeson al Yan’an. De Wuhan Norman Bethune (1890-1939)<sup>4</sup>, la Kanada kirurgo, kiu antaŭe servis en la Hispana Enlanda Milito, kaj la juna Hindia kuracisto Dwarkanath Santram Kotni (1901-1942)<sup>5</sup> ekiris al la Liberigitaj Regionoj, kie ili poste oferis sian vivon en la milito farata de la ĉina popolo kontraŭ la militarisma Japanio. Kotni kaj B. K. Basu estis kun la Hindia Medicina Misio al Ĉinio estrata de d-ro L. Atal. D-ro Basu rememoris, ke Zhou Enlai en tiuj tagoj estis homo energioplena, klera kaj bone-informita, kiu analizis la militon kaj politikan situacion kun malofta sagaco. La korespondantoj ĉeestantaj gazetarajn konferencojn de Zhou estis multaj, alsenditaj de Usono, Britio, Francio, k.c. Basu memoris, ke unu el ili antaŭdiris, ke eble post dudek jaroj ili estos fieraj pri sia konatiĝo kun Zhou Enlai. “Kial post dudek jaroj?” Basu intermetis. “Tio ja estas tro malproksima estonteco, mi fieras ĝuste en tiu ĉi momento!”

La juna personaro, kiun Zhou kolektis por S.I.I., estis sensperta, sed diligenta kaj lernema. Li metis grandan emfazon sur la uzadon de la cerbo kaj insistis pri u ĉin por la personaro de eksteraj aferoj. U signifas kvin, kaj ĉin signifas okupiĝi pri, t.e., okupiĝi pri kvin aferoj: 1) okupiĝi pri uzo de siaj okuloj – pri legado kaj antaŭ ĉio studado de marksisma literaturo kaj verkoj de Mao Zedong, kaj la politikoj kaj direktivoj de la Partio; 2) okupiĝi pri uzo de siaj oreloj – pri elekto de homoj por sondi iliajn opiniojn pri la milito,

Kuomintango, la estonteco de la lando, k.c., kaj resendo de iliaj opinioj opinioj por konsultado; 3) okupiĝi pri uzo de sia lango – pri disvastigo de la politikoj kaj principoj de la Partio kaj refuto al eraraj ideoj kaj opinioj; 4) okupiĝi pri uzo de siaj manoj – pri persona plenumo de ĉio, kio estas farenda. Oni devas sin apogi per si mem, kaj ne sur aliaj; kaj 5) okupiĝi pri uzo de siaj kruroj – pri krurlaborado, t.e., eliri por amikiĝi kun kiom eble plej multe da homoj kaj ne resti endome, atendente, ke iu frapu al la pordo.<sup>6</sup>

Validaj egale por aliaj laborsferoj, tiuj ĉi reguloj estis fidele observataj de lia personaro en Wuhan. Kvankam nesufiĉaj en nombro, ili sukcese atingis multon en la daŭro de unu jaro.

Wuhan falis en la manojn de la japanoj en oktobro 1938. la Oficejo de la Oka-voja Armeo translokiĝis al Chongqing, la dum milita ĉefurbo supre de Yangzi, kaj en aprilo de la sekvanta jaro Sekcio de Eksteraj Aferoj anstataŭis la Sekcion de Internacia Informo. Ĝi estis metita sub la Sud-Ĉinian Buroon de la Centra Komitato de la Komunista Partio, estratan de Zhou Enlai. Dum en Wuhan Zhou devis kontentiĝi per skeleta personaro, nun, en Chongqing, li havis pli da viroj kaj virinoj por fari la laboron, sed la problemoj fariĝis pli malsimplaj kun paso de la monatoj. La Sekcio de Eksteraj Aferoj, kiu regule kunvenis sub lia persona gvidado, fidele sin tenis je la gvidlinio enkorpiĝinta en lia ĝenerala opinio pri la unua stadio de la milito.

Laŭ Zhou Enlai, la japana invado faras minacojn al la okcidentaj potencoj, kaj precipe endanĝerigas la Britajn kaj Usonajn interesojn en Ĉinio. Ĉar Londono kaj Vaŝingtono volas konservi sian piedtenon en la lando, la afero de ili malplej dezirata estas la eksplodo de enlanda konflikto, kiu profitigus nur la invadantojn. Tial la Partio devas

labori super la usonanoj, por gajni ilin por la vidpunkto de Yan'an. Tio devigos Kuomintangon pripensi dufoje antaŭ ol ataki la komunistojn plenforte kaj paciĝi kun Japanio. Kvankam estas grave, ke oni apogu sin sur siaj propraj fortoj, Zhou Enlai montris, tamen oni devas fari ĉion eblan por akiri internacian subtenon, moralan kaj materialan, por daŭrigi la rezistmiliton, ĉar se oni lasos sin izoli, tio faciligos aferojn al la japanoj. Gajni simpatian kaj subtenon por la rezistmilito – tio estis la agadprincipo, kiun Zhou Enlai formulis por la personaro de la komunista delegacio, kiam ili klopodadis inter la eksterlandanoj en Chongqing. Ili penis aliri al la ambasadoj kaj Ĉinio-helpaj grupoj kaj amikiĝi kun ili, kunvokis gazetarajn konferencojn por eksterlandaj korespondantoj kaj instigis simpatiajn fremdlandajn gastojn viziti la delegacian sidejon. Zhou Enlai mem ludis grandan rolon en ĉiuj ĉi aktivecoj, kaj, persiste klopodante, li kaj liaj helpantoj sukcesis rompi la malpermeson, kiu detenis ĉiujn politikajn partiojn, escepte de Kuomingango, de kontakto kun la diplomaciaj misioj en la dummilita ĉefurbo. Kvankam furioziĝis la reĝimo de Ĉjang, tamen multo el tio, kion ĝi volis kaŝi – ĝia korupteco, ĝia malkapablo, ĝiaj manovroj paciĝi kun Japanio por turni la pafilojn anstataŭe kontraŭ la komunistojn – staris nude malkaŝita antaŭ la mondo. La publika opinio en la Okcidento, precipe en Usono, komencis esti skandalita de tio, kio estis okazanta en Ĉinio.

Ĉar oni jam skribis multon pri Zhou Enlai, la diplomato dum la militaj jaroj kaj la postaj 1940-aj jaroj, estas preskaŭ nenecese ripeti, kion oni jam rakontis, krom montri ke, dum li pasigis multon el sia tempo kun la superaj tavoloj de usonaj militaj kaj diplomataj rondoj, li ankaŭ opiniis grava kulturi sian amikecon al ordinaraj usonaj militistoj. Liaj ir-reiraj vojaĝoj de Yan'an estis farataj per aviadilo metita sub lian disponon de la usona

armeo, kaj por montri sian dankemon, li persone invitis la aviadistojn al bankedoj en Yan'an, kion li ja povus taski al siaj helpantoj. Li mem regalis la gastojn, ĉar tio donis al li okazon amikiĝi kaj paroli kun junaj usonanoj. Li invitis ankaŭ soldatojn kaj suboficirojn el la usona Mekankista Korpuso manĝi kun li, post kiam finiĝis la laboro instali radiostacion por lia delegacio. Lia facila alirebleco kaj senceremonieco faris favoran impreson sur la usonanoj, kaj ili tion diris tute senrezerve, kio metis Ĉjang Kajŝek en tre malbonan humoron.

Post la eksplodo de plenskala milito inter Kuomintango kaj la komunistoj, la respondeco de Zhou Enlai por direkti la Sekcion de Eksteraj Aferoj estis transprenita portempe de generalo Ye Jianying. Kiel estro de la Ĉefstabo de la Popola Liberiga Armeo, Zhou Enlai estis absorbita en militaj aferoj, kaj nur post kiam la tutlanda venko fariĝis videbla kaj li kaj Mao Zedong translokiĝis en majo, 1948, al Xibaipo en Hebei-provinco la lasta restadejo antaŭ ilia impeta marŝo en Pekinon, li reprenis siajn devojn kiel la ĉefproparolanto de la Partio pri eksteraj aferoj.

Kun la fina triumfo alproksimiĝanta, la kadroj de la Sekcio de Eksteraj Aferoj estis pretaj kun fervoro plenumi la taskojn, kiuj nun ilin logis. Zhou Enlai, sciante pri ilia malpacienco, aranĝis por ili la laboron dum la intertempo: 1) daŭrigi la tradukadon de verkoj de Mao Zedong; 2) trejni sufiĉan nombron da homoj spertaj en eksteraj aferoj; kaj 3) fari esploradon pri la eksteraj politikoj sekvotaj post la baldaŭa tutlanda liberiĝo. Kiel Mao Zedong diris, Ĉinio devis fari novan komencon sur la tereno de eksteraj aferoj kaj formuli siajn politikojn sur nova bazo. La tasko por oficistoj sin okupantaj pri eksteraj aferoj, li diris, estis “purigi la domon kaj prepari invitilojn sendotajn al la gastoj”.

En la antaŭtago de la inaŭguro de la Popola respubliko, kiun prezidanto Mao Zedong estis proklamonta je la deka antaŭtagmeze la unuan de oktobro 1949 sur Tian'anmen-pordega turo, Zhou Enlai alvenis al la Sekcio de Eksteraj Aferoj je la lasta fojo. Ni jam plenumis, kion oni konfidis al ni, li diris al la ĝoje ridetantaj gejunuloj kolektiĝintaj ĉirkaŭ li. Moraŭ ni formale komencos nian regulan diplomatian laboron. Li donis al ili detalajn instrukciojn pri tio, kiel morgaŭ matene la parolado de Prezidanto Mao, kune kun lia aldonita letero, estos transdonita al la alilandaj ambasadorejoj aŭ konsulejoj en Pekino aŭ Nankino. Poste li lasis la oficialan sigelilon portantan lian nomon ĉe la oficistaro por stampi la komunikaĵon transdonotan al la restantaj diplomatoj. Ĝi estis la unua dokumento, kiu eliris en la nomo de Zhou Enlai kiel ministro de eksteraj aferoj. En sia unua jardeko kiel ĉefministro li samtempe plenumis la oficon de ministro de eksteraj aferoj, kaj post la du gravaj internaciaj konferencoj en Ĝenevo kaj Bandungo li transdonis la oficon al marŝalo Chen Yi.<sup>7</sup> Tamen li restis la ĉefa persono en la eksteraj aferoj de Ĉinio tra la jaroj de la “kultura revolucio” ĝis la tago, kiam li elspiris la lastan spiron. Neniu alia ĉina gvidanto havis tiel grandan influon sur la diplomatian fronton de sia lando.

Zhou Enlai estas memorata ne nur kiel larta plenumanto<sup>8</sup>, sed ankaŭ kiel plej bona instruisto de ŝtatestistiko. Direktivoj al liaj subuloj entenis ne nur precizajn indikojn, sed ankaŭ klarigojn pri la kialoj. El unu parolado farita de li al la Ministrejo de Eksteraj Aferoj en la unuaj jaroj de la Popola Respubliko oni povas ekvidi lian penson.

En la vivo de nacio, li diris al grupo da flavbekaj oficistoj de eksteraj aferoj, oni devas esti ĉiam pretaj fari du specojn de milito – milito de vortoj kaj milito de armiloj. La milito de vortoj inkluzivas vortojn parolajn kaj skribajn. Diplomatio apartenas al la

kategorio de la milito de vortoj, en ĉiu tago de la jaro. Estas dezirate, ke tiuj, kiuj laboras en la diplomatia sfero, estu ĉiam pretaj batali per vortoj kaj gajnu sukceson. Li avertis ilin pri la malfaciloj kaj obstakloj sur ilia vojo, ĉar la nova Ĉinio, diferenca de la malnova, havis nenian precedencon por sekvi kaj devis trarabati al si novan vojon.<sup>9</sup> Dum ne estas eble sekvi la manieron de la kapitalismaj landoj, asertis Zhou Enlai, ankaŭ la metodo de sovetunia diplomatio ne konvenas al Ĉinio en ĉiuj aspektoj. Jam de tre longe la ĉefministro metis ian diferencon inter Ĉinio kaj Sovetunio, ĉar Zhou Enlai ne estis dogmisto, kiu sanktigus ĉiun sperton sovetunian, kiel tiam agis nemalmultaj superaj oficistoj. Li konis Sovetunion, farinte studon pri tiu lando en sia juneco, sed li respondis al la pulsado de sia propra lando kaj firme tenis sin je tio, kion li opiniis taŭga por Ĉinio.

Lia analizo pri la tiama internacia situacio rilate la kapitalisman mondon reduktiĝis al unu centra fakto – ke ĝi estas dividita kaj ne estas solida, nepenetrebla bloko. Kiel li asertis, la malnova mondo de kapitalismaj landoj estas dividita en tri partoj: unue, la militemaj fortoj, kiuj ne hezitas sin turni al milito; due, la fortoj, kiuj staras por konservi la ekzistantan staton; kaj trie, la fortoj, kiuj staras por konservi la pacon. Laŭ tiu ĉi analizo, li difinis la eksteran politikon de Ĉinio kiel jenan: gajni al si la fortojn porpacajn, influi la fortojn starantajn por la ekzistanta stato kaj izoli la fortojn militemajn – alivorte, konstrui unuecfronton por paco en la internacia kareno. Ebleco kaj neceseco ja ekzistas por Ĉinio doni sian influon al tiuj ĉi fortoj, li diris. Li citis etan ekzemplon, kiu, iagrade, ilustris lian vidpunkton.

En 1954 Kolumbia Universitato celebris la ducentjaran datrevenon de sia fondiĝo kaj invitis Ĉinion al la ceremonio en Nov-Jorko. Apenaŭ unu jaro forpasis post la efektiviĝo

de la korea armistico, kaj inter Ĉinio kaj Usono ekzistis nenio alia ol antagonismo. Eble tiam ne estis favora momento, eĉ sur la kultura kampo, por fari kontakton inter la du landoj. Malakceptante la inviton, Guo Moruo, la direktoro de la Ĉina Akademio de Sciencoj, tamen sendis per telegrafo gratulon de Ĉinio al la universitato. Raportante la salutan mesaĝon, Xinhua-novaĵagentejo menciis nur Guo Moruo, ellasinte la nomon de la ĉefo de Kolumbia Universitato, d-ro Grayson Kirk. Laŭ akademia etiketo, tio signifis malrespekton. Sed estis io pli ol tio, kiel Zhou Enlai rimarkis tiam, kiam li riproĉis la redaktistojn respondecajn pri la fuŝo. Tio ne nur konfuzis homojn, kiuj legis la novaĵon, li diris, ili devis scivoli, kial troviĝas la nomo de la ricevinto de la invito sed ne tiu de la sendinto. Pli grave, unu okazo por influi homojn estis preterlasita pro tio.

Malofte la ĉefministro permesis tiajn okazojn forgliti el iaj manoj. En 1955 Dag Hammarskjöld, la ĝenerala sekretario de UNO, venis en Pekinon por peri por liberigi usonajn militkaptitiojn, kiuj atencis la teritorian aeron de Ĉinio. Estis vintro. Elakompante la ĝeneralan sekretarion ĝis lia aŭtomobilo, Zhou Enlai trovis iun eŭropano-aspektan fremdulon sidanta apud la ŝofora sidloko en frosta vetero. Post lia demando oni diris al li, ke la homo estas usonano, korpogardisto de s-ro Hammarskjöld. La informo kolerigis lin. Kiel vi povas lasi tian aferon okazi ĉi tie, la ĉefministro riproĉis siajn helpantojn, lasante gaston treni en la malvarmo? Kial vi ne invitis lin en la hejtitan koridoron? Iu donis klarigon. Nu, li estas usonano. Kiu volus havi rilaton kun usonano? Estas facile kompreni, kial la korpogardisto de Hammarskjöld estis traktata kiel homo malŝatata. La Korea Milito ĵus finiĝis kaj Usono estis ankoraŭ la ĉefa malamiko. Sed la ĉefministro pensis malsame. Tio, kion ni kontraŭstaras, li klarigis al ili, estas la usona imperiismo, ne ordinara usona

funkciulo. Kiel vi povas trakti gaston tiamaniere? Estas nepre necese, li aldonis, ke ni invitu lin al la venonta bankedo. En la antaŭvespero de la forveturo de Hammarskjold for de Ĉinio, la ĉefministro donis bankedon honore al la oficisto de UNO. Ne nur estis invitita lia usona korpogardisto, Zhou Enlai eĉ levis sian glason por fari toston al li.

La metodo, kiun li aplikis por ripari la mankojn kaj erarojn kaŭzitajn pro preteratento de liaj subuloj, estas tipa de Zhou Enlai. En la militaj jaroj en Chongqing li ofte uzis la hejmon de Guo Moruo en Tiangongfu kiel rendevuejon por intervudiĝi kun amikoj politike inklinaj al la politikoj adoptitaj de la Komunista partio. La domo, kiun Guo proponis al li por uzo en iu ajn tempo, estis facile alirebla kaj ne tro okulfrapa. Tiam estis nek oportune, nek sekure por ne-partianoj esti viditaj ĉe la sidejo de la delegacio de la Komunista Partio, ĉar ĝi estis kaŝe observata de Kuomintangaj spurohundoj, alivestitaj kiel strataj ŝuflikistoj, teovendistoj kaj aliaj vagantaj ĉirkaŭ la loko. Elirinte el la delegacia sidejo, vizitantoj estis gvatsekvataj ĝis siaj hejmoj, kaj iliaj nomoj kaj adresoj estis prenitaj kaj ili estis ofte persekutataj kaj turmentataj, ĝis ili opiniis pli bona deteni sin for de la loko.

Iun tagon Zhou Enlai elfaris liston kaj petis siajn helpantojn forsendi invitilojn por rendevuo en la loĝejo de Guo Moruo. Venis la difinita horo, sed unu el la invititoj ne aperis. Zhou scivolis la kialon. La helpantoj trovis kun teruro, ke ili forgesis sendi al la forestanta gasto lian invitilon. Zhou citis malnovan ĉinan popoldiron por admoni la kulpulojn. “Neniu bonhumoras ĉe la tablo, se unu gasto estas malzorgata.” Eble vi rigardas tion kiel malgrandan aferon, ian senintencan neglekton, li dirs. Sed la koncernata persono probable prenos tion kiel intencan ofendon. Tiaokaze tio estas nemalgranda, sed granda afero, precipe en tiu ĉi tempo, kiam la politika batalo kontraŭ Kuomintango estas tiel



malsimpla kaj delikata. Ĉu ne troviĝas ĉina esprimo “imagu vin sur alies loko”? Zhou diri al siaj helpantoj, ke ili remaĉu liajn vortojn. Severe riproĉinte ilin, li sendis sian aŭtomobilon por alporti la forgestian gaston, kiu tuj post sia alveno estis salutata kun abundaj pardonpetoj. Kiel koncerne la usonan korpogardiston de Hammarskjold, Zhou Enlai volis, ke neniu gasto estu malzorgata.

La Ĝeneva Konferenco pri Koreio kaj Hindoĉinio en 1954<sup>10</sup> estis la unua grava internacia konferenco de post la Dua Mondmilito, ĉe kiu Zhou Enlai unuafoje elmetis sin al la grandskalaj kompleksaĵoj de diplomatio. Ĝi estis ankaŭ la unua internacia konferenco post la Korea Milito, kiu venigis Ĉinion kaj Usonon, la du protagonistojn al la tablo de intertraktado. La atento de la mondo koncentrigis sur la Palaco de Nacioj (la malnova domo de la Ligo de Nacioj), kie la du mortaj malamikoj estis intertraktontaj pri la problemo pri Azio kaj vortduelontaj unu kontraŭ la alia. Ĉies okuloj estis turnitaj al Zhou Enlai, kiu venigis kun si ducentmembran delegacion. Kiel la legenda virtuozo, nomata “La Talleyrand<sup>11</sup> de Ĉinio”, ludos sur la mondscenejo, estis afero ege interesa por la diverslandaj ĵurnalistoj kolektiĝintaj en Ĝenevo. Ĉiuj estis malpaciencaj sendi sukan raporton al sia lando.

La sekretario de Ŝtato John Foster Dulles, ĉefo de la usona delegacio, estis rigidliniulo, kiu sekvis politikon de malamikeco kaj nerekonon al la Ĉina Popola Respubliko. Kvankam membroj de la du delegacioj preskaŭ ĉiutage renkontiĝis unu kun alia en la konferenca halo, Dulles permesis nenian kontakton inter sia delegacio kaj la ĉina. Li instigis ĵeti glacian rigardon, se membroj de la usona delegacio renkontiĝis kun la ĉinoj vizaĝo kontraŭ vizaĝo en la halo aŭ la koridoroj, kaj li mem ĵuris, ke li neniam havos rilatojn kun la ĉina delegacio, krom se lia aŭtomobilo hazarde kolizius kun tiu de Zhou Enlai. Do estis ne mirinde, ke tiu ĉi frosta atmosfero estiĝis longe cirkulanta rakonto pri Dulles, kiu rifuzis fari manpremon kun la ĉina ĉefministro ĉe renkonto neatendita en la ripozĉambro de la Palaco de Nacioj.

Richard Nixon menciis tion en sia Memoraĵoj kiel “ofendon” kaj Henry Kissinger priskribis tion kiel “malrespekton” en sia *Jaroj en Blanka Domo*.<sup>12</sup> Ne estus en la naturo de Zhou Enlai en tiaj cirkonstancoj rigardi ofendon kiel ion personan. Neniu el liaj publikaj

agoj, en aŭ ekster la lando, estis motivita sur persona bazo. Ĉio, kion li faris, estis farita en la nomo de lia lando aŭ registaro. En Ĝenevo li reprezentis Ĉinion, kaj se la usona Sekretario de Ŝtato intence prenis sintenon ofenda, tio estus ne kontraŭ Zhou Enlai kiel individuo, sed kontraŭ Ĉinio kiel lando.<sup>13</sup>

Kio do estus la rezulto, se Hohn Foster Dulles kondukus malpli malamike en Ĝenevo, aŭ la registaro de Eisenhower havus malpli rigidan sintenon kontraŭ Ĉinio en la jaroj tuj post la Korea Milito? Ĉu la progreso de la usona historio estus iom malsam? Je konsiderindaj demandoj.

Dulles forlasis Ĝenevon baldaŭ post kiam la konferenco eniris en sian unuan kunsidon, kaj la gvidado de la usona delegacio falis sur la ŝultrojn de generalo Walter Bedell Smith, la milit-tempa stabestro de Eisenhower. Iu ĵurnalisto demandis la generalon dum la konferenco, kiu daŭris de aprilo ĝis julio, ĉu kaj kiam kontakton li havas kun Zhou Enlai. Lia sola kontakto kun s-ro Zhou Enlai estas, li ŝercis, dividi la saman longan rulitan mantukon en la vira necesejo. Bedell Smith, iom malrigidiĝinte en sinteno dum la finaj semajnoj de la konferenco, iniciatis konversacion kun la interpretisto de la ĉefministro en la koridoro. Kvankam ili nur babilis, tamen en tio estis io signifoplena. Zhou ekhavis antaŭsenton, ke ne ĉiu en la usona delegacio havas ĝuste la saman opinion kiel Dulle rilate Ĉinion, kaj li decidis kontaktiĝi rekte kun la anstataŭanta ĉefo de la usona delegacio.

Baldaŭ venis lia okazo. Kiam li iutage enpaŝis en la koridoron, li vidis, ke Bedell Smith verŝas kafon en sian tason. Li iris rekte al la tablo de la usonano kaj etendis sian manon. La surprizita Bedell Smith evidente konfuziĝis, sed li faris rapiden reagon. Li havis cigaron en sia maldekstra mano kaj haste prenis la kaftason per la dekstra, kvazaŭ

por montri, ke liaj manoj estas plenaj. Kiel ajn estis, la ĉina ĉefministro jam rompis la glacieron. Ili faris mallongan ĝentilan konversacion, kiu finiĝis per laŭdo de la ĉefo de la usona delegacio al Ĉinio kiel lando kun malnova kaj granda civilizacio, kaj komplimento al Zhou pro la grandioza kontribuo, kiun Ĉinio faris al la mondo.

Kelkan tempon poste Bedell Smith trovis okazon daŭrigi la ĵus starigitan interrilaton. Estis la ferma kunsido kaj Zhou Enlai estis faranta konversacion en la koridoro. La usonano aliris, por diri saluton al la ĉefministro. Komentante la konferencon, Bedell Smith diris, ke li opinias ĝin fruktodona, kaj profitis de la okazo por esprimi siajn varmajn sentojn por la ĉina popolo. Li diris al la ĉefministro, kiel forte li estas impresita de lia diplomata takto kaj kiel li ĝojas konatiĝi kun li. Al tio Zhou Enlai respondis: “Ĉu mi ne la unua etendis mian manon al vi lastfoje, kiam ni renkontiĝis?” La usonano iom embarasiĝis, rememorigite pri sia groteska pozo kun “manoj plenaj”, kaj kiam li provis forridi sian embarason, li donis al la ĉina ĉefministro kubutpuŝeton je la brako, antaŭ ol diri adiaŭ.

Kial la anstataŭanta ĉefo de la usona delegacio neniam kolektis al si sufiĉan kuraĝon por manpremi kun la ĉina ĉefministro?

Tio estis nekomprenebla al la ĉina delegacio kaj restis tia dum kelka tempo. Nur post longe la enigmo solviĝis. John Foster Dulles, ankoraŭ estante en Ĝenevo, donis malpermeson kontraŭ manpremado kun la ĉinoj. Tio klarigis la neklarigeblan ĵonglon de Bedell Smith kun cigaro en la mano kaj taso da kafo en la alia dum la momento, kiam Zhou Enlai aliris al li ĉe la unua renkonto, kaj lian kubutpouŝeton je la brako anstataŭ manpremo ĉe la dua. Malgraŭ sia sagaco kiel sukcesa juristo de Wall-strato, Dulles forgesis fari aldonitan malpermeson kontraŭ kubutpuŝeto.

Dum Zhou Enlai perdis neniun okazon por influi membrojn de la usona delegacio, li aliflanke ankaŭ lasis neniun provokon ne rebatita. Kiam la demando pri Hindaĉinio estis metita por diskutado, parolante en la nomo de Ĉinio, li prezentis proponon. Trovinte ĝin utila por solvi la demandon, Bedell Smith diris sian opinion rekte kaj eksplicite. Disputo sekvis en la usona delegacio; iuj opinis kontraŭ la parolo de la anstataŭanta ĉefo, kiu estis favora al la propono de Ĉinio. Walter Robertson, supera membro de la usona delegacio, kiu siatempe servis en la usona taĉmento al la triflanka (Kuomintango, la Komunista Partio, Usono) Milita Interpaciga Grupo en Ĉinio post la milito kontraŭ Japanio, malkonsentis kun sia ĉefo. Bedell Smith, ne povante kvietigi la malkonsentojn en la delegacio, petis forpermeson kaj veturis al Berno. Robertson, anstataŭante Smith, kiel la ĉefa proparolanto de Usono, atakis la ĉinan proponon ĉe la sekvanta kunsido. Zhou Enlai respondis, demandante, ĉu la usona delegacio tenas la vorton, kiun ĝi jam diris. “La anstataŭanta ĉefo de la usona delegacio, kiu parolis ĉe la lasta kunsido, diris, ke la ĉina propono estas utila en tiu ĉi diskuto,” Zhou Enlai replikis. “Kaj nun vi, Robertson, rompissian vorton. Al kiu ni do kredu, al vi aŭ via delegaciĉefo? Permesu al mi rememorigi vin, Robertson, ke antaŭe ni krucigis la glavojn kun vi. Se vi nun nepre volas batalon, ni estas pretaj refoje akcepti vian defion.” La protokolo de la konferenco portis nenian mencion pri respondo de Robertson, se ia ajn estis, al tiu refuto.

En la fino de la limigo de Dulles estis tute forgesita. Dank’ al la perado de la brita ekstera sekretario Anthony Eden, la usona delegacio intervidiĝis kun la ĉina por diskuti pri procedoj por traktado pri la rehejmigo de personoj retenataj de ĉiu flanko. Tio ĉi fine kondukis al Ĉinio-Usonaj interparoladoj ĉe la nivelo ambasadora, kiuj fariĝis

rekordorompa traktado-maratono, daŭranta kun interrompoj la sekvantaj dek kvin jarojn.

Malgraŭ la obstrukcado de Usono, la Ĝenava Konferenco venkis la lastan baron por atingi interkonsenton pri la ĉesigo de militagoj en Hindoĉinio kaj provizis ĝin per politika solvo.<sup>14</sup> Sed, kiel pruvis la postaj okazaĵoj, la interkonsento vaniĝis pro la kontraŭstaro de Dulles. La lasta rezulto dum la jaroj estis la vundiĝo de Usono, kaŭzita de ties implikiĝo en senvenkan militon en Vjetnamio en la 1960-aj jaroj kaj 1970-aj jaroj.

Kvankam tiu ĉi vaglumeca celo ombris ĉion alian en Ĝenevo, tamen el la vidpunkto de Ĉinio – aŭ, pli precize, laŭ la takso de Zhou Enlai – la longedaŭrantaj ambasadoraj interparoladoj inter Ĉinio kaj Usono tamen estis penvaloraj, se nur por tio, ke traktado en Ĝenevo kaj poste en Varsovio kondukis al tio, ke Usono lasis reveni al sia patrujo la raketo-specialiston de ĉina deveno, prof. Qian Ŝuesen (Chien Hsueh-sen) ĉe la Kalifornia Instituto de Teknologio, Pasadena, Usono<sup>15</sup>, kiu siatempe helpis konstrui la unuan usonan telestiratan misilon. Qian Xuesen, civilulo ranganta kiel kolonelo en la usona armeo dum li laboris super misilprojekto, estis retenita por periodo de kvin jaroj nur pro tio, ke Usono timis, ke la specialisto de interkontinenta balistika misilo volas reiri al sia hejmlando, kiu jam fariĝis Popola Respubliko gvidata de la Komunista Partio. Fine Pekino konsentigis Vaŝintonon ellasi Qian, kaj la profesoro kaj lia edzino Jiang Ying, muzikistino edukita en Germanio, kaj iliaj du infanoj forveturis de la usona tero al Ĉinio per la ŝipo S.S. President Cleveland la 17-an de septembro, 1955.

Ĉe iu konferenco post jaroj, parolante pri Ĝenevo, Zhou Enlai asertis, ke valoras la tuta penado akompani la usonanojn ĉe la tablo de traktado por revenigi Qian Xuesen, kvankam la maratonaj interparoladoj kun Usono, li diris, rezultigis preskaŭ nenion alian,

kio povus esti konsiderata kiel pozitiva.

En Ĝenevo okazis flankaj spektakloj al la ĉefa dramo. Zhou Enlai faris interparolojn en kaj ekster la konferenca halo kun la ĉefaj partoprenantoj. Ifoje diskutoj estis farataj ĉe lia apudlaga vilao, kiun vizitadis ankaŭ parlamentanoj el aliaj Eŭropaj landoj kaj fame konataj personoj, kiuj deziris renkontiĝi kun la ĉina ŝtatestro. Inter ili estis Charlie Chaplin, la geniulo de la kinematografia mondo. La brita ekstera sekretario Anthony Eden bone konatiĝis kun la ĉina ĉefministro en Ĝenevo, kaj ilia ofta kontakto kondukis al interkonsento starigi diplomatian agentejon por interligo reciproke en la ĉefurbo.

Eble de pli granda signifo el la longatempa vidpunkto estis la vojaĝo de Zhou Enlai en junio al Hindio kaj Birmo inter la kunsidoj de la konferenco, ĉar la Kvin Principoj de Paca Kunekzistado starigitaj dum liaj vizitoj estis utilaj por vastigi kion Ĉinio ĉiam probatalis. – unuecfrento de landoj de la Tria Mondo kontraŭ la imperiismo. La Kvin Principoj iniciatitaj de Zhou Enlai estis: reciproka respekto al teritoria integreco kaj suverenceco;

Reciproka respekto al teritoria integreco kaj suverenceco; reciproka neagreso; reciproka neinterveno en internaj aferoj; egaleco kaj reciproka profitigo; kaj paca kunekzistado. Tiu ĉi kvinpunkta gvidilo por la internacia konduto formas la fundamenton de la postaj Dek Principoj adoptitaj ĉe la Bandunga Konferenco en 1955 en Indonezio – la dua ĉefa internacia konferenco, kiun ĉeestis Zhou Enlai.

Sur sia vojo al la Afriko-Azia Konferenco, kiu laŭplane okazos de la 18-a ĝis la 24-a de aprilo en Bandungo, indonezia urbo por somera turismo, la ĉina ĉefministro apenaŭ evitis atencon kontraŭ lia vivo. Kvankam ne en la plej bona sanstato post apendica

operacio, li opiniis la konferencon tiel grava, ke li decidis ĉeesti je ĉia kosto. Li planis ekvojaĝi la 11-an de aprilo kun sia personaro per luita hindia pasaĝera aviadilo *Princino Kaŝmiro*, kiu haltos en Hongkong por preni membrojn de la delegacio. Unu prokrasta bombo estis metita de Kuomintangoaj spionoj en la alon de la aeroplano dum brulaĵ-reprovizado ĉe Kaitak-flughaveno, kaj la aeroplano eksplod-detruigis en la ĉielo ĝuste kiam ĝi alproksimiĝis al la marbordo de Norda Borneo. Dek unu personoj, ne inkluzive de membroj el la aviadila personaro, perdis sian vivon, inter ili ok estis el Ĉinio, kaj po unu el Vjetnamio, Pollando, kaj Aŭstrio. Unu epitafio pri la dek unu martiroj, kiuj mortis por la afero de paco, sendependeco kaj libereco, estis gravurita sur granda tomboŝtono starigita en Babaoshan-tombejo de Revoluciuloj en Pekino.

Je hazardo de la sorto, Zhou Enlai ne estis en la aviadilo, ĉar necesigis al li planoŝanĝon malfrua invito, ke li estu en Ranguno, Birmo, por intervidiĝi kun la ĉefministroj de Birmo, Hindio kaj Egiptio. Tio evitigis al Ĉinio netakseblan katastrofon.

De Ĝenevo ĝis Bandungo estis majloŝtono. Se la Ĝeneva Konferenco okazis por solvi la restaĵon de koloniismo kaj la problemojn leviĝintajn el la Korea kaj Hindaĉina Militoj, la Bandunga estis kunvokita por diskuti, kiel plej bone konservi la sendependecon, politikan kaj ekonomian, de la novnaskiĝintaj landoj en Azio kaj Afriko kontraŭ la rabemaj imperiismaj fortoj. Multaj paroladoj faritaj en la 18-a de aprilo, la malferma tago, difinis la tonon al la konferenco – plifortigi la ligon de solidareco kontraŭ la imperiismo kaj koloniismo en Azio kaj Afriko. Sed la diferenco en sociaj sistemoj kaj politikaj ideologioj, plus reciproka suspekto kaj miskompreno, kaŭzita kaj nutrataj de la antaŭaj koloniaj fortoj, tendencis enbati kojnon inter partoprenantojn. Ekde la komenco malakorda tono agacis en

la ĉefa temo pri unueco kaj kunlaboro. Kelkaj delegitoj kreis konfuzajn malicaĵojn, kiaj “la minaco de komunismo”, “subfosaj agadoj” kaj “manko de religia libereco”. Tiaj sugestaĵoj havis Ĉinion kiel sian celon. Streĉiteco regis en la konferenco. Necesis fari tujan reagon.

Ĉar laŭ la tagordo Ĉinio devis paroli la sekvantan tagon, Zhou Enlai decidis disdoni sian prepraitan parolon anstataŭ eldiri ĝin ĉe la posttagmeza kunsido. En la mallonga tempo restanta al li post la matena kunsido li skribis novan suplementan parolon dum la tagmanĝa horo por respondi la vualitajn atakojn, sendante paĝon post paĝo de ĝi al la laborantoj por tradukado. Petite adresi la parolon al la kunvenantoj, la vigla kaj sagaca diplomato, kiu antaŭ unu jaro potence skuis la mondon en Ĝenevo, suriris la tribunon.

“La ĉina delegacio,” li deklaris, “venis por la celo serĉi unuecon, ne elvoki kverelojn. Ni komunistoj neniam malkonfesas nian kredon pri komunismo, nek neas, ke socialismo estas bona sistemo. Tamen ne necesas al iu ajn distrumpeti siajn ideologion kaj politikan sistemon, ĉar tiaj diferencoj ja ekzistas inter ni.

“La ĉina delegacio venis ĉi tien por serĉi komunecon de opinioj kaj ne por levi punktojn de diferenco. Ĉu ekzistas ia bazo por trovi komunecon de opinioj inter ni? Mi pensas, ke jes, ĉar la plejparto de la landoj en Azio kaj Afriko trapasis periodojn de malfeliĉo kaj sufero kaj nun ankoraŭ spertas tiajn, dank’ al la koloniismo. Tio ĉi estas rekonita de ni ĉiuj. Se ni serĉas komunan bazon kaj forigas la malfeliĉon kaj suferon truditajn al ni de la koloniismo, estas do facile por ni kompreni kaj respekti unu alian, esti simpatiaj kaj helpemaj unu al alia...”.<sup>16</sup>

Klariginte la vidpunkton de Ĉinio, Zhou Enlai traktis la asertojn pri la manko de religia libereco en Ĉinio kaj la terurajn vortojn pri “subfosaj agadoj”. Li refutis tiujn ĉi



mensogojn kaj invitis ĉiunjn delegitojn ĉe la Bandunga Konferenco viziti Ĉinion laŭ sia bontrovo kaj vidi propraokule, kiel statas Ĉinio, precipe ĝiaj marbordaj kaj landlimaj provincoj. Kvazaŭ alparolante malbonvolulojn, li alprenis pacigan tonon por certigi ilin, ke Ĉinio toleras tiujn, kiuj scias nenion pri la vera situacio, partoprenante en dubo. “Ni havas nenian bambuekranon (bambukurtenon),” li rimarkigis, “sed ekzistas iuj, kiuj volas meti ian fumekranon inter nin.” La parolado de la ĉina ĉefministro, celanta serĉi samopiniecon kaj flanklasi diferencojn, servis por forigi kaŝitajn obstaklojn for de la vojo kaj faris multon por meti la konferencon sur la ĝustan trakon.

Dum la semajnodauranta konferenco Zhou Enlai laboris preskaŭ tagnokte, dormante ne pli ol tri horojn ĉiutage. Tio estis ofero farinda, ĉar la Dek Principoj, enkorpigantaj la Kvin Principojn de Paca Kunekzistado en spirito, se ne en litero, kronis la Bandungan Konferencon per sukceso kaj metis bazangulan ŝtonon de la kodo, per kiu la landoj de Azio kaj Afriko – kaj poste ankaŭ Latin-Ameriko – gvidis siajn duflankajn kaj multflankajn interrilatojn. Historio certe ne subtaksos lian monumentan kontribuon al la popolo de la vasta regiono, kiu hodiaŭ estas nomata la Tria Mondo.

Kvankam kontraŭ la volo de la ĉina delegacio, la demando pri Taiwan tamen leviĝis ĉe la konferenco, ĉar ekzistas iaj nebulecaj ideoj ŝvebantaj super la tiama situacio en la Taiwan-a regiono. Gvidate de la principo serĉi komunecon de vidpunktoj kaj flanklasi opinio-diferencojn, Zhou Enlai pritraktis la demandon pri Taiwan antaŭ la delegitoj, kvankam li ne petis, ke ĝi estu inkluzivita en la tagorordo de la konferenco. Ekster la konferencejo, li faris interparolojn kun la registaraj ĉefoj de multaj landoj, precipe kun la ĉefoj de la delegacioj birma, cejlona, hidia, indonezia, pakistana, filipina kaj tajlanda, por

klarigi la vidpunkton de Ĉinio.

Al la demando troviĝas du flankoj, la ĉina ĉefministro montris. Unue, Taiwan estas ĉina teritorio. Kiam kaj kiel la ĉina popolo liberigos Taiwan-on, estas afero precize kaj ekskluzive de Ĉinio. Ĝi estas interna afero kaj ne toleras entrudiĝon de iu ajn fremda lando. Due, la streĉiteco en la Malproksima Oriento, kaj aparte en la Taiwan-a regiono, devas esti atribuita sole al la okupado de la ĉina teritorio Taiwan fare de Usono. La ĉina registaro volus fari traktadon kun Usono por solvi tiun ĉi flankon – la internacian flankon – de la demando, tamen la suverena rajto de la ĉina popolo liberigi Taiwan-on ĉiaokaze ne povas esti atencita. Utiligante la okazon prezentitan de la konferenco, Zhou Enlai faris anoncon, kiu entenis amikan noton, al Vaŝinton: “La ĉina kaj usona popoloj estas amikaj unu al la alia. La ĉina estas preta sidiĝi kun la registaro de Usono por traktado.”

Fine ĉinaj kaj usonaj diplomatoj komencis ambasadorajn traktadojn en Varsovio, farante la unuan paŝon en la longa vojaĝo al Ŝanhajo, kie la historiofara Kuna Komuniko subskribita de ĉefministro Zhou Enlai kaj prezidento Richard Nixon en la 28-a de februaro 1972 ĉe la fino de la vizito de la prezidento al Ĉinio finis du jardekojn da antagonisma stato kaj komencis novan periodon de akordiĝo inter la du landoj. Sekve la internacia flanko de la Taiwan-demando, kion Usono estas tuŝanta, fine solviĝis, ĝis tia grado, ke “la usona registaro ne kontestis” la starpunkton tenatan de la popolo de Ĉinio, “ke ĉiuj ĉinoj sur ambaŭ flankoj de la Taiwan-a markolo asertas, ke ekzistas nur unu Ĉinio kaj ke Taiwan estas parto de Ĉinio.” En 1979, je kvarono da jarcento post la Varsoviaj interparoloj, Ĉinio kaj Usono normaligis siajn interrilatojn, kondiĉe ke la lasta finu siajn diplomaciajn ligojn kun Taiwan, nuligu la Usono-Taiwanan traktaton kaj retiru usonajn

armitajn fortojn el la regiono.

Post la Bandunga Konferenco la sekvanta ĉefa paŝo de Zhou Enlai en la monda areno estis vojaĝo al dek unu landoj en Azio kaj Eŭropo en 1956 por plivastigi la diplomaciajn horizontojn de Ĉinio, vojaĝo “por serĉi amikecon, pacon kaj sciojn”. Tiam inter aliaj aferoj Ĉinio planis esplori kaj disvolvi sian petrolan industrion en granda skalo kaj tial, kien ajn li iris, li havis specialan intereson por vizito al fabrikoj kaj petrolrafinejoj kaj iliaj instalaĵoj. Li pensis, ke Ĉinio povas lerni el iliaj spertoj.

Sed lia plej longa vojaĝo en la eksterlando – rekordo por iu ajn ĉefministro en la mondo – estis farita inter decembro 1963 kaj februaro 1964, vojaĝo, kies vojplano inkluzivis vizitojn al dek kvar landoj en Azio, Afriko kaj Eŭropo. Li estis akompanata de marŝalo Chen Yi, vicĉefministro kaj ministro de eksteraj aferoj, dum tiu ĉi sepdekdu-taga rondvojaĝo. Ĝuste dum sia vojaĝo tra la afrika kontinento Zhou Enlai proklamis la Ok Principojn regantajn la ĉinan helpon al fremda landoj, enkondukante novan koncepton en internaciajn rilatojn, kio akiris tujan aprobon de landoj de la Tria Mondo pro la spirito de vera egaleco kaj neprofitemo, kiuj formis la fundamenton de tiuj ĉi principoj.<sup>17</sup>

Antaŭ ol komenci la rondvojaĝon Zhou Enlai faris ĝisfundan studadon pri la demando. Sur lia skribotablo en Zhongnanhai kuŝis ĝisdata dosiero pri la programo de la helpo de Ĉinio al aliaj landoj, plena de margenaj notoj manskribitaj de li mem. Li opiniis nepre necesa inspekti la projektojn helpatajn de Ĉinio en la de li vizitotaj landoj por vidi, kiel ili estas efektivigataj kaj kiaj problemoj postulas pluan atenton. Li komparis la help-programojn liveritajn de aliaj landoj kaj trovis, ke ili estas komunaj en tio, ke la donita helpo estas plejofte profito-motivita, kun kondiĉoj alligitaj kaj privilegioj eltruditaj,

favorantaj la helpanton en tute misa proporcio. Helpo sub tiuj ĉi kondiĉoj neeviteble pli kaj pli dependigos la helpiton de la helpanto.

Zhou Enlai havis en la menso la freŝan pasintecon de Ĉinio kaj la kolonian historion de la landoj de la Tria Mondo, kiam li konsidris la ekonomiajn rilatojn de Ĉinio kun tiuj ĉi landoj. Ĉar Ĉinio kaj ĉiuj aliaj subevoluintaj landoj antaŭe suferis ekspluatadon fare de la grandaj potencoj, li decidis, ke la helpo de Ĉinio devas esti de malsama speco, libera de iaj postsignoj de ekspluato. Sekve formiliĝis lian nun famaj gvidaj principoj: respekti strikte la suverenajn rajtojn de la helpita lando, almeti neniajn limigajn kondiĉojn, ebligi al la helpita lando fariĝi ekonomie memstara kaj evolui sen ekstera interveno, postuli ĉinajn personojn laborantajn super help-projektoj dividi feliĉon kaj suferon kaj vivi kaj labori en la samaj kondiĉoj kiel la lokaj laborantoj en similaj pozicioj. Li rigaridis la laste menciitan kiel la plej gravan, kiu estis severa postulo al helpo-laborantoj psikologie ne sufiĉe preparitaj por elteni malmildajn kondiĉojn en fremda lando.

Iafoje estiĝis interesokonfliktoj, ĉar iuj helpo-projektoj, finkonstruite, konkuros kun ĉinaj tradiciaj eksportaĵoj. Sed se iu lando esprimis sian intereson pri serĉado de helpo por konstrui unu difinitan fabrikan, kiel ekzemple teksejon, suker-rafinejon, teoplantejon, cigaredfabrikan, k.c., Zhou Enlai ĉiam penis igi sian registaron doni kiom eble tian helpon, kia estis dezirata. En tia okazo, Ĉinio ne nur helpis konstrui la entreprenon interkonsentitan, sed ankaŭ instruis kaj transdonis spertojn, ekzemple, kiel kreskigi kotonon, sukerkanon, teon kaj tabakon. Ĉar la tuta ideo de neprofitema helpo, kiel Zhou Enlai klarigis, estas ebligi al la helpita lando atingi memstarecon kaj en tekniko kaj en provizado je krudaj materialoj. Li ofte atentigis registarajn departementojn por projektoj

de ekstera helpo pri tio, ke se Ĉinio havus neniun alian intereson krom zorgi nur pri si mem, tio estus egoisma naciismo, kaj se Ĉinio arongante pretendus esti bonfaranto, tio estus grandnacia ŝovinismo. Li neniam permesis al ili forgesi tion kaj precipe la grandnacian ŝovinismon – ĉar Ĉinio, li diris, estas granda lando, kaj se registaraj oficistoj ne estas konstante antaŭgardemaj, ili inklinas teni la nazon supren antaŭ landoj ricevantaj helpon de Ĉinio.<sup>18</sup>

La helpo-projekto entreprenita de Ĉinio, kiu okupis multon el lia tempo kaj donis al li pli da kapdoloroj ol aliaj, estis la konstruado de la fervojo, kiu ligas Tanzanion kun Zambio, populare konata kiel la Tanzania aŭ Amikeca Fervojo. Kiam la plano estis unuafoje proklamita, la du landoj prezentis kontraktoproponojn al pluraj okcidentaj landoj. Ĉiuj rifuzis. Evidente ĝi ne estis afero profitodona, kaj cetere nevenkeblaj ŝajnis la malfaciloj kaj danĝeroj en la trahakado de preskaŭ nepenetreblaj ĝangaloj por meti trakojn. La du landoj sin turnis al Ĉinio esperplene, sed ne tre memfide. Ili sciis, ke ankaŭ Ĉinio ne estas riĉa lando kaj ĝi havas sian pezan fervoj-konstruan programon por plenumi. Je ilia kontentiĝo Pekino konsentis financi kaj konstrui la projektitan trunklinion.

Post ses jaroj da senĉesa penado finkonstruiĝis tiu ĉi 1 800-kilometra fervojo interliganta la internan landon Zambio kun Tanzanio sur la orienta marbordo. Kiam ĝi estis servopreta, precize dirite, en julio 1976, Zhou Enlai jam forlasis tiun ĉi mondon. Estis dece, ke la popoloj de Tanzanio kaj Zambio, celebrante la malfermon de sia fervojo al trafiko, devis fari omaĝon al la homo, kiu siatempe faris multon por helpi ilin turni revon en realon, per kelkminuta silento en tiu tago por honori lian memoron

Alia maksimumo, pri kiu Zhou Enlai konstante atentigis sian akompanantaron dum tiu

rondvojaĝo, estas ke ŝtatoj, grandaj aŭ malgrandaj, devas esti egale traktataj, kaj de ju pli malgranda estas la ŝtato, des pli granda respekto devas esti montrata al ĝi. Unu okazaĵo parolas multe por tiu ĉi principo, kiun li strikte observis tra sia tuta ĉefministreco.

Kelkajn tagojn antaŭ ol Zhou Enlai venis al Akro, la ĉefurbo de Ganao en okcidenta Afriko (lando kun ok milionoj da loĝantaro, proksimume samkvanta kiel tiu de Pekino, kaj kun areo iom pli granda ol Hebei-provinco, en kiu Pekino troviĝas), ŝtatrenverso minacis la reĝimon de d-ro Kwame Nkrumah, la prezidento. Tiam Nkrumah estis faranta la lastan preparon por bonvenigi la eminentan vizitanton el Ĉinio. En la ĉina delegacio oni proponis prokrasti aŭ forstreki la viziton pro sekurecaj konsideroj. Zhou malkonsentis. Ju pli la gastiganto trovas sin en malfacilo, li klarigis, des pli li bezonas subtenon, kaj des pli ni devas iri tien laŭ la origina plano. Li proponis al la ganaa registaro nuligi ceremoniaron, forigante la kutimajn bonvenigajn kaj adiaŭajn formalizaĵojn ĉe la flughaveno, por certigi maksimuman sekurecon de Prezidento Nkrumah. Krome, li proponis ankaŭ, ke la planitaj interparoloj, la bankedo donota en lia honoro kaj aliaj aktivecoj, ĉiuj havu lokon en la kastelo, kie la ganaa regnestro tiam loĝis. Li apenaŭ pensis pri sia propra sekureco.

Kontraste al Ganao, lia vizito al Sudano verŝis lumon sur tiun ĉi lian karakterizan trajton en malsama situacio. Kartumo proponis ke Ĉefministro Zhou Enlai kaj la gastiganto veturu en senkovrila aŭtomobilo de la flughaveno al la gastodomo, por ke popolanoj en la ĉefurbo povu havi ekvidon de sia ĉina gasto. Ĉar tiam la situacio en Sudano estis iom nestabila, la laborantoj de la ĉina delegacio malkonsentis kaj la aranĝo estis ŝanĝita. Informita pri tio, la ĉefministro riproĉis la tro skrupulajn akompanantojn kaj ordonis, ke ili aranĝu kun sudanaj oficistoj kavalkadon de la gastodomo ĝis la flughaveno

en senkovrila aŭto en la tago de foriro, por fari kompenson. Ĉu tio ĉe estis etiketo? Supraĵe, jes, sed la prenita decido signifis pli multe ol tio. Ĝi estis manifestiĝo de solidareco kun la implikita gvidanto de subpremata nacio.

Unu daŭra impresio postlasita de Zhou Enlai en la landoj, kiujn li vizitis. Estis lia facile-alirebleco. Ĉiamaniere li klopodis renkontiĝi kun ordinaraĵoj. Kiam venis adiaŭa tempo, li nepre elserĉis la ŝoforojn, la gastodomajn kaj hotelajn kuiristojn, la aeroplanajn stevarojn, kaj la civilvestitajn sekurigajn personojn por danki ilin ĉiujn, ke ili faris lian viziton agrabla kaj ĝuodona. Li faris la plej grandan surprizon al la raportistoj, kolektantaj informojn pri lia rondvojaĝo, per nekutima afableco, kian li montris al la “netuŝebluloj” dungitaj de la ĉina ambasadorejo en Nov-Delhio. Li manpremis kun ĉiu el ili, esprimante al ili simpatian kaj kompatan. Vivante plej malsupre de la socia skalo, la “netuŝebluloj” en Hindio, rigardataj kiel taŭgaj nur por la plej humiligaj okupoj, ekzemple purigado de necesejoj kaj balaado de plankoj, tradicie estas elĵetuloj, evitataj kaj repuŝataj de ĉiuj escepte de homoj interne de sia propra kasto – sistemo de ekspluato kaj subpremado anstataŭ simpla sinteno al la profesioj, kiu tenas la pariojn en sklaveco. Tretita kaj humiligita.

Inter la superaj gvidantoj de Ĉinio Zhou Enlai havis pli da rektaj rilatoj ol aliaj kun la Kremlaj gvidantoj. Li traktadis kun Stalin ĉe la komenco de la 1950-aj jaroj en Moskvo, kaj poste asertis, ke malgraŭ siaj malfortaĵoj kaj mankoj Stalin estis granda proleta revoluciulo. Li forte kontraŭstaris al la maniero, en iu la mortinta sovetunia gvidanto estis insultata de siaj postvenintoj, kaj diris al ili antaŭ ilia vizaĝo, ke iliaj politikoj devias de la ortodoksa marksismo. En iu Moskva disputo kun Nikita Ĥruŝĉov Zhou Enlai kontestis lian

patriarkan pretendon esti proparolanto de la internacia komunisma movado kaj skurgis lian krudan analizon, kiu kondamnis Stalin pro ĉiuj aferoj, kiuj fuŝiĝis en Sovetunio.

En la dua duono de 1956 du okazaĵoj danĝerogruaj skuis la de Moskvo regatan Orientan Eŭropon. Unu estis la eksplodo de manifestacioj en Poznan, Pollando, kaj la alia estis la ribelo en Budapeŝto, Hungario. Ambaŭ okazis tuj post la “ne-Stalinigo” antaŭpuŝita plu frue en februaro de Ĥruŝĉov kaj liaj kunlaborantoj. En Pollando tio estis enlanda tumulto, ĉar la Poznanaj laboristoj, malkontentaj pri la stato de la aferoj en la politikaj kaj ekonomiaj sferoj, iris sur la stratojn por elverŝi sian malkontenton, dum en Hungario tio estis malsama afero, komplikita fakte de la enmiksiĝo de malamikaj fortoj el la eksterlando. Tie protestaj manifestacioj ne nur kontraŭstaris al la aŭtoritataj instancoj, sed ankaŭ decidis renversi ilin kaj ŝiri Hungarion el la Varsovia Pakto. En ambaŭ okazoj Ĥruŝĉov konsterniĝis, movante armeojn de la Varsovia Pakto por minaci Pollandon per la uzo de forto, dum por reagi kontraŭ Hungario li sendis sovetuniajn trupojn en la landon por subpremi la ribelon, eĉ sen ia ajn vualo, ekzemple, de “invito” el la suferanta lando, kiuj signis la perforton faritan de lia postveninto Breĵnev al Ĉeĥoslovakio en 1968 kaj al Afganio dek jarojn poste.

Dum sia vizito al Moskvo en januaro 1975 por diskuti kun la sovetuniaj gvidantoj pri la situacio en la Orienta Eŭropo, Zhou Enlai skurgis ilian intervenon en polajn internajn aferojn kaj ilian svingon de granda bastono por malhelpi plenumon de iu ajn linio de politiko aŭ agado, kiu malakordis kun tiu de Kremlo.

De Moskvo li vojaĝis al Pollando kaj Hungario. En Budapeŝto, kie la pafiloj ĵus silentiĝis, spite riskojn li parolis al kunveno de aktivuloj, ĉe kiu li riproĉis la aktivulojn, ĉe



kiu li riproĉis la sovetuniajn gvidantojn pro neobservo de la principoj de naci-egaleco kaj proletara internaciismo. Tiu ĉi emocia parolo venigis larmojn al veteranaĵ hungaraj komunistoj en la okulojn.

Polemikoj pri principoj de marksismo-leninismo faris la splitiĝon inter Pekino kaj Moskvo malkaŝita en 1960. sub Ĥruŝĉov Sovetunio arogante sin tenis ne nur en rilatoj inter ŝtatoj, sed ankaŭ en rilatoj inter la du Partioj. La Ĉinio-Sovetuniaj rilatoj, kiuj pli kaj pli malboniĝis, nun atingis novan malaltecon. Ĥruŝĉov faris premon, vane esperante, ke Ĉinio timigite revenos al la sovetunia linio. Sen averto li disŝiris plurajn centojn da interkonsentoj kaj kontraktoj faritaj kun la ĉina registaro, retiris ĉiujn sovetuniajn personojn laborantajn super helpo-projektoj, kaj ĉesigis ekspedon de nepre necesaj ekipaĵoj al Ĉinio. Plie, Moskvo preme postulis, ke Pekino repagu la ŝuldojn estigitajn dum la Korea Milito.

La sovetunia gvidanto pensis, ke li jam sufokpremas la gorgon de Ĉinio, ĉar rilate agrikulturan produkton 1960 estis malbona jaro por la lando. Jam aperis nesufiĉeco de grenoj, kaŭzita parte de eraraj politikoj en la kamapro. Ĉinio ja spertis tre malfacilan tempon.

Sed Zhou Enlai, kiel ĉefo de la registaro, kaj laŭ instrukcio de Mao Zedong, respondis al la sovetunia premo per pliigo de la polemika batalo kaj organizado de la nacio en unueca penado por kompensi la damaĝojn estigitajn de Sovetunio kaj la naturo. Rezulte de tio, la cirkonstancoj komencis revigliĝi la sekvantan jaron kaj en oktobro, kiam li ĉeestis la Dudekduan Kongreson de la Sovetunia Partio en Moskvo, Ĉinio ekonomie jam trapasis la krizan momenton.

La Dudekdua Partia Kongreso, se konata per nenio alia en aparteco, estas memorata pro la blasfemoj ankoraŭfoje amasigitaj sur Stalin. La mortinta gvidanto ne nur fariĝis la objekto de insultado ĉe la kunvenoj, ankaŭ lia sarkofago estis profanita kaj formovita el la Ruĝa Placo, kun lia korpo reenterigita aliloke en senceremonia maniero. Zhou Enlai lasis al Ĥruŝĉov kaj liaj kunuloj scii, kie Ĉinio staras koncerne tiun ĉi aferon. Li gvidis la ĉinan delegacion al la Ruĝa Placo kaj metis florkronon antaŭ la maŭzoelo de Lenin. Poste li elserĉis la novan ripozlokon de Stalin kaj metis antaŭ ĝi bukedon da floroj kun surskribo – ago de spito kaj malestimo al liaj profanantoj. “Al J. V. Stalin, granda marksisto-leninisto,” ĝi diris. Tion farinte, Zhou forlasis la Sovetunian Kongreson sen atendi ĝis la fino de la tagordo kaj flugis la sia lando.

Kiam la aviadilo *La Spirito de '76* portanta la prezidenton de Usono Richard M. Nixon surteriĝis la 21-an de februaro, 1972, en la pekina flughaveno por komenci, kion Nixon priskribis ĉe la fino de sia vizito kiel “la semajnon kiu ŝanĝis la mondon”, la sepdektri-jara ĉefministro Zhou Enlai rekti staris apud la aeroplana ŝtuparo por bonvenigi la unuan usonan prezidenton, kiu metis la piedojn sur la ĉinan grundon. Senmakule pura en griza tuniko kovrita de malhelkolora palto spite la vereran februaran veteron, la malforte-aspektanta ĉefministro – kvankam ne sciata al la mondo – efektive estis tre malsana homo. Ekde 1966 li suferis de kormalfortiĝo kaj nun estis kancertrafita. La perfidemaj ombroj, kiuj vualis la afablan kaj vigan vizaĝon, evidentigi lian malbonan farton.

Sed en la semajno de la 21-a ĝis la 28-a de februaro, 1972, li estis okupata je sinsekvaj interparoloj kaj traktadoj kun la usona prezidento, montrante nenian signojn de

laceco eĉ kiam li akompanis Nixon kaj lian edzinon al societaj kunvenoj vespere. Nixon rimarkis, ke lia interparolanto prenas iajn pilolojn dum iliaj kvarhoraj kunsidoj, kaj pensis, ke ili estas kontraŭ alta sangpremo. Sed la malsano de Zhou estis multe pli serioza. Pli frue ĉe iu kunveno, laŭ *Memoraĵoj de Nixon*, kiam la ĉina ĉefministro esprimis la esperon, ke la prezidento kaj lia konsilisto de Nacia Sekureco restos en ofico, li sugestis, ke li mem oble ne estos sur la scenejo. “Ekzemple, se mi mortos de atako de kormalsano, vi devos traktadi kun malsama anstataŭanto.” Li diris ne hipoteze, sed la puran veron, kaj nur duonon de la vero. La morto, fortenuata de energia volforto, krom de medicina kuracado, estis for de li je malpli ol kvar jaroj.<sup>19</sup>

Intertempe li plu persistis, same firme sur la gvida posteno kiel antaŭe, unue en sia Zhongnanhai-a oficejo kaj, kiam ne plu eblis esti tie, en malsanula lito. Kiel kunarkitekto de Mao Zedong por la nova alproksimiĝo al Usono, li donis sian tutan atenton al la vizito de Nixon, entreprenante traktadi en la nomo de sia lando pri aferoj grandaj kaj malgrandaj kaj harmoniigi la aktivecojn, kiuj kulminis per la subskribo de la fama Ŝanhaja Komunikaĵo en la lasta tago de la prezidento en Ĉinio.

Subskribita en la 28-a de februaro 1972, la Kuna Komunikaĵo estas unika dokumento en la analoj de internaciaj aferoj, la rezulto de longa kaj intensa traktad-procezo kun reciprokaj cedoj. Ĝi estas unika, ĉar, malsama de ordinaraj internaciaj interkonsentoj, kiuj uzas banalaĵojn por maski diferencojn, kiuj ne povas esti forigitaj en la procezo de traktado, tiu ĉi kuna komunikaĵo listigas kaj klarigas kaj la diferencajn kaj la samajn opiniojn de la du landoj. La disputoj kaj diferencoj estas samforme antaŭanoncitaj per la formulo, “la usona flanko asertis” aŭ “la ĉina flanko asertis”, per kiu ĉiu partio al la

komunikaĵo atentigas pri lokoj, kie ne troviĝas sama opinio.

Ĉio ĉi tio rememorigas pri unu el la politikoj, kiun Zhou Enlai adoptis en 1955 en la indonezia urbo Bandungo – serĉi saman opinion kaj flankenmeti diferencojn. Kio faris Bandungon malsama de Ŝanhajo estas, ke dum la diferencoj en Bandungo estis nemenciitaj en la Afriko-Azia Interkonsento de Dek Principoj, la Ŝanhaja Komunikaĵo detale katalogas kaj klarigas la malakordajn punktojn. Tio estis refoja montrigo de la diplomata talento de Zhou Enlai.

En neakordigebla antagonisma stato dum du jardekoj, la Ĉina Popola Respubliko kaj Usono senĉese interŝanĝis venenajn insultojn ekde la Korea Milito en la fruaj 1950-aj jaroj. Dum la Popola Respubliko estis insultata kiel internacia “krimulo” aŭ “proskribito” en la usonaj novaĵ-komunikiloj, Usono estis titolita kiel “arkiimperio” en la ĉina gazetaro. Kaj tial, antaŭ ol tiu historia manpremo inter la usona prezidento kaj la ĉina ĉefministro ĉe la tagmezo de la 21-a de februaro 1972 povis fandi la tutan rigidecon kaj sterilecon de la malamikaj jaroj, ambaŭ flankoj de la Pacifiko devis fari multon por forigi la malamikecon akumulitan dum la jaroj kaj klarigi al la popolo la bezonon transturni unu novn paĝon en la rilatoj inter Ĉinio kaj Usono.

Siaflanke Nixon insistis pri la graveco establi dialogon kun la gvidantoj en Pekino kaj esprimis la esperon “fini la izolitecon de la ĉina ĉeftero for de la monda komunumo”.

Pere de Edgar Snow, la usona verkisto, Mao Zedong pli frue sendis unu publikan kaj klaran signalon sugestantan, ke Ridhard Nixon, se li tiel deziras, estos bonvena viziti Ĉinion aŭ kiel prezidento aŭ kiel privata turisto.<sup>20</sup>

La Ŝtata Konsilantaro sub Zhou Enlai kaptis la okazon informi ĉiujn sektorojn de la

popolo pri la ŝanĝiĝintaj faktoroj en la internacia situacio, kiu postulis esploron pri nova rimedo venigi Ĉinion sur la vojon de rekontaktiĝo kun Usono. Raportoj portantaj esencajn informojn pri Usono estis komunikitaj al la popolo per registaraj kanaloj ĉe ĉiuj niveloj, kune kun klarigoj rilate al tio, kial prezidento Nixon, ĝis nun severe insultita en la ĉina gazetaro, estis invitita al Ĉinio kiel gasto de la registaro, ĉar estus malfacile por la ordinaraj popolanoj, se ne antaŭe preparitaj gluti la ofendon vidi la “arkiimperiston” bankedanta en la Popola Halo.

Vere, dum sufiĉe longa tempo antaŭ la efektiviĝo de la Ĉinio-Usona reproksimiĝo, la triangula interrilato de Ĉinio, Sovetunio kaj Usono trapasis iajn ŝanĝiĝojn. Kolektante milionon da malamikemaj armeanoj sur siajn landlimojn tuŝantajn Ĉinion, Sovetunio jam kondukis la streĉitajn rilatojn inter la du landoj al rompopunkto. La tiamaj cirkonstancoj ebligis ŝanĝigon de kolizio al interakordiĝo en la ĉina rilato kun Usono. Do estis ne tro malfacile ĉirkaŭiri la angulon. Unu tipa ĉina esprimo ofte uzata en tiu tempo estis *ĝŭan ŭanzi*, laŭlitere, ĉirkaŭiri angulon, alivorte, sekvi novan kurson.

Se de la komenco la akcepto donita al la usonaj vizitantoj estis moderigita – nur ĝentila kaj deca, tion oni jam atendis. Dudek jaroj da malamikeco ne povis aliiĝi dum unu nokto. Cetere, la du landoj, tiam sen diplomaciaj rilatoj, ankoraŭ ne oficiale rekonis unu la alian. Sed la neatendita intervidiĝo de Mao Zedong kun la usona prezidento, kiu okazis kelkajn horojn post ties alveno, estis certa signo, ke la gastigantoj estas pretaj doni varman bonvenigon. La novaĵo-raportado pri la unua tagnokto de Nixon en Pekino kaj la paĝaranĝo de *Popola Tagĵurnalo*, la organo de la Partio, kun ses fotografiaĵoj en la sekvanta mateno, montris ke la akcepto estas pli amika ol oni komence antaŭvidis. Zhou

Enlai ankaŭ zorgis pri tio, ke iompostioma plivarmiĝo okazu en oportunaj momentoj por esprimi tiajn sentojn. Tio venis en la tria vespero de la vizito de Nixon. Zhou Enlai akompanis ilin spekti tablotenisan kaj gimnastikan prezentadon en nove konstruita stadiono. Tie la maksimume multa spektantaro de tempo al tempo eksplodis per aplaŭdo, ofte en regula ritmo, kiel multe por aklami la ludadon, tiel por esprimi bonvenigon al la honoraj gastoj de la ĉefministro. En la okuloj de la spektantoj, ja alvenis la unua oficiala usona senditaro.

Zhou Enlai faris sian plejblon por igi siajn gastojn senti sin hejme. La traktadoj kun Nixon havis lokon alterne en la Popola Halo kaj en la gastodomo en Diaoyutai (la Fiŝkapta Teraso), kie la usona prezidento estis loĝigita. Tiaj aranĝoj donis al la eminenta vizitanto tian senton, kvazaŭ li restus en oficiala rezidejo anstataŭ en gastodomo, por aranĝi la traktadojn kiel gastiganto. Certe prezidento Nixon devis tion senti, kiam li staris ĉe la pordo de sia “oficiala rezidejo” por saluti ĉefministron Zhou Enlai kaj liajn kamaradojn, venantajn por fari oficialajn aferojn.

Kiel supre dirite, Zhou Enlai ĉiam klopodis por certigi, ke neniu el liaj gastoj havos kaŭzon por plendi pri “malzorgiteco”. Sekretario de Ŝtato William P. Rogers ne estis inkluzivita en la usona partio, kiam ĝi intervidiĝis kun Mao Zedong, kaj estis konsilisto de Nacia Sekureco Henry Kissinger, kiu sidis apud la prezidento ĉe la gravaj interparoloj. Preskaŭ ĉe la fino de la vizito, la ĉefministro faris specialan viziton al s-ro Rogers. Tio estis kortuŝa ago; jen la plej admirinda

Trajto de Zhou Enlai – la perfekta diplomato.

## **Notoj:**

1. La diplomata kariero de Zhou Enlai, rilate la kontakton kun alilandanoj, povas esti retrospurata al lia unua renkontiĝo kun la usona verkisto Edgar Snow sur la Shaanxi-provinca fronto en la somero de 1936 (“La Vojo al la Ruĝa Ĉefurbo” en *Ruĝa Stelo Super Ĉinio*). Aŭ ankoraŭ pli frue ĝis la 1920-aj jaroj, kiam li havis rilatojn kun reprezentantoj de la Komunista Internacio senditaj el Moskvo, inkluzive de Mikhail Markvich Borodin kaj B. Lominadze.

2. James Bertram poste intervjuis Mao Zedong pri la rolo de la komunista Partio de Ĉinio kaj la kontraŭjapana Rezistmilito. “Interparolo kun la Brita Ĵurnalisto James Bertram” en *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, Esp. eld. Vol. II, p. 47.

3. La 20-an de septembro 1984 la Smedley-Strong-Snow-a Societo de Ĉinio (mallongige SSS-societo) fondiĝis en Pekino por omaĝi al tiuj ĉi fidelaj amikoj de la ĉina popolo pro iliaj grandaj kontribuoj al ĵurnalismo, precipe ilia senantaŭjuĝa, verdira raportado pri la batalado inter Kuomintango kaj la komunistoj. La societo publikigis unu libron por memorigi la centan naskiĝa datrevenon de Anna Louise Strong kaj la naskiĝtagojn de ŝiaj du samlandanoj en 1985.

4. Fama kirurgo, kiu iam servis kontraŭ la faŝistoj en la Hispana Interna Milito, Norman Bethune venis en Ĉinion en la printempo de 1938 kiel la ĉefo de medicina taĉmento. Li mortis de sangveneniĝo la 12-an de novembro 1939 en norda Ĉinio dum operaciado al vunditaj soldatoj. “Memore al Norman Bethune” en *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, Esp. eld. Vol. II, p. 327.

5. D.S. Kotni, la juna kirurgo el la Hindia Medicina Helpgrupo al Ĉinio, renkontiĝis kun Zhou Enlai jam antaŭ alveno en Yan’an kaj helpis kuraci la elartikigitan kubuton de Zhou Enlai. Li laboris dum la plejparto de la tempo en la Internacia Paca Hospitalo de Norman Bethune en Shanxi-Chahar-Hebei-a Milita Regiono, kies direktoro li fariĝis en januaro 1941. Li edziĝis al ĉina virino, sia koleginino, kaj aliĝis al KPĈ. Malsana je epilepsio, li mortis de severaj konvulsioj sur sia posteno la 9-an de decembro 1942. La dumonata gazeto *Renwu (Personoj)*, 1982, n-ro 6, Pekino.

6. “Rememoraĵoj pri la Diplomatiaj Bataloj de Zhou Enlai antaŭ la Liberiĝo de Ĉinio” en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. II, p. 97.

7. Chen Yi transprenis de Zhou Enlai la oficon de Ministro de eksteraj aferoj tuj post la Oka Kongreso de la Partio okazigita en septembro 1956.

8. Richard Nixon estis impresita de “la inteligenteco kaj energipleneco” de Zhou Enlai, kiu estis, kun “la kombino de eleganteco kaj harditeco, tre neordinara homo en la mondo nuntempa” (*La Memoraĵoj de Richard Nixon*, Vol. II, p. 49 kaj p. 10). Lia konsilisto pri Nacia Sekureco (poste sekretario de Ŝtato) Henry Kissinger trovis Zhou “unu el la du aux tri plej impresaj homoj”, kiujn li iam renkontis. Jen citaĵo el Kissinger: “Ĝentila, senfine pacienca, eksterordinare inteligenta, subtila, li dum nia tuta diskutado penetris kun facila gracieco la esencon de nia nova interrilato, kvazaŭ sin trovus nenia prudenta alternativo.” (*Jaroj en la Blanka Domo*, p. 745).

9. La ĉina esprimo uzata ĉi tie estas ling-ĉji-lu-zaŭ, kiu laŭvorte signifas konstrui novan kuirejon – laŭsence, fari novan komencon. *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, Vol. II, p. 85.

10. La Ĝeneva Konferenco okazigita dum la 26-a de aprilo – la 21-a de julio 1954 decidis nenion pri la korea demando, sed ĝi atingis interkonsenton pri militpaŭzo en Hindoĉinio. Samlibre, p. 146, 236, kaj 274.

11. Talleyrand-Perigord (1754-1838): Franca fama ŝtatisto kaj diplomato. – Trad.

12. *La Memoraĵoj de Richard Nixon*, Vol. II, p. 26. Jaroj en la Blanka Domo, p. 724.

13. Citinda en detalo estas la diro de Zhou Enlai pri la rilato inter “ludantoj kaj la teamo”: “Persisi ĉe la team-spirito, kaj batali kontraŭ memestimo. Laboro en eksteraj aferoj estas farata en la nomo de la

lando, kaj la kolektivo devas esti ĉiam tenata en la koro; se iu estas instigata de privataj konsideroj, tio povas konduki al tre seriozaj malagrabloj. Estas la triumfo de Maozedong-penso kaj la penadoj de la popolo, kiuj gajnis al ni laŭroj devas aparteni al la lando. Servo al privataj celoj ne estgas permesata en plenumado de devoj en la sfero de eksteraj aferoj. Ne ĝoju, kiam aliaj vin alŭdas, ĉar, kia ajn honoro venas al vi, devas esti rigardata kiel apartenanta al la popolo. Se aliaj mallaŭdas vin, tiam ekzameni vian laboron kaj vidu, ĉu vere estas io malbona; por diri mallonge, metu vin en la teamon.” El “Niaj Ekstera Politiko kaj Taskoj” en *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, vol. II, p. 91.

14. “Parolado al la Afriko-Azia Konferenco”, samlibre, p. 148.

15. “Qian Xuesen en Usono” skribita de Wen Xiang, la dumonata gazeto *Renwu (Personoj)*, 1982, n-ro 6, p. 20, Pekino.

16. “Aldona Parolado”, *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, Vol. II, p. 153.

17. “Lernu de Ĉefministro Zhou Enlai kaj Efektivigu la Revolucian Linion en Ekstera Politiko” en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. I, p. 157.

18. “Granda Ĉampiono de Internaciismo” skribita de la Studgrupo de Ministrejo de Eksteraj Aferoj en *La Amata Ĉefministro de la Poplo*, p. 163.

19. *La Memoraĵoj de Richard Nixon*, vol. II, p. 50.

20. “Lernu de Ĉefministro Zhou Enlai kaj Efektivigu la Revolucian Linion en Ekstera Politiko” en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. I, p. 170. “Konversacio kun Mao Zedong” skribita de Edgar Snow, *Life*, la 30-a de aprilo 1971.



# ĈAPITRO VIII

## Ne Dioj, Sed Homoj

Ĉe la suda fino de Tian'anmen-placo inter la Popola Halo kaj la Muzeo de la Ĉina Revolucio staras la Monumento al la Popolaj Herooj. Ĝia surskribo tekstas:

*Eterna gloro al la popolaj herooj, kiuj oferis sian vivon en la lastaj tri jaroj por la Popla Liberiga Milito kaj la Popla Revolucio!*

*Eterna gloro al la popolaj herooj, kiuj oferis sian vivon en la lastaj tridek jaroj por la Popola Liberiga Milito kaj la Popola Revolucio!*

*Eterna gloro al la popolaj herooj, kiuj oferis sian vivon en la periodo de 1840 ĝis tiu ĉi dato por batali kontraŭ la internaj kaj eksteraj malamikoj kaj lukti por akiri nacian sendependecon, liberecon kaj bonstaton por la popolo!*

*Inaŭgurita de la Unua Plena kunsido de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco*

*La 30-an de septembro 1949*

La konstruado de la monumento komenciĝis ĝuste en la antaŭtago de la proklamo de la naskiĝo de la Popola Respubliko fare de Mao Zedong sur la turo de Tian'anmen-pordego. Kiam Zhou Enlai prenis la mikrofonon por alparoli la ĉeestantajn altrangulojn, Mao Zedong staris apude, flankita de Soong Ching Ling kaj marŝalo Zhu De. Tiu ĉi solena ceremonio signis la finon de unu epoko kaj la komencon de epoko nova, en

kiu Mao kaj Zhou estis tandeme laborontaj por kvarono da jarcento. La Monumento al la Popolaj Herooj simbolis tiun ĉi kunlaboradon. Mao estis la aŭtoro de la surskribo de la monumento, kaj Zhou la kaligrafo, kiu donis al ĝi eternan formon.

La interrilato de la du homoj efektive datiĝas de la mezo de la 1920-aj jaroj en Guangzhou (Kantono) kiam la Komunista Partio kunlaboris kun Kuomintango en la farado de la Norden-ekspedicio por liberigi Ĉinion el la militarista reĝimo en Pekino. Sed nur kelkajn monatojn post la komenciĝo de la Longa Marŝado en malfrua aŭtuno de 1934, kiam la Ruĝa Armeo estis devigita forlasi sian bazlokon en Jiangxi por moviĝis norden, la sigelo estis metita sur ilian daŭran kunlaboradon.

Unu plivastigita kunveno de la Politika Buroo estis kunvokita en januaro 1935 en la malgranda urbo Zunyi en Guizhou-provinco por taksu pasintajn erarojn kaj konsideri la estontecon. Wang Jiaxiang (1906-1974), supera gvidanto de la Partio kaj direktoro de la Ĝenerala Politika Departemento, insistis pri eksigo de Qi Ganĝian (1907-1946), alinomata Bo Gu, kaj Li De (1900-1974), la germano Otto Braŭn, kiu reprezentis la Komunistan Internacion en la Ĉina Soveta Regiono, el la milita komandanteco kaj la ĝenerala gvidanteco. Zhou Enlai, kiu estis parte – kvankam ne ĉefe – respondeca pri la malvenkoj suferitaj ĝis tiam en la militaj sferoj, konsentis kun Wang kaj uzis sian konsiderindan influon kaj prestiĝon por subteni Mao Zedong, kiu leviĝis el la varma debato kaj fariĝis nova gvidanto de la Partio.<sup>1</sup>

En la 1920-aj jaroj kaj fruaj 1930-aj jaroj Zhou Enlai estis pli grava en la Partio kaj pli vaste konata komunisto ol Mao Zedong. Sed de sia longa spertado de batalo kontraŭ Ĉjang Kajŝek, precipe en la kampanjoj por defendi la bazregionojn kontraŭ la tutforta

provado de Ĉjang por ilin detruĵi, Zhou Enlai venis al la konstato, ke la imagoplena formulo de Mao Zedong – organizi la kamparon por meti sieĝon al la urbaj centroj – estas ĝuste la solvo por revigligi la revolucion. Li venis ankaŭ al la kredo, ke Mao Zedong estas tia homo, kiu povos elkonduki la Ruĝan Armeon el la marasmo kaj rebonigi la situacion. Li estis konvinkita pri la esceptaj kapabloj de Mao kaj estis tute preta sekvi Mao kaj ludi duan violonon. Ekde 1935, kun energia subteno de Zhou, plus la sindonaj penadoj de pluraj dekoj da provitaj kamaradoj, Mao gvidis la ĉinan revolucion al venko.

Zhou Enlai kaj Mao Zedong devenis el tre diferencaj fonoj, kvankam ambaŭ estis sudlandanoj – t.e., homoj venintaj el sude de Yangzi-rivero. La plej aĝa filo de mandarena familio, kiu jam falis en malprosperon en la tempo de lia naskiĝo, Zhou Enlai rigardis Shaoxing en Zhejiang-provinco kiel sian prapatran hejmurbon. Li studis en mezlernejo financata de usonaj misiistoj en Tianjin kaj poste iris eksterlanden, unue al Japanio kaj poste al Francio kaj Germanio, kie li akceptis marksismon kun fervoro. Sekve en sia frua aĝo Zhou Enlai jam estis elmetita al alilandaj kaj okcidentaj influoj.

En kontrasto, Mao Zedong, naskita al kamparana familio pli-ol-mezriĉa en Hunan-provinco, kiu estas abunda je grenaj rikoltoj, pli bone konis la kamparon ol la urbon. Li konis la teron kaj ĝian valoron jam de sia knabaĝo. Plej multaj hunananoj havas inklinon al varmegaj kapsikoj, ju pli pikantaj, des pli bonaj, kaj Mao ne estas escepto. Kiel knabo li devis helpi sian patron sur la kampoj kaj provis studi sporade sub olelampo en la hejmo; nur post paso de multaj jaroj li komencis viziti regulan lernejon en Changsha, la provinca ĉefurbo, kaj poste iris al la Pekina Universitato, kie la fariĝis asistanto en la bibliotiko. Lia formala edukiteco estis iom nekompleta. Kiel avida leganto, Mao Zedong

estis vaste memedukita. En sia junceo li neniam veturis eksterlanden, kaj ĉio, kion li sciis pri la ekstera mondo, venis el legado pri ĝi en ĵurnaloj kaj gazetoj – unue en publika biblioteko de Changsha kaj poste en la biblioteko de la Pekina Universitato<sup>2</sup> – sufiĉe diference de Zhou Enlai, kiu havis rektajn personajn kontakton kaj sperton.

Mao fariĝis brila politika kaj milita strategiisto malgraŭ la limigiteco de sia sciofonto, kiun liaj helpantoj povis kovri per tio, kion ili trovis en ĵurnaloj kaj gazetoj haveblaj ĉe poŝtoficejo de malproksimaj urboj dum la milito kontraŭ Ĉjang Kajŝek. Ekde la tempo de la Longa Marŝado tra la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito, lia kompreno pri la tuta situacio en Ĉinio kaj popola sento estis decidiga por la fina venko de la revolucio. Li estis gvidanto, kiun homoj sekvis tre volonte, kapabla klarigi malsimplajn ideojn al ordinarajn popolanojn en lingvo al ili facile komprenebla.

Zhou Enlai sciis la anglan kaj francan lingvojn kaj iom konis la japanan kaj germanan de siaj studentaj jaroj en la eksterlando, dum Mao Zedong, kiu lernis sian abocon en la angla lingvo kiel mezlernejano en Changsha, renovigis sian intereson por la lingvo nur tiam, kiam kiel gvidanto de la lando li estis devigita intervidiĝi kun eksterlandaj vizitantoj kaj pensis, ke iom da scio pri la angla lingvo estos utila. Li persistis en sia lernado de la angla lingvo ĝis sia maljunaĝo, kaj eĉ dum la “kultura revolucio”, kun la helpo de instruisto, ĉar li pensis, ke tiel li povos legi iujn filozofiajn traktaĵojn en la originalo.

Unu afero, kiun ili komune dividis en sia frua kariero, estis ĵurnalisma sperto, ĉar ambaŭ siatempe estis unuaklasaj verkistoj. Post la liberiĝo de Ĉinio, dum Mao daŭrigis de tempo al tempo skribi por Popola Tagĵurnalo, la organo de la Partio, Zhou Enlai ludis la ĵurnalistan rolon plejparte en redaktora ofico. Kiam Popola Tagĵurnalo aperigis ion gravan,

precipe ĉefartikolon pri ekstera politiko, plejofte estis Zhou Enlai, kiu jesigis la paĝajn presprovaĵojn, ekzamenante la titolojn kaj eĉ la paĝaranton. Ifoje lia interparolo kun fremdlanda korespondanto devis esti interrompita, ke li povu doni al la paĝoj la lastan pririgardon antaŭ la templimo de la presado en la plej fruaj horoj de la mateno. Preskaŭ ĉiuj intervjuoj kun la ĉefministro okazis post noktiĝo, ĉar labori nokte estis kutimo de Zhou kaj ankaŭ de Mao. La kutimo formiĝis en gerilaj tagoj, kiam la gvidantoj de la Partio estis okupitaj je kondukado de la milito dum la tago kaj faris sian skriban laboron dum la nokto. En la lastaj jaroj de la “kultura revolucio” la malbona sanstato kaj enhospitaliĝo devigis Zhou Enlai rezigni multon el sia kontrolo rolo, kaj Jiang Qing kaj ŝiaj komplicoj komencis uzi la propagandilojn por siaj propraj celoj.

Neniu duopo da homoj dividantaj la plej altan potencon povis esti tiel diferenca inter si en temperamento kiel Mao Zedong kaj Zhou Enlai. Kun nur kvin jaroj apartigantaj ilin en aĝo, ili estis de la sama generacio, sed edukoj en malsamaj medioj donis al ili malsamajn trajtojn. Kie Mao estis decidema kaj fortavola, Zhou estis singarda kaj akordiĝema. Kie Mao estis senafekta kaj krudhonesto, Zhou estis ĝentila kaj subtila. Kie Mao estis sprita kaj inklinita fari ŝercon por pruvi sian tezon, Zhou estis pli faktema kaj kutimis orde prezenti siajn pensojn kaj argumentojn por klarigi siajn opiniojn. Mao emis agi sen antaŭa konsidero – kiel en la iniciato de la Granda Antaŭensalto en aŭgusto 1958 – dum la modera Zhou konstante konsultis sian singardemon kaj zorge pasadis la “por” kaj “kontraŭ” antaŭ ol ekagi.

Ambaŭ kredis pri kaj agis laŭ la amaslinio, kiu en marksisma terminologio signifas intime kontaktiĝi kun la popolo por koni ĝiajn opiniojn. Ili malaprobis *jijantang*, aŭ

unu-homan decidadon. Mao kaj Zhou ambaŭ praktikis kaj ankaŭ predikis la amaslinion kun granda sukceso en la jaroj antaŭ la Ligeriĝo, sed Mao fine inklinis ĝin forgesi, des pli kiam lia prestiĝo altiĝis, kaj li preferis siajn proprajn opiniojn al kolektivaj opiniojn kaj tial lasis la personkulturon disvolviĝi ĉirkaŭ si malgraŭ sia buŝa opono kontraŭ ĝia praktikado. Li foj-foje falis en *jijantang* en siaj lastaj jaroj, longe antaŭ la “kultura revolucio”, kiu estis ĝuste ĝia rezulto. *Jijantang*, kiu trovas kritikon netolerebla kaj estas surda al raciaj voĉoj, estas tia laborstilo kaj agmaniero, kiu mordtas la politikan korpon. T troviĝas fekunda grundo por ĝia kresko eĉ en la socialisma Ĉinio, ĉar ĝi havas la saman naturon kiel familiesteco – patriarka regmaniero, kiu ekzistas jam milojn da jaroj en Ĉinio kiel parto de ĝia kulturo. Kunligita kun la popola sincera admiro kaj heroo-adoro al Mao pro liaj efektivaj atingoj – kiuj faris lin malmodesta – tio ĉi plimalbonigis la aferon. En tio ĉi kuŝis la fonto de multaj malbonoj de Ĉinio dum la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj.

En siaj pli malfruaj jaroj Mao ĝuis la amikecon kun konservativuloj de sia propra generacio. Li kalkulis kiel siajn personajn amikojn tiajn eminentulojn starantajn ekstreme dekstre de la politika spektro, kia la Kuomintanga generalo Zhang Zhizhong (1890-1969), kiu reprezentis Ĉjang Kajŝek en la paca traktado kun la komunistoj en 1949 kaj decidis resti ĉe siaj gastigantoj, kiam la traktado rompiĝis. En sia duvoluma Memoraĵoj, publikigita postmorte en 1985, Zhang Zhizhong faris interesan mencion pri sia deziro aliĝi al KPĈ en 1925, kiam li estis kolego de Zhou Enlai en Huangpu-militakademio. Li sin turnis al Zhou, kiu esprimis sian altan takson, sed diris, ke la afero devas esti prezentita al la Partia organizaĵo. Ĉar tie ekzistis tia konkordo inter la du partioj, ke ne konvenis al KPĈ varbi al si altrangajn KMT-oficirojn, la peto devis esti flankenmetita. Sed en la jaroj de post

la fondiĝo de la Popola Respubliko en 1949 la antaŭa KMT-generalo estis ĉiam respektata kiel socie eminenta atltrangulo, kies amikeco estis alte taksata kaj kulturata de Mao kaj aliaj partiaj gvidantoj.

Zhou Enlai, kiel prezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, la organizaĵo de la unuecfrento, amikiĝis kun homoj de ĉiaj fonoj kaj aĝoj. Li tiom ŝatis lerni de instruituloj kun diversaj specialecoj, kiom li ĝuis la amikiĝon kun homoj en la mondo de artoj, sportoj kaj muzikoj. Estas malfacile imagi, ke Mao klopodis, kiel Zhou faris, amikiĝi kun Kimiyo Matsuzaki, la japana tablotenisa ludantino.

Mao havis siajn firmajn preferojn kaj neniel kaŝis siajn ŝatojn kaj malŝatojn. El la membroj de la Politika Buroo, kiuj forpasis dum la 1970-aj jaroj, Mao persone ĉeestis nur la funebran solenon en januaro 1972 por Marŝalo Chen Yi, kun kiu li ofte interŝanĝis opiniojn kaj leterojn pri la verkado de ĉina klasika poezio.<sup>3</sup> Chen Yi estis multe ofendata en la “kultura revolucio” malgraŭ la daŭraj penadoj de Zhou Enlai por lin protekti, kaj eble el ia pentema sento la prezidanto faris la nekutiman agon por persone esprimi siajn lastajn respektojn.

En unu el siaj pensemaj, malkaŝemaj momentoj Mao priskribis sian personecon kiel tigranj-simian – du trionoj da tigrecio kaj unu triono da simieco. Tio ĉi estis en la letero datita la 8-an de julio 1966, ksendita el Wuhan al lia edzino Jiang Qing ĉe la komenco de la “kultura revolucio”. La letero estis cirkuligita inter oficistoj kaj membroj de la Partio post la morto de Lin Biao, sed la kialo ne estis klarigita. Inter aliaj aferoj ĝi traktis la monomanion de Linj Biao al studado de ŝtatrenversoj, en Ĉinio kaj aliaj landoj, kaj lian ekscesan entuziasmon, kun kiu li gloraltigis Mao Zedong ĝis la ĉielo.

La taksado de Mao pri sia propra personeco kiel hibrido de tigro kaj simio estis interesa diagnozo. La tigro estas nature forta, maltrankvila, kaj ĉiam atakema, dum la simio estas ludema, lerta, kaj ĉiam preta submeti sin al risko, laŭ la ĉina folkloro. La tigro kaj la simio ambaŭ estas popularaj ĉe la ĉina popolo.

En la historio de la moderna Ĉinio la provo de forto inter la Komunista Partio kaj Kuomintango kelkfoje ŝajnis senespere neegala por la antaŭa – kiam malvenko evidente ŝajnis la sola, neevitebla rezulto. Estis la tigra sentimeco kaj la simia riskemo en Mao Zedong, kiuj helpis al li kaj liaj kamaradoj venki la timinde fortan malamikon. En 1927, post kiam Kuomintango komencis severan atakon al la komunistoj tra la tuta lando, estis Mao Zedong, kiu donis la kuraĝan ideon mobilizi la kamparanojn kaj fari armitan batalon unue en la kamparo anstataŭ apogi sin plu sur la facile frakasitaj urbaj ribeloj, kiujn la plejparto de la komunistaj gvidantoj ankoraŭ preferis. Estis liaj kuraĝaj kaj lertmanovraj strategioj dum la Longa Marŝado de 1934-35, kiuj savis la fortojn de la ruĝa Armeo kaj turnis tion, kio komenciĝis kiel retiriĝo, en heroecan epopeon, kiu skuis la mondon. La decido en 1946 doni pezan baton al la armeoj de Ĉjang Kajŝek, kiuj estis treege superaj al la fortoj gvidataj de la komunistoj en ekipiteco kaj nombro, kestis alia kuraĝa, sed zorge planita paŝo.

Post la tutlanda venko la plej grava ekzemplo estis kompreneble la decido sendi la Ĉinajn Popolajn Volontulojn al Koreio en 1950 por batali kontraŭ la usona milita maŝino. Tio estis decido, kiu pendis sur fadeneto. Tuj post la pli ol du jardekoj da enlanda malpaco, militi kontraŭ superpotenco devis ŝajni al iuj frenezaĵo. Nur la maltrankvileco de Mao Zedong, kiu pruviĝis prava foje-refoje dum la antaŭaj jaroj, konvinkis liajn kolegojn en la Politika



Buroo kaj registaro pri la akceptindaco de la decido.

Post kiam la milito en Koreio finiĝis per armistico, kaj post kiam li dividis kun siaj kamaradoj la triumfon efektiviĝi la refloradon de la ekonomio en mallonga tempodaŭro de jaroj, sukceso kapturigis Mao. Li komencis ignori iujn el la pli gravaj el siaj principoj, kiuj antaŭe gvidis la Ĉinan Revolucion laŭ la vojo al venko.

Unu el la unuaj, kiuj povis legi tiujn ĉi danĝersignalojn kaj penis sonigi averton, kvankam en nerekte maniero, estis Tian Jiaying (1922-1966), propra sekretario de Mao, kiu reviziis la manuskriptojn kaj redaktis piednotojn por la unuaj kvarvolumoj de *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*.<sup>4</sup>

Plumpa, mezastatura, kaj senlace konversaciema kiel plej multaj sichuananoj, Tian Jiaying estis orfiĝinta kaj elkreskis en Chengdu, la provinca ĉefurbo. Lia familio estis malriĉa, kaj de infaneco Jiaying bone konis la krudan flankon de la vivo, servante kiel metilernanto en apoteko de tradiciaj ĉinaj kuracherboj. Meminstruita, en la dekkvinjara aĝo li jam bone konis la klasikajn verkojn kaj povis verki poeziaĵojn en la klasika stilo. En la aĝo de malpli ol dudek jaroj li ĵetis sin en politikajn aktivecojn organizitajn de la subtera Komunista Partio en Chengdu, kaj dum la Kontraŭjapana Rezistmilito li iris al Yan'an, tiam magneto por ĉiuj revoluciemaj junuloj.

En 1948 li estis elektita por anstataŭi Hu Qiaomu kiel konfidenca sekretario de Mao Zedong. Dum la jaroj de Yan'an ĝis Pekino, Tian servis kiel la okuloj kaj oreloj de la prezidanto, irante profunde en la kamparajn regionojn por esplori kondiĉojn ĉe la ordinaraj popolanoj krom fari siajn sekretariajn taskojn. Kiam Mao starigis siajn oficejon kaj hejmon en Zhongnanhai poste la liberiĝo de Pekino en 1949, ankaŭ Tian transloĝiĝis tien,

por esti tuj disponebla al Mao en iu ajn tempo.

Zhongnanhai estis loĝata de superaj personoj de la Partio kaj registaro. Neeviteble ĝi estis ĉasejo por tiuj, kiuj penis plaĉi al personoj en potenco. Tian Jiaying malamis tiajn homojn, precipe Chen Boda kaj Jiang Qing, kiuj naŭzis lin. Kompare kun la altrangaj loĝantoj en tiuj ĉi klostrecaj loĝejoj, Tian estis nur meznivela funkciulo, ne privilegiita; li estis permesita loĝi kaj labori en Zhongnanhai nur pro tio, ke li estis sekretario de Mao. Li havis amikojn ekster la muroj de Zhongnanhai. Iu aparte intima al li estis Li Rui, kiu laboris ĉe la departemento de povo kaj energio sed ankaŭ de tempo al tempo skribis ion por gazetaro. Ili jam bone konis unu la alian dum la tagoj en Yan'an kaj subtenis inter si firman amikecon. En la lulilo de la Ĉina Revolucio ili estis instruitaj esti honestaj kiel al si mem, tiel ankaŭ al aliaj, kaj malestimi la naŭzajn personojn, kiuj karieradas per observado de la politika barometro. Ili estis instruitaj respekti la veron kaj ne malfermi sian buŝon, se ili ne estis certaj pri la fakto; sed se ili sentis, ke ili estas pravaj, ili devis malkaŝe paroli. Tio estis la tradicio, kiun Tian Jiaying kaj Li Rui dividise, kiam ili estis kune kaj parolis pri malnovaj tempoj kaj la problemoj, kiuj ĉagrenis ilin en la politika tereno de post la veno en Pekinon.

Chen Boda, Tian diris al Li Rui, ofte serĉis okazon konversacii kun li en Zhongnanhai, por eltiri de li informojn. Tian estis embarasita kaj naŭzita trovinte, ke homo tiom multe pli aĝa kaj pli altranga en la Partio ol li alproksimiĝas al li nur pro tio, ke li estas sekretario de Mao. La homo, kiu poste en la mezaj 1960-aj jaroj fariĝis ĉefo de la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio”, ofte demandis jenajn demandojn: “Kion la prezidanto legas en tiuj ĉi tagoj?” “Kiu novaj libroj altiras lian atenton?” “Kiu problemoj okupas lian spiriton?”

Tian kaj Li abomenis tiajn oportunistojn, kiuj toleras sinhumiligon por trovi, kiel la vento blovos, kaj laŭ tio manipulas siajn velojn.<sup>5</sup>

En novembro 1958 la Granda antaŭensalto estis en bolado kaj unu kunveno de la Partia Politika Buroo estas kunvokata en Zhengzhou, Henan-provinco, por diskuti pri la temo. Evidente por sekvi snobecon, Chen Boda elpaŝis kun “fantazia” ideo: forigi varoproduktadon kaj aboli la monon kiel interŝanĝilon. Li formale proponis tion ĉi ĉe la kunveno de la Partio. Mao severe riproĉis la oportuniston kaj malakceptis ĝin kiel sensencaĵon, ĉar en tiuj ardaĵ tagoj li konservis sufiĉan prudenton por rifuzi la ideon kiel neeblan kaj politike danĝeran. La rifuzo bridis, sed ne forigis la oportunismon de Chen, kaj ĝi ree manifestiĝis en la “kultura revolucio”.

Dum malpli ol ok monatoj la bedaŭrindaj sekvoj de la Granda Antaŭensalto fariĝis pli kaj pli klaraj al tiuj, kiuj observis la kamparan scenejon. Kiam tiam Jiaying faris profundan esploron pri la situacio en iu gubernio de sia hejmaprovinco, kadroj baznivelaj diris al li, ke ili estis devigitaj mensogi kaj trompe pligrandigi la ceferojn de la produkto, kaj ke konsiderinda nombro da kamparanoj efektive suferas malsaton de tiam, kiam komenciĝis la Granda Antaŭensalto.

En la antaŭvespero ka la kunveno de la Partia Centra Komitato en 1959 en Lushan, Jiangxi-provinco, li raportis al Mao la kamparan situacion, dum Li Rui, tiam laborante en la industria sektoro, koncize parolis al la gvidanto pri la problemoj, kiujn alvizaĝis la fabrikoj, minejoj kaj transportaj sistemoj. Mao okazigis tri viglajn babilkunvenojn (la ĉina nomo estas ŝenŝjanhui, laŭvorte kunveno de feoj, t.e. senceremonia, libera diskutado) kun Tian, Li kaj kelkaj aliaj por peti iliajn opiniojn. Kiel Li Rui poste rememoris, Mao tiam

estis preparita ĝustigi la “maldekstrajn” erarojn kaj listigis dek naŭ demandojn por submeti al la plena kunsido de la Centra Komitato por diskuto.<sup>6</sup>

Ĉiuj komencis diskuti pri la lastatempaj eraraj ekstrem-maldekstraj politikoj de la Partio, tamen la plena kunsido faris abruptan direktoŝanĝon. Ĉar Marŝalo Peng Dehuai, la Ministro de Nacia Defendo kaj membro de la Politika Buroo, submetis sian faman leteron kritikantan la Grandan Antaŭensalton kiel “etburĝan varmkapiĝon”. Tio ĉi ne estis akceptita de Mao, kaj la 23-an de julio la membroj de la Centra Komitato estis postulataj kritiki la “dekstran portunismon” de Peng Dehuai kaj liajn “kontraŭ-Partiajn aktivecojn”.<sup>7</sup>

Tian Jiaying kaj Li Rui estis surprizitaj ĝis muteco de la anonco. Se la Partio ne intencas ĝustigi siajn ekstrem-maldekstrajn erarojn kaj anstataŭe atakos kamaradojn havantajn moderajn opiniojn, tiam Marks helpu nin, pensis la du junuloj.

Kiel sekretario de Mao, Tian bone konis la prezidanton, kaj dum li multe respektis la grandan homon, li klare vidis liajn fortaĵojn kaj malfortaĵojn, kiel malmultaj povis. “Se iam mi devos forlasi Zhongnanhai por labori aliloke,” li foje konfidis al sia amiko, “mi ĉe mia foriro donos kelkajn opiniojn.” Kio ili estos? La plej grava, li diris, estos ke Prezidanto Mao konduku tiel, ke oni ne parolu pri lia maobono, “post kiam li travivos sian centan jaron” – eleganta ĉina ĉirkaŭparolo signifanta “post lia morto”. Tian, rigardante malproksimen al la estonteco, pensis pri la loko de Mao Zedong en la historio. Tio montris lian zorgon pri la reputacio de la Partia gvidanto. Malfeliĉe, Li Rui konfidencis tion ĉi al iu intima amiko dum la irado de la Lushan-a kunveno. Iel la privata konversacio de tian ekcirkulis, kaj iu membro de la Centra Komitato elmetis la aferon ĉe plena kunsido. La bonintencaj vortoj estis forte distorditaj. Fine la demando estis flankenmetita, kaj tian

daŭrigis sian laboron kiel sekretario de Mao. Sed la cirkonstancoj ja ne plu estis la samaj por li en Zhongnanhai.

La sekvantajn kelkajn jarojn Tian Jiaying dediĉis al la skribado de la koncizaj piednotoj, entute 987 pecoj, al kvar volumoj de *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*. Tio estis monumenta, tempokonsuma tasko. Tian de tempo al tempo devis konsulti la prezidanton mem, sed li trovis lin malinklina ekzameni siajn verkojn de la pasintaj jaroj. La intereso de Mao, diris Tian, ŝajne ŝanĝiĝis: li estis okupita plene kaj ekskluzive pri novaj aferoj, novaj tendencoj kaj novaj problemoj. Li intencis proponi, ke la prezidanto rezignu sian ĉiutagan kontroladon de la ŝtataj aferoj, por sin koncentri sur la resumadon de ĉefaj lecionoj de la Ĉina Revolucio kaj dediĉi pli da tempo al teoria laboro, kio, Tian kredis, havus multe pli grandan signifon por estontaj generacioj. Sed liaj vortoj estis retenitaj ĉe la lango. En la fino de 1958 Mao ja decidis forlasi sian postenon de prezidanto de la Popola respubliko (konservante la prezidantecon de la Partio), sed li komencis nenian teorian resumadon.<sup>8</sup>

Okazis la “kultura revolucio”. Chen Boda, denove aktiviĝinte, sin urĝis fari venĝon al Tian Jiaying. La 21-an de majo 1966 la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio”, kies ĉefo li nun estis, sendis lakeon al la hejmo de Tian por deklari akuzojn: kunagadi en ligo kun la nun juĝesplorata direktoro de la Ĝenerala Oficejo de la Partio (tio aludis Yang Shangkun, kiu antaŭ jaroj rifuzis kontentigi la postulon de Chen pri pliluksa loĝejo en Zhongnanhai); konstante havi dekstro-oportunismajn ideojn; falsi la verkojn de la prezidanto (tio aludis, ke tian ne aprobis meti la nomon de Peng Dehuai en iun artikolon koncernantan la opinion de Mao pri Deoficigo al Hai Rui).

Senprokraste Tian Jiaying estis eksigita kaj ordonita tuj foriri el Zhongnanhai,

transdoni ĉiujn klasigitajn materialojn en sia posedo kaj konfesi siajn erarojn. Al la furioziĝinta Tian restis nenio por fari, ĉar nun Mao volis aŭdi nur la voĉojn de ekstrem-maldekstruloj.

La 23-an de majo Tian finis sian vivon. Citante la vortojn de Lusin, la granda verkisto, Li Rui rimarkigis, ke sinmortigo estas ia protesto kontraŭ okazaĵoj de la tempo. La morto de Jiaying, lia amiko lamentis, estis ago de protesto kontraŭ tio, kio estis okazinta ĉirkaŭ li.<sup>9</sup>

Tian Jiaying estis inter la plej fruaj el multaj viktimoj. La sekvantaj dek jaroj kaŭzis terurajn damaĝojn al Ĉinio ne nur ekonomie, sed ankaŭ en ĉiu sfero de homa penado. La “Granda Antaŭensalto” kaj la “kultura revolucio” estis iniciatitaj de Mao Zedong sen ĝisfunda analizado de la situacio, kiun alvizaĝis la lando – kion ĝi povis kaj ne povis fari – kaj precipe en la “kultura revolucio”, sen klara distingo inter amikoj kaj malamikoj – kiujn ataki kaj kiujn protekti. Ili estis eraroj faritaj ne de unuopa individuo, sed de grupo da gvidantoj superregataj de unu homo, kiu permesis, ke *jijantang* kaj la simia flanko de lia personeco lin venku. Malsame de la eraro de la “Granda Antaŭensalto”, en kiu Lin Biao kaj Jiang Qing ludis neniun gravan rolon, en la “kultura revolucio” Mao uzis tiujn ĉi du kiel lancpinton de la revolucio, kaj ili siavice uzis lian mantelon por efektiviĝi siajn intencojn. Kaj plie, ili laŭdegis Mao preskaŭ kiel dion, por lin pli bone manipuli. Ĉar la prezidanto suferis parkinsonan malsanon kaj estis al li tre malfacile aŭdi, liaj helpantoj kaj interpretistoj devis observi liajn lipmovojn kaj diveni, kion li volas diri. Ĉio ĉi tio faris lin pli izolita for de kio estis okazanta ĉirkaŭ li aŭ en la lando, kaj Jiang Qing kaj ŝia bando do plene utiligis la situacion.

La taktiko de Lin Biao en la komenco estis fari senskrupulan uzon de lia kreaĵo – la malgranda ruĝa libro, Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong – por montri, ke li estas pli revoluciema, pli sindona, pli lojala al Mao, ol iu ajn alia en la politika areno. Laŭ Lin Biao, kiu neniam laciĝis de kantado de laŭdoj al Mao, “la instruoj de la prezidanto estas ĉiopova kaj la evangelia vero.”.

Antaŭ ol Lin Biao estis oficiale nomumita daŭrigonto al Mao Zedong, la plej parto el la membroj de la Politika Buroo, inkluzive de Zhou Enlai, opiniis kontraŭ la fanatikeco de Lin Biao en troa reliefigo de politiko je la kosto de laborplenumado. Politiko, Zhou Enlai asertis, pravas sian valoron nur se ĝi kondukas al bona laboro. Lin Biao, per la presaj komunikiloj, kiujn li suikcesis teni sub sia dispono, atakis la ĉefministron – kvankam ne menciante la nomon – pri tio, ke tiu disvastigas, kion li nomas herezo. Sed tra la tutaj jaroj de la “kultura revolucio” Zhou Enlai firme staris ĉe sia vidpunkto malgraŭ la sovaĝaj akuzoj de Lin Biao kaj post de Jiang Qing pri devioj de la Partia linio. En la departementoj sub la Ŝtata Konsilantaro Zhou postulis, ke oni sekvu la principon, ke politikoj devas akordiĝi kun laŭdinda laboro, principon, kiu helpis konservi prudenton en certa mezuro kaj teni la ŝanceliĝantan mekanismon de registaro en funkciado en tiuj konfuzaj tagoj, kiam politiko signifis revolucion kaj revolucio signifis troan liberecon.

Du fojojn en sia kariero post 1949 Zhou Enlai trovis sin en la malfeliĉa situacio, ke li devis ordigi la ĥaoson estigitan de eraraj politikoj, dum kaj post la “Granda Antaŭensalto” kaj dum la “kultura revolucio”. Kun la helpo de pluraj teknike bone orientitaj vicĉefministroj, li sukcese remetis la ŝipon de la ŝtato en ekvilibron post la tri jaroj da malfacileco de 1959 ĝis 1961, kaŭzita de eraraj politikoj, malabunda rikolto de greno kaj la retirado de helpo kaj teknikistoj fare de Sovetunio. La situacio reboniĝis en 1962, kaj Ĉinio enirus laŭ la vojo de reprosperiĝo kaj disvolviĝo en la 1970-ajn jarojn, se ne tuj sekvus la postaj ekstrem-maldekstraj politikoj kaj la damaĝokaŭzantan eventoj de la

“Kultura revolucio”.

Ŝajne Zhou Enlai ne sufiĉe tiom sukcesis en la posta periodo, ĉar post la morto de Lin Biao, Jiang Qing kaj ŝia bando, okupantaj poziciojn de poentco, ankoraŭ povis daŭrigi siajn detruajn aktivecojn. Sed Zhou Enlai ja sukcesis konservi grandan korpuson da superaj, provitaj kaj harditaj gvidantoj de la Partio kaj registaro, kaj Deng Xiaoping estis inter ili.

En komparo neniu okazaĵo en la malfruaj jaroj de Zhou Enlai – eĉ ne la delikata diplomateco kondukanta al la restarigo de Ĉinio-usonaj interrilatoj – povas esti pli grava el la longtempa vidpunkto, ol lia sukceso en konservo de miloj da bonaj homoj kaj tenado de ili en sekureco. Tio estis lia porĉiama monumento al liaj brilaj ŝtatista kapablo kaj lerteco de kaŝbatalado en malsimplaj kaj ŝajne senesperaj cirkonstancoj.

En la unuaj kvin jaroj de la “kultura revolucio”, malsame ol la lastaj kvin, Zhou Enlai estis devigita sekvi Mao, ĉar nur la reteno de la ĉefministreco ebligis al li teni la kolosan registaron en nedissplitiĝo. Eĉ tiel li trovis sin en malfacila situacio, ĉar li devis kalkuli kun vicoj da fortoj, kiuj ne povis esti facile kategoriigitaj kiel absolutaj malamikoj aŭ kiel veraj kamaradoj. Sed kun Lin Biao pereinta en 1971, kaj la flugiloj de la “Ruĝaj Gvardianoj” tonditaj, la lukto de Zhou fariĝis iom malpli komplikita dum la dua duono de la “kultura revolucio”. Lia sagaca trakto de la fiasko de Lin Biao gajnis al li favoron de la prezidanto. La tuta afero de Lin Biao skuis Mao Zedong, ĉar li neniam songis, ke lia persone elektita daŭrigonto povos turni sin kontraŭ li, eĉ ĝis la grado komploti por lin murdi. Do Mao refoje inklinis rigardi Zhou Enlai kiel nemankigeblan kamaradon kaj kolegon.



Dum la unua duono de la periodo Zhou Enlai okupis la trian lokon en la hierarkio de la Partio post Lin Biao, nun la duan nur post Prezidanto Mao. Ĉio ĉi tio faris diferencon. Antaŭ la kraŝo de sia aeroplano en 1971 la “kronprinco” Lin Biao povis, ekzemple, alpaŝi al Zhou Enlai kun propono sub la tromŝajno, kvazaŭ ĝi venus de Mao, dum Zhou ne povis eviti Lin aŭ lasi Lin en nesciado, se li havis gravan aferon por prezenti al la prezidanto. Nun ĉio ĉi jam ŝanĝiĝis kaj certagrade aferoj estis pli simplaj. Sed nur supraĵe.

En 1976, kun pli kaj pli serioziĝanta korpa malfortiĝo de Mao, la kliko de Jiang Qing elpensis ruzan artifikon por teni la malsanan prezidanton sub sia dispono. Ne povante aliri rekte al sia edzo, Jiang Qing transpostenigis la nevon de Mao, Mao Yuanxin, de Shenyang, nordorienta Ĉinio, al Pekino, kaj lokis lin en Zhongnanhai kiel interliganton – eksterordinara aranĝo, se ekzamenate el la vidpunkto de la Partio aŭ registaro. Tiamaniere ĉiuj komunikoj al kaj de Mao devis iri pere de la junulo, kiu estis ĉiam preta fari, kion ajn ŝi petis. Pro tio oni ne povas scii eĉ nun, ĉu tio, kio komuniĝis kiel instrukcioj, ordonoj kaj direktivoj nominale kun abrobo de Mao, estis ŝanĝita aŭ falsita.

Antaŭ la “kultura revolucio” Zhou Enlai neniam alvizaĝis tiel grandan kaj kompleksan problemon, ke li devis batali kontraŭ potenca frakcio interne de la Partio por protekti honestajn kaj spertajn kadrojn de detruigo. Li persistis en laboro, konsciante, ke li falos, la tuta ŝipo de ŝtato kun multaj bonaj kamaradoj dronos kun li, ĉar liaj malamikoj interesiĝas ne nur pri meto de siaj manoj sur kelkajn ministrejojn, sed pri kapto de la tuta potenco en la Partio kaj registaro – katastrofo por la ĉina popolo. Kun paso de tempo tio ĉi fariĝis multe pli klara. En januaro de 1974 ĉe iu amaskunveno en Pekino Jiang Qing kaj ŝiaj subtenantoj, en la nomo de la prezidanto, iniciatis la ekstravagancan kampanjon de

“Kritikado al Lin Biao, Kritikado al Konfuceo”. Je la unua fojo Jiang Qing, kiu aranĝis ĉion tion, publike atakis la ĉefministron pri ties movo ne sufiĉe rapida por “paŝoteni kun la revolucio”. Kiel pruvis postaj okazaĵoj, Jiang Qing kaj ŝiaj subtenantoj faris “Konfuceon” la kodnomo por Zhou Enlai. Kvankam Mao donis sian aprobon ĉe la komenco al la absurda kampanjo iniciatita de Jiang Qing, Wang Hongwen kaj aliaj, li retiris ĝin, kiam li konstatis, kion ili intencas, kaj riproĉi sian fremdiĝintan edzinon pro ties kaŝaj ambicioj fariĝi la Partia prezidanto kaj formi sian propran “kabineton”. Ĉi-rilate Mao nomis Jiang Qing kaj ŝian klikon “kvarpersona bando”, kaj tiel gluiĝis al ili la moknomo.<sup>10</sup>

Zhou poste enhospitaliĝis en la jaro, sed, ankoraŭ ĝuante la konfidon de Mao, daŭrigis prizorgi la ĉiutagajn aferojn de la Partio kaj registaro kiel antaŭe. La “kvarpersona bando”, avida je tuja kapto de la potenco, provis rapidigi siajn paŝojn. Wang Hongwen, kies meteoreca rangaltiĝo en la fruaj tagoj de la “kultura revolucio” faris lin la plej juna membro de la bando, estis ekspedita al Changsha en Hunan, kie Mao Zedong restis. Tio ĉi okazis malonge antaŭ la dua Plena Sesio de la Deka Partia Kongreso kaj la Kvara tutlanda Popola Kongreso, ĉe kiuj la plej grava demando en la tagordo estis la formado de la registaro – la elekto de la ĉefministro kaj la starigo de la nova Ŝtata Konsilantaro, la kabineto. Wang Hongwen subsugestis al Mao, ke estus bona afero forigi Zhou Enlai el la nova registaro kaj ne nomumi Deng Xiaoping kiel unuan viĉĉefministron. Li saturis siajn argumentojn per kalumnioj, pro kio la prezidanto faris al li bonan lavon. Jiang Qing kalkulis je la vojaĝo de Wang por akiri la aprobon de Mao por organizi la kabineton, kiun ŝi jam havis en la menso. Ŝi perdis la hazardludon.

Kelkatempe antaŭ la Kristnasko de 1974 Zhou Enlai flugis al Changsha. Denove

veturigante la ĉefministron, la speciala aviadgrupo por la aervojaĝoj de la ĉefministro dronis en akstazo, ĉar li ne vojaĝis per ilia aeroplano jam multe pli ol unu jaron. Li certe resaniĝis, ili pensis, alie li ne farus la vojagon. Sed fakte li tute ne estis en sano kaj nur pene kolektis siajn fortojn por entrepreni tiun ĉi komision, ĉar la estonteco de Ĉinio estis en kfiza momento.

La 23-an de decembro Zhou Enlai sekrete interparolis kun Mao Zedong, kiu fine decidis, ke Zhou, kvankam malforta, devas resti ĉe sia posteno kaj elekti la vicĉefministrojn kaj ministrojn laŭ sia bontrovo. Post kiam la komisiono estis plenumita, la speciala aviad-grupo reveturigis Zhou al Pekino, al lia hospitala lito. Kiel kutime, antaŭ ol diri adiaŭ, la ĉefministro eniris en la kajuton por danki la aviadistojn kaj stevardinojn. Lia irmaniero ne estis firma, sed kun la helpo de sia sekretario li manpremis kun ĉiuj unu post la alia. “Dankon pro ĉio. Estis agrabla vojaĝo,” li diris. “Mi vojaĝos kun vi venontan fojon.” Sed tio estis la lasta flugo de Zhou Enlai.

La graveco de la decido prenita en Changsha estas ekstreme granda. Kvankam la fina strukturo de la Ŝtata Konsilantaro kiel submetita al la Kvara Tutlanda Popola Kongreso por aprobo la sekvantan januaron neeviteble inkluzivis iujn ekstrem-maldekstrulojn, ĉar la sagacza Zhou Enlai trovis konvena fari geston de repaciĝo al siaj kalumniantoj, tamen preskaŭ ĉiuj pli gravaj ministrecoj estis rezervitaj al tiuj, kiujn Zhou povis konfidi, por labori por la nacia intereso. Malhelpate en kreskigado de sia potenco kaj ne povante okupi gravajn postenojn, kiajn ili deziris<sup>11</sup>, la malsukcesigita Jiang Qing kaj ŝia bando pliintensigis siajn manovrojn kaj koncentris siajn atakojn al Deng Xiaoping, la centra persono en la nova kabineto kaj la plej intima helpanto de Zhou. Deng finfine estis

deoficigita je la dua fojo en la daŭro de dek jaroj. Sed la konstruaĵo, kiun Zhou Enlai pene konstruis en siaj lastaj tagoj, restis entute sendifekta malgraŭ la tumultoj de 1975-76.

Mao Zedong certe faris seriozajn erarojn dum la “kultura revolucio”, sed lia decidema subteno al Zhou Enlai en la decida tempopunkto estis lia granda merito.<sup>12</sup> Eble lia neatendita renkontiĝo kun Wang Hongwen alarmis lin pri la plenaj dimensioj de la malbonintenca ambicio de sia edzino kaj li decidis ŝin bloki, kvankam hezitante forigi ŝin tute de la politika scenejo.

En la historio de la Popola Respubliko 1975-76 estas grava el alia kaŭzo. Multaj veteranoj de la Partio, kiuj antaŭe estis kaluminitaj, eksigitaj, kaj en kelkaj okazoj ĵetitaj en malliberejon, nun estis senkulpigitaj kaj denove laboris. Ilia liberiĝo ne povus veni en pli oportuna momento, ĉar la programo de la modernigo unuafoje deklarita de Zhou Enlai ĉe la kunveno de la Tutlanda Popola Kongreso en 1975 (lia lasta publika ago antaŭ tiu ĉi plej alta ŝtatorgano) bezonis spertoriĉan personaron bone konantan la ekonomion kaj registaran administradon por sia plenumiĝo. La fakto, ke miloj da bonaj homoj persekutitaj unue de Lin Biao kaj poste de Jiang Qing kaj ŝia bando estis senkulpigitaj kaj revenis en aktivan servadon, pruvis, ke la tajdo jam ŝanĝis sian direkton. Jiang Qing kaj ŝia bando nun estis pli kaj pli rigardataj kiel konsumita forto, kaj montriĝis jam ilia nekapablo daŭrigi la kampanjon de “Kritikado al Konfuceo” (efektive “Kritikado al Zhou Enlai”) ĝis ĝia fino. Ilia regado de teroro estis alproksimiĝanta al sia fino.

La kosto rilate homojn estis grandega. Sennombraj homoj, alt- kaj malaltrangaj, estis false akuzitaj, submetitaj al neregulaj tribunaloj, kruele pridemanditaj kaj enkarcerigitaj. Iuj antaŭtempe mortis pro tio, ke oni intence rifuzis al ili bezonatan medicinan prizorgon.

Aliaj sin mortigis.

Oni demandas, kiajn agojn faris Zhou Enlai tiam, kiam ĉio ĉi estis okazanta. Ĉu li ne povus preni pli firman starpunkton en kontraŭstaro al tiaj frenezaĵoj? Ĉu ekzistis io pli, kion li povus fari por protekti kaj savi tiujn ĉi homojn?

Tiuj ĉi demandoj povas esti respondataj en la kunteksto pri interrilato de Zhou kun Mao. Ambaŭ estis homoj kiel pensado, tiel ankaŭ de agado, sed dum Mao estis homo pli de pensado ol de agado, Zhou estis la malo. De kiam la Komunista Partio transprenis la regpotencon en 1948, Mao plejofte estis la pensulo, la teoriulo, la homo de ideoj en la kvarono, de jarcento, dum Zhou estis la faranto, la plenumanto, la administranto. Ili kompletigis unu la alian en la pacaj kaj feliĉaj tagoj, kiam la politikoj de la Partio estis sanaj kaj seneraraj.

Zhou Enlai kompreneble estis neordinara marksisma pensulo en siaj propraj diversflankaj multaj verkoj en la formo de paroladoj kaj raportoj pri politikoj, militaj aferoj, kulturo, edukado, scienco, teknologio, artoj kaj literaturo kaj pri intelektuloj kaj la unuecfronto. Li ne permesis vastan publikigadon de siaj verkoj dum sia vivdaŭro; li opiniis, prave aŭ malprave, ke tia privilegio devas esti rezervita ekskulzive por Mao Zedong. La duvoluma *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, publikigita en 1981 kaj 1984, rivelis liajn sagacan menson, realecan vidpunkton, kaj emfazon sur interakordiĝo kaj persvado por solvi kontraŭdirojn kaj unuiĝi kun kontraŭuloj.

Zhou respektis la opiniojn de Mao, ĉar li rigardis lin kiel la nekontesteban gvidanton de la Partio kaj teoriiston de la Ĉina Revolucio. Li submetiĝis al la juĝo de Mao pri la neceseco lanĉi la “kulturan revolucion”, kvankam li poste dubis pri la paŝoj kaj rimedoj prenitaj en tiu traŭmata periodo enkondukita de la “granda instruanto” por gardi Ĉinion de korupto de reviziismo. Antaŭe Mao estis prava tiom multajn fojojn. Se li decidis, ke la “kultura revolucio” estas bona por la Partio kaj la registaro – por eviti, li asertis, la danĝeron de reviziismo kaj glitadon al la kapitalisma vojo – Zhou konsentis senkonteste. Zhou ĉiam montris sin modelo en observado de Partia disciplino kaj submetiĝo al Partiaj decidoj,

kaj tiam ja la plej altaj gvidantoj de la Partio subtenis Mao.

Se Zhou havis ian opinionon malsaman de la Partia decido, li ankoraŭ fidele plenumis ĝin, lasante sian propran opinioon flankenmetita, ĝis okazo sin prezentis por ree elmeti la demandon en la sekvantan kunveno de la Partio. Se li levis sian propran proponon kaj ĝi ne estis akceptita, Zhou flankenmetis sian malkonsenton kaj faris sian plejebulon por plenumi la linion de la Partio.

Tia estis lia sintenado al la “kultura revolucio”, almenaŭ en ĝia unua fazo. Zhou Enlai staris kun Mao Zedong, dividante inter si bonon kaj malbonon. Ĉar Lin Biao, la nomumita daŭrigonto al Mao, supozeble reflektis opiniojn de Mao, Zhou respektis ankaŭ liajn opiniojn, kvankam kun iaj rezervoj.

De la komenco Lin Biao dekretis, ke la “kultura revolucio” estu movado por batali kontraŭ burokratismo, por kontroli ĉiujn kadrojn, Partiajn kaj aliajn, por vidi, ĉu ili estas politike taŭgaj por sia posteno. Lin Biao larĝe stermis la reton, kaj liaj sekvantoj malice sugestis, ke tre malmultaj eĉ de la membroj de la Politika Buroo estos liberaj de la “puriga” procedo. Mao ne protestis, por ne paroli pri malakcepto de tiu ĉi propono, kaj baldaŭ eĉ mem aliĝis al la batalo per sia grand-ideografiafiŝa afiŝo “Bombardi la Stabejon!), kiu metis la kondiĉon al kampanjoj de “Ruĝaj Gvardianoj” kontraŭ iu ajn, kiu estis malfeliĉe identigita kiel parto de la “burga stabejo”.

Mem treege modesta, Zhou ĉiam opiniis, ke eĉ fundamente bonaj oficistoj povas havi ion por plibonigi. Li tro malamis kaj kontraŭbatalis la burokratan laborstilon. Ĉu nun li povus elpaŝi kontraŭ la kontrolado al siaj propraj subuloj, kiuj estis kritikitaj? Li ne havis la antaŭscion ĉe tiu ĉi frua stadio por vidi la “kulturan revolucio” kiel kaŭzon de malbono al la nacio, kiu devis esti ekzorcita je ĉia kosto. Kiam la kavalkado de batalo iradis kun

bruoj, kaj pli kaj pli da intimaj kamaradoj estis persekutataj, Zhou devis pli kaj pli kompreni, ke ion terure malbonan ja faras la “kultura revolucio”, se ĝi faras nenian distingon inter amikoj kaj malamikoj kaj koncentras sin sur pereigon de la revoluciaj veteranoj. Kaj li devis jam ekkoni en kelkaj rilatoj la kaŝitajn motivojn de tiaj homoj, kiaj Lin Biao kaj Jiang Qing.

Eble lia bona partianeco kaj lia grandega respekto al Mao blindigis lian aliokaze akran juĝon pri la bezono ŝanĝi la direkton kaj malakrigis lian kuraĝon brave stariĝi kontraŭ Mao pro ties misgvido al la Partio kaj lando. Sed li devis ankaŭ konkludi en la kriza tempopunkto, ke por li tro publike oponi kontraŭ la progrestendenco de eventoj ne estus en la plej bona intereso de la nacio. Li kredis ke, konsidere ĉiujn aferojn, estas pli bone ne spiti la ŝtormon, sed klini sin por gajni la venkon. Tiel longe kiel li estis ĉefministro, ia racieco povis ankoraŭ plu ekzisti en la ĉiutaga funkciigado de la registaro kaj ekonomio. Li povis doni iajn protektrimedojn al minacataj kadroj ĉe ĉiuj niveloj kaj eble mildigi la suferojn de milionoj da hoamoj en la tuta lando. Kaj metante obstaklojn al la ambicioj de la oportunistoj por plej alta, nelimigita potenco, li povis gardi la landon de eĉ pli malfeliĉa tragedio en la longa periodo. Ĝi probable estis la sola prudenta vojo libera al li, ĉar se Zhou elpaŝus en malkaŝa opono, tio pliintensigus la “plenskalan internan militon”, kiu estis en progreso.

Lia deteniĝemo ne estis el malriskemo. Zhou neniam antaŭe retiriĝis de danĝero en sia revolucia kariero dum pli ol duona jarcento; lia fizika kaj morala kuraĝo estis nedubela. La rolo, kiun li elektis por si mem, estis eĉ pli malfacila kaj turmentega, ol se li publike kaj malkaŝeme parolus kaj fariĝus martiro. Ĝuste kiel la naskiĝo de la Popola Respubliko estis

neimagebla sen la gvidanta mano de Mao Zedong, estis egale neimagebla por la radoj de la registaro daŭrigi sian turniĝadon en tiu ĉi periodo sen la firma mano de Zhou Enlai. Pli ol iu ajn alia ĉe la plej alta nivelo, Zhou Enlai persone kaj konstante zorgis pri la sorto de tiuj, kiuj estis malhonoritaj enkarcerigitaj aŭ forsenditaj al malproksimaj lokoj. Li intervenis, kiam ajn eble, por fari ilian sorton pli facile eltenebla aŭ efektiviĝi lian liberigon kiam ajn la okazo sin prezentis. Se li ne povis malebligi la damaĝon, li faris kion li povis, por ĝin limigi.

Post la morto de Lin Biao, li senlace penadis por akceli la senkulpigon de tiuj, kiuj estis persekutataj, kaj ĉar li vidis la prezidanton pli ofte ol antaŭe, li aliris al li en oportunaj momentoj kaj demandis, ĉu tiu ĉi aŭ tiu persono ne povas esti senkulpigita kaj rekomenci labori. Poste li prezentis longajn listojn de kadroj – iuj ankoraŭ en malliberejo, iuj ankoraŭ enfermitaj en sia loĝejo, iuj restantaj senokupaj – kaj persone faris esplorojn kun Mao por elpeti lian aprobon por ilia liberigo aŭ renomumo. Sed Jiang Qing, Kang Sheng kaj iliaj similaj uzis ĉiun eblan prokrastan taktikon, kaj iafoje senkulpigo, kiam ĝi finfine venis, ne signifis tujan liberecon. Mulataj devis atendi sian liberiĝon dum pluraj jaroj, kaj unu el iliaj grandaj bedaŭroj en la maljuneco estis ilia neebleco doni siajn lastajn respektojn al la homo, kiun ili konsideris kiel sian savanton – Zhou Enlai – kiam li forpasis en la januaro 1976.

Mao Zedong alte sin tenis kontraŭ tiuj ĉi aferoj – tio estis komprenebla en liaj lastaj jaroj, kiam li estis serioze malsana dum longa tempo. Sed antaŭ la fino estiĝis signoj de introspekto de la flanko de Mao. Foje, retrorigardante al la eventoj de la “kultura revolucio”, li estis devigita konfesi, ke estas eraroj kaj malbonagoj. Li pensis, ke la tuta



afero meritas verdikton de “*san-ĉji-kaj*” (traduko: dividiĝo en tridek procentojn kaj sepdek procentojn). Koncerne tion, ĉu estas sepdek procentoj da bono kaj tridek procentoj da malbono, Mao ne diris, sed estis akceptebla la supozo, ke tio estis, kion li volis diri.<sup>13</sup>

Dum la jaroj Zhou Enlai plue ĝuis la konfidon de Mao, kvankam nur certagrade. Ĉirkaŭita de grupo da homoj servilaj, kiuj penis fari sin favorataj per flataĉoj, Mao fariĝis pli kaj pli apartigita disde siaj kamaradoj en la Politika Buroo kaj disde la realeco – ideala situacio por pli vigla kreskado de eraroj kaj ekscesoj. Eĉ post la morto de Lin Biao li ne inversigis la direkton, nek malkonfesis la ekstremo-maldekstrajn rimedojn alprenitajn en lia nomo aŭ praktikatajn de lia edzino. Anstataŭe li kondukis kiel antaŭe, lasante aferojn plu devii de la ĝusta vojo kaj permesante siajn senpere proksimajn personojn trakti lin kiel orakolon. Tio estis frapa ekzemplo de la tendenco al *jijantang*, kiun li tiel ofte malaprobis en siaj plu fruaj jaroj.

Nelonge post la afero de Lin Biao, Zhou Enlai, al kiu estis konfidita la kontrolo de *Popola Tagĵurnalo*, la organo de la Partio, faris provon por ŝanĝi la situacion. Estis 1972, kaj Zhou Enlai pensis, ke ne estas plu prokrasteble kritiki kaj forĵeti la ekstrem-maldekstrajn ideojn kaj praktikojn, kiuj plagis la landon. Unu el la superaj membroj en la redakcio tute konsentis pri la direktivo de Zhou, kaj laŭ ĝi faris ŝanĝon por speguli en la ĵurnalo la abomenon de la popolo kontraŭ la ekstrema radikalismo de la “kvarpersona bando”. Zhang Chunqiao eksplodis de kolero, kaj la samon faris Yao Wen Yuan. Kunveno de la ĉefaj redaktistoj estis kunvokita kaj severa riproĉo estis farita. Sed, en la koro de tiu malcedema redaktisto, pravis Zhou Enlai, ne la sekvantoj de Jiang Qing.

Profitante la foreston de Zhang kaj Yao el Pekino, la redaktisto dediĉis unu tutan paĝon de ĵurnalo al kritikado de la ekstrema maldekstrismo. La furioziĝinta “kvarpersona bando” severe riproĉis la ofendantojn kaj minacis fari fortan agon. Tiu redaktisto sin turnis al la prezidanto de la partio kun la espero, ke lia letero prezentanta la motivojn por kritiki la ekstreman maldekstrismon ricevos aprobon de Mao. Sed Mao kontraŭis al la ideo, ĉar li opiniis, ke la tasko antaŭ la lando estas daŭrigi la skurĝadon al la “ekstrema dekstrismo”.<sup>14</sup>

Tiu supera redaktisto kaj pluraj samopiniaj kolegoj estis vokitaj al la Popola Halo. Tie, malantaŭ tablo, sidis Jiang Qing, Zhang Chunqiao, Yao Wenyuan – kaj Zhou Enlai. Sur la tablo kuŝis la letero de la redaktisto al la prezidanto, kaj ekvidinte ĝin li deprimiĝis. Zhou havis embarasan mienon. Estis evidente, ke li volus protekti tiujn kamaradojn, kiuj estis elmetataj al atako, sed li ne povis. Ŝajnis evidente ankaŭ, ke eĉ li mem estis celaĵo. Ĉar la lasta arbitracianto, Mao mem, jam klare montris, kie li staras. En siaj rilatoj kun la prezidanto, Zhou plejofte respektive cedis al Mao, kaj ree en tiu ĉi okazo. Se batali kontraŭ la ekstrema maldekstrismo estis tio, kion tiam la lando pleje bezonis, kaj la starpunkto de Zhou povus doni konsiderindan influon al la situacio, eble Zhou cedis tro facile, ne persistante en sia opinio. Sed tiam eble la ĉefa kulpo ne devis esti metita sur lin. Verŝajne Mao ne povis kompreni, kio erara okazas al la lando, aŭ al li mem, aŭ kion malutilan li faras al la revolucia afero, kiun li servis tiel longe kaj tiel bone.

En la lastaj jaroj de sia vivo Mao Zedong, malsana kaj izolita, dronis en pli forta amo al sia propra saĝo. La flatantoj ĉirkaŭ li faris sian plejebulon ekspluati tiun ĉi lian fatalan malfortecon. Se troviĝis iu, kiu povus atentigi Mao, eĉ se nur en nereakta maniero, pri tio, al kia bedaŭrinda stato lia *jijantang* jam alkondukis la landon, kaj pri la bezono revivigi la

demokration en la Partio, tiu estis Zhou Enlai. Ho ve, tiam li mem jam estis grave malsana. Estis neeble por malsanulo, kvankam spertoriĉa kaj sagaca li estis, entrepreni taskon, kiu postulis delikatan traktadon, perfektan takton kaj senfinan paciencon. Ĉiaokaze, estis eble tro malfrue por igi Mao ekvidi, ke la homoj ĉirkaŭ li faras al li nenian bonon lin diigante.

Ke Mao Zedong estas ne dio, sed mortemulo, povanta fari erarojn, estis la temo de la artikolo “Lerni de Mao Zedong”, aperinta en la ĉina gazetaro en oktobro 1978. Ĝi estis prenita el parolado farita de Zhou Enlai en majo 1949, kiu vidis sian presiĝon nur tridek jarojn post la evento kaj du jarojn post la forpaso de ambaŭ homoj. En sia parolado Zhou rimarkigis, ke Mao Zedong, naskita kaj kulturita en kamparo, evoluis de knabeco trapenetrita per obskurantismo kaj superstiĉo al vireco didiĉita al progreso kaj revolucio. Malgraŭ sia grandeco, li ne estis neerarema. La eksterordinara alta kvalito de Mao, asertis Zhou, kuŝis en lia firma decido elrompiĝi el la ŝelo malnova, forĵeti ĝin kaj alpreni la novan. Tio ĉi estis ideo ĝustatempa por esti denove levita tuj post la “kultrura revolucio”. Estis granda tragedio, ke Mao, la elprovita revoluciulo, en siaj lastaj jaroj, forlasis tiun ĉi procezon de konstanta sinprovado kaj sinremuldata

Zhou Enlai estis la plej intima kolego de Mao Zedong dum kvardek jaroj kaj bone konis liajn fortaĵojn kaj malfortaĵojn, eble li kulpis en tio, ke li, kiel kamarado kaj amiko, iom tro inklinis konservi kamaradecon je la kosto de malkaŝemo kaj estis ne sufiĉe kuraĝa riski konflikton kun li. En Zhou Enlai eble estis tro da milda ĝentileco kaj ne sufiĉe da marksista malkaŝemo. Li kutimis tro multe eviti rektan agadon kontraŭ Mao Zedong prefere ol fari vizaĝ-kontraŭ-vizaĝan batalon de volo kun li, kiam iafoje tio ĉi ŝajnis ne nur necesa, sed nepre necesa. Povas esti, ke Zhou tro facile cedis al Mao, egale ĉu li

opiniis tiun prava aŭ tute erara. Tamen, ĉar li tiel energie batalis en la “kultura revolucio” por teni la ŝipon de ŝtato en navigado; ĉar li faris tiom multe por forturni atakojn kaj malakrigi batojn faritajn al viktimoj de tiu terura periodo; ĉar li sukcese detenis la “kvarpersonan bandon” kaj malebligis al ili kapti la plej superan potencon – ĉio ĉi tio el hospitala lito en liaj lastaj du jaroj – la popolo de Ĉinio hodiaŭ inklina pardonon al li liajn malfortaĵojn.

Zhou Enlai estis el regiono de vino, Shaoxing en Zhejiang, provinco de orienta Ĉinio, fama pro sia dolĉa kaj agrabla Shaoxing-vino. Ĝi estis tute malsama de tiu alia fama ĉina drinkaĵo, *maŭtaj-o*, la forta likvoro kun trompa travidebla pureco, kiun Zhou Enlai kaj liaj kamaradoj eltrovis en Guizhou-provinco dum la Longa Marŝado. Same kiel Shaoxing, Zhou Enlai kiel homo kaj ŝtatisto estis nature milda kaj afabla, plena de ĉarmo kaj gracio, pacema kaj libera de kverelemo. Tamen li estis ankaŭ fervola revolucia batalanto. En lia kompleksa, rava personeco troviĝis kaj Shaoxing kaj *maŭtaj-o*, kun Shaoxing en superrego.

Intervidiĝante kun Oriana Fallaci en la Popola Halo en Pekino, en aŭgusto, 1980, Deng Xiaoping rakontis al la itala ĵurnalistino, kiaspeca homo Zhou Enlai estis. Li parolis sentoplene pri la forpasinta ĉefministro kiel “mia pli aĝa frato”, homo, kiu “estis multe respektata de siaj kamaradoj kaj la tuta popolo”, kaj kiel gratulinde estis, ke Zhou Enlai supervivis la “kulturan revolucion”, kvankam, Deng montris, “li diris kaj faris multajn aferojn, kiujn li ne dezirus. Sed oni pardonis lin, ĉar, se li ne farus kaj dirus tiujn aferojn, li mem ne povus pluvivi kaj ludi sian neŭtraligan rolon, kiu reduktis perdojn. Li sukcesis en la protektado de konsiderinda nombro da homoj.”<sup>15</sup>

Respondante penetran demandon de Fallaci, temantan precipe pri la “kultura revolucio”, Deng Xiaoping diris, ke kvankam Mao Zedong estis ĉefe respondeca pri la eraroj faritaj, tamen ankaŭ li mem, Zhou Enlai, kaj aliaj veteranaj kamaradoj devis en ia aŭ alia maniero porti la respondecon. “Ni ne devas meti ĉiujn pasintajn erarojn sur Prezidanton Mao.” Kompare kun liaj elstaraj kontribuoj al la ĉina Revolucio kaj la reunigo de Ĉinio kiel nacio, la eraroj de Mao, li asertis, estis neĉefaj. La fundamenta kaŭzo, kiel Deng emfaze rimarkigis kaj la *Rezolucio pri la Historio de KPC (1949-81)* detale klarigis, devas ne atribuita al personaj faktoroj, sed al la tiama potencostrukturo, kiu lasis demokratian centralizismon difektita kaj kolektivon gvidadon eroziita.<sup>16</sup> La tragedio estis pli malĝojiga, ke ĝis la fino de siaj tagoj, anstataŭ retrorigardi al la pasinteco per kritikema okulo, Mao Zedong ja restis konvinkita, ke tio, kion li faras, estas por la bono de la lando, kaj ke ĉiuj liaj pensoj kaj agoj, en teorio kaj praktiko, estas en akordo kun la doktrino de marksismo kaj la bezonoj de la diktaturo de la proletaro.

#### **Notoj:**

1. Wang Jiaxiang, ankaŭ vicprezidanto de la Milita Komisiono de la Partio, jam frue konstatis la erarojn faritajn de Otto Braun kaj aliaj en la milita sfero. Li grave funkciis dum la batalo kontraŭ la kvara “ĉirkaŭeksterma” kampanjo lanĉita de Ĉjang Kajŝek kaj estis sur brankardo dum parto de la tempo de la Longa Marŝado. Estis hazarde, ke Mao Zedong falis en malsanon samtempe kaj estis portata sur brankardo. La du do faris kompanjon unu kun la alia, kaj Wang konfidence diris al Mao, ke la aferoj ne povas daŭri tiamaniere kaj ke Otto Braun kaj tiuj, kiuj pensis kaj agis same kiel li, devas esti eksigitaj el la gvidantaro. Mao, kiu konsentis kun li, akcentis la gravecon de kombino de la universala vero de marksismo-leninismo kun la realeco de la ĉina revolucio. Ili komencis diskutadon pri la ideo kunvoki kunvenon de la Politika Buroo. Alia vicprezidanto de la Milita Komisiono, Zhou Enlai, kiu havis oftan kontakton kun Braun, abomenis lian arbitran manieron trakti la militan situacion. Li ofte kontestis opiniojn kaj decidojn de Braun kaj faris varmajn argumentadojn kun la germano dum la batalado kontraŭ la kvina “ĉirkaŭeksterma” kampanjo kaj dum la Longa Marŝado. Laŭ Wu Xiuquan (iama Vicministro de eksteraj aferoj kaj Ambasadoro al Jugoslavio), kies flanka devo estis fari interpretadon dum la Longa Marŝado, Zhou Enlai de tempo al tempo interŝanĝis akrajn vortojn rekte kun Braun en la angla lingvo. “Rememoroj pri Zunyi-konferenco” en *Historiaj Dokumentoj de Zunyi-konferenco*, p. 112, Popola

Eldonejo, 1985, Pekino.

2. Mao Zedong, rekomendate de prof. Yang Changji, kiu poste fariĝis lia bopatro, aliĝis al la personaro de la Biblioteko de la Pekina Universitato en oktobro 1918. li fariĝis asistanto al la ĉefbibliotekisto, prof. Li Dazhao, unu el la plej fruaj marksistoj-kleruloj kaj, kun Mao Zedong, fondinto de KPC en 1921. Li Dazhao estis arestita de la nord-militarista reĝimo pro siaj politikaj kredoj kaj ekzekutita la 28-an de aprilo 1927. Mao Zedong restis ĉe la Biblioteko de la Pekina Universitato ĝis marto 1919.

3. La 31-an de decembro 1977 *Popola Tagĵurnalo* uzis sian tutan front-paĝon por reprodukti leteron de Mao Zedong al Chen Yi, datitan en la 21-a de julio 1965, en kiu la prezidanto de la Partio diskutis pri poezio kun la marŝalo de PLA. Samtempe la letero estis faksimile reproduktita.

4. Kiel redaktanto de *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong* kaj kelkaj libroj pri historio por la Ĉina Akademio de Sciencoj, Tian Jiaying postlasis malmulton de li mem verkitan krom volumeto Studi “Servu al la Popolo”, kolekto da artikoloj klarigantaj la Maozedong-penson en populara lingvo. Dum peco da tempo antaŭ la tutlanda venko en 1949, Tian guvernis Mao Anying, la pliaĝan filon de Mao Zedong, pri la ĉina lingvo kaj historio.

5. Dek Rememoroj skribita de Li Rui, p. 53, Popola Eldonejo, Pekino.

6. Samlibre, p. 54.

7. *Memoraĵoj de Peng Dehuai*, p. 276, Popola Eldonejo, Pekino. *Rezolucio pri la Historio de KPC (1049-81)*, p. 28, Fremdlingva Eldonejo, Pekino.

8. *Dek Rememoroj*, p. 55.

9. Samlibre, p. 59.

10. *Rezolucio pri la Historio de KPC (1949-81)*, p. 39.

11. Kvankam Zhang Chunqiao, la tiel nomata “cerbo” de la “kvarpersona bando”, okupis la poŝton de vicĉefministro, tamen la pli gravaj ministrecoj kiel ekzemple de nacia defendo kaj eksteraj aferoj restis en la manoj de kamaradoj konfiditaj de Zhou Enlai.

12. *Rezolucio pri la Historio de KPC (1949-81)*, Sekcio 22.

13. Laŭ Deng Xiaoping, “Kamarado Mao Zedong diris, ke ankaŭ li faris erarojn kaj ke ekzistis ankoraŭ neniu persono, kies diroj estus tute seneraraj aŭ kiu ĉiam estus absolute prava. Li diris, ke se ies laboro povas esti taksita kiel sepdek procentoj da atingoj kaj tridek procentoj da eraroj, tio estos sufiĉe bona, kaj ke li mem tre ĝojos, kaj kontentos, se estontaj generacioj povos doni al li tian sepdek-tridek-taskadon post lia morto.” *Elektitaj Verkoj de Deng Xiaoping*, p. 51.

14. *Rezolucio pri la Historio de KPC (1949-81)*, Sekcio 21.

15. *Elektitaj Verkoj de Deng Xiaoping*, p. 329.

16. *Rezolucio pri la Historio de KPC (1949-81)*, Sekcio 22.

## ĈAPITRO IX

# Sovaĝeco de la “Kultura Revolucio”

Maozedong malfermis Pandoran Skatolon en 1966. Eĉ nun, post la forpaso de du jardekoj, ne ĉiuj malbonoj ellasitaj de la bele nomata “kultura revolucio” estis metitaj sub regado.<sup>1</sup> Mao tragike mistaksis la veran situacion de la lando, kaj lia senbaza suspekto, ke ĉie estiĝas reviziismo, kaŭzis miskondukatan politikan movadon, tiel ke Lin Biao, Jiang Qing kaj iliaj aliancanoj preskaŭ tuj faris sian agadplanon por kapti la regpotencon.

Ĥaoso sekvis – kaj estis instigita de la oportunistoj. Ili konstatis, ke grandaj nombroj da iliaj antaŭaj kamaradoj, precipe tiuj sur altaj postenoj, devus esti forigitaj disde ilia vojo. Tio, ke ilia avenuo al la potenco estos surŝutita per kadavroj, evidente kostis al ili neniom da dormo. La oficiala xinhua-novajĝentejo raportis dum la juĝproceso de Jiang Qing kaj aliaj en novembro 1980, ke ne natura morto dum la dek jaroj de la “kultura revolucio”. Tio ĉi eble estis konservativa cifero.

Laŭ iu esploro<sup>2</sup>, sole en Pekino de la lasta semajno de aŭgusto ĝis la fino de septembro 1966, en ĉirkaŭ kvardek tagoj, pli ol 1 700 personoj estis mortigitaj sen juĝo aŭ akuzo, pli ol 33 600 hejmoj estis priserĉitaj sen serĉordonoj, kaj pli ol 84 000 loĝantoj rigardataj kiel “nedezirindaj” estis forpelitaj el la urbo. Tiun ĉi senleĝan jardekon la Partio komencis kondamni nur post junio 1981. Ĝia Centra Komitato, kunvenanta en plena sesio, faris la verdikton “erara de la komenco ĝis la fino”.

La “kultura revolucio” komenciĝis en la printempo de 1966 per tio, kio estis ŝajne ordinara akademia debato en ĵurnaloj kaj gazetoj pri la politika kaj literatura valoro de pekina opero nomata *Deoficigo al Hai Rui*. Jiang Qing, laŭdire inspirita de Mao Zedong,

varbis verkistojn por ataki la dramiston kaj lian scenaron. Unu el ŝiaj dresitaj luĉevaloj estis Yao Wenyan, relative nerimarkinda mezranga funkciulo de la Propaganda Departemento de Ŝanhaja Partia Komitato. Tiu ĉi oportunisto rapide trovis favoron ĉe ŝia grupo, kaj komencis rapidan suprengrimpadon laŭ la politika ŝtupetaro. Fine li fariĝis la gazetara caro. La kritikoj al *Deoficigo al Hai Rui* kondamnis ĝin kiel malican alegoron, kiu aludis la grandulon mem – la prezidanton Mao Zedong. La dramisto Wu Han venis sub severajn atakojn, sed la plena serio da akraj kritikoj estis rezervita por la homo aŭ frakcio, kiu supozeble instigis Wu Han al tio.

Hai Rui estis ĉina folkloro heroo, honesta ŝtaoficisto de Ming-dinastio (1368-1644), ĉiam admirata kiel homo neordinare maltima, malkaŝe-parola, kiu ne hezitis diri al la imperiestro vizaĝo-kontraŭ-vizaĝe, ke tiu estas erara.

Por tiuj, kiuj penis serĉi kaŝitajn signifojn, la historia Hai Rui rememorigis modernan heroon, marŝalon Peng Dehuai (1898-1974), alian homon, kiu ĉiam malkaŝe diris la veron. Naskita al kamparana familio kaj vaste memlerninta, Peng rangaltiĝadis en la KMT-armeo tute per sia kapablo.<sup>3</sup> Li transiris al la komunista flanko pro sia baza justemo kaj simpatio por la ordinaraj popoloj. Sindona komunisto, centprocenta militisto, peng faris bravan servon al la Ĉina Revolucio kaj atingis brilajn militmeritojn en Koreio.

Lia honesteco kaj malkaŝemo kaŭzis lian ruiniĝon. Ĉe la kunveno de la Partia Centra Komitato kunvokita en julio 1959 en Lushan, Jiangxi-provinco, speciale por kritiki la ekstreman maldekstrismon de la “Granda Antaŭensalto”, Peng skribis al Mao Zedon privatan leteron, kiu estigis malfeliĉegon. Ŝajne multe ŝokita de la honesta takso de Peng pri la situacio, Mao turnis la kunvenon en atakon kontraŭ Peng pro ties “kontraŭ-Partia” kaj “kontraŭ-socialisma” konduto. La obstina militisto estis senigita je siaj oficoj de Ministro de Nacia Defendo kaj membro de la Partia Politika Buroo. La kritikoj de Peng fakte estis tute ĝustaj. Ambaŭ agrikulturo kaj industrio estis en serioza malfacileco, kaj la false pligrandigitaj ciferoj kaj fanfaronaj troigoj nur kreis malveran bildon de sukceso,



kiam la vero estis ĝuste la malo. Superaj gvidantoj de la Partio, kiuj jam antaŭe diskutis pri la problemoj de la “Granda Antaŭensalto” ĉe pluraj kunvenoj kaj estis preparitaj elmeti planojn por ĝustigi ilin ĉe la Lusan-a kunveno, estis skuitaj de forta surprizo, trovinte la maljunan marŝalon tiel severe punita nur pro sia kor-elverŝado.

Ĉu ili ĉiuj konsentis pri la direktoŝanĝo de la prezidanto? Ĉu ili ne konsentis pri la takso de Peng Dehuai pri la situacio?

Zhou Enlai, ekzemple, havis dubojn almenaŭ pri la raportitaj ciferoj de la fer- kaj ŝtal-produktado kaj la valoro de “indiĝena-metoda ŝtaligado”, pri kiuj li jam kolektis informojn per siaj propraj kanaloj. Sed nek li, nek liaj kolegoj en la Politika Buroo kuraĝis paroli pri tio. Neniu dubis, tiom malpli kontestis, pri la saĝo de Mao en turno de la konferenco en tute malsaman direkton – jen sinteno kiu ja ne kontribuis al ilia reputacio.<sup>4</sup>

Tiam Mao Zedong jam fariĝis multe tro memfida por la bono de la Partio aŭ la lando. Eĉ en siaj rilatoj kun intimaj kolegoj, membroj de la Politika Buroo, li ŝajnis malpli ol tolerema pri opinioj, kiuj diferencis de liaj propraj. Tia sinteno kontraŭis al lia propra politika filozofio – la amaslinio. Kaj ĝi fariĝis pli serioza kun la paso de tempo kaj pro la flategoj, kiujn li ricevis. De troa memfideco ĝis arbitreco estis nur unu paŝo.

Frue en 1966, tute el sia propra volo, la “granda instruanto” (unu el la epitetoj donacitaj al li de Lin Biao) dronigis la nacion en la katastrofo de la “kultura revolucio”. Post la movado kontraŭ “dekstra oportunismo” en 1959, ligita kun Peng Dehuai, multaj homoj interne de la Partio jam timis dividi siajn pensojn kun aliaj, same kiel en la tagoj post la “kontrau-dekstrula movado” en 1957, kiam homoj ekster la Partio opiniis plej bona teni sian buŝon fermita. Demokratia centralizismo interne de la Partio efektive fariĝis nur

nominala post la falo de Peng Dehuai.

Eĉ en malfavoro, Peng mem ne povis esti timigita. Foje, kiam lia nevino demandis lin, kial li devis preni sur sin la riskon komenti ekonomiajn aferojn, li diris, “Kial mi ne devis? Mi estas partiano, kaj membro de la Politika Buroo. Se mi estas certa, ke io estas erara, en nia ekonomio aŭ iu ajn alia tereno, mi devas levi la aferon, aŭ sonigi averton. Mi ne meritis esti komunisto, se mi tenus mian buŝon fermita.”

Ĉinaj komunistoj devas ne nur atentigi la popolon pri eraroj kaj maljustaĵoj, li diris al ŝi, sed ankaŭ ĝustigi ilin. Al ŝi li detale klarigis la kvin “Ne-timojn” postulatajn al ĉiuj bonaj komunistoj: ne timi esti deoficigita; ne timi esti eksedzigitita disde la edzino; ne timi esti elpelita el la Partio; ne timi esti ĵetita en malliberejon; kaj ne timi esti ekzekutita. “Mi neniam timas eĉ la morton,” diris la maljuna militisto. “Kial do mi devus timi ion ajn? Jen kial mi prenis sur min la riskon.”<sup>6</sup>

Lia kuraĝo poste estis provita eĉ pli severe. Arestita de la fortoj lojalaj al Lin Biao jam en la komenca periodo de la “kultura revolucio”, Peng estis ĵetita en malliberejon kaj foj-refoje turmente pridemandata. La morto lin forprenis, ankoraŭ en malliberejo, en 1974.

En la malfruaj 1970-aj jaroj Peng, kune kun multaj aliaj fame konataj eminentuloj, estis rehonorigita, kvankam postmorte. Deng Xiaoping, kiu mem suferis humiligojn kaj la perdon de libereco dum la “kultura revolucio”, eldiris la jenon en 1980:

*En la unua duono de 1959 ni estis ĝustigantaj la “maldekstrajn” erarojn. Kaj la frua stadio de la Lushan-a kunveno estis dediĉita al ekonomia laboro. Tamen pro la apero de la letero de kamarado Peng Dehuai estiĝis direktoŝanĝo. La opinioj de kamarado Peng estis ĝustaj, kaj por li kiel membro de la Politika Buroo estis normale skribi al la prezidanto. Kvankam Peng havis siajn mankojn, tamen la maniero trakti lian aferon estis tute erara.*

Ĉu la teatraĵo *Deoficigoj al Hai Rui* celis aludi pri Peng Dehuai?

Wu Han (1909-1969), la dramisto, forte neis tion. Li estis unu el la vicurbestroj de Pekino ĉe la eksplodo de la “kultura revolucio”. Efektive li ne estis politikisto, nek dramisto, sed universitata instruisto, profesoro pri historio, rekonita de siaj samfakuloj kiel unu el la tre malmultaj ekspertoj pri Ming-dinastia historio. Li estis plej feliĉa tiam, kiam li fosadis en malnovaj volumoj kaj arkivoj.

Li estus kontenta je sidado super malnovaj folioj, se ne okazus la murdo de Kuomintangaj murdistoj al lia kolego prof. Wen Yiduo (1899-1946), sentima kritikanto kontraŭ la reĝimo de Ĉjang Kajŝek. La murdo en plena taglumo sur la stratoj de Kunming forte surprizis ĉinajn intelektulojn. Ĝi skuis ilin el ilia rutina vivo kaj turnis ilin en probatalantojn de civilaj rajtoj. La batalo farita kontraŭ Kuomintango fine tiris Wu Han kaj aliajn al li similajn al la Komunista Partio de Ĉinio.<sup>8</sup>

Estis ia ironio en la maniero, kiel Wu Han ligiĝis kun la historia figuro de Hai Rui. En 1959, ĝuste antaŭ ol prezidi super plivastigita kunveno de la Partia Politika Buroo en Ŝanhajo (de la 25-a de marto ĝis la 4-a de aprilo), Mao Zedong spektis indiĝenan Hunan-operon, en kies lasta akto aperis Hai Rui, la honesta homo, kiu kuraĝis riproĉi imperiestron. Li estis tre interesita, sendis alporti al li la biografion de Hai Rui kaj diris al la ĉeestantoj de la kunveno, ke ili ĉiuj povas lerni ion de la homo.

Tiam la superaj personoj de la Partio estis diskutantaj kiel plej bone bremsi la fantazian ŝveligon de la produkto-ciferoj kaj la trograndigon pri superhomaj atingoj, kiuj akompanis la “Grandan Antaŭensalton” kaj la naskiĝon de popolaj komunumoj antaŭ la jaro. Ĝuste tian homon kaj tian spiriton ni bezonas, diris Mao pri Hai Rui. Post la Partia

konferenco publikiĝis la alvoko, ke oni imitu la spiriton de Hai Rui. Pluraj proponis, ke Wu Han, la fakulo pri Ming-historio, skribu ion por diskonigi Hai Rui. Wu Han verkis unu mallongan pecon nomatan “Hai Rui Riproças la Imperiestron” por Popola Tagĵurnalo, laŭ la instigo de Hu Qiaomu, membro de la Partia Centra Komitato kaj specialisto en propaganda laboro. Hu antaŭe studis en Qinghua-universitato samtempe kiel Wu Han, kiu estis unu jaron pli juna ol li, kaj poste, de la Yan’an-aj tagoj, servis kiel sekretario al Mao Zedong.

En sia rememoro publikigita en oktobro 1984, Guo Xinhua, antaŭa sekretario de Wu Han, skribis pri unu konversacio kun tiu kelkatempe post la leviĝo de la debato pri la teatraĵo:

*“Kamarado Hu Qiaomu venis min viziti kaj instigis min skribi pri Hai Rui... Li diris, ke estas Mao Zedong, kiu volas nutri la spiriton de Hai Rui ... Peng Dehuai estas generalo, kiu akiris al si la honoron en batalo, kaj mi havas nenion alian krom admiro al la homo ... Sed li havis ja nenian rilaton al mia teatraĵo Hai Rui.”*

Lin Biao, Jiang Qing kaj iliaj aliancanoj baldaŭ direktis siajn atakojn al pli elstaraj oficistoj de la Pekina Partia Komitato – Deng Tuo (1912-1966), la homo, kiu respondecis pri la artoj kaj edukado, kaj iama ĉefredaktoro de *Popola Tagĵurnalo*, la organo de la Partio; kaj Liao Mosha, direktoro de ĝia Unuecfrota Departemento.

Ili kaj Wu Han estis etiketitaj kiel “Malbonaj elementoj”, kulpaj pri “krimoj kontraŭ

la Partio, socialismo kaj Prezidanto Mao”, pri kolportado de “reviziismo” en *Notoj pri la Trifamilia Vilaĝo*, regula rubriko en *Frontlinio*, la dusemajna organo de la Pekina Partia Komitato.

La kalumnio kontraŭ tiuj ĉi intelektuloj estis preludo al aferoj venontaj, tamen la lasta celo de iliaj persekutantoj estis faligi gvidantojn de la Partio kaj registaro, kiuj ne estis en ilia tendaro. La “kontraŭ-Partia, kontraŭ-socialisma, kontraŭ-Prezidanto-Mao-a” kontraŭrevolucia etiketo estis fiksita sur multaj el la elitaj intelektuloj de la nacio. Ĉiuj tiel etiketitaj estis publike kalumnitaj per “grand-ideografiaj afiŝoj”, kiuj estis gluitaj ne nur en iliaj laborlokoj, sed ĉie en la urbo. Plej multaj estis senprokraste eksigitaj, ĵetitaj en malliberejon, aŭ “forekzilitaj” en la kamparon.

“Ruĝaj Gvardianoj” atakis kaj priserĉis la hejmon de Deng Tuo, terure malordigis lian domon kaj ŝmirmakulis aŭ forrabis liajn manuskriptojn. Liaj valoraj skribrulaĵoj, pentraĵoj kaj antikva meblaro estis konfiskitaj. Tio estis la lasta netolereblaĵo por li, homo saturita de la kulturo de la malnovtipa ĉina intelektularo.

Li preferis morton al ofendiĝo kaj humiliĝo, kaj la 18-an de majo 1966, tiu ĉi brila verkisto kaj ĵurnalisto sin mortigis.

Nur unu el la verkistoj de la “Trifamilia vilaĝo” supervivis la teruraĵojn de la “kultura revolucio” – Liao Mosha, la malplej konata el la tŝrio. Dum la daŭro de ĉirkaŭ unu jaro post la morto de Deng Tuo, Liao Mosha kaj Wu Han estis parigitaj por “Batalkunveno al alia, elmontrataj sur la estrado kvazaŭ cirkaj bestoj, kun la kapo klinita malsupren antaŭ la spektantaro kaj la manoj torditaj kaj kunligitaj de la “Ruĝaj Gvardianoj” malantaŭ la dorso. Ili estis pridemandataj kaj ordonataj konfesi siajn “krimojn”. Wu Han, kiu longe vivis la kvietan vivon de universitata profesoro, baldaŭ pereis en malliberejo. Liao Mosha suferis ok jarojn da punado, kio estis la sorto de la plejparto el la malliberigitaj intelektuloj. Kvankam li kun ruinigita sano eliris el karcero kaj post estis sendita al punlaborejo en la sud-Ĉinia provinco Jiangxi, li tamen ĝisvivis la tagon de repago kaj estis unu el la procesaj atestantoj ĉe la speciala tribunalo starigita en Pekino en novembro 1980 por juĝi Jiang

Qing kaj ŝiajn sekvantojn.

En la okuloj de Lin Biao kaj Jiang Qing, tiaj personoj, kiaj Wu Han, Deng Tuo kaj Liao Mosha, estis personoj malgrandaj, kies elimino estis grava nur ĝis la grado, en kiu ili formis travadŝtonojn por formovo de pli grandaj objektoj. Precipe kvar homoj en la unuaj tagoj de la “kultura revolucio” estis ĉe la kapo de ilia listo por esti atakitaj: Peng Zhen, membro de la Politika Buroo kaj la homo numero unua de la Pekina urba regisaro; Luo Ruiqing, iama ministro de Publika Sekureco, supera generalo de la Popola LiBeriga Armeo kaj estro de Ĝia Ĉefstabo; Lu Dingyi, alterna membro de la Politika Buroo, vicĉefministro kaj direktoro de la Partia Propaganda Departemento; kaj Yang Shangkun, membro de la Partia Centra Komitato kaj ĝia sekretariato kaj direktoro de la gravega Ĝenerala Oficejo de la Partia Centra Komitato.

Unu plivastigita kunveno de Politika Buroo estis kunvokita en Pekino de la 4-a ĝis la 26-a de majo 1966. la kunvenon superprezidis Liu Shaoqi, tiama vicprezidanto de la Partio, en la foresto de Mao Zedong, kiu feris for de la ĉefurbo. Sed la tagordo estis decidita de Mao antaŭ lia forveturo, kaj la kunveno en efektiveco estis tenata en la manoj de Lin Biao, Kang Sheng, Chen Boda kaj Zhang Chunqiao.

Peng, Luo, Lu kaj Yang estis akuzitaj pri organizado de kontraŭ-Partia kliko, kaj estis denunciataj, eksigitaj kaj arestitaj sen precizaj akuzoj. La falo de la homoj, kiuj okupis ĉiu sian gravan pozicion de respondeco en Pekina potencostrukturo, estigis skuajn ondojn tra la tuta lando. Pli grave kaj eble ankaŭ misaŭgure, la kunveno akceptis kion oni nomis la “Cirkulero de ka 16-a de Majo”, redaktita kaj tekstofiksita de Mao mem, kiu regadis de malproksime la operaciojn de la burĝonanta “kultura revolucio”.

En unu paragrafo troviĝis mencio pri “Ĥruŝĉov-tipa persono dormanta en nia mezo”. La lingvaĵo uzita estis tiel ĉirkaŭparoleca, kaj la signifo tiel ambigua, ke neniu, eĉ ne Liu Shaoqi, Zhou Enlai kaj Deng Xiaoping, havis ian ajn ideon, kiu aŭ kio estas aludita. Ili estis tenataj en nesciado pri multo el tio, kio estis efektive okazanta (ekzemple la decido publikigi la unuan grandideografiaĵaj afiŝoj), ĉar Lin Biao kaj lia aro da konspirantoj, ĝuante konfidon de la prezidanto, tenis rektan linion de komunikado kun li. Tio estis netolerebla situacio, kaj Liu Shaoqi estis devigita peti la prezidanton reveni al Pekino, kion tiu faris en la 18-an de julio.

Ŝanĝiĝoj gravedaj je teruraj rezultoj sekvis el tiu ĉi eksterordinara kunveno kaj la reveno de Mao. Unue, la eksigo de la kvar homoj sen ia ajn konsiderinda kontraŭstaro akcelis la falon de Liu Shaoqi kaj Deng Xiaoping, nun ankaŭ akuzitaj pri estrado de “burĝa” stabejo en rivalado kun, se ne en kontraŭstaro al, la “proleta” stabejo de Mao. Due, kun la starigo de la “gvida grupo de la kultura revolucio”, kies vicĉefo Jiang Qing, la edzino de Mao, estis nomumita, ŝi ekokupis centran scenejon anstataŭ atendi en la kuliso. Enj la tempo de la “plivastigita kunveno” de la Politika Buroo ŝi ne estis eĉ membro de la Partia Centra Komitato kaj ludis nenian oficialan rolon, sed nun ŝi ordonis kaj instrukiis. Trie, ĉar tiu ĉi gvida grupo estis respondeca rekte antaŭ la malgranda nombro da membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo, Jiang Qing kaj ŝia koterio povis eviti la Partian sekretariaton kaj Politikan Buroon por fari laŭplaĉe. Kvare, la eniroj de la “Ruĝaj Gvardianoj” en la ĉeŝfluo de politika vivo estis faktoro malordiga kaj detrua, kiu disĵetis la leĝon kaj ordon al la ventoj kaj ĵetis Ĉinion en ĥaoson. Pli ol iu ajn alia supera gvidanto, Zhou Enlai kiel ĉefministro devis preni sur sin multon el la premo en la kritikado al siaj

kolegoj kaj subuloj, krom sia kutima peniga laborŝarĝo.

La termino “Red Guard” (Ruĝa Gvardiano) eniris en la anglan lingvon nur kun la apero de la “kultura revolucio” de Ĉinio. La brita *Concise Oxford dictionary (Konjca Oksforda Vortaro)* (sepa eldono, 1982) difinis Red Guard kiel “junan aktivulon en Komunista Ĉinio”. La usona *Webster’ Ninth New Collegiate Dictionary (Vebstera Naŭa Nova Kolegia Vortaro)* (1983) nomis Red Guard “membro de organizaĵo de dekelkjaraj aktivuloj en Ĉinio servantaj al la Maoista Partio”. La kerna vorto estis “aktivulo”. Estante plejparte dekelkjaraj, energiaj sed naivaj, lojalaj al tio, kion ili konsideris la socialisma afero, sed ne havantaj sufiĉe da politika kompreno, ili estis senhonte manipolataj kaj fariĝis sturmaj trupoj por Lin Biao kaj Jiang Qing, kiuj ameme nomis ilin “etaj generaloj”. Neniu povas esti certa, kiam, kie, kiel ĉio ĉi komenciĝis, sed la “ruĝaj gvardianoj” multiĝis en “ribelo estas pravigebla”. Tiam estis someraj ferioj kaj ili kun muĝo sin ĵetis en ribelon – unue kontraŭ la lernejoj aŭtoritatoj, siajn instruistoj, kaj poste, en la socio, kontraŭ ĉio, kio al ili ne plaĉis.

La 18-an de aŭgusto Mao Zedong akceptis la salutojn de Pekinaj “Ruĝaj Gvardianoj” kolektiĝintaj sur Tian’anmen-placo, kio donis al la junuloj ian gravecon. Aliaj en la lando petis la saman privilegion. En la mallonga tempopeco de unu monato, dek milionoj el ili kunvenis en Pekino por ricevi la “benojn” de Mao. El ĉiuj anguloj de la lando ilia vojaĝo al la ĉefurbo metis la departementojn de transportado, precipe la fervojajn servojn, sub grandegan premon. Ĉefministro Zhou subite trovis milionojn da junuloj sub sia prizorgado – ili ĉiuj samtempe bezonis loĝadon, nutradon, kaj iuj eĉ vestaĵojn (pro manko de vesto por ŝanĝo aŭ de pli varmaj vestoj). Ruĝa brakrubando portanta la vortojn “Ruĝa



Gvardiano” paradis kiel senpaga pasbileto, kaj ĉiuj, kiuj havis tian sur sia brako, rigarids sin kiel gastojn de Prezidanto Mao. Ili senpage veturis, senpage loĝis, senpage sin nutris, senpage sin amuzis – ĉio, kompreneble, estis je la registara kosto.

Post tio efikis, nenia haltigo al tiuj ĉi junuloj. Ribelo jam fariĝis tiama moro, kontraŭ iu ajn persono kaj loko. Ekscesoj estis teruraj. Mao, kiu vokis la junulojn al ribelo, rapide modifis la sloganon jene: Ribelo kontraŭ reakuloj estas pravigebla.” Sed la damaĝoj jam estis faritaj. Kiu do decidu, kiaj homoj aŭ aferoj estas reakciaj, tio efektive ne estis difinita. Multaj junuloj prenis la decidojn en sian propran manon. Ĉiaokaze, al Lin Biao kaj Jiang Qing ja ne plaĉis bridi la “Ruĝajn Gvardianojn.”

Unu afero, kiu alarmis Zhou Enlai dum la “Ruĝaj Gvardianoj” daŭrgis la furiozadon, estis la probableco, ke multaj patriotoj kaj politike eminentaj personoj kun aŭ sen partia aparteno povas esti atakataj aŭ ofendataj. Tiuj ĉi estis homoj, kiujn la Komunista Partio klopodis gajni dum la jaroj kiel parton de la unuecfronto, kiu helpis al la revolucio atingi la venkon kaj ludis gravan rolon en la ekonomio, kulturon kaj socia vivo de la lando. Por Zhou Enlai, kiu laboris pli energie kaj faris pli multe ol aliaj por starigi la unuecfronton, ĝia konservado estis dua instinkto.

Frue en la mateno de la 30-1 de aŭgusto li ricevis de Prezidanto Mao urĝan noton alfiksitan al unu raporto. La noto tekstis: “Transdonu tiun ĉi al la ĉefministro, ke konvena aranĝo estu farita laŭ lia bontrovo. Li devas esti protektata.”. “Li” estis Zhang Shizhao (1881-1973) el Changsha, Hunan-provinco, iama leĝisto, malnova amiko de la prezidanto, kiu haste skribis leteron samdatan, plendante pri la priserĉado de sia hejmo fare de “Ruĝaj Gvardianoj” en la antaŭa nokto. Tuj ekaginte, la ĉefministro senindulge riproĉis tiujn

respondecajn por la leĝrompo, ordonis, ke la raraj libroj kaj valoraĵoj konfiskitaj estu redonitaj al sia posedanto, kaj sendis PLA-soldatojn por gardi la hejmon de Zhang Shizhao. Zhou ankaŭ prenis pluajn antaŭrimedojn. La noto de Mao Zedong servis kiel ĝustatempa katalizilo por grandigi la amplekson de la homoj protektendaj.<sup>11</sup> Li decidis tuj kompili protekto-liston, kiu inkluzivis tiajn eminentajn nomojn, kiaj Soong Ching Ling (la vidvino de d-ro Sun Yat-sen), poeto, historiisto kaj verkisto Guo Moruo, Li Zongren (antaŭa aganta prezidento de la Kuomintanga reĝimo, kiu revenis al la hejmlando en la somero de 1965), kaj multaj aliaj sur diversaj kampoj.

La protekto-listo de la 30-a de aŭgusto 1966 de la ĉefministro estis plue pligrandigita, tiel ke ĝi inkluzivis la vicprezidantojn de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso; membrojn de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la vicprezidantojn de la Popola Respubliko; ministrojn kaj vicministrojn de la Ŝtata Konsilantaro; vicprezidantojn de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco; vicĉefministrojn de la Ŝtata Konsilantaro, gvidantojn de la diversaj demokratiaj partioj; kaj la prezidanton de la Plejsupera Popola Juĝejo kaj la ĉefprokuroron de la Plejsupera Popola Prokurorejo.

La atento de Zhou estis altirita al la famo, ke la “Ruĝaj Gvardianoj” planas sieĝi la hejmon de Soong Ching Ling kaj postuli, antaŭ ĉio, ke ŝi ŝanĝu sian hararanĝon (ĉiuj tri tratinoj de Soong-familio kutime portis sian hararon aranĝitan en tubero laŭ la deziro de sia patrino). Zhou Enlai tuj kunvokis Pekinajn “Ruĝajn Gvardianojn” kaj ilin persvadis, kvankam li povus simple doni ordonon. Lia parolo kun la “Ruĝaj Gvardianoj” estas unu ekzemplo de tia pacienca persvado, kian Zhou Enlai uzis foj-refoje anstataŭ administra

devigo dum la “kultura revolucio”.

Soong Ching Ling – ŝi estas la vidvino de d-ro Sun Yat-sen. La elstara kontribuo de d-ro Sun Yat-sen al la lando estis rekonfirmita de Prezidanto Mao en la grava artikolo *Pri Popol-demokratia Diktaturo* skribita post la liberiĝo de Pekino. Lia elstara atingo ankaŭ estis gravurita sur la Monumento al la Popolaj Herooj. Ke studentoj en Nankino volas detruigi la bronzan statuon de d-ro Sun Yat-sen, tio ne estas prava. Ni absolute opinas kontraŭ tio. En la Unua de Majo kaj la Nacia Festo (la unua de oktobro) ĉiujare ni pendigas portreton de d-ro Sun Yat-sen kontraŭ Tian’anmen-pordego – tio estas ideo de Prezidanto Mao. Kiel burĝa revolucia gvidanto d-ro Sun Yat-sen havis siajn meritojn kaj ankaŭ mankojn.

De kiam lia vidvino komencis kunlabori kun ni, ŝi neniam klinas la kapon al Ĉjang Kajŝek. Post la malsukceso de la Granda Revolucio, ŝi iris eksterlanden. Ŝi savis la vivon de subteraj laborantoj de nia Partio. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito ŝi laboris en ligo kun ni. Dum la Liberiga Milito ŝi havis por ni simpatian. Ŝia kunlaborado dum la longaj jaroj estas konsekvenca, konstanta de la komenco ĝis la fino. Ni devas respekti ŝin. Nun ŝi grandaĝiĝis. Ĉi-jare ni memorigos la centjaran datrevenon de la naskiĝo de d-ro Sun Yat-sen kaj ŝi skribos artikolon ĉe al okazo, kio havos internacie grandan influon. Do alglui grand-ideografiajn afiŝojn al ŝia hejmo – tio ne estos deca. El ŝia familio kun tri fratoj kaj tri fratinoj, neniuj krom ŝi prenis la vojon de revolucio. La fakto, ke ŝia pli juna fratino edziniĝis al Ĉjang Kajŝek, neniel povas esti motivo por ŝin renversi. La domo, en kiu ŝi loĝas, estis metita de la ŝtato sub ŝian disponon. Iuj diris: “Mi ne timas tion diri, mi ne timas tion fari, kaj, kiel ajn estos, ni iros tien.” Tio estas malprava. Ĉiaokaze ni devas

dekonsili ilin de tio.<sup>13</sup>

La interveno de Zhou Enlai en la ĝusta tempo nebligis tion, kio povus esti terura vizaĝ-kontraŭ-vizaĝa konflikto, metanta en troan streĉitecon la longe-ekzistantan konkordon kun Soong Ching Ling, kiu staris kiel simbolo de la kunlaborado de d-ro Sun Yat-sen kun la Komunista Partio. Dum pli ol duona jarcento Zhou kaj lia edzino faris sian plejblon por plifortigi tiujn ĉi ligilojn de amikeco, starigitajn parte sur persona bazo, sed plejparte en la intereso de la Komunista Partio. Tiu ĉi neskribita alianco, neordinara en tio, ke ĝi ligis individuon kun organizaĵo, eltenis la elprovon de la tempoj, precipe en la jaroj post la disiĝo de Kuomintango disde la komunistoj. La interrilato de Ĉjang Kajŝek kun lia bofratino, la vidvino de la fondinto de la Respubliko, estis tiel delikata, almenaŭ por tiel diri, ke ĝi povis rompiĝi en ĉiu momento. Nombro da ekstrem-dekstraj membroj de Kuomintango rigardis ŝin kiel dornon en la karno kaj volus ŝin murdi. La persona sekureco de Soong Ĉing Ling do neniam estis for el la pensoj de Yan'anaj gvidantoj, precipe de Zhou Enlai, kiu konservadis linion de komunikado kun ŝi pere de la subtera Partio en Ŝanhajo, iafaĵe tra Hongkongo.

Ĝuante altan estimon de Mao Zedong kaj Zhou Enlai, fakte de homoj de ĉiuj rangoj kaj okupoj, Soong Ching Ling ludis gravan rolon en la registaro de la nova Ĉinio, kiun ŝi helpis fondi. Kiel ĉiu alia, ŝi estis surprizita de la krueleco de la “kultura revolucio”, kiam ĝi ekaperis sur la politika horizonto. Ŝi malĝojis pro tio, kio estis okazanta al tiuj, kiujn ŝi konis kaj respektis, sed ŝi povis fari nenion por influi okazaĵojn. Dum Zhou Enlai, kiel kutime, zorgis pri tio, ke Soong Ching Ling mem ne estu kompromitita, ŝi fordistanĉigis sin de la politikaj elsaltuloj, kiuj arogis al si potencon kaj misuzis siajn poziciojn por

malutili al la lando. Dum multa tempo de la “kultura revolucio” Soong Ching Ling tenis sin for el la lumrondo.

Zhou Enlai havis multajn aliajn okazojn dum tiu ĉi periodo por praktiki sian politikan kapablon. En la fruaj tagoj de la “kultura revolucio”, ekzemple, la personaro de la Pekina Hotelo kiel tiu de aliaj institucioj, organizaĵoj kaj entreprenoj, estis dividita en du partiojn inter si kontraŭstarantajn. Administrado malstreĉiĝis kaj servoj estis en ĥaosoj. Neniu volontis, ekzemple, ciri la ŝuojn de gastoj. Ribelo furoris, kaj la servantoj komencis forlasi laborojn, kiajn ili malemis fari. Cirado de ŝuoj por gastoj estis rigardata kiel servo malnobliga, de kiu oni devas sin liberigi. Ĉu ne Jiang Qing kaj la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio” vokis junulojn leviĝi kaj ribeli kontraŭ “burgaj” kutimoj? Ĉi tie en tiu ĉi hotelo, tiel opiniis la junuloj inter la hotelaj laborantoj, estis multaj kontraŭribelendaĵoj. La stato nebrideble malboniĝis, kaj la afero vekis la atenton de Zhou Enlai.

Li kolektis la hotelan personaron kaj parolis al ĝi pri ĝustaj sintenoj al laboro kaj pri malsamaj manieroj de servado al la lando. En la socialisma socio, diris la ĉefministro, estas divido de laboro, same kiel en kapitalisma lando. La diferenco inter la du sistemoj estas, ke sub socialismo ĉiu estas egala kaj la laboro, kiun oni faras, estas nek aparte nobliga, nek aparte malnobliga. Oni devas fari sian plejblon, kaj se la laboro postulas ciri ŝuojn por hotelaj gastoj, do oni devas fari tion kiel eble plej bone. Ne konsideru la diferencojn. Zhou Enlai alvokis al ili. Laboru kune kaj faru kion la profesio postulas. Se vi ankoraŭ ne volas ciri ŝuojn por la gastoj, do mi devas veni por fari tion anstataŭ vi.

La parolo trafis ilian koron. Servoj pli aŭ malpli renormaliĝis. Kvankam la du partioj, kiel ĉiuj tiaj partioj en la lando, ne metis finon al sia malakordo ĝis multe poste.

Zhou Enlai povis teni Soong Ching Ling kaj aliajn en sekureco dum la “kultura revolucio”, sed en aliaj okazoj li ne povis interveni. Unu tia ekzemplo estis tiu pri Ma Sicong, aŭ Sitson Ma, kiu homo estis pli fame konata en Okcidentaj muzikaj rondoj. Zhou jam konis Ma en Chongqing en la lastaj 1930-aj kaj fruaj 1940-aj jaroj, kiam li instrukiis al subteraj membroj de la Partio laborantaj en artaj rondoj, ke ili proksimiĝu al Ma, ĉar li opiniis la homon tre gajninda al la komunista flanko.

Unuaranga violonisto kaj eminenta komponisto, Ma havis multajn eblajn elektojn antaŭ si en la printempo de 1949, kiam Pekino invitis lin partopreni en la Unua Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, okazigota en la liberigita norda Ĉinio. Li povus fari novan komencon en Tawan, kie la aŭtoritatoj proponis al li la plej honoran muzikan postenon. Li povus reveni al Eŭropo, kie li povus fari elekton el multaj laboroj laŭ sia bontrovo. Aŭ li povus resti en Hongkong, nur je mallonga distanco de sia malnova hejmo en Haifeng, Guangdong-provinco. Sed li kaj lia edzino, pianistino Wang Muli, decidis aliĝi al siaj komunistaj amikoj.

Ma, tiam nur tridekokjara, estis nomimita direktoro de la Centra Konservatorio, kaj la nomumo estis persone aprobita de Zhou Enlai. Alta salajro kaj iaj privilegiaĵoj respondis al la ofico – grandspaca domo, aŭtomobilo kun ŝoforo, kaj kuiristo por kuirado por la familio. Li estis elektita al la tutlanda Popola Kongreso, li estis vicprezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondoj kaj vicprezidanto de la Asocio de Ĉinaj Muzikistoj.

Ĉio ĉi tio faris lin ekstreme loganta celo al la “Ruĝaj Gvardianoj” en la komenca periodo de la “kultura revolucio”. Li estis mokata kaj atakata en grand-iideografiaj afiŝoj kiel “reakcia aŭtoritatulo pri muziko”, lia enspezo estis draste reduktita, li estis forpelita el

sia hejmo (kiu jam estis traserĉita kaj prirabita) kaj sendita al reten-centro ĉe de Kolegio de Socialismo. Ma estis trenata al “batal-kunvenoj” antaŭ siaj propraj studentoj, nun ebriaj de revolucio. Ĉar, kompare kun kamaradoj-studentoj de la Ŝanhaja Konservatorio, kie kelkaj el la instruistoj laŭdire jam “mortis pro malhonoro”, ili havis nenian grandan “venkon” por fanfaroni.

Laŭ la raportoj de vidintoj, unu el la unuaj aferoj, kiujn la studentoj faris, estis razi la kapon de Ma tiel, kvazaŭ li estus malliberulo. Li estis bategita ĝis sangado. La enfermo kaj insultado al li daŭris tiom longe, ĝis la fama muzikisto serioze konsideris sinmortigon. Li estis deadmonita for de tio de sia maljuna kuiristo Jia Junshan, varmakora homo kun forta justsento.

Jia tenis kontakton ankaŭ kun Wang Muli, la edzino de Ma, kiu kun siaj infanoj jam kaŝiĝis ĉe parencoj en Guangzhou.

En Guangzhou, kiu estas je 3-4-hora veturo for de Hongkong, la unua haltejo al la ekstera mondo, cirkulis multaj rakontoj pri tio, kiel homoj, por eskapi de la teruraĵoj de la “kultura revolucio”, povas forfuĝi per vojo tera aŭ mara – por ia prezo. Post multa pripensado la familio decidis submeti sin al la risko. Ma mem povis aliĝi al ili tiam, kiam en novembro 1966 li kaj aliaj membroj de la fakultato estis permesitaj reveni hejmen. Kun la helpo de Jia Junshan, kaj dank’ al parto el lia ŝparaĵo, Ma kaj liaj familianoj ja efektivigis sian eskapon en malgranda boato.

Ilia forkuro estis deklarita kiel “ŝtatperfido”. La privata posedaĵo de la familio estis konfiskita kaj ĉiuj komponaĵoj kaj partituroj de Ma estis malpermesitaj. Pluraj homoj estis implikitaj, inter ili Jia Junshan, kiu estis enkarcerigita por kvar jaroj pro helpo al la

fuĝintoj.

Zhou Enlai havis tre malsaman opinionon, kiun li esprimis en sia konversacio kun vizita usona delegacio. “Mi havas du bedaŭrojn en mia longa kariero,” li diris al ili. “Unu koncernas Ma Sicong. Kiam li estis jam en la aĝo de pli ol kvindek jaroj, li devis forlasi la patrujon kaj vivi eksterlande. Tio estas plej bedaŭrinda.”<sup>14</sup> La viktimoj de persekutato reagis en malsamaj manieroj. Iuj sin montigis, kiel Deng Tuo kaj Tian Jiaying, sekretario de Mao. Aliaj, kiel ekzemple Ma Sicong kaj liaj familianoj, forkuris el la lando. Plej multaj faris ian pasivan reziston. Ĉi tie menciinda estas Zhang Zhixin, virino trideknaŭjara, ordinara laborantino de Partia oficejo, pri kiu oni neniam antaŭe aŭdis, ĝis ŝia afero skuis la konsciencon de la nacio. En rekta kaj simpla maniero ŝi sentime alvizaĝis siajn akuzantojn kaj batalis kontraŭ ili ĝis sia lasta spiro.

Kolegio-edukita, la patrino de du malgrandaj infanoj, Zhang estis virino milda, kiu ludis la violonon. Ŝi devenis el malriĉa familio en Tianjin en norda Ĉinio. Ŝi prenis serioze sian partianecon, malsame ol iuj, kiuj vidis en ĝi nur vojon al politika avanco. Kiam temis pri defendo de la vero, ŝi estis neŝancelebla.

Zhang Zhixin estis malalt-nivela funkciulino de la Liaoning-provinca Partia Komitato en Shenyang, kiam ŝi estis akuzita pri absurda “krimo de penso” – precize, “ke ŝi malkonsentis kun Jiang Qing kaj distordis la interpreton de Jiang Qing pri marksismo kaj Maozedong-penso.” Zhang ne malkonfesis tion. Ŝi publike diris, ke Jiang Qing estas erara, ke ŝiaj agoj estas kontraŭ principoj de la Partio. Ŝiaj senperaj superuloj admonis ŝin; ŝiaj amikoj konsili ŝin diri al neniuj siajn pensojn. Venis avertoj de la provinca Partia organizaĵo, ke tia opono kontraŭ Jiang Qing signifas oponon kontraŭ Prezidanto Mao. Sed tiuj ĉi



premoj ne povis hezitigi Zhang. Ne ŝiaj opinioj, ŝi respondis, sed tiuj, kiuj tordis ilin, kontraŭis al la proletara stabejo. Ŝi dubis pri la rajto de Jiang Qing esti proparolanto de prezidanto Mao. La vane penantaj aŭtoritatoj de la Partio sendis ŝin al Kadra Lernejo de la 7-a de Majo (en efektiveco punlaborejo). Sed oni ankaŭ promesis al ŝi indulgon, se ŝi reprenos siajn dirojn.

Nek perforta devigo, nek kaĵolo povis ŝanĝi ŝiajn opiniojn, kaj ŝi estis trenita antaŭ neregulan tribunalon kiel aganta kontraŭrevoluciulino. Oni ne permesis al ŝi paroli ĉe la proceso, timante, ke ŝi povus turni la situacion malfavore al siaj persekutantoj.

Zhang estis senprokraste kondamnita al morto. La mortpuno estis plenumita la 5-an de aprilo 1975 sen informo al ŝia familio.

La detaloj de ŝia morto tremigis la tutan landon, kiam ili estis malkovrita post la falo de Jiang Qing. Timante, ke ŝi povos krei sian spiton kaj denunci Jiang Qing ĉe la morto, ŝiaj ekzekutantoj tranĉis al ŝi la trakeon je minutoj antaŭ ol ŝi estis trenita antaŭ grupon da pafmortigantoj. Poste ŝia nomo fariĝis konata al ĉiuj familioj, glorata kiel martiro kaj memorigata kiel simbolo de rezistemo.

Tamen la oportunistoj efektive celis pli grandajn ĉasaĵojn – ekzemple Liu Shaoqi. Malsupera nur al Mao Zedong en la Partia hierarkio, Liu estis supera al ĉiuj aliaj membroj de la Politika Buroo, inkluzive de Zhou Enlai, kaj cetere plenumis la oficon de ŝtatestro. Li estis akuzita pri estrado de “burĝa stabejo”, kune kun Deng Xiaoping, la ĝenerala sekretario de la Partio, kaj pri kondukado de Ĉinio en la marĉon de reviziismo kaj kapitalismo.

La plejparto el la superaj personoj de la Partia hierarkio havis siajn rezervojn, se ne

plenan malaprobon, pri la “kultura revolucio”. Unuflanke ĝi estis tiel subita, tiel nova, tiel malsama de la pasinta praktiko; aliflanke ĝi ŝajnis direktita ĉefe kontraŭ tiaj homoj, kiaj ili mem. Kvankam ĉiuj altranguloj partoprenis en la amaskunvenoj sur Tian’anmen-placo por montri, kiel postulate, la solidarecon de la Partio, tamen ĉiu el ili, inkluzive Liu Shaoqi, kaŝis en si propran opinion rilate al tio, ĉu li vere subtenas la movadon.

Taktoplena kiel kutime, Zhou Enlai metis ian respektan distancon inter li mem kaj la ruza Lin Biao, kiu estis pli entuziasma ol iu ajn alia en laŭdado al Mao Zedong kaj la “kultura revolucio”. Dum Lin Biao postulis, ke ĉiuj dediĉu sian tutan forton al la revolucio iniciatita de la prezidanto, la sagaca Zhou Enlai sugestis bezonon pri modereco, citante kaj eksplikante iujn ordinarajn principojn de la Partio enj nerekta kaj nesintruda maniero por meti dampilon sur la fajran bombaston de Lin. Lia parolado en la mezo de septembro al “Ruĝaj Gvardianoj” el la Politeknika Instituto de Harbin, nordorienta Ĉinio, kiuj venis al Pekino por raporti al li pri sia situacio, metis emfazon kiel sur la laŭdindan, tiel ankaŭ sur la nelaŭdindan flankon de la laboro de la Partio kaj la registaro. Atingoj, li diris, superpezis mankojn dum la dek sep jaroj de post la fondiĝo de la Popola Respubliko. La subdiro estis – esti analizema kaj ĝuste taksi proporcion. Tio estis ĉio, kion li povis fari, por esprimi sian vidpunkton pri evito de ekstretoj, sen esti atakata de Mao kaj Lin.

Mao Zedong tenis la kompason kaj kredeble sciis, kien li volas direkti la movadon. Sed Liu estis konfuzita, kaj kvankam li ne komplete perdis sian orientiĝon, li tamen ne sciis, kien antaŭeniri. Li estis malkaŝema al si mem kaj sia aŭdantaro, kiam li faris sian lastan publikan paroladon ĉirkaŭ la fino de julio. Rilate la demandon kiel daŭrigi la “kulturan revolucion”, li diris al kunveno de kadroj en la Popola Halo: “vi havas nenian

ideon, nek komprenon. Vi volas, ke mi diru al vi kiel fari tiun ĉi revolucion. Sincerdire mi ne scias, ne aliaj kamaradoj de la Partia Centro, laŭ mi, havas ian ajn ideon.” Ĝuste unu semajnon poste, la 5-an de aŭgusto, Mao Zedong, publikigis sian unuan kaj solan grandideografiaĵan afiŝon “Bomkbardi la Stabejon”. La celo estis klara: ĝi estis la “burga” stabejo, kies ĉefo supozeble estis Liu Shaoqi.

Entute ĉirkaŭ cent akuzoj estis faritaj kontraŭ Liu Shaoqi. Unu absurda akuzoj estis, ke li kaj lia edzino Wang Guangmei vivis luksan vivon. Laŭ instrukcio de Jiang Qing, “Ruĝaj Gvardianoj” el Qinghua-universitato trenis Wang al “Batal-kunveno” kun rozario da tablotenisaj pilketoj ĉirkaŭ ŝia kilo, ĉar ŝi portis unu perlan kolĉenon dum formala vizito kun sia edzo al Indonezio en 1963. efektive, la kolĉeno estis prunteprenita kaj kelkaj novaj vestoj faritaj nur sub la instigo de la Etiketa Departemento de la Ministrejo de eksteraj Aferoj.

Naskita en la sama jaro (1898) kiel Zhou Enlai, Liu Shaoqi kaj lia samaĝulo aliĝis al la Komunista Partio pli-malpli samtempe, unu en Ĉinio kaj la alia en Francio. Ankaŭ Liu dum la plejparto de sia vivo estis profesia revoluciulo kaj dividis altan prestiĝon kun la aliaj gigantoj: Mao Zedong, Zhou Enlai kaj Zhu De. Elstara organizanto kaj la aŭtoro de multaj marksismaj verkoj el kiuj la plej fama estis lia *Kiel Fariĝi Bona Komunisto*, Liu Shaoqi eminentis tiel subtera Partia gvidanto en blankaj (Kuomintangaj) regionoj dum dudek jaroj kun interrompoj.<sup>15</sup> Lia granda fortaĵo estis lia kapablo teni sian aplomban kaj analizan forton kaj politikan ekvilibron en malfacilaj kaj danĝeraj situacioj. Li estis nomumita politika komisaro por helpi al la aganta komandanto Chen Yi reorganizi la fortojn de la Nova Kvara Armeo, kiu estis perfide atakita de Ĉjang Kajŝek en suda

Anhui-provinco en januaro 1941. li bone plenumis la taskon pligrandigi la disigitajn fortojn de la Partio en Kuomintangaj regionoj, malproksime de ilia Yan'an-a ĉefstabejo. Zhou Enlai iam diris pri li: "En la historio de la Partio Liu Shaoqi neniam eraris en krizaj tempopunktoj." La vortoj esprimis altan admiron de unu granda revoluciulo al alia.

La falo de Liu Shaoqi estis rapida. Per Partia rezolucio akceptita en 1968 Liu Shaoqi estis kondamnita kiel "renegato, malamika agento kaj laborist-perfidulo" kaj li kaj lia familio estis forpelitaj el sia hejmo en Zhongnanhai. Liu kaj lia edzino estis enkarcerigitaj en apartaj malliberejoj en Pekino, kaj denunciataj en foresto en "batal-kunvenoj", ĉe kiuj liaj kamaradoj, inter ili precipe Deng Xiaoping, iafoje lin anstataŭis.

Poste, la 17-an de oktobro 1969, Liu Shaoqi estis sekrete veturigita per aviadilo al Kaifeng, Henan-provinco, por esti tenata en izoleco en apartigita konstruaĵo de la registaro. Estante diabetulo, kiu estis trafita ankaŭ de pneŭmonio, li estis en sanstato netaŭga por vojaĝo kaj li estis alportita sur brankardo. Kvar semajnojn poste, la 12-an de novembro, la antaŭa ŝtatestro mortis je kvarono antaŭ la sepa en malvarma mateno, nur lia karcergardisto estis kun li en liaj lastaj momentoj. Lia edzino kaj infanoj ne estis informitaj, kaj tute ne sciis, kie li estas. nur 11 jarojn post sia morto Liu Shaoqi estis plene rehonorigita, kaj oni donis al li ŝtatan funebran solenon. Ĉu Mao Zedong devis parte respondeci pri la morto de Liu Shaoqi? Eble jes, ĉar li kreis la kondiĉojn por la persekutado al Liu Shaoqi (kaj Deng Xiaoping) per la grand-ideografiaĵa afiŝo "Bombardi la Ĉefstabejon" kaj ĉar li aprobis en 1968 la rezolucion de la Partio, kondamnanta Liu Shaoqi kiel "renegaton, malamikan agenton kaj laborsitperfidulon". Tamen Mao estis perpleksa, kiam temis pri la demando ĉu renversi veteranajn kadrojn aŭ nur kritikadi ilin.

Jen citaĵo el Deng Xiaopin: “Ni ne povas diri, le li partis nenian respondecon por la intensigita persekutado al veteranaj kadroj, kiu poste okazis, sed li ne estis la sola por esti kulpigita. En kelkaj okazoj persekutoj estis jam faritaj de Lin Biao kaj la “kvarpersona bando”, dum en aliaj ili okazis post la dorso de Mao. Malgraŭ tio, oni devas diri, ke la renverso de granda nombro da kadroj estis unu el la plej grandaj tragedioj de la lastaj jaroj de kamarado Mao Zedong.”<sup>16</sup>

Tio, kio okazis al Bo Yibo, kiu antaŭe intime kunlaboradis kun Liu Shaoqi en regionoj regataj de Kuomintago, estas alia ekzemplo pri tio, kiel Zhou Enlai uzis sian pozicion por protekti kamaradojn en malfeliĉo.

La 18-an de aŭgusto 1966 Mao Zedong kaj aliaj plejsuperaj gvidantoj kolektiĝis sur la tribuno de Tian’anmen-pordego por revui paradon de “Ruĝaj Gvardianoj” – la unua el ok tiaj okazoj. Zhou Enlai, perceptante la plifortiĝantan ŝtormon, tiris Bo Yibo flanken kaj flustris: “Yibo, tio ĉi estos severa provo. Vi devos elporti kiel vi povos.” Ĉar per la kanalo de onidiroj liaj helpantoj jam ricevis informon, liaj helpantoj jam ricevis informon, ke Lin Biao, Jiang Qing kaj Kang Sheng intencas persekuti tiujn, kiujn ili nomis “perfiduloj”, kiel ekzemple Bo Yibo, pro tio, ke tiuj antaŭe eliris vivaj el Kuomintangaj malliberejoj.

Bo Yibo kaj sesdek aliaj komunistoj arestitaj pro politikaj krimoj estis liberigitaj en 1936 efektive laŭ interkonsento farita kun la Kuomintangaj aŭtoritatoj. La Centra Komitato de la Komunista Partio mem faris traktadon pri ilia liberigo. Tamen, tridek jarojn poste ili estis humiligataj pro la supozo, ke ili akiris sian liberon per perfido al la Partio.

Kiam la unua el tiuj ĉi antaŭaj kunarestitoj estis kaptita de “Ruĝaj Gvardianoj”, Zhou Enlai sendis al Mao Zedong letereton, rememorigantan lin pri tio, ke la Sepa kaj Oka

Kongresoj de la Partio jam ekzamenis la “kazon de sesdek unu” kaj donis al ili sian aprobon. Samtempe li telegrafis al la “Ruĝaj Gvardianoj” en Xi’an, dirante, ke se ili posedas ian novan atestaĵon, ili devas transdoni ĝin al la Partia Centro en Pekino. Sed la oportunistoj ne estis tiel facile haltigeblaj.

Kiel celobjekto Bo Yibo<sup>18</sup> estis okulfrapa. Tiam li estis alterna membro de la Politika Buroo de la Partio, vicĉefministro kaj ministro respondeca pri la Ŝtata Ekonomia Komisiono, kaj deputito al la Tutlanda Popola Kongreso. Viktimo de Ménière-malsano, Bo Yibo ekfalegis en sian banĉambro iumatene ĉirkaŭ la fino de tiu eventoplena aŭgusto, kaj estis alforĝita al lito. Li petis de ĉefministro Zhou kelksemajnan forpermeson, kaj Zhou skribis sian noton en la margeno de la petskribo: “Mi konsentas, ke Bo havu sesmonatan forpermeson.” La intenco estis liberigi Bo de la ĥaosa kaj perforta batalo, kiu jam regis en Pekino, kaj de la insidoj de Lin Biao kaj Kang Sheng. Bo Yibo kaj lia edzino haste forveturis suden al Guangzhou, pri kiu ili pensis, ke ĝi estos ilia azilo.

En Novjara Tago de 1967 la edzino de Bo partoprenis en plezurkunveno donita de malnovaj amikoj. Bo mem ne havis la emon al la gajeco. Ĉirkaŭ la tagmezo Zhao Ziyang – nun la ĉefministro de Ĉinio sed tiutempe la unua Partia sekretario de Guangdong-provinco – respondeculo de la partia komitato de Guangdong-provindo – venis al li kun maltrankviliga novaĵo. Sesdek “Ruĝaj Gvardianoj”, li diris al Bo, jam alvenis de Pekino kaj nun estas sur sia vojo por lin kapti.

Apenaŭ li foriris, Bo Yibo enŝovis ĉiujn klasitajn dokumentojn kaj materialojn, kiujn li havis kun si, en la dosierujon kaj kuris trans la korton al bangalo, kie loĝis Dong Biwu, aganta prezidanto de la Popola Respubliko. “Dong Laŭ! Dong Laŭ!”<sup>19</sup> Bo Yibo kriis

helpon. sed antaŭ ol li povis igi la okdekjaran Dong Bi Wu malfermis la pordon, la atakemaj, bruegantaj junuloj jam ĵetis sin sur lin. Li estis frapita teren. Dong stumble iris al li, sin apogante sur sia promenbastono, kaj sciante, ke estus vane rezoni kun la entrudiĝantoj, sin klinis kaj prenis la dosierujon de Bo. “Yibo, iru kun ili,” li diris. “Ankaŭ mia filo estis arestita. Ŝajnas, ke devas esti ia miskompreno. Pli aŭ malpli frue la afero klariĝos. Mi povas diri nur tiom. Vi scias, kiel la cirkonstantoj estas kun mi ...” la maljunulo, jam kun larmoj, ne finis la frazon. Tiam Dong kaj Mao estis la du solaj ankoraŭ vivantaj fondintoj de la Komunista Partio de Ĉinio.

Antaŭ ol Bo estis enpuŝita en aŭtomobilon, li petegis siajn kaptintojn atendi nur momenton, por ke li povu diri adiaŭ al sia edzino. Ne, ili muĝis. Li estis rapide forportita al la fervoja setacidomo por trajno veturonta al Pekino. Antaŭ ol ili atingis la lastan parton de sia vojaĝo, Kang Sheng, direktante la operacion el Pekino, ordonis al ili elvagoniĝi ĉe Baoding, loko ĉirkaŭ tri horojn for de la ĉefurbo, kie ducent “Ruĝaj Gvardianoj” estis atendantaj por transigi la kaptiton en kamionon. Kang Sheng volis esti certa, ke lia kaptaĵo aingos la destinitan vojaĝcelon – malliberejon ekster Deshengmen-pordego.

Enkarcerigiteco poste ŝanĝiĝis al reteniteco, kiu estis apenaŭ diferenca de la antaŭa. Sed kun tiu ĉi ŝanĝiĝo de lia situacio Zhou Enlai sukcesis sendi ordonon, ke oni metu bo en hospitalon por kuraciĝo, kio estis artifiko por mildigi al lia kamarado la suferon. Post la falo de Jiang Qing, Bo diris al amikoj, ke sen la konstantaj zorgoj de Zhou Enlai pri lia sano – signalo al la malamika tendaro, ke la afero de Bo Yibo ne estas forgesita – li certe mortus.

La klopodoj de Zhou Enlai por protekti kadrojn de la Partio kaj registaro etendiĝis en

multaj okazoj ankaŭ al iliaj junaj infanoj. Kiam gepatroj estis malliberigitaj aŭ arestitaj kaj iliaj hejmoj diŝiritaj, estis ĉiam intervenoj de Zhou Enlai, kiuj igis la instituciojn, kie iliaj gepatroj siatempe laboris, donis sumetojn da mono (en ĉiuj tiaj okazoj la salajroj estis retenitaj) por la vivtenado de la infanoj.

Okulvitrita, malvigla, ambiciega, Kang Sheng (1898-1976), kies origina nomo estis Zhang Shuping, devenis el granda, sed malriĉiĝinta bienula familio en Zhucheng-gubernio en la ĉemara provinco Shandong, la sama gubernio, kie Jiang Qing naskiĝis kun pli malalta deveno. Kang Sheng ĝuis favoron de Mao Zedong dum la unuaj tagoj de la “kultura revolucio” kaj tenis grandegan povon, servante publike kiel “konsilanto” al la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio”, sed plejofte malice operaciante post la scenejo. Kvankam li okupis nenian oficon en la administra branĉo de la registaro, tamen en 1970-aj jaroj li jam estis membro de la Konstanta Komitato de la Partia Politika Buroo. Preskaŭ ĉiuj falsaj krimkulpigoj al la veteranoj de la Partio povis esti retrospurataj al Kang Sheng, eĉ se ili supraĵe aperis kiel faraĵoj de la grupoj de Lin Biao kaj Jiang Qing.

Ekde la tempo, kiam li aliĝis al la Partio en la 1920-aj jaroj, li jam estis kulkaulema karieristo, kiu ne hezitis alte rajdi sur alies dorso. Li starigis potencobazon inter samprovincanoj por formi “Shandong-bandon” en la 1940-aj jaroj, kiam li estis sendita labori kiel subtera Partia gvidanto en sia propra provinco. Li cirkonstancoj, en kiuj li kaj Jiang Qing interkonatiĝis en la 1930-aj jaroj, povas esti priskribitaj kiel mistero, ĉar ilia interrilato en tiu periodo, kiu poste disvolviĝis en politikan kunlaboradon, igis multajn severmorajn kamaradojn levi la brovojn. Sen Kang Sheng la antaŭa filmaktorino neniam povus aliĝi al la Komunista Partio, por ne paroli pri edziniĝo al la prezidanto de la Partio.



Ĝis sia morto en 1975 Kang Sheng estis efektiva ĉefo de la sekurec-aparato de la Partio, konata simple kiel la Socia Departamento, kies funkcio estis provizi la hierarkion de la Partio per sekureco kaj malebligi al nedezirindaj personoj enfiltriĝi en ĝiajn vicojn. En Yan'an Kang uzis sian oficon persekuti centojn da senkulpaj kadroj de la Partio kiel Kumintangajn spionojn. La ekscesoj estis tiel grandaj, ke Liu Shaoqi kaj Zhou Enlai ambaŭ proponis, ke Kang Sheng estu eksigita for de tiu ĉi sentema departemento. Sed tiam estis milita tempo, kaj la plej multaj membroj de la Centra Komitato estis okupitaj en aliaj Liberigitaj Regionoj. La ruza Kang Sheng sukcesis konservi sian oficon, kvankam nur post kiam li konfesis siajn erarojn kaj faris ian memkritikon.

La demando estis denove levita en 1966 de Liu Shaoqi, kiu parolis al Prezidanto Mao pri la bezono ekzameni la tiel nomatan aferon de “spionoj laborantaj por la sovetianoj” kaj esplori la personan historion kaj dosieron de Kang Sheng. La “kultura revolucio” intervenis kaj, kiam ĝi komenciĝis, ĉiuj aliaj aferoj estis portempe flankenmetitaj. La unua grava politika persono, kiu pagis por la neglekto de la Partio, estis neniu alia ol Liu Shaoqi mem.

Alia viktimo estis Li Lisan el Liling, Hunan-rpovenco (1899-1967), unu el la plej superaj gvidantoj de la Partio en la 1920-aj jaroj, kiu edziĝis al sovetia virino dum sia daŭra restado en Sovetunio. Li estis akuzita de Kang Sheng kiel ĉefo de “grupo de sovetiaj spionoj”, kiu inkludis plurajn centojn da homoj. Kvankam la akuzaĵoj estis neniam pruvitaj, tamen Li Lisan kaj liaj kamaradoj estis enkarcerigitaj aŭ eĉ mortigitaj en malliberejo. Estis ne senkaŭze, ke Kang Sheng miskulpigis Li Lisan, ĉar en la Sepa Kongreso de la Partio okazigita en Yan'an en 1945 Li Lisan ofendis Kang Sheng, kiam li,

parolante pri siaj propraj eraroj, malkaŝis iujn el la skandalaj aferoj de la ĉefo de la sekreta polico. Kang Sheng ne estis homo pardonema kaj forgesema.

La apero de la unua grand-ideografiaĵa afiŝo, kiu estigis similan agon tra la tuta lando, heroldante la “kulturan revolucion” en granda skalo, estis instigita de Kang Sheng kaj lia edzino Cao Yi’ou, kiuj kuraĝigis la kunskribantojn, docentaron de la Pekina Universitato kaj ŝiajn kolegojn, ĝin produkti. Poste Kang akiris jesigon de Mao Zedong kaj faris la afiŝon publikigita sur la frontpaĝoj de ĵurnaloj kaj disaŭdigita per radio tage kaj nokte. La afiŝo postulis renverson de ĉiuj “irantoj de la kapitalisma vojo” – kio aludis iun ajn en pozicio de aŭtoritato. Tre baldaŭ la oficistaro de Ĉinio, de supre ĝis malsupre, estis skuita de ondoj de atakoj, kaj gvidantaj oficistoj kaj kadroj estis akuzitaj pri ĉia krimo sub la suno.

Dum la movado brue sin puŝis antaŭen kaj multaj veteranoj de la Partio falis ĉe la vojflanko, Kang Sheng senĉese potenciĝis, precipe post la morto de Lin Biao en aviadila kraŝo. En sia ofico li devus raporti la rezultojn de esploro pri la afero de Lin Biao al Zhou Enlai, kiu estris la esplorgrupon, sed anstataŭe li kaŝis dokumentojn kaj materialojn kaptitajn el la sekretaj oficejoj starigitaj de Lin Biao en diversaj urboj. Li ankaŭ prenis ĉefajn kunlaborantojn de Lin Biao el tiuj ĉi lokoj sub sian ŝirmon. Li ne nur detruis atestojn, kiuj povus krimkulpigi la bandon de Jiang Qing, sed ankaŭ plifortigis sian potencbazon. Lia pufigita personaro kreskis ĝis tia grado, ke li estis la sola supera gvidanto, kiu havis pli ol unu oficejon en Pekino. Li fieris posedi tri apartajn oficejojn, krom la oficejoj starigitaj en kvindek kvar urboj de la lando, por plenumi siajn obskurajn taskaĉojn.

Kiel kutime, li instaligis subaŭskultilojn en la oficialaj loĝejoj de Mao Zedong, Zhou Enlai, Zhu De. Tion eksciinte, Mao severe riproĉis Kang Sheng en septembro 1972. Kang kategorie neis, ke li tion sciis. Tamen, tri monatojn poste, kiam la prezidanto rearanĝis sian kabineton, li hazarde trovis subaŭskultajn aparatojn. Li postulis klarigon. Kang Sheng forte ĵuris, ke li sciis nenion pri tiuj aparatoj, sed antaŭ ol li vokite aliris al la prezidanto, li silentigis por ĉiam la tri teknikistojn, kiuj efektive instalas ilin. Mortintaj homoj ne parolas.

Zhou Enlai, kiu enhospitaliĝis en la somero de 1974, iutage telefonis al Ye Jianying, unu el la kvar ankoraŭ vivantaj marŝaloj de PLA, kaj ŝercis pri sia enhospitaliĝo. “Sciu,” la ĉefministro sprite diris, “mi trovis kaŝejon ĉi tie, ĉar mi ne povas plu resti kiel kutime en Zhongnanhai. En la hospitalo mi diras, kion mi volas.” La maljuna marŝalo sciis, kion li aludas.

Nur post kiam la “kvarpersona bando” falis el la potenco, Kang Sheng estis malkovrita iom detale kiel la postkulisa direktanto de la “kultura revolucio”, la kruela maliculo, tiranta la ŝnurojn de post la scenejo, la ulcero mordetanta la politikan korpon de la Komunista Partio de Ĉinio dum multaj jaroj. Kondamnitaj kaj senigita je ĉiuj honoroj, Kang Sheng postmorte estis publike forpelita el la Partio en 1980 kun la tuta malgloro, kiun li meritis.

En la dua duono de 1966 kaj la komenco de 1967, preskaŭ ĉiuj ambasadoroj de Ĉinio estis revokitaj por partopreni en la “kultura revolucio”. Iuj estis submetitaj al pridemandado kaj turmentado fare de la “Ruĝaj Gvardianoj” tuj post kiam ili eliris el la aeroplano. La kolerigita Chen Yi, la ministro de eksteraj aferoj, postulis klarigon de Chen Boda kaj Jiang Qing, ĉefo kaj vicĉefo de la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio”, sed ili rifuzis intervidiĝi kun li kaj doni ian ajn klarigon, kial oficistoj de eksteraj aferoj estas krude traktataj ĉe la flughaveno. Nur rekta interveno de Zhou Enlai haltigis tiun ĉi absurdan agon.

Unu ambasadoro de supera rango, Liu Xiao, iama vicministro de eksteraj aferoj, ne

plu vidiĝis post kiam li estis invitita vespermanĝi kun Kang Sheng. Chen Yi telefonis al Kang Sheng por demandi, kio okazis. Kang Sheng diris: Liu Xiao jam konfesis, ke li estas duobla spiono kaj nun estas skribanta denuncon kontraŭ la Orient-Ĉinia Buroo kaj la Ŝanhaja Buroo de la Partio.” Li aldonis malican aludon: “Mi ja ne scias, kiu alia estas implikita en tiu ĉi afero.” Chen Yi, kiu iam estis ĉefo de ambaŭ burooj en Ŝanhajo post la Liberiĝo, kriis en la telefonon: “Kang Sheng, kial vi ne venu kaj arestu ankaŭ min?” Homo ĉiamruza, kiu sciis, kiam la homa pacienco estas trouzita, Kang Sheng alkroĉis la aŭdilon al la telefonaparato. Poste li plendis al Prezidanto Mao, ke Chen Yi malhelpas lian laboron. Unu semo de suspekto ĝustatempe semita, li kredis, iam produktos fruktojn.

Liu Xiao kompreneble “konfesis” nenion. Post kelka vortbatalo kun Kang Sheng ĉe la manĝotablo, li estis kaptita de homoj de Kang Sheng, kiam li forlasis la domon por iri hejmen. Malgraŭ la protestoj de Chen Yi, Liu restis en malliberejo sen esploro kaj juĝo.

La minacoj de Kang Sheng faris nenian efikon sur la maltima kaj malkaŝema Chen Yi, kiu plu proparolis siajn kamaradojn kaj tion, kion li konsideris la ĝusta linio de la Partio. Li plej arde koleriĝis ĉe iu kunveno en februaro 1967, superprezidata de Zhou Enlai kaj ĉeestata de vicĉefministroj kaj marŝaloj de la Popola Liberiga Armeo. La armeaj veteranoj faris intensan vizaĝ-al-vizaĝan batalon kontraŭ la agitantoj de la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio” (Chen Boda, Jiang Qing, Kang Sheng kaj aliaj).<sup>21</sup>

Chen Yi tremis de kolero kaj pugnobatis la tablon por akcenti sian diron. Partiaj veteranoj, li diris, estas turmentataj kaj eĉ torturataj de grupo da senrespondecaj personoj. Kial do, li rekte demandis siajn kontraŭulojn, kamaradojn, kiuj dediĉis sian tuton kaj tiel longe sekvis la Partion, devas esti tiel persekutataj? “En la historio de la Partio ja

troviĝis homoj, kiuj uzis sian pozicion por falskulpigi veteranojn de la Partio kaj insultis ilin en la plej abomeninda maniero,” la marŝalo muĝis. “Sed en postaj jaroj tiaj homoj fine transiris al la malamika flanko. Ĉi tie estas homoj provantaj fari la samon. Permesu al mi diri al vi, ke ili venos al nenia bona fino.”

La afabla kaj bonaspekta militisto-poeto estis intima kamarado kaj amiko de ĉefministro Zhou Enlai, la vicĉefministro elektita por servi kiel ties ministro de eksteraj aferoj. Tial li estis alte sur la listo de frapatoj de Lin Biao kaj Jiang Qing. Alparolante grandan kunvenon de kadroj en la frua periodo de la “kultura revolucio”, kiam silento estis eble preferata al kuraĝo, Chen eldiris siajn opiniojn pri tiu ĉi eksterordinara politika movado. Li publike diris, ke antaŭe li faris erarojn kaj povos ree fari la samon, kaj ke en la longa historio de la Ĉina Revolucio li ne estis ĉiam sur la flanko de Prezidanto Mao. Li donis nenian garantian, ke li ne ree kontraŭstaros al Mao.<sup>22</sup>

Lin Biao, Jiang Qing kaj la “Ruĝaj Gvardianoj” ofendiĝis de la malkaŝa parolo de la maljuna veterano. En ilia menso ĉiu vorto aŭ frazo de Prezidanto Mao estis evangelia vero. Chen Yi estis senindulge kritikata pro siaj malkaŝe esprimitaj opinioj, sed li akiris la respekton kaj amon de multaj per sia fideleco al tio, kion li opiniis ĝusta.

Iun tagon la marŝalo estis alvokita al la Pekina Fremdlingva Instituto por klarigi siajn “reakciajn opiniojn” antaŭ kunveno de la studentoj. Li alvenis per sia aŭtomobilo en la difinita tempo kaj kiam li eniris en la halon, oni donis al li konusforman paperĉapon, ke li ĝin portu sur la kapo. Chen ne perdis sian humursenton. Li rekte staris kiel soldato, de tempo al tempo reĝustigante la altan paperĉapon. Poste oni postulis lin, kiel kutime en tiaj okazoj, reciti iun citaĵon el Prezidanto Mao – rito, kiu ĉiam komenciĝis per “Prezidanto

Mao diras” kaj estis sekvata per citaĵo el la malgranda, ruĝa libro. Klariginte al si la voĉon Marŝalo Chen Yi kvazaŭ psalmis: “Prezidanto diras: ‘Kamarado Chen Yi estas bona kamarado.’”

La konsternitaj “Ruĝaj Gvardianoj” sur la podio rigardis unu alian en konfuzo. Iuj rapide foliumis la malgrandan ruĝan libron, sed ne povis trovi tian citaĵon.

Chen Yi, kompreneble, improvize elpensis ĝin. Li grimace ridetis, kiam oni insiste demandis lin pri la deveno de la citaĵo.

La plej bona helpanto de Zhou Enlai nun estis severe tanata ne nur pro siaj nepentantaj “reakciaj” opinioj, sed ankaŭ pro falsado de la sanktega malgranda ruĝa libro. Liaj eldiroj, ĉiu apartigata disde kunteksto, estis kolektitaj kaj presitaj en libra formo sub la titolo Malicaj vortoj de Chen Yi, kaj ili estis severe kritikitaj unu post alia, ĝis la kunveno ĉesis kaj li estis forkondukita. Li estis eskortita de kelkaj “Ruĝaj Gvardianoj” ĝis sia aŭtomobilo kaj kiam li estis preta eniri en ĝin, li demetis sian konusforman ĉapon kaj donis ĝin al unu el ili. “Volu bone konservi ĝin. Mi bezonos ĝin ĉe la venonta kunveno.”

Mao Zedong mem akceptis kun rezerviĝemo la sensaciajn anekdotojn cirkuligitajn de la “Ruĝaj Gvardianoj” pri Chen Yi. La komento de Mao pri la libro eldinita de la “Ruĝaj Gvardianoj” por kalumnii la marŝalon estis unu konciza spritaĵo: “Malicaj vortoj de Chen Yi ne estas malica.” La prezidanto diris, ke Chen Yi, kvankam sub akra kritikado, devas daŭrigi sian laboron. Sed en siaj malmultaj restaj jaroj la maljuna militisto restis for de sia laboro, malgraŭ ke Zhou Enlai penadis senkulpigi sian amikon kaj intiman kamaradon.

Tri jarojn pli juna ol Zhou Enlai, Chen Yi estis en Francio kiel laboristo-studento pli-malpli samtempe kun sia amiko. Li ne restis tie longe. En iu manifestacio organizita de

ĉinaj studentoj por protesti kontraŭ la arbitraj rimedoj de Liona Universitato, Chen Yi, aktiva gvidanto de studentoj, estis forpelita el tiu lando en oktobro 1921 kaj revenis al Ĉinio. Poste li ludis elstaran rolon en la Nanchang-a Leviĝo en 1927 sub la gvido de Zhou Enlai kaj de tiam pasigis sian vivdaŭron en uniformo.

La honesta kariero de Chen Yi de liaj studentaj tagoj ĝis la naskiĝo de la Popola Respubliko donis al liaj malamikoj neniun okazon ataki lin per trogravigo de iu ajn incidento en lia persona historio. Sed li estis dorno en ilia karno kiel intima kolego de Zhou Enlai, tial ili atakis lian funkciadon de la ministro de eksteraj aferoj, akuzante lin pri plenumo de reviziisma ekstera politiko kapitulaci al la fortoj de imperiismo.

Chen Yi faris kontraŭatakon kun energio. Dum la dek sep jaroj de post la fondiĝo de la Popola Respubliko, li diris, la ekstera politiko de Ĉinio estis formulita de Prezidanto Mao kaj la Politika Buroo de la Partio, kaj ĝia plenumo estis gvidata de la prezidanto kaj la ĉefministro en ĉiu grava tempopunkto. Eraroj kaj mankoj povas ekzisti en la ĉiutaga plenumado – kaj li estas preta preni sur sin la respondecon por tio – sed estas tute neimageble akuzi la registaron pri sekvado de “reviziisma” ekstera politiko. Private, li diris al kamaradoj en sia oficejo, ke “tiuj, kiuj ŝvelparolas en revolucia ĵargono, estas nenio alia ol frazistoj. Ili neniam faris eĉ tagon da honesta laboro dum sia vivo.” Liaj helpantoj petegis lin: “Marŝalo, ju malpli multe dirite, des pli bone.”

“Ho ne, mi ne permesos, ke ili ŝtopu al mi la buŝon,” li diris. “Mi eble ofendos iujn, kaj pro tio mi eble falos en malfeliĉon, aŭ eĉ estos mortigita, sed se pro timo al tio ĉi mi ne kuraĝus diri kion oni opinias direnda, tiam kiel komunisto mi ne volorus eĉ unu groŝon.”

Por fari premon sur Chen Yi “Ruĝaj Gvardianoj”, instigitaj de Lin Biao kaj Jiang

Qing, metis sieĝon al la sidejo de la Ministrejo de Eksteraj Aferoj poer starigo de dekoj da tendoj ĉirkaŭ ĝia domo kaj faris akran observadon por havi okazon kapti la ministron. Xie Fuzhi, ministro de Publika sekureco, kiu tiam estis alte sur la totem-stango de Lin Biao kaj Jiang Qing kaj estis la homo numero unua en la urba registaro de Pekino, donis al la junaj tumultantoj ĉian helpon, kian ili bezonis. Ili estis provizitaj per laŭtparoliloj, per kiuj ili ripete kriadis: “Eksigon al Chen Yi! Eksigon al Chen Yi!” “For Chen Yi!”

Murskribaĉoj montriĝis ĉie ĉe stratanguloj kaj sur la muroj de la ĉefurbo, postulantaj lian eksigon. Fine estis donita permeso okazigi kunvenon en la Popola Halo por “kritiki” Marŝalon Chen Yi. Zhou Enlai kiel ĉefministro konsentis ĉeesti al ĝi, kondiĉe ke la aranĝo estu strikte limigita al “kritiko”. Li rifuzis suriri la podion, ĝis oni forigis grandan tolpecon kun surksirbo “For Chen Yi!” pendantan de la balkono. Post tio la ĉefministro sidiĝis apud sia kolego, evidente por esprimi per tio simpatian por lia severa elprovo, kaj finaŭksultis liajn akuzantojn.

Subite kelkaj fortikaj “Ruĝaj Gvardianoj” saltleviĝis de siaj sidlokoj en la antaŭaj vicoj kaj puŝis sian vojon antaŭen al la podio. Zhou Enlai tuj ordonis ĉesigi la kunvenon. Li riproĉis tiujn, kiuj prezidis en la kunveno, pro ilia promesorompo kaj avertis ilin, ke li ne plu toleros perforton. Poste li forlasis la kunvenejon, ordoninte al la sekurigaj personoj, kiujn li venigis kun si, ke ili protektu la vicĉefministron kaj poste sekure akompanu lin hejmen.

Zhou Enlai faris penigan zorgon, ke ĉia rimedo estu alprenita por malsukcesigi la provojn forkapti la marŝalon. La ĉefministro devis fari la protekto-rimedojn sekuregaj, ĉar Lin Biao kaj Jiang Qing havis kunlaboranton en la Ministrejo de Publika Sekureco, homon ofice respondecan antaŭ li mem en la Ŝtata Konsilantaro sed kun unu piedo en la malamika tendaro.

El la dek marŝaloj de la Popola Liberiga Armeo, laŭ Lin Biao kaj Jiang Qing, kvar ankoraŭ baris al ili la vojon en 1967. Ili estis Chen Yi, Ye Jianying, Xu Xiangqian kaj Nie Rongzhen. Ekskluzive de Lin Biao mem,<sup>10</sup> el la kvin aliaj, Zhu De, jam pli ol okdekjara,



estis konsiderata kiel tro maljuna por malhelpi ilian komploton kapti la potencon; He Long kaj Peng Dehuai jam estis faligitaj; Luo Ronghuan jam mortis; kaj Liu Bocheng, la komandanto de la Dua Kampa Armeo kun sia intima amiko Deng Xiaoping kiel politika komisaro, estis konsiderata kiel senigita je forto en iu ajn politika batalo, ĉar li jam malkapabliĝis pro malsano kaj estis alforĝita al lito multajn jarojn

En tia okazo Chen Yi do elstaris inter la kvar por esti eliminata – unue, ĉar same kiel Ye, Xu, Nie, li estis intima kaj tre tre kompetenta helpanto de Zhou Enlai. Due, li estis unu el la favoratoj de Mao Zedong, dividante komunan intereson kun la prezidanto en klasika ĉina poezio. Trie, li estis malkaŝema kaj neniam flatis potenculojn; li devis esti silentigita kaj punita kiel ekzemplo por averti aliajn, ke spitado signifas malfeliĉon. Kvare, inter la kvar marŝaloj, Chen Yi estis la plej konata eksterlande. Lin Biao kaj Jiang Qing fine sukcesis per lerta manovro igi sian malamikon for el Pekino, je preteksto efektivigi la direktivon de Prezidanto Mao fari esploradon de lokaj kondiĉoj en iu fabriko ĉe baza nivelo. Tio estis mallongtempa tasko kaj la marŝalo revenis al la ĉefurbo, sed neniam denove ludis sian regulan rolon kiel vicĉefministro kaj ministro de eksteraj aferoj.

Lia sano pli kaj pli malboniĝis kaj li trovis, eble tro malfrue, ke li estas trafita de kancero. Kutime viveca kaj sprita konversaciemulo, Chen Yi fariĝis portempe tre neparolema. Poste unu neatendita evento frakasis la kvieton ĉirkaŭ li kaj rompis lian silenton – la afero de Lin Biao.

La homo, kiu intencis uzurpi la potencon, senmaskigite en komploto mortigi prezidanton Mao, fuĝis el la lando kun sia familio kaj kunkonspirantoj kaj mortis en aviadila kraŝo super ĉina landlimo kun Mongolio la 13-an de septembro 1971. Tiu ĉi

eksterordinara okazaĵo boligis la sangon de Chen Yi. Dum Zhou Enlai estis daŭre konsiliĝanta kun Mao Zedong pri rimedoj kontraŭ ĝiaj sekvoj, la malsana marŝalo enfermis sin en privata ĉambro kun siaj armeaj kolegoj por pridiskuti kaj malkovri ĉion, kion ili sciis pri la ĉefkrimulo.

Kvankam malsana, Chen Yi uzis multan tempon preparante akuzoskribon. Sed li kolapsis de laciĝo dum li faris paroladon de akra atako.

Li estis rapide sendita en hospitalon kaj ricevis kirurgian operacion, sed li restis delira dum la plejparto de la tempo. La ĉefministro, kiu lasis al la kuracistoj instrukcion, ke ili raportu al li tuj kiam la paciento rekonsciigis, alvenis en la noktomezo de la 2-a de januaro, sed Chen rapide refalis en komaton. La 6-an de januaro la maljuna militisto elspiris sian lastan spiron.

La konstantaj penadoj de Zhou Enlai por helpi kamaradojn en malfeliĉo en la “kultura revolucio” jam fariĝis legendo. Sen lia interveno, multaj el la superaj gvidantoj de Ĉinio hodiaŭ restus en plitika Limbo aŭ alvizaĝus eĉ pli malbonan sorton. En kriza momento, sed ne antaŭe – ĉar antaŭtempa penado liaflanke malutilus anstataŭ helpi – ili povis kalkuli je lia preteco doni al ili helpon. Kiam lia pozicio aŭ prestiĝo ne estis sufiĉa por atingi la deziratan rezulton, kiam ĉio alia ne sukcesis, la sagaca ĉefministro do sin turnis al Mao Zedong – taktiko, kiun li povis uzi nur ŝpareme.

Lia interveno por helpi Xu Xiangqian el Hubei-provinco, unu el la kvar aktivaj marŝaloj supre menciitaj, estas trafa ekzemplo.

La 1-a de aŭgusto 1967 estis la kvardeka datreveno de la naskiĝo de la Popola Liberiga Armeo, la speciala, ruĝlitera dato por viroj kaj virinoj en uniformo. Ordinare la

nomlisto de ĉiuj, kiuj ĉeestis la celebran kunvenon, estis publikigita en plena tuteco. La sekvantan matenon observantoj pri la politika scenejo ĉiam detale ekzamenis *Popolan Tagĵurnalon*, la organon de la Partio. La malaero de eminenta nomo for el la listo signifis, ke la persono koncernata jam estis elpurigita, senfavorigita, aŭ estis tro pridisputata por esti invitita. Post la tiel nomata “ribelo de februaro 1967”, kiu metis grandan nombron da superaj oficiroj en malfacilan situacion, neniu kron tiuj, kiuj estis intimaj al Lin Biao, povis certiĝi dudek kvar horojn antaŭe, ĉu li povos esti en la Popola Halo por celebri la okazon.

Marŝalo Xu Xiangqian, vicprezidanto de la Milita Komsiono de la Partio, trovis sin flanklasita en la mateno de la 31-a de julio tiujare.

En ordinaraj aŭ pli kvietaj tempoj, Xu estus inter tiuj, kiuj faris la decidon pri la invitoj, anstataŭ esti neglektata. Tamen li ne estis formale eksigita el sia posteno, kvankam tio estis, kion intencis Lin Biao. Je la kvina posttagmeze, du horojn antaŭ la celebra kiunveno, lia kolego Ye Jianying neatendite venis al lia hejmo por transdiri la vortojn de Zhou Enlai: pretiĝu al la celebra kunveno. Troviĝis opinio-diferencoj pri tio, ĉu Xu Xiangqian devas esti permesita ĉeesti la kunvenon – kio signifis, ke oponis Lin Biao kaj liaj similaj. Ye diris, ke la afero estas diskutata de la ĉefministro kun Prezidanto Mao. Li estis tiel zorgema, ke li eĉ venigis kun si barbiron, supozante, ke lia malnova kolego, tiam ne plene aglibera, devas bezoni hartondadon.

Unu horon poste, Zhou Enlai telefonis dirante, ke la afero jam estis solvita ĉe Prezidanto Mao. Xu povis ĉeesti la kunvenon kune kun kelkaj aliaj altrangaj oficiroj, kiuj ankaŭ estis sub atako. Zhou Enlai, ĉiam majstra traktikisto en tia situacio, alarmis

fidindajn sekurecajn taĉmentojn laŭlonge de la vojlinio, kiun Xu estis prenonta al la Popola Halo. Li ne volis, ke la marŝalo falu en la nerajtigatajn manojn sur sia vojo al la kunveno, ĉar Xie Fuzhi, lia ministro de publika sekureco, estis samtempe servanta al alia mastro.

Xu Xiangqian ekkonis Zhou Enlai en 1924, kiam li fariĝis kadeto ĉe Huangpu-militakademio, kies direktoiro de la Politika Departemento Zhou tiam estis.

Kiam la Popola Liberiga Armeo – ne la ordinaraj soldatoj, sed ĝiaj administrataj oficejoj kaj nebatalaj unuoj – estis implikita en la “kultura revolucio”, Xu Xiangqian estis ĉefo de la gvida grupo de la armitaj fortoj. Li kaj Lin Biao tute ne havis la saman opinion pri multaj aferoj, kaj al Zhou Enlai li sin turnis por konsilo.

Unu el la grandaj zorgoj de Xu estis malpliigi la damaĝon faritan de la “Ruĝaj Gvardianoj” en Pekino kaj aliloke en la lando, komprenigi al la junuloj, ke “sufiĉeco estas sufiĉeco”, sen ŝajni verŝi malvarman akvon sur ilian kapon. Li estis maltrankvila pro tio, ke ili estas manipolataj de Lin Biao, Jiang Qing kaj aliaj oportunistoj. Li el paŝis kun serio da “Ne-oj” bazita en spirito sur la *la Dek Ses Punktoj – Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio koncerne la Grandan Proletan Kulturajn Revoluciojn*.

Oni kunvokis kunvenon por diskuti pri tiuj ĉi “Ne-oj”: Ne faru nerajtigitan areston, ne faru nerajtigitan tra serĉon, ne donu korpan punon, ne metu altan konusforman ĉapon sur la akuzitan, ne pendigu al li kalumnian tabulon ĉirkaŭ lian kolon, ne paradigu lin tra la stratoj, ktp.

La kunveno okazis sub la prezido de Zhou Enlai, kiu subtenis ĉiujn ĉi tiujn limigojn. Sed Jiang Qing kaj Chen Boda evitis doni rektan respondon kaj parolis per nebulaj vortoj,

ilin ne akceptante, nek rifuzante. Ilia sinteno estis signalo, kaj lia rezulto estis pli granda ĥaoso.

Maltrankviligata de la okazantaj eventoj, Mao Zedong decidis la 23-an de januaro 1967 mobilizi la ter-, mar- kaj aer-armeojn por helpi restarigi stabilecon. Li sendis oficirojn de la tri armeoj kiel “laborteamojn” en registarajn oficejojn, lernejojn, universitatojn kaj aliajn establaĵojn, unue por gvidi kaj konsili kaj poste por mem plenumi la administradon. La oficejo de Xu Xiangqian denove ellaboris la bazajn regulojn.

La regularon formulitan kun la helpo de Ye Jianying, Chen Yi, Nie Rongzhen, kaj ankaŭ pluraj el la altrangaj oficiroj el la Milita Komisiono de la Partio, Xu Xiangqian submetis al la kunveno kunvokita de Zhou Enlai. Jiang Qing kaj ŝiaj subtenantoj denove evitis doni rektan respondon jesan aŭ nean, sed vane. Ĉar Mao Zedong, konsultite, donis sian aprobon.

La gemilitistoj de PLA. En sia fremda rolo kiel civilaj administrantoj, solvis iujn problemojn kaj samtempe ankaŭ kreis multajn. Iuj, kiuj havis privatajn celojn, profitis el la potenco en siaj manoj. Tamen la regularo ja servis kiel moderigilo seur radikaluloj en la armeoj, kiuj unuafoje disponis aŭtoriaton en la civilaj sferoj. Lin Biao kaj lia bando rigardis tiun ĉi regularon kun malŝato, kaj ekstreme troigis neperfektaĵojn leviĝintajn el ĝia plenumado. Ili kulpigis tiujn, kiuj partoprenis en ĝia ellaborado kaj plenumado, kaj komencis ataki Zhou Enlai, kiu nun pli kaj pli fariĝis vojobstaklo en ilia batalo por petenco.

Kiam la plendo atingis la orelojn de Mao Zedong, li diris koncerne la uzon de la militistoj, ke la situacio jam estis sufiĉe bone traktita, kaj ke la kritikantoj estas saĝaj nur

post la evento. Zhou Enlai aplombe reagis kontraŭ tia ĉikana kritiko. Lia ĉefa zorgo estis konservi iom da stabileco, precipe en la armeoj

Krom sia plentempa laboro funkciigi la Ŝtatan Konsilantaron, kun ĝia ampleksa administrado, la ĉefministro estis ofte vokata al kunvenoj por solvi urĝajn problemojn estigitajn de la partiecaj bataloj inter grupoj de la “Ruĝaj Gvardianoj”. Tiam Mao Zedong jam destinis Zhou Enlai por partopreni kiel en konsiliĝoj de la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio” sub Chen Boda kaj Jiang Qing kaj de la “Grupo de la Kultura Revolucio” de la Milita Komisiono (PLA), estrata de Xu Xiangqian, tiel ankaŭ en interligaj kunsidoj inter la du. Tio estis rolo tre konvena al la kapablo de la ĉefministro kiel diplomato kaj intertraktanto lerta en akordigado de kontraŭaj vidpunktoj.

Lin Biao kontraŭis al la decido de Mo, denove difinante la subordigitecon: la “Grupo de la Kultura Revolucio” de la Milita Komisiono, estrata de Xu Xiangqian, devas veni sub la duoblan gvidadon de la Milita Komisiono mem, kies efektiva, se ne nominala, ĉefo li estis, kaj la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio”, sed ĉefe sub la lasta, al kiu ĉiuj gravaj demandoj devis esti submetitaj por decido.

Tiu ĉi propono celis malhelpi al Xu Xiangqian plenumi sian rolon kaj preni regpotencon el la manoj de Zhou Enlai. Kiam Xu Xiangqian penis kontaktiĝi kun la grupo de Jiang Qing, naŭ fojojn el dek nek ŝi nek Chen Boda estis atingebla. Kaj se ili troviĝis, ĉio, kion li akiris, estis ambigua respondo aŭ rifuzo. Tio estis netolerebla situacio. Iuj trupunuoj de PLA estis en ĥaosa stato pro bataloj inter rivalaj grupoj de “Ruĝaj Gvardianoj”. Xu abomenis ĉion ĉi tion kaj esprimis la intencon pri ekŝiĝo, sed li estis deadmonita de Zhou Enlai.

Ankaŭ alte sur la listo de atakatoj de Lin biao estis Luo Ruiqing (1906-1978) el Nanchong, Suchuan-provinco, unu el la dek armeaj generaloj de PLA. Altastatura kaj fortika, kun ŝercnomo “alkreskulo” en armeaj rondoj Luo Rui Qing estis kripligita je unu kruro dum la “kultura revolucio”, laŭdire, rezulte de puŝfalo de sur la balkono de iu domo en la somero de 1966, kiam li estis retenata por pridemandado fare de “Ruĝaj Gvardianoj”.

Mallonge antaŭ ol la “kultura revolucio” ektondris tra Ĉinio, Lin Biao, en iu plivastigita kunsido de membroj de la Politika Buroo en Ŝanhajo, per manovro senigis Luo Ruiqing je ĉiuj liaj oficoj de la Partio kaj registaro. Kiel arma generalo, rango malsupera al tiu de marŝalo kaj supera al tiu de korpusa generalo, Luo tenis multe tro da oficoj sentemaj por la ambicia Lin Biao. Kaj Luo okupis sin pri sekurecaj aferoj ekde la tempo de la Longa Marŝado, kaj estis intima helpanto de Zhou Enlai de tiam, kiam li komencis labori sub tiu dum Xi’an-evento de 1936.<sup>24</sup> Lin biao volis forigi Luo, ĉar tiu baris al li la vojon “politikigi” la armeon. La ĉefa kaŭzo, kial Jiang Qing malamis Luo, estis ke la generalo iam publike – kaj varme – laŭdis Yang Kaihui, la unuan edzinon de Mao Zedong, kiu estis ekzekutita de Kuomintango en 1930 pro ŝia revolucia agado. Tio ĉi treege malplaĉis al la tria edzino de la prezidanto.

Dum la 1960-aj jaroj Lin Biao kaj Luo Ruiqing estis la ĉefaj personoj en la strukturo de la militaj fortoj de Ĉinio. Lin estis la ministro de nacia defeno kaj natura membro de la Milita Komisiono de la Partio. Luo estis la estro de la Ĉefstabo kaj samtempe ĝenerala sekretario de la Milita Komisiono, ofico, kiu necesigis al li kontroli ĝiajn ĉiutagajn aferojn. Dum Lin Biao faris sian plejebelon politikigi la armeon, Luo emfazis rigorajn profesiajn normojn kaj ekvilibrigis militan kaj politikan trejnadojn.

En decembro 1965 Luo Ruiqing estis senigita je ĉiuj siaj oficoj kaj lia nomo plene malaperis el la novaĵ-komunikiloj la sekvantan printempon. Kiam ĝi reaperis, ĝi estis ligita kun tri aliaj – Peng Zhen, Lu Dingyi kaj Yang Shangkun – kaj la “kvaropo” estis akuzita pro formado de “kontraŭ-Partia kliko”. Unu jaron poste, dum la “Ruĝaj Gvardianoj” faris sovaĝajn arestojn kaj severe pridemandadis la viktimojn laŭ sia volo, la ĉefministro ricevis informon, ke “etaĵ generaloj” de Jiang Qing intencas kapti Luo Ruiqing, tiam ricevanton en hospitalo kuracadon pro sia rompita kruro. La komandanto de la Pekina Garnizono estis instrukiita de la oficejo de la ĉefministro, ke li pretiĝu loĝigi Luo kaj lian edzinon en sian kazernon. Tamen, Lin Biao, Jiang Qing kaj iliaj subtenantoj, utiligante la tumulton kaj la konsiderinda povon en siaj manoj, sekrete forkondukis Luo tien, kie ili povis trakti lin laŭ sia plaĉo.

Fronte al skandalaj malobservadoj de leĝo kaj ordono – forrabo de gvidaj kadroj, militaj kaj aliaj, traserĉo de la hejmoj de tiuj en gravaj oficoj kaj forkapto de konfidencaj dokumentoj en ilia posedo – Zhou Enlai prenis du specialajn rimedojn. Unu estis ordoni al la Pekina Garnizono, ke ĝi duobligu siajn penojn por provizi superajn oficistojn je pli efika protekto. La alia estis, ke li mem alvizaĝu la diversajn frakciojn de la “Ruĝaj Gvardianoj”, intervidiĝante kun ili tiel ofte kiel eble kaj vekante ilian justsenton per sia kutima persvada povo.

Iafoje ili lin obeis, aliffoje ili ne. senfinaj kunvenoj kaj tempokonsuma, nervostreĉa diskutado kun “Ruĝaj Gvardianoj” multe lacigis Zhou Enlai. Lia sano estis difektita. Kaj iafoje tia penado eĉ tute vaniĝis, kiel en la okazo de Luo Ruiqing. Premdevigante Luo Ruiqing konfesi siajn “malbonfarojn”, Lin Biao kaj lia bando ne nur minacis fini la



kuracadon por lia grave rompita kruro, sed eĉ, kiam li restis malcedema, perforte amputigis ĝin.

Luo Ruiqing kaj lia edzino pasigis sep jarojn en malliberejo, kaj estis malpermesite al iliaj infanoj ilin viziti. Ilia filo Luo Yu pasigis kvar jarojn en izolita enfermo. Dank' al persista penado de Zhou Enlai, finfine Luo Ruiqing estis liberigita en 1973, kaj lia edzino du monatojn poste. Ŝi sciis nenion pro la amputado kaj ploris kiel infano, kiam la geedzoj revidiĝis en malsanula ĉambro de arma hospitalo en Pekina antaŭurbo. La ĉefministro sendis al ili salutojn kaj kuraĝigajn vortojn, atentigante ilin, ke troviĝas multaj okazoj denove labori por la lando, sed la grava afero por ili ambaŭ estas antaŭ ĉio resaniĝi.

El la virinoj, kiuj supervivis la severan provon de la Longa Marŝado por atingi Yan'an en 1935, pli ol 40 ankoraŭ vivas hodiaŭ; la plej elstara estas kompreneble la ankoraŭ aktiva Deng Yingchao. La malplej konata probable estas Wang Dingguo.<sup>25</sup>

Apenaŭ dudekjara dum la Longa Marŝado, Wang Dingguo, servanta kiel propaganda laborantino, konatiĝis kun multaj el la altranguloj de la Partio dum sia laboro, inkluzive de sia estonta edzo, Xie Juezai, multajn jarojn pli aĝa ol ŝi, poeto en la klasika ĉina lingvo kaj granda taglibristo. Ŝia politika komisaro prenis ŝin kun si tiam, kiam li iris viziti la malsanan Zhou Enlai, trafitan de tifoida febro, en iu posttagmezo de junio 1935. poste, forlasinte Yan'an, Wang pasigis kelkajn jarojn en Lanzhou, Gansu-provinco, kie ŝia edzo estis ĉefo de la oficejo de la Oka-voja Qrmeo, gvidata de la Komunista Partio.

Zhou Enlai kaj Deng Yingchao trapasis Lanzhou en somero 1939 sur la vojo al Sovitunio por kirurgia kuracado de lia elartikigita kubuto, kaj restis ĉe Xie kaj lia edzino. Dum sia reveno en la sekvanta printempo ili denove haltis en tiu ĉi transporta centro de

nordokcidenta Ĉinio. Tiam Xie Juezai jam transposteniĝis returne al Yan'an, kaj lia familio estis atendanta veturigon – problemo en tiuj militaj tagoj. Kvankam troviĝis sufiĉa spaco en la kamiono de Zhou Enlai por preni kelkajn ekstrajn pasaĝerojn, s-ino Xiie ne volis trudi du infanetojn al la al-Yan'an-veturantaj vojaĝantoj. “Tio ne ĝenas,” diris Zhou Enlai, “kaj ni povas helpi prizorgi la etulojn dum la vojaĝo.” La pli juna el la du infnoj, nur kelkajn monatojn aĝa, mordetadis per sia sendenta buŝeto iun ajn, inkluzive de Zhou Enlai; Zhou donis al ĝi ŝercnomon hundeto. Atinginte Yan'an, Zhou Enlai alkondukis la patrinon kaj infanojn al la Partia Lernejo, kaj akvidinte Xie Juezai, li ŝercis: “Jen mi transdonas al vi viajn edzinon kaj infanojn. Komisio plenumita.”

Xie fariĝis la unua ministro de internaj aferoj kaj poste estro de la Plejsupera Popola Juĝejo. Li faris multe da prepara laboro por kodigi la novajn leĝojn de la lando antaŭ ol la tutlanda venko venigis lin kaj lian familion al Pekino. Tia politike neriproĉebla paro kiel Xie Juezai kaj Wang Dingguo ne devus vekti ian ajn suspekton en iu ajn loko. Sed aferoj freneziĝis en la “kultura revolucio”.

Kun la ŝtormo leviĝinta ĉie en Ĉinio, eĉ veterantino el la Longa Marŝado kiel Wang Dingguo estis akuzita de Lin biao, Jiang Qing kaj ilia konsilanto Kang Sheng kiel “perfidulino”. La 6-an de februaro 1969 oni arestis ŝin kaj malpermissis al ŝi eĉ telefoni al sia edzo en la hejmo, por diri al li pri sia malliberiĝo. La novaj potencomanipulantoj forte deziris elimini homojn, kiuj estis rigardataj kiel intimaj al Zhou Enlai, kaj Xie kaj lia familio neniam kaŝis tion, ke ili staras kun Zhou Enlai.

Dum pli ol unu montao la tenanto de la plej alta juĝista ofico, kiu paraliziĝis de 1963, perdis kontakton kun sia edzino. Apartaj privilegioj decaj al lia pozicio estis retiritaj kaj la

kuiristo disponigita de la registaro estis forsendita. Li havis malfacilon en prizorgo de si mem kaj, kvankam li mem estis senhelpa, tamen la maljunulon pleje maltrankviligis la persona sekureco de lia edzino. En sia plej senespera momento li ekpensis pri Zhou Enlai. Li sciis, ke la ĉefministro mem havas malfacilan tempon, sieĝate de multego da problemoj ĵetitaj al li de la komuna malamiko. Tamen li skribis leteron kaj sendis ĝin al Zhongnanhai. Ĝi estis la krio de malsana kaj senespera homo. Tri tagojn poste, lia edzino estis liberigita rezulte de interveno de Zhou Enlai. Sed la malliberejaj aŭtoritatoj, sekvante la instrukciojn de siaj mastroj, metis tri kondiĉojn al ŝia libero. Unue, ŝi devis anonci sin al sia laborloko je la oka ĉiumatene kaj resti tie dum la tutaj laborhoroj; due, ŝi devis sin deteni de ĉiuj eksteraj kontaktoj; kaj trie, ŝi povis eldiri neniun vorton pri la pridemandado kaj esplorado, kiujn ŝi ricevis, eĉ al sia edzo. Wang Dingguo konsentis, kaj rapidis hejmen.

Ŝi estis frapita ĉe la ekvido de la pala, marasma Xie Juezai kuŝanta sur la sofo. Ŝi volis scii, kion ŝia liberiĝo okazis, kaj kiu savis ŝin el la inferfaŭko. Tiam subite ŝi ekmemoris ion kaj komencis pripalpi la angulojn kaj sidparton de la sofo. Xie mallforte murmuris: “Ili ĉiuj estas ĉi tie.” Li eĉ aperigis rideton. “Ne estu maltrankvila. Ĉiu el ili.”

Kiam venis famoj, ke la hejmoj de multaj veteranoj de la Partio estis traserĉitaj, Wang Dingguo jam faris la antaŭzorgan aranĝon: ŝovi ĉiujn taglibrojn de Xie Juezai sub la sidparton de la sofo kaj ilin enkudris. Tiuj ĉi taglibroj, tenataj pli ol sesdek jarojn kaj jam nombrantaj milionon da vortoj, ampleksis notojn pri la tempoj antaŭ kaj post la naskiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj tial estis valoregaj por studantoj de la moderna ĉina historio. Kiel eksinstruisto-komunisto kaj konfidenca sekretario de Mao Zedong antaŭ la Longa Marŝado en la Jiangxi-bazregiono, li registris ne nur siajn proprajn komentariojn pri

politikaj kaj sociaj eventoj, sed ankaŭ konversaciojn kaj dirojn de Mao Zedong, Zhou Enlai, Liu Shaoqi, Zhu De, Ren Bishi<sup>26</sup> kaj multaj aliaj elstaraj personoj. Kiam Wang Dingguo karesis la sofon kun profunda sento de trankviliĝo, ektintis la telefono. Ŝi tremis per la tuta korpo, timante levi la ricevilon. Post ĉirkaŭ unu minuto ŝi respondis la vokon. La voĉo ĉe la alia fino diris, “Lo! Halo! Kiu estas tie? Kiu parolas? Ha lo!”

Ŝi aŭskultis en tremetanta silento. Pose, en palpebruma daŭro, ŝi rekonis la konatan voĉon.

“Estas mi... estas mi,” Wang Dingguo ekploregis, sed ŝi penis regi sin. “Ho, ĉefministro... Mi estas hejme. Dankon, dankon. Nun mi estas hejme.”

“kiel fartas Xie Laŭ? Vi devas prizorgi lin bone, tre bone.” La voĉo de la ĉefministro venis kun ia nuanco de maltrankvilo. Post kiam ŝi demetis la ricevilon, Xie diris al ŝi pri tiu letero al Zhou Enlai. Se ne estus la helpo de la ĉefministro, li dubis, ĉu lia edzino povus iam revidi lin. Du jarojn poste, en junio 1971, Xie mortis. En ordinaraj tempoj homo de lia rango meritus okulfrapan nekrologan noticon en la gazetaro. Sed la “kvarpersona bando” kaj ĝia konsilanto Kang Sheng decidis, ke ne estu nekrologa notico, nek kondolencoj, nek florkronoj, nek iaj ajn ritoj, por signi lian forpason. Funebraĵoj, ili diris, estas parto de la malnovaj moroj, kiuj devas esti forigitaj. Zhou Enlai nuligis ilian ordonon.

Apenaŭ sekiĝis la larmoj de la vidvino, la bando de Jiang Qing komencis turmenti la familion de Xie. Unue ili malkonektis la telefonon, celante teni Wang Dingguo izolita kaj fari ŝian vivon malfacila. Informite pri tio ĉi, Zhou Enlai instrukciis al helpanto, ke li tuj riparigu la telefonon kaj faru, kion la familio bezonis fari. Tiu ĉi homo kun imponaj ŝtataj respondecoj tamen zorgis pri tiaj bagatelaj aferoj. Li eĉ atentigis sian helpanton pri tio, ke

en vintro la familio de Xie nepre ricevu sufiĉe grandan porcion da karbo kaj karbobrikaj por hejti la ĉambrojn.

Ekster la rondoj ĉirkaŭ Zhou Enlai en Zhongnanhai, Fu Chongbi, komandanto de la Pekina Garnizono, havis plej multe da ĉiutaga kontakto kun la ĉefministro en la unuaj jaroj de la “kultura revolucio”. Nun arĝentara kaj sesdeksep-jara, Fu estis nur knabo tiam, kiam li aliĝis al la Ruĝa Armeo kaj faris la Longan Marŝadon. Li rangaltiĝis de ordinara soldato al la generalo respondeca pri la ĉefurba sekureco. Lia okupo elmetis lin al konstantaj konfliktoj kun krucmilitirantaj “Ruĝaj Gvardianoj” de Jiang Qing kaj puŝis lin en multajn vizaĝo-kontraŭ-vizaĝajn oponadojn kontraŭ la megero mem.

Lia unua malagraba kontakto kun la edzino de Mao okazis en decembro 1966, kiam boliĝis la “kultura revolucio”. La “Ruĝaj Gvardianoj” forrabis Peng Zhen, urbestron de Pekino, kaj liajn superajn kolegojn en noktomezo. Zhou Enlai ordonis al Fu, ke li prenu rimedojn por liberigi la homojn kaj trovi sekuran lokon por ili. Jiang Qing, ravita de la aŭdaca ago de la junuloj, mokis la superruzitan garnizonan komandanton, kiam ili renkontiĝis vizaĝo-kontraŭ-vizaĝe.

“Nu, kion vi diros pri tio ĉi? Kian bonegan laboron la etaj generaloj faris! Jen vi, generalo, vi ja ne povas protekti viajn homojn, ĉu?”

Ŝia ĝojo estis efemera. Fu eltrovis la lokon, kie la urbestro kaj liaj kolegoj estis retenitaj, kaj translokis ilin al la garnizona sidejo laŭ la instrukcio de la ĉefministro.

Dume, la “Ruĝaj gvardianoj”, aŭdacigitaj de Jiang Qing kaj Lin Biao kaj ĝojegantaj por sia unua aventuro, komencis konkuri inter si, por fari la “plej kuraĝajn”, aŭ “plej revoluciajn” agojn. Rivalaj grupoj penis superi unu alian en spitado al leĝo kaj ordono kaj

en forkaptado de altrangaj ŝtatoficistoj, precipe de tiuj, kiuj estis enskribitaj en la nigra listo de Lin Biao kaj Jiang Qing. La personaro de la garnizonaj trupoj de Fu Chongbi, en nombro multe malpli ol la hordoj de la junuloj, estis devigita malfacilege luktadi kontraŭ la hom-forrabado.

Song Renqiong, unua partia sekretario de la Nordorient-Ĉinia Buroo kaj veterana militisto, oficevojaĝis al Pekino kaj loĝis en la armea multetaĝa hotelo je kelkaj mejloj okcidente de Tian-anmenplaco. Li ne estis amika al Lin Biao, kiu kun Jiang Qing konspiris kun agentoj senditaj el Liaoning-provinco, por unue kapti Song kaj poste denunci lin per falsaj akuzoj.<sup>27</sup>

“Ruĝaj Gvardianoj”, kiuj spionis la agojn de Song el la hotelo, enŝteliĝis en la domegon post noktiĝo kaj sin direktis rekte al lia ĉambro sur la plej alta etaĝo. Ili ne povis perforte forporti sian kaptiton per la lifto aŭ la ŝtuparo sen altiri troan atenton, ĉar la hotelo estis plena de gardostarantoj el la garnizono de Fu. Ili do decidis ligi la kaptiton kaj mallevis lin al la grundo per nodita ŝnuro. La nekutima bruado vekis atenton de la soldatoj, kiuj ĝustatempe alkuris al la loko kaj lin savis.

Informite pri tio, kion la “Ruĝaj Gvardianoj” intencis fari, Zhou Enlai faris ekspiron de faciliĝo, ĉar la freneza mallevo de tia alteco povus signifi tujan morton por homo en la aĝo de Song. Por eviti la ripetiĝon de tiaj okazaĵoj, la ĉefministro diris al Fu, ke li duobligu la gardojn ĉe la armea hotelo.

Ankaŭ Lin Biao kaj Jiang Qing tiris lecionon el la fuŝita forrabo de Song Renqiong, kaj preskaŭ sukcese efektivigis sian planon kapti Chen Zaidao kaj Zhong Hanhua, plejsuperajn oficirojn el la Komandejo de la Wuhan-a Militregiono de PLA en centra Ĉinio,

kiuj samtempe loĝis en la hotelo. Ĉi-foje la klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing kolektis sep milojn da “Ruĝaj Gvardianoj” por forte ataki la hotelon, kaj la sekurecaj trupoj de Fu estis multe superitaj en nombro. Pluraj centoj da junuloj sukcesis fari trarompon kaj estis impetantaj supren laŭ la ŝtuparo. Tio estis danĝera situacio. La garnizoina komandanto, kiu estis ĉe la loko, komunikiĝis kun Zhou Enlai kaj ricevis instrukcion kaŝi la du generalojn en iun neuzatan lifton kaj lasi ilin resti en ĝi inter la oka kaj naŭa etaĝoj. Samtempe la ĉefministro telefonis al la agento de Jiang Qing, kiu estis direktanta la operaciojn ĉe la hotelo, kaj postulis, ke li kaj liaj sieĝantoj tuj retiriĝu. La homo hezitis. Zhou faris la sekvojn tre evidentaj. Aŭ li cedos aŭ alie li estos transdonita al Prezidanto Mao por disciplina puno. La ultimato efikis.

Malgraŭ ĉiuj obstakloj kaj malfaciloj Fu Chongbi estis laŭdata pro sia bone plenumita laboro. Inter liaj atentindaj sukcesoj estis la rimedoj prenitaj por provizi marŝalon Chen Yi kaj marŝalon Xu Xiangqian je protekto. Al Fu, kiu laboris rekte sub la ĉefministro en tiuj ĉe aferoj, estis donitaj ne nur specialaj taskoj plenumotaj, sed ankaŭ proponoj kiel ilin efektivigi. Zhou Enlai eĉ faris noktan inspektadon kune kun Fu por vidi, ĉu la sekurigaj aranĝoj por altrangaj oficiroj de PLA estas en sufiĉe strikteco.

Foje Zhou Enlai instrukiis al tiu ĉi lojala oficiro, ke li disaranĝu siajn soldatojn kaj aŭtojn kun la motoroj funkciantaj kaj faru helikopteron ŝvebanta proksime, por gardi kontraŭ la ebleco, ke Partiaj veteranoj pridemandataj ĉe inkviziciecaj kunvenoj alfrontas fizikan danĝeron. Ili devas esti savitaj je ĉia kosto, li diris. Fu kreskis en sia laboro kaj fariĝis pli kuraĝa kaj pli memfida en siaj bataloj kontraŭ Jiang Qing kaj ŝiaj fanatikaj subtenantoj. Je la kulmino de la ĥaoso estigita de la plimultiĝo de la okazoj de

hom-forrabado, Fu Chongbi kontentiĝis per tio, ke li malhumile kondukis kontraŭ Jiang Qing kaj faris ŝin embarasita antaŭ publiko.

En la somero de 1967, Li Jingquan, unua partia sekretario de la sudokcident-Ĉinia Buroo kaj antaŭa politika komisaro de Marŝalo He Long, kune kun kelkaj aliaj veteranoj de la Partio, atendis la decidon de sia sorto, loĝante en iu gastejo de la Partio en okcidenta Pekino. La plejparto el ili estis en siaj sesdekaj jaroj, iuj en malbona sanstato, tamen ili estis piloriitaj kaj paradigitaj tra la stratoj de la ĉefurbo, kun sandviĉtabuloj pendantaj de la kolo, kiuj identigis iliajn nomon kaj “krimojn”. La iama aŭtoritatulo numero unua de la plej multthoma provinco de Ĉinio, Sichuan, kaj politika komisaro de He Long dum la Liberiga Milito, Li Jingquan estis suferanto de kronika hipertensio, kiu devus enhospitaliĝi anstataŭ resti en gasteja ĉambro. En la gastejo estis ankaŭ dekoj da kadroj altrangaj, sed pli junaj. Se nenio estus farita por malebligi la plagon de hom-forrabado, sekvus ilia vico.

La ĉefministro diris al Fu Chongbi, ke li prenu tujajn paŝojn por sekrete transloĝigi ĉiujn ĉi tiujn kamaradojn al la garnizona stabejo. Kiam Jiang Qing kaj ŝiaj lakeoj subite atakis la gastejon kaj trovis neniun postsignon de la homoj, kiujn ili venis por kapti, ŝi ekbolis de kolero. Ĉe kunveno vespere en la tago, Jiang Qing minace rigardis Fu.

“Kie ili estas?” ŝi ĵetis demandon al la garnizona komandanto en la vizaĝon.

Fu mutis. Li ekrigardis la ĉefministron, kiu havis severan vizaĝon. Al la rapide sinsekvantaj, insistaj demandoj de Jiang Qing li nur levis siajn ŝultrojn. Alpremite al muro, li fine respondis, “Demandu la superulojn, ili scias,” la sekvantan tagon li hazarde vidis Prezidanton Mao kaj raportis al li pri la instrukcio de la ĉefministro protekti la sieĝatajn kadrojn. Li ne menciis la premon, kiun Jiang Qing metis sur lin.



“Bone faris la ĉefministro. La garnizonaj trupoj ja plenumas siajn devojn en protektado de tiuj ĉi kamaradoj,” la prezidanto komentis. Fu trankviliĝis.

En tiuj tagoj estis okazigitaj regulaj ĉiutagaj kunsidoj, en kiuj Zhou Enlai ordinare prezidis. Tiuj ĉi estis tempo-konsumaj kunsidoj, ĉeestataj de membroj de la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio”, precipe Jiang Qing, Chen Boda kaj Kang Sheng. La superaj oficiroj de la garnizonaj trupoj gaste ĉeestis. En la tago tuj post la renkontiĝo de Fu kun la Prezidanto, Jiang Qing, ekvidinte la garnizonan komandanton, denove premdevigis lin eldiri la lokon, kie sin kaŝis la malaperintaj kadroj. Ŝi estis treege kolera kaj ne plu toleris eviteman respondojn. Ŝi kriegis al Fu Chongbi, kiu restis kvieta kaj trankvila.

“Iru demandi la prezidanton!”

“... kial vi ne diris tion pli frue?”

“Mi diris. Ĉu mi ne diris, ke la superuloj scias pri tio?”

Fu raportis al Zhou Enlai pri la renkontiĝo kun Prezidanto Mao kaj ties komento, kaj ili kune ekridegis.

Tamen en du okazoj Jiang Qing kaj ŝiaj subtenantoj superruzis lin. Unu konsernis marŝalon He Long, kaj la alia armean generalon Luo Ruiqing. Ĉar, se estis jam decidite starigi enketgrupon por esplori la dosieron de iu oficisto, kiel ajn malsolidaj la akuzoj povis esti, Fu Chongbi kiel garnizona komandanto havis nenian rajton sprimi sian opinion pri tio kaj devis transdoni la akuziton sub esploradon. Tial li ne povis ne transdoni tiujn ĉi du homojn, kiuj estis sub lia protektado. Fine, akuzoj estis fabrikitaj kontraŭ Fu Chongbi, kaj li pasigis kelkajn jarojn en malliberejo en Shenyang en nordorienta Ĉinio. Zhou Enlai anticipe donis al li privatan informon, ke Lin Biao intencas ekagi kontraŭ li, kaj ke kun

bedaŭro, la ĉefministro ne povas tion haltigi. Li diris al Fu, ke li neniam perdu esperon, ke ĉio ordiĝos, en la fino. La 22-an de marto de 1968, du tagojn antaŭ ol Fu estis forsendita el Pekino, ĉefministro Zhou publike donis al li adiaŭan manĝon en la Popola Halo. Tio estis elmonro de publika subteno al sindona kaj firma kamarado, kiu estis miskulpigita. La adiaŭaj vortoj de Zhou estis: estu preta respondi la alvokon denove fari servadon, kaj dume gardu la sanon kaj restu firma.

Poste la ĉefministro provis per ĉiu ebla rimedo senkulpigi Fu, kvankam ĉiufoje Zhou Enlai estis malhelpata de Jiang Qing kaj ŝia bando, eĉ post la morto de Lin Biao. Tamen, ĉe la fino de 1973, Mao Zedong aprobis la nuligon de la kazo kaj Fu Chongbi revenis al Pekino, liberigita de ĉiuj akuzoj.<sup>28</sup>

Estas eble konvene fini tiun ĉi ĉapitron per rakonto, kvankam skiza, pri la homo, kiu estis plej multe kaj plej longatempe kalumniata, sen escepto de Liu Shaoqi. Li eltenis ĉian atakon preskaŭ ĝis la fino de la senleĝa jardeko de 1966-76, sed li senplende eliris kaj fariĝis la plej prestiĝa gvidanto de Ĉinio.

Dum Liu Shaoqi estis etiketita kiel “la unua iranto de la kapitalisma vojo” de Ĉinio, Deng Xiaoping estis nomata “la dua iranto de la kapitalisma vojo” kun ĉiuj sekvoj de la puno por “perfido” al la Partio. Ambaŭ perdis sian liberecon en la tumulto 1966, kaj post du jaroj da mallibereco en Pekino estis translokitaj ĉiu al sia aparta maliberejo: unu al Kaifeng en Henan-provinco, centra Ĉinio, kaj la alia al Nanchang en Jiangxi-provinco en la sudo. Liu Shaoqi, la pli maljuna el la du, malsana kaj rapide malfortiĝanta, mortis en semajnoj post sia enkarceriĝo, dum Deng Xiaoping supervivis.

Naskita la 24-an de aŭgusto 1944 en Guang’an-gubernio, Sichuan-provinco, Deng

Xiaoping ĝuas la reputacion de la plej optimisma, elasta figuro en la ĉina politikistaro, trifoje falinta en la ĥaosa interna batalo en la Komunista Partio, unufoje antaŭ 1949 kaj dufoje dum la “kultura revolucio”. Li estis unu el la unuaj superaj gvidantoj, kiuj estis faligitaj de sur la pozicio aŭtoritata, kaj unu el la lastaj, kiuj fine reakiris sian gvidan pozicion, en la somero de 1977.

Kiel sia mentoro Zhou Enlai, Deng Xiaoping veturis al Francio por studi kiel laboristo-studento en 1920, aktivis inter la rondoj de ĉinaj progresemaĵ studentoj kiuj studis eksterlande, kaj aliĝis al la Komunista Partio. De Francio li veturis al Sovetunio por plua studado kaj revenis ĉe la komenco de 1926 al Ĉinio, kie li trovis kunlaborecon efektivigitan de d-ro Sun Jat-sen inter Kuomintango kaj la komunistoj pendanta sur fadeneto, se ankoraŭ ne rompiĝinta.

La unua granda laboro de Deng post lia reveno al Ĉinio estis en Guangxi-provinco (nun la Guangxi-a Ĝŭang-nacieca Aŭtonoma Regiono) en suda Ĉinio, kie li helpis krei armitan revolucion bazlokon. Lia unua degradiĝo okazis en 1933, kiam li estis senigita de la radikalaj maldekstruloj de la Partio je sia ofico pro subteno al Mao Zedong en disputoj pri politikolinioj.

Deng Xiaoping tute ne estis doktrinisma kaj nepraktikema teoristo, kiel multaj el liaj kamaradoj-studentoj, kiuj revenis el Sovetunio en la 1920-aj jaroj. Ili adoris ĉion sovetunian, ĉar en iliaj okuloj la granda norda najbaro estis la unua, kaj sekve la modela, socialisma lando en la mondo. Denove kiel Zhou Enlai, Deng metis grandan emfazon sur praktikon kaj plenumadon, kiujn li rigardis kiel la lakmus-provilon de vero kaj bono. Unu el liaj plej famaj diroj, kiu poste kaŭzis al li malfeliĉon, estis populara metaforo pri katoj,

eble el la infanaĝaj memoroj de lia naskiĝloko Sichuan, provinco tiam plagata de ratoj. Ne gravas, ĉu la kato estas nigra aŭ blanka, Deng diris, se ĝi kaptas musojn, ĝi estas bona kato. Kiuj do povis malaprobi tion? Lin Biao kaj Jiang Qing, kompreneble, kiuj insistis, ke li ignoras la politikajn distingojn, kiujn ili tiel multe ŝatis (inkluzive de la familia “klasa fono”), pro pragmataj konsideroj.

Unu ampleksa ekspozicio de “Reviziismaj kaj Kapitalismaj Eldiroj de Deng Xiaoping”, detala katalogo de cent tiaj ekzemploj, estis okazigita en Qinghua-universitato, por montri, kia aĉa “iranto de la kapitalisma vojo” estas Deng Xiaoping. Delegacioj el lernejoj, fabrikoj kaj registaraj oficejoj estis alkondukitaj por spekti tiun ĉi kreaĵon de Jiang Qing.

Sed aferoj pli strangaj ol fikcio ja okazis en la “kultura revolucio” de Ĉinio. Ĵonglado per la listo de personoj ĉeestantaj publikajn gravajn kunvenojn estis uzata de la novaj potencomanipulantoj por montri, kies aŭtoritateco estas en kreskado kaj kiuj estas en malfavoro aŭ estas baldaŭ eksigotaj. La listo, kompilita ĉefe de Lin Biao, Jiang Qing kaj iliaj subenantoj, akiris tian gravecon, ke ĝi estis rigardata kiel politika barometro. En aŭgusto 1966 Liu Shaoqi oficiale okupis la lokon malsuperan nur al Mao Zedong en la Partio kaj la unuan en la registaro, kaj tamen la novaĵ-raporto en *Popola Tagĵurnalo* post la revuado al la “Ruĝaj Gvardianoj” fare de Mao Zedong en la 18-a de aŭgusto 1966 malaltigis Liu al la oka loko. Tial ĉiu sciis, ke Liu estas en malagrabra situacio. Deng Xiaoping estis ankoraŭ pli malsupre en la listo. Fine lia nomo nur okaze aperis kaj poste komplete malaperis krom kiel objekto de kritikado.

En 1969 Deng kaj lia familio estis “senditaj malsupren” for de Pekino. Tiu ĉi

travivaĵo estis priskribita de lia filino Maomao en artikolo skribita por *Popola Tagĵurnalo* du tagojn antaŭ la okdeka naskiĝia datreveno de ŝia patro en 1984.<sup>29</sup> Titolita “Tagoj en Jiangxi”, la artikolo rememoris la ekzilon kaj vivon de ŝiaj gepatroj kiel kondamnitaj malliberuloj en iu dezerta, komplete forlasita infanteria lernejo sub la atentaj okuloj de gardistoj senditaj por malebligi al “la dua iranto de la kapitalisma vojo” fari eskapon. En la tuta lernejo estis nur tri enloĝantoj: ŝia patro, ŝia patrino kaj ŝia avino (duonpatrino de Deng Xiaoping), kies kuna aĝo nombris multe pli ol ducent jarojn. Maomoao skribis kun granda sentovarmo kaj respekto al la historio de la periodo.

Kiel en la okazoj de aliaj superaj ŝtatoficistoj atakitaj, la supozita kulpo de gepatroj kompromitis aliajn membrojn de la familio, senkonsidere de aĝo. Dum multaj lernaĝaj infanoj devis iri al la kamparo por fari agrikulturan laboron laŭ la instruo de Mao, ordinare daŭrantan je nedifinita periodo, multaj malofte montris sin eksterdome aŭ sin kaŝis ie por eviti arestiĝon. Hejmoj disŝiriĝis, ĉar la pli junaj estis dispelitaj al ĉiuj anguloj de la lando. La okazo de Deng Xiaoping ne estis escepto. La familianoj de Deng estis vaste disigitaj eĉ antaŭ tiam, kiam la tri plej maljuna estis senditaj al Jiangxi-provinco la 20-an de oktobro 1969.

Apenaŭ ili al kutimiĝis al sia nekonata ĉirkaŭaĵo en Nanchang, la provinca ĉefurbo, la agente de Lin Biao en la PLA-trupoj en Jiangxi alvenis al ilia gastejo kaj komencis fari al la nov-venintoj bonan lavon. Deng Xiaoping estis ordonita “dece konduki kaj humile submeti sin al transformiĝo per laborado”. Poste ili transloĝigis al “hejmo” en la dezerta, neuzata infanteria lernejo ne malproksime de Nanchang, kie Deng Xiaoping kaj lia familio trenis sian mizeran ekzistadon dum la sekvantaj tri jaroj. Deng kaj lia edzino, kiuj perdis

sian oficon en la registaro, ricevis nur malgrandan parton de sia antaŭa salajro, kies sumo ne sufiĉis eĉ por pagi iliajn ĉiutagajn bezonoaĵojn. Ili mem faris siajn kuiradon, lavadon kaj purigadon.

El la tri, Deng Xiaoping, kvankam jam sesdekkvin-jara, estis la plej fortika. Lia edzino Zhuo Lin havis kronikan, seriozan hipertension kaj lia patrino estis multe tro maljuna por ŝarĝi sin per la mastrumaj laboroj. Laŭ la filino Maomao, ŝia patro prenis sur sin la plej pezajn ŝarĝojn. Kiam ŝia patrino estis tro malsana por ellitiĝi, Deng donis al ŝi flegadon, servante al ŝi manĝaĵojn kaj dekoktante tradician ĉinan medikamenton. La avino faris iom da kuirado kaj pli malpezajn laborojn. La patro de Maomao hakis brullignon, portis akvon, disrompis grandajn karbopecojn por ilia forno, ktp.

La familio limigis la elspezojn por siaj vivnecesaĵoj, por ŝpari ĉiumonate iom da mono por pagi fervojajn veturkostojn de Maomao kaj ŝia pli juna frato, kiam ili ricevis permeson viziti siajn gepatrojn. Deng kaj lia familio kulturis la terspacojn apud la domo kaj faris legomĝardenon, parte por bonigi sian nutradon, parte por malpliigi elspezojn por nutraĵoj.

Agante laŭ la instrukcio de la agento de Lin Biao, la grupo da gardistoj destinitaj ilin gardi ne permesis la tri foriri de la loĝejo sen permeso aŭ havi ian ajn eksteran kontakton. Deng kaj lia edzino laboris duontage en traktor-fabriko je distanco de dudekminuta piedirado; en la posttagmezo, kune kun la duonpatrino, ili laŭvice laboris sur sia legoma parcelo; kaj vespere Deng kaj Zhuo Lin pasigis sian tempon per legado, dum la avino per kudrado. Antaŭe, kiam ili estis ordonitaj forveturi al Jiangxi, Deng petis la permeson preni kun si multon multon el la familia biblioteko, verŝajne antaŭvidante longan enfermitecon.

Li kaj Zhuo Lin estis dankemaj al ĉiuj tiuj libroj, kiujn ili slportis kun si, kiam la vesperoj fariĝis pli kaj pli longaj en la vintraj monatoj.

En privata vivo, laŭ Maomao, ŝia patro estis introspektema, ne vere silentema, sed homo malmulte-vorta. Hardita en la batalado dum pli ol duonjarcento, li jam fariĝis optimisto aplomba rilate al si mem. Li ne ĉagreniĝis pro malfeliĉo, ne tro ĝojis, kiam aferoj bone iris. La ŝanĝiĝoj de la tempo, kun tri supren-kaj-malsupreniĝoj en politika kariero dum pli ol kvindek jaroj, multe atestis tiun ĉi granvan trajton de la karaktero de Deng Xiaoping.

Vivante en la izoliteco de for a urbeto, Deng kaj lia familio, devigataj teni sin malsocietemaj, forte deziris akiri novaĵojn, precipe novaĵojn pri la politika situacio. Vere, ili havis *Popolan Tagĵurnalon* por legi kaj aŭskultis la radiodisaŭdigon, sed tio faris ilin neniom pli informitaj. En 1971 ili aparte interesiĝis pri la manko de ĉia informo pri Lin Biao, “vicĉefkomandanto” post Prezidanto Mao, kiu ŝajne ne partoprenis en la celebra kunveno de la Nacia Festo en la 1-a de oktobro tiujare. Ĉu Lin Biao sin detenis de tiu ĉi plej grava publika kunveno? Kio okazis en Pekino? Poste, frumatene de la 5-a de novembro, oni surprize diris al Deng kaj lia edzino, ke ili nepre iru al la fabriko kiom eble baldaŭ. Estos kunveno por aŭdi raporton pri dokumento de la Partia Centro.

Estis la unua fojo, ke Deng kaj liaj familianoj estis petitaj ĉeesti ian politikan kunvenon de post sia alveno al Jiangxi antaŭ du jaroj. Kion tio aŭguris? Maomao ne sciis, kion signifas la voko, kaj tre deziris diskuti kun iu pri tio (ŝi kaj ŝia plej aĝa frato Deng Pufang, paraliziginta sub la talio pro persekuto fare de agentoj de Kang Sheng en la Pekina Universitato, tiam jam kuniĝis kun la familio). La patro de Pufang siatempe faris peton al

la Partia Centro, ke ĝi permesu al lia filo kuniĝi kun ili en Jiangxi, ĉar kiel kriplulo li ne kapablis vivteni sin per tio, kion li perlaboris, farante paperkorbojn en pundomo de Pekino. La gefratoj diskutis pri la subita ŝanĝiĝo, sed kiam la tagmanĝa tempo alproksimiĝis, iliaj gepatroj ankoraŭ ne sin montris, kaj ili maltrankviliĝis.

Ĉe la tagmezo Deng kaj lia edzino revenis, sed neniu el ili diris eĉ unu vorton, ĉar la gardistoj estis apude. Zhuo Lin ekpuŝis per sia kubuto sian filinon, kaj kiam ili eniris en la kuirejon, ŝi desegnis per sia montrofingro sur la manplado de Maomao la jenajn ĉinajn ideografiaĵojn: “Lin Biao mortis.”

Tuj kiam la gardistoj foriris el la domo kaj estis ekster la aŭdebleco, la familio komencis diskutadon pri tiu ĉi gravega evento. Zhuo Lin tre detale rakontis la raporton donitan en la fabriko pri tio, kiel Lin Biao kaj lia edzino Ye Qun kaj ilia filo Lin Liguo konspiris por mortigi Prezidanton Mao, kiel ili estis senmaskigitaj kaj fuĝis el la lando, kaj mortis en aviadila kraŝo. Ŝia edzo, ruĝiĝinta de emocio kaj enpenŝiĝinta, diris malmulte. La mallonga spritaĵo dirita de Deng Xiaoping prezentis lian karakteron: “En la mondo ne troviĝus justeco, se Lin Biao ne mortus tian morton.”

De tiu tago la cirkonstancoj komencis pliboniĝi. La krudvoĉa insultema agento de Lin Biao estis forpelita. Ŝanĝiĝo en la estraro de Jiangxi-provinco venigis du gvidajn ŝtatoficistojn al la pordo de Deng; ili vizitis kun siaj komplimentoj kaj demandis, ĉu estas io, kion ili povus fari por iom plifaciligi ilian vivon. Rezulte de ilia vizito, la du plej abomenindaj gardistoj estis forigitaj. Poste, ĉe la fino de 1972, ili aranĝis al Deng kaj lia edzino pilgriman vojaĝon al jinggang-montaro, la fortreso, kie Mao Zedong kaj Zhu De kreis sendependan reĝimon per armita ofrto en la ĉirkaŭaj regionoj, kaj ankaŭ reviziton al



la intima loko, Ruijin, la ĉefurbo de la Ĉina Soveto en la fruaj 1930-aj jaroj.

En februaro 1973, la Partia Centro sciigis Deng Xiaoping kaj lian edzinon, ke ili povas reveni al Pekino. La 20-an, pasiginte pli ol tri jarojn da devigata neaktiveco en la sud-Ĉinia provinco, Deng kaj lia familio komencis sian vojaĝon per fervojo returne al Pekino. Du semajnojn poste, en la Internacia Virina Tago, la 8-a de marto, Deng Xiaoping faris diskretan aperon en la celebra kunveno donita de Zhou Enlai en la popola Halo. Li reprenis la direktadon de la registara potenco kiel la unua helpanto de la ĉefministro kaj, kiam la sanstato de la enhospitaliĝinta Zhou Enlai fariĝis kriza, efektive kaj ne nominale transprenis la ĉefministrecon.

Kvankam Deng Xiaoping ĉiam sciis, ke Jiang Qing kaj ŝia bando da konspirantoj ĉiel klopodas por refoje renversi lin, tamen en la finaj monatoj de 1975 estis tiom multe da laboro por fari, ke li tute ne konsideris sian personan estontan sorton. Antaŭ ĉio estis la vizito de la usona prezidento Gerald Ford, la postveninto al Richard Nixon en la Blanka Domo. Deng bone sciis, ke la pozicio de Ĉinio en la Ĉinia-Sovetunia-Usona triangulo de fortoj estas multe tro grava por esti influata de la perturboj en la enlandaj politikoj. Li do direktis sian tutan energion al la delikata traktado de la diplomaciaj malsimplaĵoj. Tamen la danĝersignaloj embuskantaj ĉirkaŭ li – la plej evidenta estis la pliintenxiĝo de la kampanjo de “Kritikado kontraŭ Deng”, iniciatita de Mao Zedong – farigis pli kaj pli misaŭguraj.<sup>30</sup>

En la plirapidigita batalado por la plej alta aŭtoritato post la morto de Zhou Enlai, Jiang Qing kaj ŝia bando pli energie klopodis por faligi sian ĉefan malamikon de sur la alta pozicio de potenco. Ili pensis, ke ilia okazo jam venis, kiam dum la tempo de la festo *Ĉingming* en frua aprilo centoj da miloj da homoj torentis sur Tian’anjmen-placon tagon

post tago por esprimi sian malĝojon pri la forpaso de Zhou Enlai antaŭ tri monatoj – kaj sian retenatan malkontenton kontraŭ la regado de la “kvarpersona bando”. Jiang Qing kaj ŝia bando faris rebaton per vitriolaj artikoloj en la novaĵ-komunikiloj, akuzante Deng Xiaoping pri tio, ke li instigis la popolon leviĝi kontraŭ la Partio kaj Prezidanto Mao. Post tio ĉi sekvis la klopodo artifice igi la Politikan Buroon akcepti du rezoluciojn, kondamnantajn Deng Xiaoping kaj senigantajn lin je ĉiuj oficoj kiel en la Partio, tiel ankaŭ en la registaro.<sup>31</sup>

Tiutempe al la plejparto de la popolo estis evidente, ke tiaj akuzoj estas senbazaj de la komenco ĝis la fino. Post la falo de Jiang Qing la verdikto estis renversita kaj Deng Xiaoping reokupis ĉiujn siajn postenojn. Li ĝuis pli grandan popularecon ol iam ajn antaŭe kaj lia influo en la Partio estis ree konfirmita, post kiam la Tria Plena Sesio de la Dekunua Centra Komitato de la Partio, okazigita ĉe la fino de 1978, malaprobis la “kioajnismon” antaŭenpuŝitan de Hua Guofeng, la “nigraĉevala” postvenanto al Mao Zedong en 1976, kaj renversis la erarajn rezoluciojn akceptitajn antaŭ unu jaro. Neniu alia politika eminentulo en la nuntempa Ĉinio montris pli grandan elastecon ol Deng Xiaoping, la elektito de Zhou Enlai por gvidi Ĉinion laŭ la vojo al la modernigo projektita de Mao kaj Zhou mem.

Kaj Zhou ja elektis plej bonan homon por la tasko – ordigi la ĥaoson rezultigitan de la “kultura revolucio”, ellabori la agadplanon pri ŝanĝado kaj reformado por plenumi la bezonojn de modernigo, kaj refreŝigi la gvidantaron ĉe ĉiuj niveloj per junaj, kenergiaj homoj, kiuj estas profesie kvalifikitaj, al socialismo dediĉitaj kaj ne timantaj defion kaj eĉ kontraŭstaron. Laŭ temperamento, laŭ sperto kaj decidemo, Deng Xiaoping estis la homo taŭga por la tasko, homo kapabla elteni ĉiajn elprovojn kiel lia mentoro Zhou Enlai. La

reformado, kiun li helpis efektiviĝi, jam transformis multaj aspektojn de la ĉina vivo kaj metis la fundamenton por la progresoj ekonomia, politika, socia kaj kultura, al la venonta jarcento. La celo estas turni Ĉinion en evoluantan, prosperan landon kun altaj viv- kaj kultur-niveletoj, kaj demokratia, socialisma sistemo.

Ĉu estos eraroj kaj malsukcesoj sur la vojo antaŭen? Jes, kompreneble. Sed Deng Xiaoping kaj tiuj, kiuj pensas kiel li, estas certaj, ke tiaj eraroj estas neeviteblaj, sed korekteblaj en la procezo de reformado. Deng Xiaoping, kiu estis rimarkinde malaltkreska, faris ŝercon pri si ĉi-rilate. Eĉ se la ĉielo falus, li diris, ne necesus maltrankviliĝi. Malgraŭ ĉio, estus la altkreskuloj, kiuj la unuaj trafiĝus kaj suferus la plej fortan ekfrapon.

#### **Notoj:**

1. En sia artikolo “Marksismo kaj kondiĉoj en Ĉinio”, en *Ruĝa Flago* (1983, n-ro 6), historiisto Hu Sheng havis la jenon por diri pri la “kultura revolucio”: “La kultura revolucio faris eraran taksadon pri la tiamaj kondiĉoj (kvazaŭ burĝaj reakciaj fortoj estus ĉie sentataj) kaj samtempe kredis, ke du aŭ tri fortaj atakoj farataj de popolamasoj povos komplete transformi la tiamajn kondiĉojn kaj krei la ‘Plej puran’ kaj ‘plej idealan’ socialisman socion. Tio estas nur revo kaj povas fari nenion krom malutilo”. Hu Sheng nun estas direktoro de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj.

2. “Komentario pri la Unua Stadio de la Kultura Revolucio” skribita de Wang Nianyi en *Esplorado pri la Historio de la Partio*, revuo neregule publikigata de la Partio-historia Esploro de la Muzeo de la Ĉina Revolucio, la 20-a de oktobro 1948, Pekino.

3. *Memoraĵoj de Peng Dehuai*, Ĉapitro 1, Popola Eldonejo, Pekino.

4. *Rezolucio pri la Historio de KPCĈ. (1949-81)*, Sekcio 17.

5. Samlibre, Sekcio 18.

6. “Memore al Onklo Peng Dehuai” skribita de Peng Gang, *Popola Tagĵurnalo*, la 26-a de novembro 1984.

7. *Elektitaj Verkoj de Deng Xiaoping*, p. 280.

8. “Mi Priploras Yiduo” skribita de Wu Han en *Memore al Wen Yiduo*: Antologio, p. 59, Sanlian-eldonejo, Pekino.

9. “Rememoro pri Deng Tuo”, skribita de Ding Yilan (lia vidvino) en *Memore al Novaj-fronto*, 1979, n-ro 1.

10. La Politika Buroo de KPCĈ kunvenis dum la 4-a – 26-a de majo 1966 en Pekino. La 16-an de majo ĝi akceptis la Cirkuleron de la Centra Komitato de KPCĈ (ĝenerale konata kiel la “Cirkulero de la 16-a de Majo), kiu konsistis el tri sekcioj: Antaŭparolo anoncanta la starigon de gvida grupo de la kultura revolucio respondeca rekte antaŭ la Konstanta Komitato de la Politika Buroo; la anonco pri serio da

politikoj kaj rimedoj por akceli la kampanjon, kiuj estis, en retrorigardo, ekstreme-maldekstraj; kaj la fina parto vokanta ĉiujn en la Partio, registaro, armeo, kaj institucioj edukaj kaj kulturaj “sturmi la citadelojn” de la burĝaj fortoj, iliajn reprezentantojn kaj kutimojn. Du tagojn poste, la 18-an de majo, Lin Biao faris sian fifaman paroladon pri ŝtatrenversoj kaj atakis Peng Zhen, Luo Ruiqing, Lu Dingyi kaj Yang Shangkun, pri formado de “kontraŭ-Partia” kliko.

11. *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, p. 450.

12. Granda Revolucio: T.e. la Unua Elanda Revolucia Milito kondukita sub la kunlaboro de KPĈ kaj Kuomintango kontraŭ la imperiismaj kaj feŭdaj fortoj – la nordaj militaristoj. Ĝi malsukcesis pro la perfido de Ĉjang Kajŝek. – Trad.

13. *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, p.451.

14. “Nostalgio – Mallonga Biografio de Sitson Ma” skribita de Ye Yonglie, publikigita en la monata gazeto *Wenhui Yuekan*, 1985, n-ro 5, Ŝanhajo.

15. El “Rezolucio pri Kelkaj Demandoj en la Historio de Nia Partio (1945)”: “La ideoj de kamarado Liu Shaoqi pri taktikoj por la laboro en la Blankaj Regionoj same estas modelo. Ĝuste konsiderante la tre rimarkindan malegalecon inter la forto de la malamiko kaj mia propra en la Blankaj Regionoj, kaj precipe en la urboj, post la malvenko de la revolucio en 1927, kamarado Liu Shaoqi staris por sistema organizado de niaj retiriĝo kaj defendo kaj ‘la portempa evito de decidaj bataloj kun la malamiko, dum la situacio kaj kondiĉoj estas malfavoraj al ni’, por ‘sin prepari al revoluciaj atakoj kaj decidaj bataloj en la estonteco.’” *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, Vol. III, p. 202

16. *Elektitaj Verkoj de Deng Xiaoping*, p. 287.

17. *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, Vo. II, p. 452. Fakte Kang Sheng, konsilanto al Jiang Qing en la “Gvida Grupo de la Kultura Revolucio”, estis malantaŭ la manovroj “senmaskigi” tiel nomatajn “perfidulojn” kaŝitajn en la Partio kaj relevi la “Kazon de sesdek unu personoj”. Rezulte de tio Bo Yibo, An Ziwen, estro de la Organiza Departemento de KPĈ, kaj multaj aliaj baldaŭ fariĝis viktimoj de falsaj akuzoj faritaj de Kang Sheng kaj la “Ruĝaj Gvardianoj” sub lia dispono. Liu Lantao, unua sekretario de la Shaanxi-provinca Partia Komitato, kiu estis menciita en la telegramo de Zhou Enlai al la “Ruĝaj Gvardianoj” en Xi’an, estis unu el tiuj, kiuj la unuaj estis kalumniataj kaj persekutataj.

18. Bo Yibo nun estas vicprezidanto de la Konstanta Komisiono de CK de KPĈ.

19. “Laŭ” signifas grandaĝulon. Oni ĝin aldonas sufikse al al nomo de maljuna eminentulo por esprimi respekton. – Trad.

20. Enhospitaligo estis unu el la rimedoj uzitaj de Zhou Enlai por protekti kamaradojn. En la raporto sendita al Mao Zedong li proponis, ke “sekreta kuracado” en Hospitalo N-ro 302 estu donita la Tao Zhu, tiam n-ro 4 en la Partia hierarkio, ĉar Lin Biao, Jiang Qing kaj iliaj subtenantoj estis lin kune atakantaj en la komenco de 1969. *Elektitaj Verkoj de Zhou Enlai*, vol. II, p. 454.

21. Rezolucio pri la Historio de KPĈ (1949-81), Sekcio 21.

22. Parolado al la personaro de la Fremdlingva Eldonejo, aŭgusto 1966.

23. “Rememoroj pri Ĉefministro Zhou en la Kultura Revolucio” skribita de Xu Xiangqian en *La Amata Ĉefministro de la Popolo*, kp. 1.

24. *Xi’an-evento kaj Kamarado Zhou Enlai* skribita de Luo Ruiqing, Lü Zhengcao kaj Wang Bingnan, Popola eldonejo, Pekino, 1978.

25. La semajna gazeto *Liaowang (Foren-rigardo)*, la 5-a de marto 1984, Pekino.

26. Ren Bishi (1904-1950) aliĝis al KPĈ en 1922 kaj estis supera gvidanto de la Partio en la tempo de sia morto.

27. Song Renqiong, naskita en 1909, propravole retiriĝis el la Politika Buroo en septembro 1985, por

ke pli junaj povu preni sur sin pli da respondecoj en la plej supera gvidinstanco de la Partio. Nun li estas vicedirektoro de la Centra Konsila Komitato de KPĈ.

28. “La Kaŝita Fako de ‘la Armita Atako Kontraŭ la Gvida Grupo de la Kultura Revolucio’” en *Popola Tagĵurnalo*, la 15-a de marto 1979, p. 3. Antaŭ “Intervujo al Generalo Fu Chongbi” en *Pkina Vespera Ĵurnalo*, la 12-a de aprilo 1985, p. 1. Fu Chongbi estis politika komisaro de la Pekinaj Militaj Trupoj de PLA.

29. *Beijing Review (Pekina Revuo)*, la 3-a de septembro 1984.

30. Rezolucio pri la Historio de KPĈ (1949-81), Sekcio 21, paragrafo 3.

31. Du rezolucioj akceptitaj de la Centra Komitato de KPĈ estis publikigitaj la 7-an de aprilo 1976 – unu nomumanta Hua Guofeng unua vicprezidanto de la Partio kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro kaj la alia eksiganta Deng Xiaoping de ĉiuj liaj oficoj en la Partio kaj registaro.

# ĈAPITRO X

## Servoplumado en Hospitala Lito

“Homo ne devas timi morton. En okazo de milito, mi pensas, plej bone estas morti sur la bataalkampo. Batalu kontraŭ la malamiko ĝis la fino, kaj se vi estas trafita de kuglo, tio estas inda morto. Se ne estas milito, do laboru energie, tre energie, ĝis vi plene elĉerpiĝos kaj falos mortinta.”

Tiuj ĉi vortoj estis diritaj de Zhou Enlai dum la ĉina Printempa Festo de 1966 en Tianjin, kie antaŭ ĉirkaŭ kvindek jaroj li unuafoje renkontis Den Yingchao, sian edzinon. Ili estis ĝuantaj maloftan ferio, kaj Zhou estis en filozofia humoro, respondante al la propono, ke li iom sin malstreĉu en laboro. Li estis parolanta al Yang Zhengmin, la filo de generalo Yang Hucheng (unu el la du Kuomintang-aj generaloj, kiuj forkaptis Ĉjang Kajŝek en Xi'an-evento en 1936). Yang Hucheng estis ekzekutita de la Kuomintanga reĝimo en ĝiaj lastaj tagoj sur la ĉeftero, kaj lia filo fariĝis unu el la neoficiale adoptitaj filoj de Zhou-familio.<sup>1</sup>

La printempa Festo estas okazo por rekuniĝo de familianoj, kaj la junulo, tiam vicurbestro de Tianjin, venis por viziti Zhou Enlai kaj Deng Yingchao. Post tagmanĝo ili iom ludis tablotenison. Yang opiniis, ke la ĉefministro aspektas pli malgrase ol kutime, kaj dubis, ĉu li vere estas en bona sano. Zhou diris al li, ke li regule faras korpan ekzercadon kaj vintre povas eĉ ne porti palton ekstere. Nenio estas al li, li trankviligis la junulon, kaj estas nenia motivo por ne plu labori kiel antaŭe. Sed post kelkaj monatoj la tumulta “kultura revolucio” eksplodis, kaj neniu povis plu labori kiel antaŭe.

Pli ol iu ajn alia supera gvidanto, Zhou Enlai estis devigita porti pezegajn ŝarĝojn. Lia kormalsano, kvankam tiam

ankoraŭ ne eltrovita, komencis turmenti lin kaj tamen la ŝarĝoj, anstataŭ malpeziĝi, fariĝis pli kaj pli pezaj kun la paso de la monatoj. Multaj el liaj intimaj helpantoj, kiel ekzemple Deng Xiaoping, He Long, Chen Yi, Luo Ruiqing, Bo Yibo kaj Lu Dingyi, estis eksigitaj for de siaj oficoj. Restis nur skeleta personaro por helpi al Zhou prizorgi la normalajn aferojn de la ŝtato – kaj ankaŭ la komplikaĵojn de la “kultura revolucio”. En 1972 la kuracistoj malkovris, ke Zhou Enlai suferas je kancero. Nur kiam lia sanstato evidente pli malboniĝis, li konsentis ricevi konvenan kuracadon. Sed la laboro daŭris. Li nur transigis sian oficejon de Zhongnanhai al la Pekina Hospitalo.

Kun konsento de Mao, Deng Xiaoping estis revenigita kiel vicĉefministro, sin ŝarĝante per la ĉiutagaj aferoj de la Ŝtata Konsilantaro, kvankam el sia hospitala lito Zhou Enlai ankoraŭ sin okupis pri gravaj ŝtataj aferoj kaj akceptis eminentajn vizitantojn el la eksterlando. Sepdekses-jara, Zhou Enlai volis laboregi ĝis sia morto.

En la aŭtuno de 1975 li jam sciis, ke al li restas malmulte da tempo. Iun septembran tagon li iris al la Pekina Hotelo por hartondo, kaj kiel kutime Zhu Dianhua, la plej aĝa kaj lia preferata barbiro en la barbirejo, lin servis. Zhu tondis por li la harojn dum pli ol dudek jaroj kaj la du interamikiĝis.<sup>2</sup> Plejofte la ĉefministro vizitis la hotelon vespere. Kiam troviĝis pli da klientoj ol kiom la barbiroj povis servi, hotelgastoj proponis cedi sian lokon en la atendvico, sed Zhou ĉiam rifuzis. Li sidis legante ĵurnalojn, ĝis venis lia vico.

Kiam lin premis tempomanko, ekzemple kiam urĝa laboro tenis lin en Zhongnanhai aŭ kiam li devis intervidiĝi je fiksita tempo kun alilandaj vizitantoj, li sendis venigi Zhu. Ofte en tiaj okazoj la barbiro estis invitita resti por tagmanĝo aŭ vespermanĝo kun la ĉefministro kaj lia edzino. Foje, dum razado la ĉefministro ne povis reteni tuson kaj ricevis tranĉeton sur sia mentono.

Zhu ripete pardonpetis. “Estas mia kulpo. Ne riproĉu vin mem. Mi devus diri ion antaŭ ol ektusi,” la ĉefministro penis trankviligi Zhu. “Feliĉe, Laŭ Zhu<sup>3</sup>, via razilo ja faris lertan eviton!”

Dum tiu septembra vizito, kiu fakte estis lia lasta, la ĉefministro proponis fari grupan

fotografajon por memoro. Zhu ĝojis pro la ideo, sed, ĉar iuj el la barbiroj forestis tiun tagon, li pensis, ke pli bone estas prokrasti tion por alia tempo. Ne perceptante la klaran aludon de la ĉefministro, li kredis, ke la ĉefministro baldaŭ ree venos. Poste Zhu profunde bedaŭris tiun ĉi perditan okazon, ĉar la fotografajo estis neniam farita. Dum la sekvantaj tri monatoj Zhou Enlai estis grave malsana. En decembro Zhu Dianhua plurfoje teelfonis al la hospitalo, proponante veni kaj tondi al la ĉefministro la harojn. Sciigite pri tio, la ĉefministro diris al tiuj, kiuj lin flegis: “Zhu estas mia barbiro jam tiel multajn jarojn. Vidante min en tia stato, li afliktiĝos. Estas pli bone, ke li ne venos.”

Enhospitaliĝinte, Zhou Enlai daŭrigis plenumi taskojn kaj zorgi eĉ pri tio, kio estis ekster la normala amplekso de liaj devoj. En la somero de 1975, unu jaron post sia enhospitaliĝo, li faris al si zorgojn pri la manuskripto de la reviziita *Xinhua Zidian* (*Nova Ĉina Vortaro*), populara referenca verko por ĉiutaga uzo. La leksikografoj, kiuj ofte konsultis lin dum la antaŭaj jaroj, nun estis pretaj sendi la manuskripton al la presisito. Tamen ili volis ricevi opiniojn de la ĉefministro pro ilia finita produkto. Malgraŭ ĉio, ĝi iasence estis preskaŭ infaneto ne nur ilia, sed ankaŭ lia. Antaŭe li subtenis la projekton kaj persone ĉeestis plurajn kunsidojn por diskuti pri metodoj kaj rimedoj publikigi vere bonan novan eldonon.

Tamen ili nutris neniun grandan esperon aŭdi ion de li, sciante, ke lia sanstato estas necerta kaj ke tiel multaj gravaj aferoj postulas lian atenton.

Ĉiuj el la eldonejo ekscitiĝis tiam, kiam la raporto prezentita al la Ŝtata Konsilantaro estis resendita el la hospitalo kun subskribo evidente de Zhou Enlai kaj marĝenaj komentoj. La personaro laboranta super la vortaro estis ekzaltita, ĉar la ĉefministro estis sufiĉe sana



por tralegi ilian raporton, kaj samtempe ankaŭ malĝojis, kĉar lia skribo estis tremeteca. Zhou Enlai sikribis ĉe la fino jenajn vortojn: “Pardonu, ke mi prokrastis ĝin pro malbonfartoi.” La pardonpeto emociis ĉiujn tiel, ke ili ne povis diri eĉ unu vorton.<sup>4</sup>

Zhou Enlai submetis sin al dek kvar operacioj dum sia longedaŭra restado en la hospitalo. Eĉ tiel, li malgraŭe iris el la hospitalo, ne ĉiam kun la volonta aprobo de la kuracistoj, por plenumi plurajn publikajn funkciojn, kiuj laŭ li ne devis esti komisiitaj al iu ajn alia.

La unua estis la celebra kunveno de la Nacia Festo okazigita en la antaŭvespero de la dudekkvina datreveno de la naskiĝo de la Popola Respubliko, por kies fondo li siatempe tiel brave batalis kiel iu ajn alia. En la vespero de la 30-a de septembro 1974, je la surprizo kaj ĝojo de tiuj, kiuj kunvenis en la Popola Halo, Ĉefministro Zhou aperis por prezidi super la arĝenta jubileo. Ĉiuj kapoj turniĝis, kiam li eniris en la bankedan ĉambregon. Ĉar la ĉefministro jam ne sin montris publike dum pli ol du monatoj, kaj cirkulis famo, ke li ricevis kirurgian operacion, kies naturo tamen ne estis malkaŝita. La publiko zorgis pri lia sanstato kaj nun, vidante lin en sia mezo, oni dronis en ĝojego, pensante, ke li jam resaniĝis.

Membroj de la diplomataroj, malgraŭ etiketo, streĉis sian kolon kaj eĉ staris sur la seĝo kiel ĉiu alia, konkure penante havi ekvidon de la ĉefministro. Poste li faris parolon al la kunveno. Kvankam li foj-refoje gestis por ĉesigi la aplaŭdadon, tamen tiu ĉi libera esprimo de Ĝojo kvietiĝi nur post longa tempo. Lia mallonga parolo, de tempo al tempo interrompata de aplaŭdoj, estis la lasta, kiun li faris al aŭdantaro kun tiom multe da reprezentantoj de la Pekina fremdlandana komunumo. Ĝentila kiel ĉiam, li tamen aspektis

pale. Sed la afableco, la elegantaj manieroj montriĝantaj en ridetoj, kaj la kutimaj delikataj kapklingoj por doni akcentojn, estis la samaj kiel antaŭe. Malmultaj el la ĉeestantoj sciis, ke Zhou Enlai jam estas malsana je kancero pli ol du jarojn, kaj neniu supozis, ke ili neniam revidos lin.

Zhou Enlai faris paroladon ankaŭ al la Kvara Tutlanda Popola Kongreso, kiu okazis en januaro 1975. La kunvoko de la kongreso estis evidenta indiko, ke la malnova generacio de la Partio deziris kun senpacienco renormaligi la vivon de la ŝtato. Ĉiaokaze, la okazigo de la Kongreso jam estis tro longe atendata – la lasta okazis antaŭ la “kultura revolucio”. Ĝuste unu jaron antaŭe, Jiang Qing kaj ŝia bando vane faris sian plejebulon renversi Zhou Enlai de lia ĉefministreco per la absurda kampanjo de “Kritikado al Lin Biao, Kritikado al Konfuceo”. Malgraŭ ilia minaca bruado, la ĉefministro kaj liaj kolegoj lojalaj restis firme en la pozicio de aŭtoritato.

Krom lia parolado al ka kvara Tutlanda Popola kongreso, Zhou Enlai ankaŭ prezidis en la Dua Plena Sesio de la Deko Centra Komitato de la Partio, kiu decidis pri la tagordo de la antaŭa kaj pri la konsisto de la nova registaro. La du monatoj de decembro 1974 ĝis januaro 1975 estis periodo de intensa en-Partia batalo, kiu multe konsumis la jam tre lacigitan kaj morte malsanan Zhou Enlai.

Tamen, konsciante la necertan staton de la nacio en tiu ĉi kriza tempopunkto, li rifuzis ĉiujn proponojn pri malpezigo de lia laborŝarĝo. Jam plurajn semajnojn li senĉese laboris por fari preparojn por la du kunvenoj, pesante la elektojn por la ĉefaj registaraj postenoj kaj donante la lastajn tuŝojn al sia parolado antaŭ la Kongreso. Mao estis zorgema. Li instrukiis al la helpantoj de Zhou kion eble mallongigi la paroladon, por ke ĝi povu esti

eldirita per unu spiro.<sup>5</sup>

Ĝi ja estis la plej mallonga parolado de Zhou en Tutlanda Popola Kongreso. La deputitoj aŭskultis kun streĉita atento. Unue, ĝi estis la unua Kongreso post dekjara interrompo kaj, due, la parolado traktis ĉefe la temon pri efektivigo de la modernigo de Ĉinio en la sferoj de agrikulturo, industrio, nacia defendo, scienco kaj teknologio. Tio ĉi estis la lasta parolado de la ĉefministro pri la estonteco de la lando.

Lia tria kaj lasta publika ago okazis ses monatojn poste en junio – por plenumi la funebran ceremonion por Marŝalo He Long. Kamaradoj vane penis persvadi lin ne spiti la varmegan veteron de Pekino por iri al la Babaoshan-a Tombejo de Revoluciuloj por la funebra soleno, kiu estis prokrastita jam konsiderinde longan tempon pro la malhelpado de Jiang Qing kaj ŝia bando. Zhou ja estis en tro malbona sanstato por eliri el la hospitalo, sed li insistis. La soleno ne estis raportita en la ĵurnaloj la sekvantan tagon. Jiang Qing kaj ŝia bando ne permesis publikigon de la novaĵo. Ili ne volis, ke la publiko sciu pri la rehonorigo de He Long, des malpli pri tio, ke ĉefministro Zhou Enlai malgraŭ sia malsano eliris el la hospitalo por honori la memoron de la homo, kiun ili persekutis ĝis morto.

Unu monaton poste en julio, eble el nostalgio, Zhou Enlai iris el la hospitalo al la Popola Halo, loko, kiun li antaŭe frekventis. Li faris surprizon al la servantoj, el kiuj multajn li konis tiel, ke li povis eĉ eldiri ilian nomon, ĉar tie li tiel ofte akceptis ŝtatajn gastojn. Neniu revis pri revido de la malsana ĉefministro en ilia mezo. Ili petegis lin ripozi kiel eble plej multe.

Li ekridetis kaj diris, duone serioze kaj duone ŝerce: “Ĉu revoluciulo povus agi tiamaniere?” li promenis tie kaj tie, kaj kiam li venis al la akcepta halo proksime de la suda

enirejo, li montris per la fingro unu pentraĵon kun pinarbo, la faman pengraĵon “Ĉiuj Gastoj Bonvenaj” sur la muro. Ĝuste ĉi tie, li laŭte rememorigis al la servantoj kaj siaj akompanantoj, li akceptis en sennombraj fojoj registarajn gvidantojn el amikaj landoj. Ĉi tie estis la preferata loko por fari grupajn fotografaĵojn de gastigantoj kaj gastoj.

Tri monatojn antaŭ sia morto, Zhou Enlai sendis sian sekretarion al Wang Yeqiu, la kuratoro de la Ĉina Muzeo, por demandi pri iu afero, kiu okazis antaŭ ĉirkaŭ jaroj. Li okaze ekmemoris ĝin kaj pensis, ke ĝi devas esti registrita kiel historia fakto. Ĝi estis pri la membreco de Yang Du en la Komunista Partio de Ĉinio.<sup>6</sup>

Malmulte konata ekster Ĉinio, Yang Du (1874-1931), kiu naskiĝis en Hunan-provinco, estis sperta postkulisulo en la tumulto de politika vivo en Pekino dum la Unua Mondmilito kaj la gvidanto de rondeto konata kiel Klubo el Ses Sinjoroj. Inter la ses estis Yan Fu (1854-1921) el Fujian-provinco, kiu siatempe studis en Anglujo kaj enkondukis Okcidentajn ideojn en Ĉinion pere de siaj tradukoj de Thomas Henry Huxley, John Stuart Mill kaj Montessquieu. Kompletata konservativulo, Yang Du pensis, ke Ĉinio devas esti regata de imperiestro. Pli ol iu ajn alia, li aktive instigis Yan Shikai (1859-1916), tiam prezidenton de la Respubliko, forĵeti la respublikan formon de registaro kaj surtroniĝi. Estis li, kiu preparis la politikan klimaton por la ambicia militaristo el Henan-provinco, ke tiu povu kroni sin mem imperiestro en 1916. Kiel imperiestro, Yuan daŭris nur okdek tri tagojn, sed la fiasko ne malvigligis la fervoron de Yang Du kiel politika makleristo. Tia li restis ĝis la malfruaj 1920-aj jaroj, kiam li plene seniluziiĝis pri siaj antaŭaj idealoj. Li do forĵetis sian monarkismon, kaj por li la politika pendolo komencis svingiĝi de la ekstrema dekstro al la maldekstro.

La komunismo altiris lin. Dank' al la perado de komunaj amikoj li konatiĝi kun membroj de la Partio en Ŝanhajo. Li decidis fariĝi partiano kaj petis pri aliĝo al la Partio. Sed, ĉar li estis tia fame konata politika figuro, Zhou Enlai, kiu fina aprobis la peton, pensis, ke Yang povas fari pli da bono kiel sekreta, subtera membro. Li destinis al Xia Yan, kiu aktivis en Ŝanhajaj kulturaj kaj kinaj rondoj, konservi unutrakan, duflankan interligon kun la nova komunisto. Yang ne partoprenis en aktivecoj de Partia filio, sed estis en kontakto kun la Partio per Xia Yan.<sup>7</sup>

Yang havis multajn amikojn en la urbego, inter kiuj estis Du Yuesheng, la ĉefo de la “Blua Bando” antaŭ la Liberiĝo, kiu donis monon kaj unu belan domon al lia dispono. Estis utile por Komunista Partio havi tian homon, kia Yang Du, kun tiel multaj diversaj sociaj rilatoj, en la tempo, kiam Ŝanhajo ĝemis sub la Kuomintanga terora regado. Tuj post sia aliĝo al la Partio, Yang vendis sian proprietajon, donacis la enspezojn kiel Partiajn kotizojn, kaj serioze laboris por siaj novaj kredoj.

Intime amikante kun militaristoj kaj politikistoj diversspecaj Yang Du estis rigardata de multaj kiel homo politike ŝanĝiĝema. Kiam la sekreto pri lia membreco de la Komunista Partio ne povis esti plu tenata, iuj dubis pri lia motivo kaj scivolis, ĉu li ja ne estas oportunisto. Li ĉagreniĝis pro tiaj nerektaj kalumnioj, kaj konfide diris al Xia Yan: “Mi aniĝis al la Partio tiam, kiam la regado de blanka teroro estis en sia pleja furiozeco. Se tio estis oportunismo, tio de estis oportunismo je risko de miaj propraj vivo kaj familio.”

Kiam Zhou kuŝis mortanta en la hospitalo, tiu ĉi eksterordinara figuro el la pasinteco subite venis al li en la kapon. Li volis esti certa, ĉu la servoj, kiujn Yang Du faris al la revolucio, jam estas dece rekonitaj. Li petis la kuratoron de la Ĉina Muzeo konstati, ĉu la

kompilantoj de *Cihai*, ampleksa referenca verko, kiu definitive eldoniĝis en 1979, havas artikolon pri Yang Du. Se jes, ili devos menciigi en tiu ĉi reviziita eldono de la vortaro la fakton, ke Yang Du estis membro de la Komunista Partio de Ĉinio.

Zhou Enlai volis, ke la posteuloj sciu, ke kvankam Yang Du estis parto de la plej konservativaj fortoj en sia meza aĝo, kaj cetere nerebonigebla monarkisto, tamen li finfine vidis la lumon kaj akceptis la komunismajn doktrinojn. Yang Du faris bonajn agojn en la lastaj jaroj de sia vivo kaj, Zhou Enlai pensis, li devas esti memorata.

Zhou Enlai, ĉiam admirata pro sia bona kono de internaciaj aferoj, ne malpliigis sian dumvivan intereson eĉ tiam, kiam li restadis en hospitalo. Forte dezirante esti konstante informata pri tio, kio okazas en la mondo, li postulis siajn sekretariojn fari plenan resumadon al li. “Mi povas aŭdi,” li diris al ili, “kaj mia menso ankoraŭ funkcias.” En sia hospitala ĉambro li ankaŭ plu intervidiĝadis kun eksterlandaj vizitantoj.

La lastatempe mortinta Henry M. Jackson, tiam influa senatano de la Usona Demokrata Partio, kaj lia edzino estis inter la unuaj akceptitoj de la ĉefministro en la 5-a de julio 1974. la raportaĵo publikigita en la ĉinaj ĵurnaloj en la sekvanta tago estis la unua novaĵo pri tio, ke Zhou Enlai enhospitaliĝis, ĉar la ĉinoj ne kutimis aperigi medicinajn bultenojn. Tiu ĉi gazetara raportado rompis precedencon. Xinhua-novaĵagentejo intence montris, ke gesinjoroj Jackson, amikoj de Ĉinio, jam ricevis tre honoran traktadon kaj, pli grave, ke estis sufiĉe veraj la onidiroj cirkulantaj en Pekino pri tio, ke la ĉefministro fariĝis viktimo de serioza, kvankam ne precize menciita, malsano. En la unuaj naŭ monatoj de 1975, Zhou Enlai donis tridek du intervidiĝojn al vizitantoj el la eksterlando, meznombro proksimume po unu semajne, kio devis esti rekordo por monda ŝtatisto de lia aĝo

(sepdeksep-jara) kun malfruastadia kancero.

Dum la konsiderinda malpliĝado de la korpopezo, tio, kio ĉagrenis Zhou Enlai eble pli ol io ajn alia, estis la fakto, ke liaj piedoj komencis ŝveli. Li ne plu povis surpiedigi ledajn ŝuojn por akcepti gastojn. Antaŭ ol lia malnova amiko, la korea gvidanto Kim Il Sung, laŭplane alvenis, Zhou Enlai farigis paron da malstrikte-sidantaj tolaj ŝuoj speciale por la okazo. Kvankam tiam serioze malsana, li tamen insistis pri sia ellitiĝo por bonvenigi la vizitanton el Pjongjang. Kim ne estis fremdulo al Pekino, kaj dum plej multaj el liaj antaŭaj vojaĝoj al Ĉinio estis Zhou, kiu akompanis lin al diversaj lokoj de la lando. Kim povis paroli la ĉinan mandarenan lingvon kaj tio, ke ili parolis unu al la alia sen interpretisto en neformalaj okazoj, helpis al ili fariĝi fidelaj amikoj. Tiu ĉi aprila vizito estis ilia lasta renkontiĝo.

Ilie Verdet, poste ĉefministro de Rumanio, estis la lasta fremdlanda vizitanto akceptita de Zhou Enlai en hospitalo, en septembro 1975. Tuj post sia alveno en Pekino Verdet esprimis deziron viziti la ĉinan ĉefministron, sed li dubis pri la ebleco. Se nur Zhou povus disponigi al li kelkminutan tempon, diris Verdet, li volus persone transdiri plej bonajn dezirojn de la rumania gvidanto Nicolae Ceausescu por la rapida resaniĝo de la ĉefministro. Dum sia vizitado al iu fabriko en la ĉefurbo li ricevis sciigon, ke Zhou Enlai volus intervidiĝi kun li en la hospitalo je la unua en la sama tago, la 7-a de septembro. Je la difinita horo Zhou eliris el sia ĉambro por saluti Verdet kaj membrojn de lia delegacio en la vestiblo.

La vizito devus esti mallonga; la kuracistoj permesis tempon sufiĉan nur por mallonga konversacio kaj fotografado. Zhou petis la gastojn iri en la akceptejon, kaj li mem paŝis apud ili kun granda malfacilo. Li rifuzis la proponon de helpo, kaj gastoj sentis kordoloron, vidante la penegon necesan al li por finfari la kelkajn paŝojn de la vestiblo ĝis la akceptejo.

Post la kutimaj salutvortoj Verdet delikate turnis la konversacion al la sano de la ĉefministro. Zhou ŝercis amare, ke li jam ricevis la vokon de Karl Marks pri aliĝo al li, kio ja estis nerifuzebla. Post li rememoris sian viziton al Bukareŝto antaŭ dek jaroj, en 1965, por ĉeesti la funebran solenon de Gheorghe Gheorghiu-Dej, postmilita gvidanto de

Rumanio. Tiam estis marto kaj tamen, li diris al la gastoj, eĉ sen palto li tute ne estis ĝenata de la malvarma vetero. Dum tiu vizito al Rumanio li marŝis kvar horojn en la funebra procesio, sed nun li ne povis piediri eĉ kvar minutojn. Li konservis belajn memorojn pri Bukareŝto, diris la ĉefministro, kaj malĝojis, ke li ne povas revidi tiun belan urbon.

La konversacio daŭris multe pli longe ol kiom la kuracistoj permesis, sed Zhou Enlai havis kelkajn vortojn, kiujn li volis ke la delegaciestro portu al Ceausescu – mesaĝon, ke la Rumaniaj kamaradoj ne bezonas esti maltrankvilaj pri la ĉina Partio malgraŭ la malfacilaj tempoj, kiujn ĝi estas trapasantaj (per tio li lerte aludis la “kvarpersonan bandon”). Bonvolu transdiri al kamarado Ceausescu, kaj li petis la delegaciestron doni atenton al liaj vortoj, ke la ĉina Partio, hardita en la kaldronego de batalo dum pli ol duona jarcento, havas korpuson da gvidantoj kapablaj, kompetentaj. Nun, li diris, la vicĉefministro jam prenis sur sin la plenan ŝarĝon de la registaro. En tiu ĉi momento iu eĉ la ĉina flanko intermetis klarigante, ke la ĉefministro aludas Deng Xiaoping, kiu sidas apud Verdet. En decidiga tempopunkto, Zhou Enlai emfazis, tiuj ĉi provitaj gvidantoj povas esti atendataj transpreni la kondukilojn.

Ĝis la vivofino Zhou estis lerta diplomato zorganta pri la plifortigo de la rilatoj inter Ĉinio kaj amikaj landoj.

La koro de la ĉefministro estis ĉiam alligita al du regionoj de Ĉinio – Taiwan kaj Tibeto – kaj eĉ kiam li kuŝis en sia hospitala lito, ili ne estis for el liaj pensoj. La deka datreveno de la fondiĝo de Tibeta Aŭtonoma Regiono venis en septembro 1975 kaj Hua Guofeng, tiam vicĉefministro respondeca pri la publika sekureco, estis elektita gvidi la



delegacion al Lhasa, la ĉefurbo de la regiono, por la datrevena celebrado.<sup>8</sup> Antaŭ la forveturo li iris al la hospitalo por demandi, ĉu la ĉefministro havas ian mesaĝon por la popolo de Tibeto. Zhou akceptis la ĉefministro kaj proponis, ke li portu kiel donacon al la tibetanoj du dokumentajn filmojn pri abelbredado por akceli la agrikulturon en la regiono. Neniam volante atribui al si la agojn faritajn por alies bono, Zhou admonis Hua ne menci, ke la filmoj venis de li. En 1951 li persone ŝarĝis sin per la traktado por aranĝi la pacan liberigon de Tibeto, kaj de tiam li ĉiam zorgis pri la progreso de tiu ĉi fora parto de la lando.

Kun areo ĉirkaŭ duoble tiel granda kiel tiu de la usona ŝtato Teksaso, kaj kun preskaŭ same abundaj naturriĉaĵoj sed malmulta loĝantaro de du milionoj, Tibeto estis la malplej evoluinta regiono kun nenia menciinda industrio en la tempo de sia liberiĝo. Zhou Enlai estis konsternita de ĝiaj malriĉeco kaj postrestinteco. Tiaj ordinaraj komercaĵoj kiel najloj, ŝraŭboj kaj alumetoj devis esti importitaj aŭ alveturigitaj per tervojo el Sichuan-provinco. Antaŭ ol oni finkonstruis du landvojojn tra la danĝera tereno en la fruaj 1950-aj jaroj por ligi ĝin kun Sichuan- kaj Qinghai-provincoj, estis pli facile vojaĝi al Tibeto per trapaso de Hindio.

Liberiĝo signifis komencon de nova vivo por la servutuloj, kiuj formis la plimulton de la loĝantaro. Kiel ĉiaspecaj teknikistoj kaj inĝenieroj, tiel ankaŭ instruistoj, estis treege bezonataj, kaj Zhou Enlai klopodis por sendi tiajn personojn al Tibeto. La konstruo de la Sichuan-Tibeta kaj Qinghai-Tibeta landvojoj, kiuj prezentis eksterordinarajn atingojn de inĝeniertekniko, en la tempo, kiam la aertransportado de Ĉinio estis ankoraŭ en sia infaneco, helpis konsiderinde plibonigi la kondiĉojn en Tibeto. Post nelonge la regiono

vidis la aperon de siaj unuaj fabrikoj, elektraĵaj centraloj, modernaj domoj kaj fine la inaŭguron de regula aerveturado inter Lhasa kaj Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan.

Por akceli la nacian unuecon, Zhou Enlai rekomendis al oficistoj de la han-nacieca deveno kaj oficistoj de la tibeta lerni la lingvojn unu de alia. Li ofte pridemandis han-naciecajn kadrojn, kiuj revenis al Pekino por ĝui sian libertempon aŭ raporti pri sia laboro, por vidi, kiel bone ili identigis sin kun la lokaj popolanoj, inter kiujn ili iri vivi kaj labori. Li starigis severan regulon, ke ĉiuj hanlingve-parolantaj registaraj funkciuloj malpli-ol-kvindekjaraj, kiuj estas senditaj labori en Tibeto, devas ellerni paroli la tibetan lingvon. Por tiuj sub la aĝo de kvindek jaroj tio estas deviga, li diris, kaj por tiuj super la aĝo tio estas rekomendinda. La direktivo plaĉis al la tibetanoj.

Hua Guofeng estis la dua altranga registara oficisto, kiun Zhou Enlai sendis fari inspektan vojaĝon al la sudokcidenta altebenaĵo; la unua estis Marŝalo Chen Yi antaŭ la “kultura revolucio”. Kvankam li mem jam vojaĝis al plej multaj partoj de Ĉinio dum siaj jaroj, kaj al kelkaj lokoj plurajn fojojn, li tamen neniam trovis tempon por viziti la lokon, kiu antaŭe estis konata kiel la lando de lamaoj. Li sciis, kiajn oferojn ĉiuj tiuj homoj el aliaj partoj de la lando devas fari por alkitimiĝi al la maldensa atmosfero de Tibeto, kaj li petis Hua doni en lia nomo kuraĝigon kaj laŭdon al tiuj diligente laborantaj kadroj.

Kiam li sidis sur sia hospitala lito, pripensante la plej ĉefajn aferojn unu post alia, li opiniis grava por kadroj de la tibeta deveno esti trejnataj por anstataŭi tiujn de la hana deveno, kiel en ĉiuj naciecaj regionoj, kie la ĉefgenta grupo devas en la estonteco formi la kernon de la administracio. Li deziris, ke Hua atentigu la hanajn kadrojn en gvidanteco pri tio, ke pli gravas kvalito ol kvanto en la trejnado de tibetaj funkcioj. Se la politiko rilate

al la naciecoj estos bone plenumata, se la trejnado de tibetaj kadroj estos kondukata en kontentiga maniero, se la diversnaciecaj popolanoj vivos kaj laboros kune en amikeco, se la produkto kreskos kaj la vivtenado pliboniĝos, mallonge dirite, se se ĉio ĉi tio efektiviĝos, tiam ĉio estos en bona stato kaj la estonta progreso de la Tibeta Aŭtonoma Regiono estos certigita. Tio estis la bazo de la instrukcio de Zhou, kiam li deziris al Hua Guofeng bonan vojaĝon al Lhasa.

Ĉu estos efkika kuracrimedo kontraŭ kancero? Zhou Enlai, mem viktimo, kredis, ke en proksima estonteco tia rimedo povos kaj devos sin trovi. Li estis optimisma, ke profitante el la riĉa provizo de spertoj kaj scioj de tradicia ĉina medicino, Ĉinio havas bonŝancon trovi pli-malpli frue ian metodon por venki tiun ĉi teruran murdiston. Antaŭ ol li mortis, li esprimis la ardan deziron, ke la nuna generacio de ĉinaj kuracistoj, la tradiciaj kaj la Okcidentaskolaj, kiuj kune laboras, devas havi la ambicion fari tian trarompon. Lia interesiĝo pri tiu ĉi demando komenciĝis ne tiam, kiam li mem estis trafita de kancero. Multajn jarojn antaŭe, kiam li estis centprocente sana, li havis en sia Zhongnanhai-a oficejo unu murgrafikaĵon montrantan tiujn partojn de la lando, kiuj havas la plej altan morbokvanton de ezofaga kancero. Li donis malavaran subtenon al la esplorado sur tiu ĉi kampo.

Poste en novembro 1969, sen aprobo de Mao Zedong kaj sen konsento de Zhou Enlai, la milita ĉefkomandejo publikigis en la nomo de Lin Biao “militalarmon”, por dissendi ĉiujn tiel nomatajn ne-esencajn instituciojn kaj personojn al la kamparo. Projektita de Lin Biao kaj lia bando kiel paŝo faciligi la efektivigon de ilia plano kapti la regpotencon, tio estis oportuna preteksto por forpeli al la kamparo homojn kaj organizaĵojn, kies ekziston

en la ĉefurbo ili trovis baranta al ili la vojon. Sed la manovro, efektivigita sendistginge, trafis multjn establojn, kiuj ne devus esti disigitaj en ĉiaj ajn cirkonstancoj.

Unu el tiuj estis la Pekina Tumorhospitalo, kiu fondiĝis nur kelkajn jarojn antaŭe. Zhou Enlai estis indignigita de la nerespondeca sinteno kaj stulteco de Lin Biao kaj lia bando. Kancer-esplorado, li protestis, devas daŭri kaj la ago disigi la hospitalon devas esti haltigita. Li postulis, ke medicinistoj kaj esplristoj tra la tuta lando daŭrigu sian utilan laboron sur tiu ĉi kampo.

En februaro 1975, kelkan tempon antaŭ ol li submetis sin al operacio, li vokis al sia flanko la partian sekretariinon de Ritan-hospitalo<sup>9</sup>, kie Marŝalo Chen Yi ricevis kuracadon en siaj lastaj tagoj. Li faris tion ne pro sia malsano; li informiĝis, ke la morbokvanto de pulmokancero kreskas inter la stanministoj en la sudokcidenta provinco Yunnan. La ĉefministro demandis la partian sekretariinon, ĉu ŝi scias pri tio, kaj postulis, ke ŝi tuj sendu medicinan taĉmenton tien, por vidi kion oni povas fari kontraŭ la kreskado. Li rememoris, kiel kancero forrabis la vivon de la marŝalo kaj multaj aliaj, kaj esperis, ke ĉiuj sur tiu ĉi kampo diligente laboros, por trovi ian solvon.

Tre malmulte oni scias pri la intereso de Zhou Enlai por la tradicia ĉina medicino. La alte taksis akupunkturajn kaj aparte ĝojis, ke akupunktura anestezo rapide progresis en la periodo post la Liberiĝo. Li prenis ĉiajn eventualojn en konsideron. Kio okazos, se milito eksplodos? Tiukaze, akupunktura anestezo havos apartan avantaĝon en urĝa kirurgia operacio. Dum anestezaĵaj drogoj estas ne ĉiam haveblaj, la kirurgo povas helpi al si, portante en sia medikamenta saketo akupunkturajn nadlojn, kiuj apenaŭ okupas spacon kaj kostas preskaŭ neniom, li postulis, ke kirurgoj en armeaj kaj aliaj hospitaloj ellernu la

teknikon de akupunktura anestezo. En oktobro 1975 estiĝis novaĵo pri trarompo en teoriaj esploroj pri tiu temo fare de la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj. Kvankam tiam serioze malsana, Zhou Enlai petis la akademion prepari por si raporton pri la temo. Bedaŭrinde li ne ĝisvivis la tagon por ĝin legi.

Zhou kredis, ke la kombino de la tradicia ĉina medicino kun la Okcidenta povos naski multajn efikajn novajn terapiojn. Li forte rekomendis larĝan disvastigon de la scioj de la tradicia ĉina medicino kaj kondukadon de kuna esplorado fare de tradiciaj ĉinaj kaj Okcident-skolaj kuracistoj. Publikigode diagnozoj kaj preskriboj, lo kredis, multeutilos por riĉigi la sciojn de Okcident-skolaj kuracistoj per la esenco de la tradicia ĉina medicino.

Antaŭ sia enhospitaliĝo Zhou demandis Gao Huiyuan, disĉiplon de Pu Fuzhou (1888-1975), la fame konata kuracisto de la tradicia ĉina medicino, ĉu lia majstro, tiam vicdirektoro de la Akademio de Tradicia Ĉina Medicino, skribis ion pri siaj riĉaj spertoj. Li tion faris, diris Gao, efektive ekzistas manuskripto skribita de lia majstro kun lia helpo kaj prezentita por eldonado. Sed burokratoj lasis ĝin kuŝanta en malluma angulo por kolekti polvon. Feliĉe, li diris al la ĉefministro, li jam retrovis la manuskripton, kiu bone konserviĝas en lia mano. Tuj sendu ĝin al mi, Zhou diris al Gao. Nokte la ĉefministro legis tiujn ĉi dokumentojn kun granda intereso kaj estis multe impresita. Li skribis instrukcian noton por instigi ĝian tujan publikigon. *Diagnozoj kaj Preskriboj de Pu Fuzhou* rikoltis vastan legatcon en ĉinaj medicinaj rondoj.

Konvinkite pri tio, ke estontaj generacioj profitos de la plej bonaj medicinistoj el la pasinteco, Zhou Enlai kaptis ĉiun okazon por akcenti la gravecon igi fakulojn pri medicino, kiel tradiciajn ĉinajn kuracistojn, tiel ankaŭ Okcident-skolajn kuracistojn, meti sian

distilitan saĝon en skribitecon, dum tio ĉi estis ankoraŭ ebla. Tio, kion li pleje timis, estis ke efikaj tradiciaj kuracmetodoj, ofte gardataj kiel trezoraj sekretoj de familioj, kiuj ilin heredis, povus esti perditaj por ĉiam. Tiaj kuracmetodoj, ĝenerale heredigitaj de patro al filo, povas plej bone konserviĝi en preskita formo, li diris. En la aŭtuno de 1975 Luo Ruiqing, la antaŭa estro de la ĉefstabo, ricevis kuracadon de ortopediisto en Fuzhou, Fujian-provincol li estis tiel impresita de sia travivaĵo, ke li detale rakontis al Deng Yingchao pri la kuracado de la okdekjaro ortopediisto. Estas domaĝe, diris Luo, ke la kuracisto ne ricevas justan rekonon kaj ili havas neniun por inici pri siaj scioj kaj arto.

Kiam Zhou Enlai sufiĉe resaniĝis post operacio por esti informita pri tio, kio estis okazanta ĉirkaŭ li, lia edzino menciis la altelefonadon de Luo Ruiqing kaj, kompreneble, la rakonton pri la ortopediisto en Fuzhou. La reago de la ĉefministro estis antaŭvidebla. Li instrukiis al la Fujian-provinca registaro, ke ĝi faru tujan aranĝon, ke kvalifikitaj asistantoj helpu la maljunan ostmanipuliston en resumado kaj surpaparigo de liaj dumvivaj spertoj por publikigo. Ili estos valorega heredaĵo por estontaj studentoj de ortopedio, li diris. Krome, Zhou ĉiam estis en serĉado de vojoj ebligi al la vasta loĝantaro de Ĉinio ĝui medicinan kuracadon, malgrandigante al ili la suferon kaj elspezon ĝis minimumo. Jen estas konkreta ekzemplo koncernanta virinojn, kiuj suferis eksteruteran gravedecon.

En 1972 la ĉefministro ĉeestis al medicina konferenco. Apud li sidis d-ino Lin Qiaozhi (1901-1983) el Fujian-provinco, ĉina unuaranga ginekologo. D-ino Lin Qiaozhi, tiam vicedirektoro de la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj, diplomitiĝis el la Pekina Unueca Medicina Kolegio, institucio financita antaŭ 1949 de Rockefeller-fonduso, kaj faris postdiplomitiĝan studadon eksterlande. Ŝi estis membro de la unua ĉina kuracista delegacio por viziti Usonon post la historia vojaĝo de Richard Nixon al Ĉinio. Zhou Enlai, kiu ricevis raporton pri ebla kuracado kontraŭ eksterutera gravedeco per herbodrogo, demandis d-inon Lin, kiel ŝi kaj aliaj Okcident-skolaj kuracistoj kuracas tiajn pacientojn. Plejofte, ŝi respondis, ni operacias.<sup>10</sup>

Zhou Enlai do diskutis kun ŝi pri la graveco de nekirurgiaj rimedoj kontraŭ diversspecaj malsanoj. La plejparto de la ĉina loĝantaro, li klarigis, estas en la kamparo,

kie multaj kamparanoj timas operaciojn kaj la kuracaj kondiĉoj estas malbonaj kaj limigitaj. Li volis, ke ŝi provu uzi herbojn anstataŭ la skalpelon por eksterutera gravedeco, kaj ankaŭ akcentis al ŝi la necesecon lerni kaj profiti el la riĉa provizo de tradiciaj ĉinaj terapioj.

Kiam lia kancero estis unuafoje diagnozita en 1972, Zhou Enlai devus ĉesigi sian tutan laboron kaj enhospitaliĝi por ricevi kuracadon. Sed nenies persvado – eĉ ne de Mao Zedong – povis rapide forŝiri lin de lia oficejo en Zhongnanhai. Ne pro tio, ke li alkroĉiĝis al la potenco. En lande kaj en la internacia areno, li protestis, estas tiom multe da fendaĵoj. Tiel multaj “malhonoritaj” kadroj bezonas esti liberigitaj kaj denove enoficigitaj. Kaj kiom da penoj estas bezonataj por reordigi la pertorbitan ekonomion! Kaj tamen tro baldaŭ necesigis enhospitaligon lia malsano, pliseverigita de konsumiĝo pro troa laboro kaj de la turmentado de la ekstrem-maldekstruloj.

Tuj kiam li enhospitaliĝis, la Partia Centra komitato devis fari ĉiajn decidojn pri la kuracado postulata – kutimo, kiun ĝi sekvis por ĉiuj superaj gvidantoj. Tio ĉi donis ŝancon al la “kvarpersona bando”. En la nomo de la Centra Komitato, kaj ne malofte de Mao Zedong, Jiang Qing kaj ŝia bando faris nekredeblan multegon da ĝenoj, kiuj malhelpis la laboron de la kuracistoj kaj flegistinoj destinitaj por prizorgi la ĉefministron.

La edzino de Mao ofte altelefonis aŭ persone alvenis kaj insistis, ke ia aŭ alia kuraco estu prokrastata dum ŝi diskutas kun la ĉefministroj pri gravaj aferoj. Poste ŝi senĉese babilaĉis pri bagateloj proksimume unu horon. Foje, kiam Zhou estis sangtransfuzata, Wang Hongwen altelefonis postulante, ke Zhou mem respondu lian telefonon. Post iom da argumentado la kuracistoj cedis al Wang Hongwen, kiu paradis per sia aŭtoritato. Kun

robo ĵetita de flegistino sur la ŝultrojn de la ĉefministro, la malsanulo, kiu apenaŭ povis piediri, pene alpaŝis por levi la aŭdilon. La paroltemo, kompreneble, tute ne estis urĝa. En almenaŭ tri okazoj la ĉefkuracistoj destinitaj por prizorgi la ĉefministron estis ordone forvokitaj por prizorgi Jiang Qing.

Poste okazis la sonbend-afero. En la 1960-aj jaroj Zhou Enlai helpis en komponado de la “Kantoj de la Longa Marŝado” el *Ruĝas la Oriento*, epopea kantodanca teatraĵo pri la Ĉina Revolucio. Ĉiuj plej bonaj filmoj kaj teatraĵoj faritaj antaŭ la “kultura revolucio”, pro kiuj Jiang Qing povis pretendi al si nenian honoron, inkluzive de *Ruĝas la la Oriento*, estis jam de longe formetitaj de ŝi en keston de forgeso.

Zhou Enlai ĉiam amis “Kantojn de la Longa Marŝado”, kiu rememorigis lin pri tiu herooa travivaĵo, kiun li dividis kun sia edzino kaj multaj maljunaj kamaradoj. Li petis pri sonbendoj de tiu ĉi muzikaĵo por pasigi la longajn horojn en sia hospitala lito – unu simpla peto, kaj tamen ĝi estis rifuzita.

La agento de Jiang Qing en la Ministrejo de Kulturo, kiu tenis la bendojn en siaj manoj, ĉiel klopodis, ke la speciale petitaj sonbendoj neniam atingu la ĉefministron. Tio estis malnobla, senkompata ago farita kontraŭ homo mortanta!

Zhou Enlai, ĉefministro de la Popola Respubliko dum pli ol kvarono de jarcento kaj unu el la plejsuperaj gvidantoj de la Ĉina Revolucio, faris sian lastan spiron je la naŭa kaj kvindek sep minutoj en la mateno de la 8-a de januaro 1976.

Antaŭ ol la fino venis, je la dekunua en la antaŭa nokto, Zhou Enlai duone malfermis siajn okulojn je la lasta fojo kaj malforte flustris al la kuracistoj kaj flegistinoj ĉirkaŭ si: “Ĉi tie jam estas preskaŭ nenio, kion vi povas fari por mi. Iru prizorgi la aliajn, kiuj vin pli bezonas...”

Iom poste Zhu Dianhua, la fidela barbiro de Zhou, estis alvokita por helpi prepari la



korpon por la adiaŭa ceremonio honore al la ĉefministro. Larmoj ekfluis rivere sur liaj vangoj, kiam li klinis sin por rigardi sian amikon, la longe kaj hirte kreskintan barbon kaj la konatajn, siatempe brilantajn okulojn, kiuj nun estis fermitaj por ĉiam. Farante tiun ĉi lastan servon al la ĉefministro, li sentis la koron ŝirata.

Kaj la novaĵo disvastiĝis, kaj ĉie en Ĉinio estiĝis larmoinundo.

**Notoj:**

1. Yang Ĝengmin estas konstanta komitatano de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco; Deng Yingchao estas honora prezidantino de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj.

2. “Amata Ĉefministro Zhou Enlai Ĉiam Vivos en Nia Koro” en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. III, p. 474.

3. “Lau” (maljuna) estas prefikse aldonata ĝenerale al familia nomo, iatempe antaŭ al persona nomo, por signi intimecon al kunulo aŭ subulo. – Trad.

4. “Ĉefministro Zhou Enlai Ĉiam Zorgis pri la Eldona Laboro de la Lando” en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, vol. II, p. 372.

5. “Memorigo pri la Unua Datreveno de la Morto de la Amata Ĉefministro Zhou” en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. I, 5.

6. “Neforgeseblaj Memoroj” skribita de Wang Yejiu en kolektita volumo portanta la saman titolon, eldonita de la eldonejo de *Popola Tagĵurnalo*, Pekino, 1979.

7. La artikolo de Wang Yejiu estis kvazaŭ katalizilo, inspirante plurajn aliajn skribi siajn impresojn pri Yang Du. Xia Yan verkis artikolon titolitan “Kelkaj Aferoj pri Kamarado Yang Du”, kiu ankaŭ aperis en la kolektita volumo (vidu noton 6), p. 297.

8. “Ĉefministro Zhou Enlai Ĉiam Vivos en la Koro de la Tibeta Popolo” en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. I, p. 212.

9. “La Ĉefurbaj Medicinaj Rondoĵoj Omaĝas al la Amata Ĉefministro Zhou” en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. III, p. 441.

10. “La Pekina Popolo Pensos pri Vi” en *Memore al Ĉefministro Zhou Enlai*, Vol. II, p. 138. Ankaŭ “Ĉefministro Zhou Montras la Vojon al la Medicinistoj por Surprimi la Pinton de Medicina Scienco” en *La Amata Ĉefministro de la Popolo*, p. 392.

# KRONIKO

- 1898 Naskita la 5-an de marto al iam prospera mandarena familio, en Huai'an, Jiangsu-provinco kiel ido de multaj kleruloj-ŝtatfunkciuloj.
- 1910-1917 Veturas kun onklo al nordorienta Ĉinio. Vizitas elementan lernejon en Shenyang kaj la mezlernejon Nankai en Tianjin. Laboras en postlecionaj horoj por kovri la nesufiĉon de siaj vivrimedoj.
- 1917 Vojaĝas al Japanio por studi kaj serĉi respondojn al Problemoj de Ĉinio. Partoprenas en protestoj kontraŭ la invado de Japanio al Ĉinio. Disvolvas seriozan intereson pri marksismo.
- 1919 Revenas en Ĉinion, sin ŝarĝas per redaktado de progresema studenta ĵurnalo en Tianjin. Rariĝas gvida forto en studenta sektoro de la fama Movado de la 4-a de Majo kontraŭ feŭda subpremo kaj eksterlanda superregado. Estas enkarcerigita mallonge kaj minacata per ekzekuto. Renkontiĝas kun sia estonta edzino Deng Yingchao, ankaŭ aktiva en la movado.
- 1920-1921 Veturas al Francio kiel laboristo-studento. Organizas marksistan grupon inter ĉinoj studentaj aŭ laborantaj en Francio, kaj alian en Germanio. Ambaŭ poste kuniĝas kun la Komunista Partio de Ĉinio, fondita en Ŝanhajo en 1921.
- 1924-1925 Revenas en Ĉinio, fariĝas politika direktoro de Huangpu-militakademio en Guangdong-provinco dum la periodo de Komunist-Kuomintanga Kunlaborado kontraŭ la nordaj militaristo. Edziĝas al Deng Yingchao en 1925.
- 1927 Aprilo: Gvidas la armitan leviĝon de Ŝanhajaj laboristoj, kiu prenas la urbon el la

- manoj de militaristaj fortoj antaŭ la alveno de la Komunist-Kuomintanga Norden-ekspedicia Armeo. En la daŭro de unu semajno Ĉjang Kajŝek sin turnas kontraŭ siaj komunistaj kaj progresemaj aliancanoj en sanga masakro. Zhou apenaŭ forsavas sin. Aŭgusto: Organizas la Nanchang-an Leviĝon en Jiangxi-provinco, evento signanta la naskiĝon de la Popola Liberiga Armeo.
- 1927-1931 Faras subteran revolucian laboron en Ŝanhajo kaj aliaj lokoj, kune kun Deng Yingchao.
- 1931 Fariĝas unu el la plejsuperaj gvidantoj de la Centra Revolucia Bazregiono en Jiangxi-provinco en la sudoriento.
- 1934-1935 Helpas organizi kaj gvidi la faman Longan Marŝadon al Yan'an en la nordokcidento (Deng Yingchao estas unu el la dekoj da virinoj farantaj la marŝadon). En plivastigita kunveno de la Partia Politika Buroo en Zunyi, Guizhou-provinco, en januaro 1935, decideme subtenas Mao Zedong kiel la novan gvidanton de la Partio kaj armeo.
- 1936 Dum Xi'an-evento, reprezentas la komunistan flankon en delikata triflanka intertraktado kun Ĉjang Kajŝek kaj du el liaj propraj generaloj, kiuj forkaptis lin kun la celo devigi lin kontraŭbatali la japanajn invadantojn anstataŭ la ĉinajn komunistojn.
- 1937-1945 Funkcias kiel ĉefa proparolanto kaj intertraktanto de la komunista Partio dum la tempo de la Komunist-Kuomintanga unuecfronto kontraŭ la japana agreso, unue en Chongqing kaj poste en Nankino.
- 1946 Post la venko super Japanio kaj la rompiĝo de intertraktado pri paco kun

Kuomintang, revenas al Yan'an por helpi prepari la strategion kaj taktikojn kondukantajn al tutlanda venko en la revolucia batalado.

1949-1976 Kiel ĉefministro de la Popola Respubliko, kontrolas registaran administradon.

Internacie, fariĝas unu el la mondaj grandaj ŝtatestoj, konata precipe pro siaj kontribuoj al la solidareco inter la landoj de la Tria Mondo kaj al la formulado de la Kvin Principoj de Paca Kunekzistado.

1966-1976 dum la tumulto de kla "kultura revolucio", faras sian plejblon por teni la registaron kaj ekonomion funkciantaj kaj samtempe penas protekti tiujn, kiuj estis maljuste persekutataj de Lin Biao kaj la "kvarpersona bando". Enhospitaliĝinta por kancero en 1974, daŭrigas direkti ŝtatajn aferojn el sia malsanula lito ĝis sia morto en la 8-a de januaro 1976.

*PROFILO DE ZHOU ENLAI* estas libro tre ĝuiga, kiun la aŭtoroj verkis kun granda amo al la heroo eĉ nun nomata en Ĉinio kiel "estimata ĉefministro". Eble neniu alia moderna persono en la mondo estis tiel vaste funebrita de sia popolo, kiel Zhou Enlai, kiam li forpasis pro kancero en Januaro, 1976. La libro estas eldonita por memori la dekan datrevenon de lia forpaso kaj ankaŭ por kontentigi la bezonon koni la novan Ĉinion, por kiu Zhou Enlai, Maŭ Zedong kaj iliaj kamaradoj batalis dum jardekoj, kaj la hodiaŭan Ĉinion entreprenantan klopodon por modernigo, kiu entenas la politikan kaj administran genion de Zhou Enlai.

Laborinte 30 jarojn en Ĉinio kaj vivinte dum longa tempo en la Okcidento, la aŭtoroj bone konas ne nur la scenon de Ĉinio, sed ankaŭ okcidentajn legantojn. Tiu neformala biografio de plej elstara diplomato kaj registara ĉefo de Ĉinio estas kristaliĝo de ilia sperto akirita en la Oriento kaj en la Okcidento. La libro verkita originale en la angla lingvo estas oferita speciale al okcidentaj legantoj. Neniu alia libro pri tiu eksterordinara figuro havas tiel multajn rakontojn kaj anekdotojn aŭ tiel akraŭdajn komentariojn pri Zhou Enlai kaj Mao Zedong, pri iliaj diferencaj fonoj, pri ilia longedaŭra kunlaboro, pri iliaj propraj strategioj kaj atingoj kaj pri iliaj respektivaj inklinoj kaj malsukcesoj. La analizoj pri la du viroj estas tre fascinaj.

Percy Jucheng Fang naskiĝis en Levuka, Fiĝioj, en 1914. Li studis en Qinghua-universitato en Pekino kaj poste en la Londona Ekonomika Kolegio. Lucy Guinong Fang naskiĝis en Danyang de Jiangsu-provinco, Ĉinio, en 1914 kaj studis ankaŭ en Qinghua-universitato pri okcidenta literaturo. Same kiel la edzo, ŝi diplomitiĝis en 1938. La geedza paro pasigis la plejparton de la militaj jaroj en Hindio, kaj fine de 1945 iris al Britio por perfektigi sian studon kaj partatempe labori por la Brita Brodkasta

Korporacio. Reveninte al Ĉinio en 1949, la geedza paro dediĉis sin al ĵurnalismo kaj nun jam emeritiĝis respektive de Pekina Revuo kaj Radio Pekino Internacia.